

Leteroj
de E. Lanti

KUN
ANTAŬPAROLO
DE

PROFESORO G. VARINGJEN



SAT-Broŝurservo
F-47340 Laroque
1987 * 45 FF

Leteroj
de E. Lanti

KUN
ANTAŬPAROLO
DE

PROFESORO G. VARINGJEN



ENHAVO

Eldona pravigo	II
Klarigo	5
Antaŭparolo	7
Al la Forironto	11
Letero Unua. - Migremo	13
„ Dua. - Sennaciismo kaj pasporto	19
„ Tria. - Parolas arbaro	24
„ Kvara. - Kantismo - diismo	27
„ Kvina. - Lingvaj demandoj	31
„ Ses. - „ „	34
„ Sepa. - „ „	37
„ Oka. - „ „	42
„ Naŭa. - „ „	47
„ Dek. - Advokatecaj diroj	49
„ Dek-Unua. - Kvazaŭa konfeso pri Sovetio	54
„ Dek-Dua. - Konscienco kaj perĉiarimedeco	60
„ Dek-Tria. - Moskva mistiko	61
„ Dek-Kvara. - Monismo - Dualismo	63
„ Dek-Kvina. - Rolo kaj karaktero de SAT	66
„ Dek-Sesa. - Pri Polico	70
„ Dek-Sepa. - Rabelezo kaj herezo	72
„ Dek-Oka. - Dubemo	79
„ Dek-Naŭa. - Relativa signifo de titoloj	80
„ Dudeka. - Persekutatoj - persekutantoj	81
„ Dudek-Unua. - Respondo al enketo	83
„ Dudek-Dua. - Marksismo - sennaciismo	87
„ Dudek-Tria. - Se Marks vidus la aplikon de sia teorio...	93
„ Dudek-Kvara. - La sennaciistoj estu modestaj...	95
„ Dudek-Kvina. - Pri kunlaborado de Lanti al Sovetia ĵurnalo	97
„ Dudek-Sesa. - Organizita trompado	98
„ Dudek-Sepa. - Mensoganto senmaskigita	99
„ Dudek-Oka. - Okuloj malfermigis	100
„ Dudek-Naŭa. - Preĝejoj bruligitaj...	101
„ Trideka. - Eblo de faŝismo en Francio...	102
„ Tridek-Unua. - ...Emancipiĝi de kuratoroj	104
„ Tridek-Dua. - Racio? intuicio? indulgemo!	106
„ Tridek-Tria. - Kun ĉina kaj japana esp-istoj en Hongkong	110
„ Tridek-Kvara. - Impresoj el Tokio	112
„ Tridek-kvina. - Pripensoj el Tokio	114

Letero	Tridek-Sesa. - Inter japanaj kamparanoj	121
„	Tridek-Sepa. - Pripensoj el japana kamparloko	123
„	Tridek-Oka. - El Japanio al la filozofo- verkisto Han Riner	125
„	Tridek-Naŭa. - El Japanio pri perforto kaj cetero	132
„	Kvardeka. - Pri japana polico kaj cetero	135
„	Kvardek-Unua. - El Japanio pri moralo kaj historia materialismo	141
„	Kvardek-Dua. - El Japanio pri kelkaj temoj	150
„	Kvardek-Tria. - El Japanio pri budaismo, polico ktp.	153
„	Kvardek-Kvara. - El Japanio pri la Moskva faŝismo	155
„	Kvardek-Kvina. - El Osaka pri sinmortigo de SAT-anino	156
„	Kvardek-Sesa. - El Osaka pri la ĉin-japana milito kaj cetero	159
„	Kvardek-Sepa. - El Osaka pri moralo kaj budaismo	162
„	Kvardek-Oka. - El Osaka pri japanaj virinoj	165
„	Kvardek-Naŭa. - El Osaka pri la morto de SAT-ano	176
„	Kvindeka. - Surŝipe al Aŭstralio	179
„	Kvindek-Unua. - Pri judismo	180
„	Kvindek-Dua. - Pripensoj el Aŭstralio	182
„	Kvindek-Tria. - Pri Aŭstralio, Japanio kaj Hispanio	184
„	Kvindek-Kvara. - Impresoj pri la vivo en Sidnejo	185
„	Kvindek-Kvina. - Pri moralo kaj cetero.	187
„	Kvindek-Sesa. - El hospitalo en Aŭstralio	193
„	Kvindek-Sepa. - Kulto al kadavroj	193
„	Kvindek-Oka. - Pri sennaciismo	197
„	Kvindek-Naŭa. - Pri sennaciismo	218
„	Sesdeka. - Pri sennaciismo	229
El diversaj leteroj		240
Listo de l'verkaj de E. Lanti		III

KLARIGO

En ĉi tiu libro troviĝas la senĝena pensesprimo de K-do Lanti pri la esperanta afero ĝenerale ; pri la skismo, kiu okazis en nia movado ; pri marksismo, bolŝevismo, judismo, moralo ktp.; pri budaismo, Rabelezo, japanaj virinoj ktp. ktp. Se oni rimarkas, ke tiuj leteroj estis skribitaj en la plej diversaj lokoj de nia planedo, ekzemple, en Narvik, kiu situas 100 km. trans la polusa cirklo norda, en Japanio, Aŭstralio, Portugalio, Francio ktp., ĉiu facile komprenos, ke la skribinto povis prikonsideri aferojn laŭ larĝa kaj profunda perspektivo. Almenaŭ ni mem havis grandan intereson kaj plezuron en la legado de tiuj Lanti-aĵoj ; tial ni klopodis, por ke ĉiuj esperantistoj havu la eblon ankaŭ ĝui tiun legaĵon.

Rilate al ĉa elekto kaj aranĝo de l' materialo kolektita, ni renkontis malfacilaĵojn. Ne povis temi pri enmeto de l' tuto ; sed ni ne estas certaj, ĉu nia elekto estis ĉiurilate trafa. Povas esti, ke ni formetis kelkajn leterojn, kiuj trovus ĉe iuj legantoj pli da ŝato ol tiuj, kiujn ni enmetis. Plie, ial ni forstrekis kelkajn partojn, kiuj ankaŭ povus interesi legantojn. Nu, ni almenaŭ povas diri, ke ni agis bonintence, se ne ĉiel trafe.

Pri la ordo alprenenda ni ankaŭ estis en granda embaraso. Ĉu ordigi laŭdate aŭ laŭteme ? En pluraj leteroj pli ol unu temo estas pri-parolita. Ordigo laŭ datoj ankaŭ ne estus taŭga kelkrilate. Tial ni decidigis por aranĝo, kiu, niaopinie, ebligos al la legantoj unue ekkoni la personecon de l' verkinto kaj poste kompreni lian spiritostaton kaj sintenon antaŭ diversaj demandoj.

Tamen rilate la longajn leterojn pri sennaciismo, ni ne ŝanceliĝis por decidi, ke ili devas esti kunigitaj kaj ordigitaj laŭdate, kiel ili aperis en "**Herezulo**". Tiuj leteroj ja estas unuaj kaj povus konsistigi tutan broŝuron. Ni opiniis necese represigi tiujn leterojn, tial ke jam delonge ne plu ekzistas kolektoj de la revueto menciita kaj tial ke sen konatiĝo kun tiuj tekstoj la penso de Lanti povus iel montriĝi vere kaŝita. Nepre necesas, ke ĉiuj legantoj de ĉi tiu volumo havu la eblon konatiĝi kun tio, kion skribis nia K-do pri sia preferata temo.

Ĉu aldoni titolon al ĉiu letero ? Pri tio ankaŭ ni ŝanceliĝis. Fine ni decidis ne fari tian aranĝon, sed simple indiki la enhavon de la letero en la enhavtabelo, kiun ni enmetis komence de l' volumo.

Pro sia herezemo Lanti memkompreneble altiris al si kritikojn kaj

eĉ malsimpaton en kelkaj rondoj. Sed ni scias, ke dum sia gvidado super S.A.T. li ĉiam celis esti lojala al ĉiuj tendencoj, ekzistantaj en la laborista kaj revolucia movadoj. Pro tio, ke li sukcesis malebligi, ke nia Asocio fariĝu kvazaŭ filio de iu politika partio, Lanti estis dum kelkaj jaroj la celtabulo de ĉiaj partifanatikuloj. Sed li forlasis la gvidpostenon nur kiam la pafintoj kaj insultintoj fariĝis senpovaj. Tial ni opinias, ke la eldono de ĉi tiu volumo estas nur eta parto de danko al tiu, kiun oni iajoje nomas la "Patro de S.A.T.".

AMIKOJ DE LANTI.

Oktobre 1938.

=====

ANTAŬPAROLO

Erôtêtheis pothern eié - Kosmopolitês, ephê (1). Tiu antikva aforismo pri Diogeno plej bone difinas la novan koncepton, kiun la plej aŭdaca el la helenaj filozofoj, la fama cinikulo, faris al si pri la vera situacio de l'saĝulo en, aŭ pli ĝuste, ekster la ŝtato. Estis la unua fojo en la historio de l' homaro, kiam pensulo kuraĝis levi la kapon kontraŭ tiun timigan monstron, la ŝtaton, kiu sub diversaj, pli-malpli perfektigitaj formoj, de la klano ĝis la vastegaj orientaj imperioj aŭ la malvastaj helenaj civitoj, obstine sufokis ĉian individuecon. Kaj tion Diogeno povis fari nur dank'al tiu favora cirkonstanco, ke la helena fariĝis kvazaŭ komuna lingvo en la tuta oriento, kaj tiel iom post iom estiĝis pensmaniero pli kaj pli libera je la katenoj de la ŝtataneco.

Estas frapanta fakto, ke, kiam, post la longaj ĥaosaj jarcentoj de l' feŭda reĝimo, ree, sub la nova specifa formo de l' naciismo, la antikva tiraneco premegis la liberajn konsciojn, oni devis atendi la disvastiĝon de alia komuna lingvo, Esperanto, por ke alia aŭdaca pensulo frontu al la problemo kaj donu al ĝi solvon en tiu "**Manifesto de la Sennaciistoj**", kiun la estontuloj rigardos eble la plej signifoplena en la nuntempa literaturo. La nova Diogeno ne tre malsimilis al la unua : ne nur per sia barbo, sed ankaŭ per sia senindulga ironio, sia kruda sincero, sia absoluta preterlaso de ĉia ĝentileca hipokrito, li meritis aliĝi al la skolo de l' cinikuloj. Kaj oni facile imagas lin, sub la filozofa mallonga mantelo, traŭrantan la stratojn de la urbo, kun lanterno en la mano, kaj serĉantan ankaŭ unu viron...

Mi konatiĝis kun E. Lanti okaze de la Plena Vortaro. Oni ne sufiĉe scias, ke al Lanti, al Lanti sola ŝuldiĝas la ideo pri tiu libro. En letero de 20.XI.27 Grosjean-Mauprî: skribis al mi : "Hieraŭ Lanti sciigis al mi sian intencon kiel eble plej baldaŭ eldoni vortaron Esperantan-Esperantan, t.e. ian kompletigitan Kabe-vortaron. Li

(1) "Al demando pri lia patrio li respondis : mi estas mondcivitano."

opinias, ke tia libro mankas, kaj en lia medio oni ĝin nepre bezonas. - Necesas, li diris, unu gvidanto ; ne gravas, ĉu tiu gvidanto ne estas perfekta : la ĉefa afero estas, ke oni ĝin sekvu, kaj ĝi kreu unuecon en la uzado. - Li proponas, ke mi ŝarĝu min per tiu tasko..." De tiu momento Lanti vartis la entreprenon kun senlaca zorgado. Estas li, kiu konvinkis Grosjean-Maupin preni sur sin la aferon ; kiu diskutis kun li pri fiksado de la ĝeneralaj trajtoj de la verko (enkonduko de novaj vortoj, citado de ekzemploj, difino de plantonomoj ktp.) ; kiu dum la verkado ofte helpis nian laboron per siaj saĝoplenaj rimarkoj ; kiu dum la presado solvis la mil etajn problemojn pri tipografio kaj atente legis ĉiun presfolion. Plaĉas al mi ripeti ĉi tie la ateston, kiun la verkintoj donis pri lia rolo, fine de ilia antaŭparolo : "Ni citu la nomon de s-ro Lanti, kiu seninterrompe bonvolis al ni helpadi kaj konsiladi, kaj nur dank'al kies aktiveco, ĉiam sagaca sinteno kaj takto efektiviĝis la entrepreno." Ĉu ne pensige, ke al tiu, kiu tiel krude kondamnis la neŭtralismon, la movado ŝuldas verkon, kiu utilas tiel bone al la neŭtraluloj, kiel al la aliaj (2) ?

Mi renkontis Lanti la unuan fojon, okaze de tiu verko, en la studĉambro de Grosjean-Maupin. Mi demandis lin pri la strukturo de SAT, kaj post lia klarigo, antaŭdiris al li, ke, tuj kiam SAT estos atinginta sufiĉan amplekson, la politikaj partioj klopodos aŭ ĝin monopoligi, aŭ ĝin disfaliĝi. Mi neniam forgesos lian respondon : "Jes, tion

(2) Alia kurioza afero estas, ke tiu sama Lanti, kiu insistis ĉe ni por ricevi vortaron vere detalan de la klasika Esperanto, eĉ se tre ampleksan (Letero de Grosjean-Maupin al mi, Jan. 1928 : "Lanti postulas ekzemplojn, multajn ekzemplojn, precipe por la plursignifaj aŭ plurnuancaj vortoj... Li volas vere seriozan verkon..."), nun ne sentas la neceson de same detala kaj ampleksa gramatiko : vidu ĉi tie, pĝ. 44 . Des pli kurioze, ke li iam skribis artikolon sub jena titolo "Esperanto estas la plej malfacile ellernebla lingvo" (**Vortoj**, pĝ.23), en kiu li argumentas, ke Esperanto estas tiel malfacila, ĉar ĝi estas nepre logika, kaj oni de tro longa tempo kutimas en la naciaj lingvoj uzadi nelogikajn esprimmanierojn, ol ke oni kapablu atingi senmankan korektecon. Jen ĝuste kial ni estis devigitaj tiel detale esplori la Esperantan gramatikan materialon.

ankaŭ mi pensis. Ĝuste tial mi dediĉis min al tiu tasko. Iu diris, ke oni ne bezonas esperi por entrepreni ; sed ja en la entreprenoj, kiujn ni opinias senesperaj, ni devas streĉi nian tutan forton, por ke, se ni pravis en nia pesimismo, oni ne povu rigardi tiun nian pesimismom kiel kaŭzon de la malsukceso." Kiel bela vivmaksimo !

Pli poste mi estis akceptita en lia hejmo. Ekde la sojlo, li alparolis min Esperante, kaj mi baldaŭ konstatis, ke nur tiun lingvon oni uzadas ĉe li. Tio efikis iom strange sur min : en ĉiuj miaj rilatoj kun francaj esperantistoj, mi kutimis uzadi la francan. Kaj jen ŝajnis al mi, ke mi eniras en alian landon, kie Esperanto estas ne plu simpla helplingvo, sed ja la ĉefa kaj vera esprimilo. Imitinda ekzemplo, kiun, miaparte, mi ne neglektis. Se mi ŝuldas al Grosjean-Maupin la nocion pri la logikeco kaj korekteco de la lingvo, al Lanti mi ŝuldas la senton pri ties vivanteco.

Nur poste mi legis liajn librojn, admirante la ĉiam klaran stilon kaj la ĉiam sentiman pensadon. Lanti ofte fieris pri sia herezeco : ĝi estas nenio alia, ol la kuraĝo pensi per si mem. Sed ne estas pli malfacila penado, nek tamen pli utila al la homprogreso. Eĉ plej firmaj kredantoj tion konfesas, se ili estas inteligentaj : "Necese estas, iam skribis la apostolo Paŭlo, ke ankaŭ herezoj estu inter vi" (I Kor. XI, 19). La esperantistaro, kiu per tiom da trajtoj similas la fruan kristanaron, povus ĝoji, ke ĝi entenas en sia sino tian idolrenversiston kaj ideovekiston kiel Lanti. Bedaŭrinde la tradicioj, kutimoj, rutino tiel strikte nin ligas, ke ŝajnas vera skandalo, kiam ni vidas homon rompi tiujn katenojn kaj elpaŝi per senbaraj movoj. Multajn tiajn skandalajn liberiĝojn la leganto trovos en la ĉi tie kolektitaj leteroj : mi nur deziras al li, ke la skandalon li ne indignu, kaj ja la liberiĝon li imitu. Sed mi timas, ke ĉe la plimulto okazos la malo, kaj mi povus, sur la unua paĝo de ĉi tiuj Leteroj, kopii la epigrafon, kiun mia amiko G.E. Maŭra skribis sur la "**Vortoj de K-do Lanti**" :

Parolas la Raci' ĉi tie en simpla pur'
per buŝ' de sincerul' : lin tial la vipur'
de l' kalumni' insidis, sekvis ĉe la spur',
ĝis li, por savi sin de la martir-purpur',
rifuĝis trans la mar' en fora Singapur' !

G. VARINGJEN.

Al la forironto

Kvazaŭ antaŭvortoni enmetis ĉi tiun poemon de
K-do **Emba** ; ĝi jam aperis en **Sennacieca Revuo**, 1937,
dediĉe al K-do Lanti.

*La vento flustras : Iu nun foriros
samkiel maja suno-brilo
silente iras for, se sur la kampoj
sub ruĝa flor' jam ĉirpas grilo.
Sed l'ombra kverk' ĝin postenkrias :
Mi scias, ke vi nun foriras.*

*Senbrue volas vi do nun foriri,
adiaŭ-flagojn vent' ne ŝiras,
sed maturigis ankaŭ do la suno
kaj tamen mute ĝi foriras,
ne tondras ĝi per fulma mano
kiel torenta uragano.*

*Vi iros kiel granda ĉefo staba
post venk' foriras el batalo
por serĉi iom da ripozo paca
en verda varmvetera valo,
kie gajritma birdotrilo
pri venko kantas en trankvilo.*

*Sed povas esti, ke trans mar' muĝanta
ekserĉos vi batalojn novajn ;
La fam' ja flustras, ke la glavo via
malamas brakojn la senmovajn
kaj se skismiga ŝip' proksime krozos,
mi scias, ke vi ne ripozos.*

*Vi estas batalanto batalanta,
ja vi ekbatis la tamburon
kaj via alarmkrio postsekvigis
majestan flago-inaŭguron,
Kaj sub la nova flag' jen centoj
ariĝis fide en taĉmentoj.*

*Batalo-dekojn, -centojn vi traluktis
por alta idealo nia,
la kugloj malamikaj repuŝiĝis
de la purŝtala ŝildo via,
sed via lukt' ne estis lukt' detrua,
ĉi-lukto estis lukt' konstrua.*

La konstruita via fortikaĵo
ne estas ja kabano pajla,
la ŝtaltegmenton ĝian ne detruos
hurlanta uragano hajla :
Kontraŭ ĝin ŝtorm' se surde ondas,
fieran flagon ĝi renkontas.

Sed vi ja scias, kara forironto,
ke laŭ la ordo de la mondo
embuskas ĉiam nigra mortabismo
apud la alta, brila monto
kaj fortan ŝipon sur la maro
inside segas la ondaro.

Kiam malfortaj estis viaj muroj,
kiujn por mondo vi konstruis,
kontraŭ la turojn ĝiajn makiavele
Mensogo, Tromp' kaj Ŝtel' ne bruis ;
Sed la Senpov' en solo putras
kaj apud Forto ĝi sin nutras.

Se vi foriras kaj tra valoj, montoj
vi iĝos mondvagulo sola,
amikoj de animo via estos
la birdoj, la zefiro mola,
kaj vokos vin la vastaj Foroj
kun ĉiam novaj florodoroj.

Se en arbaro flustra vi marŝados
apud kuranta rivereto
kaj super via kap' migranta birdo
flugos en laca malkviato
timante homan persekuton,
Akceptu de ĝi mian korsaluton.

=====

Konsilo al la legantoj

Por legi ĉi tiun volumon, konsultu unue la enhavtabelon kaj elektu laŭ via ĉama humoro, intereso pri la temo aŭ eĉ laŭ la hazardo. Atentu la daton de la skribaĵo, kaj ne forgesu, ke temas pri **Leteroj** kaj ne pri romano. Almenaŭ ne dubu, ke ĉiu letero estas pensinstiga kaj do lege profita por via intelekto.

LETEROJ DE E. LANTI

LETERO UNUA

Al S-to K.S., Nag., Japanio.

Jamaŝiro, 29-7-1937.

Estiminda Samcelano,

Pro viaj afablaj kaj kuraĝigaj vortoj, kiuj evidente fontas el pure Zamenhofs **interideismo**, bonvolu akcepti mian koran dankon. Per via letero vi donis al mi novan pruvon, ke vole nevole la esp-a movado estas io plia ol pure lingva. Kaj tiel devas esti por ke la artefarita, sennacieca lingvo povu venki en pli malpli fora estonto.

Vi faris al mi demandojn, kies konvena pritrakto necesigus longan respondon. Ili eĉ povus esti la temo por ampleksa libro. Kelkfoje mi sentis la emon ekverki biografieton. Sed mi forlasis la ideon, tial ke plej ofte la konkludo de miaj pripensoj estas pesimisma: "Ne utilis... Vana laboro... Tiom malmulte da legantoj havas esp. libroj..." Tiel mi ofte monologis. Nu, ĉar hodiaŭ la vetero estas pluva, la kuloj malpli pikemaj ol kutime, mi volonte babilos kun vi skribe dum unu aŭ du horoj; eble pli, se dume ne aliĝos mia nuna humoro.

Kial mi forlasis Parizon, mian hejmon kaj venis Japanion? vi interalie demandas. Kiam mi mem faras al mi tiujn demandojn kaj pripensas la kialojn de mia migr-emo, tiam mi trovas ĉe la origino iun "kulpulon", la instruiston de la vilaĝa lernejo en Normandio, kie mi naskiĝis. Li instruis al mi legoscion kaj varme rekomendis la legadon de libro, kies titolo estas: "**La Migrado de du knaboj ĉirkaŭ Francio**". (franclingve: "Le Tour de France par deux enfants"). Tiu legado vekis mian entuziasmon kaj naskis en mi la fortan deziron iam viziti la lokojn priskribitajn en la legolibro. Mi estis dek-du-jara, kiam mi ĉesis viziti la lernejon kaj tiam en mi la ideo vidi grandajn urbojn, belajn monumentojn, altajn montojn

kaj revigajn pejzaĝojn ĉiam estis viva en mia animo. Prezentu al vi, ke Normandio konsistas preskaŭ nur el ebenaĵoj ; kaj tie la ĉefa okupo de l'kamparanoj estas la bredado de bovoj, de ŝafoj, de porkoj kaj la rikoltado de pomoj, el kiuj ili faras cidron kaj el tiu trinkaĵo brandon. Kiam mi legis pri la regionoj el Francio, kie kreskas vitoj, olivarboj, k.a. plantoj tute ne konataj en la nordo ; kiam mi vidis bildojn pri la Pireneoj kaj la Alpoj, sur kies plej altaj montoj eterne sterniĝas neĝo, tiam mi sentis nekontraŭstareblan deziron iam koniĝi kun tiuj mirindaj lokoj.

Sed por efektiviĝi mian projekton, necesis, ke mi havu rimedojn. Pripensinte la aferon dum monatoj, mi alvenis al la konkludo, ke ne ekzistas por mi alia elturniĝo ol lerni metion por havi la eblon perlabori monon en iu ajn urbo. Sed kiam mi konigis mian intencon al la gepatroj, tiam ili surprize kaj indigne admonis min forlasi tian malsaĝan projekton. Ili ja bezonis mian helpon en la mastrumado de sia farmbieneto. Sed admonoj ne efikis kaj mi obstinis en mia intenco lerni metion. Mi kvazaŭ strikis kaj intence fuŝlaboris. Mia patro ĉagreniĝis, konstatante, ke mi estas tiel mallerta, maltaŭga helpanto. Sed fine li komprenis mian konduton kaj ekkriis kolere : "Ci ne estas tiel stulta!... Intence ci fuŝas!... Ĉu?". Mi silentis, kaj kiam ĉe minaco mi devis respondi, tiam mi simple eldiris mian intencon fariĝi lignaĵisto... kaj migri tra Francio kiel la du knaboj el la lernolibro...

Miaj gepatroj malbenis la lernejon kaj hodiaŭ ankoraŭ sonas ĉe miaj oreloj la vortoj de mia patro : "Kulpas S-ro Panten (la instruisto) ; kulpas la lernejo ; tie la knabo akiris tiun malsaĝan ideon..." Kaj mia patrino, kiu estis analfabeta, aprobe aldonis, ke eble lernejoj estas utilaj en la urboj, sed certe ili estas senutilaj kaj eĉ danĝeraj en la vilaĝoj. Kaj ĉagrene sin turnante al mi, ŝi demandis : "Ci do volas esti vagulo kiel la ciganoj, kiuj venas al nia pordo por almozpeti? Ĉu ci ne hontas ?..."

Kiam ŝi preparolis la aferon kun genajbaroj, ŝi kelkfoje diris ŝerce kaj rezigne : "Mi kredas, ke ciganino ŝteleniris nian domon kaj rabe anstataŭiĝis en la lulilo mian infanon per la sia... Ne eblas, ke mi mem naskis tiun strangetan vagemulon..." Tamen ŝi tre amis min kaj konsilis cedon al mia obstina projekto. La patro finfine ankaŭ konsentis kaj okazis, ke mi estis lokumita ĉe mastro el la plej proksima urbeto, por tie lerni dum du jaroj la

lignaŝtano metion. Sed post 20-monata restado, mi opiniis jam esti sufiĉe kapabla por labori en pli granda urbo. Senaverte mi forkuris kaj dungigis kiel meti-helpanto en la ĉefurbo de la distrikto ; tie mi restis dum kelkaj monatoj kaj poste iris en la ĉefurbon de l'departemento; pli poste en la ĉefurbon de l'provinco kaj mi estis nur 18-jara, kiam mi venis al Parizo. Tie mi unue restis dum 15 monatoj ; poste mi laboris en aliaj grandaj urboj provincaj kaj ekde mia 24-a jaro mi daŭre loĝis en la ĉefurbo de Francio.

Sed mi ne volis resti simpla lignaŝtano kaj sukcesis fariĝi ebonisto, poste meblodesegnisto. Dume mi studis por partopreni konkurson kun la celo akiri postenon de fakinstruisto en Parizaj lernejoj. Mi sukcesis kaj havis la bonŝancon enoficiĝi, kiam mi estis 30-jara, ĝuste ĉe la plej frua limaĝo tiam postulita. De tiu tempo ĝis antaŭ du jaroj mi instruis al 11-15 jaraj knaboj kaj deĵoris po 22 horoj semajne. Mi do havis sufiĉe da libera tempo kaj tiam povis studi diversajn lernobjektojn. Ĝis 1914, kvarfoje en la semajno kaj dimanĉe matene, mi vizitis kursojn ĉe la liceo "Charlemagne" (Karlo la Granda).

Kiam eksplodis la milito, mi estis mobilizita kaj tiam kunportis al la fronto esp-an lernolibron. Tie mi lernis nian lingvon. Mi deĵoris kiel flegisto en ambulanco, kie ankaŭ same deĵoris 13 katolikaj pastroj. Kun unu el ili mi amikiĝis kaj dum kvar jaroj li instruis al mi la latinon. Sendube estas superflue diri, ke tiu antikva, mortinta lingvo ĉiam restis al mi plena je misteroj, kvankam mi dediĉis al ĝia lernado almenaŭ dudekoble pli da tempo ol al esp-o. Almenaŭ tiu lernado iom helpis al mi forpeli la nigran humoron, la malesperon, kiun mi ofte spertis ĉe la konstato, ke la homoj fariĝas kruelaj bestoj, kiam ili opinias batali por la "rajto kaj justo", laŭ la kredo de l'britoj kaj francoj, aŭ por defendi la "kulturon", kiel asertis la germanoj.

Post la malmobilizado mi decidis dediĉi mian liberan tempon al la propagando de esp-o. Pri mia esp-a kariero vi sendube estas pli malpli bone informita kaj pri ĝi mi ne parolos. Sed la posedo kaj praktikado de nia lingvo donis novan instigon al mia vojaĝemo. Ĉar mi havis somere dumonatan libertempon, mi profitis tiun oportunun por viziti la eŭropajn landojn. Preskaŭ ĉiujare mi estis for el Francio dum aŭgusto kaj septembro. Eĉ

okazis kelkfoje, ke ĉe la paska (aprila) libertempo mi ankaŭ vojaĝis eksterlanden. Kaj jen antaŭ du jaroj mi atingis la aĝon laŭ kiu mi rajtis ricevi pension de la pariza administracio. Kiam la perspektivo esti tute liberigita de ofico aperis antaŭ mi, tiam mia migremo fariĝis tute senbrida. Eŭropo aspektis al mi tute ridinde malgranda sur la mapo kaj mi decidis nepre konatiĝi kun aliaj mondpartoj...

Jam vi povas iomete kompreni, kial mi nun troviĝas en Japanio, en "via" lando, en kontakto kun simpatiinda popolo, kies menson mi provas kompreni. Se ne estus tiu malbeninda lingva baro kun kiu mi ĉiupaŝe kolizias, vi estu certa, ke mi ne sentus min fremda ĉi tie. Aŭ pli ĝuste : mi ne sentus min pli fremda ol en Francio. Ĉie mi ja sentas fremdon inter filistraj homoj, kaj ili svarmas en ĉiuj landoj. Nur en Esperantio mi sentas min hejme. Esperanto ja ne estas por mi helpa lingvo, sed mia preferata esprimilo, kiun mi uzas pli facile ol la francan idiomon. Ĉi tiu lasta estas ja tre malfacila kaj malmulte da francoj uzas ĝin korekte. La samon oni sendube povas diri pri ĉiuj naturaj lingvoj.

La unua kaŭzo de mia ĉeesto en mondparto 20.000 km. for de Francio fontas el la lernejo de mia naskiĝvilaĝo, kuŝas en la legolibro, kiun rekomendis al mi la instruisto. Li ja estas la unua "kulpulo", laŭ la esprimo de mia patro, kaj la dua estas Zamenhof mem. Se esp-o ne ekzistus, verŝajne neniam mi venus ĉi tien. Kaj, inter ni dirite, mi kredas, ke la germanaj faŝistoj estis pravaj, kiam ili diris, ke la praktikado de sennacieca lingvo povas nur difekti la naciemon ĉe ties uzantoj. Tian konfeson mi ne volus fari publike, nacilingve. Sed estas tute certe, ke kiam mi konstatis, ke per esp-o mi pli facile esprimas miajn pensojn ol per la franca lingvo, de tiam mortis ĉia naciemo en mia menso ; de tiam mi sentas min sennaciulo, sopiras al mondĉivitaneco kaj sentas min kore ligita **nur al Esperantio**. Kaj ĉe tia konstato mi klare ekkomprenis, ĝisoste konvinkiĝis, ke la homoj, kiuj pretendas klopodi por starigo de mondpaco kaj tamen ignoras esp-on, tiuj estas ja filistroj mokindaj. Inter ili mi sentas min fremda kie ajn.

Diri ke la instruisto el mia naskiĝvilaĝo kaj Zamenhof kaŭzis mian mondmigremon, tio estas iom supraĵa pri-konsidero super faktoj. Ĉe plifunda pripensado baldaŭ

aperas pli malproksimaj kaj interplektiĝintaj kaŭzoj : la menciita lernolibro ne ekzistus, se antaŭe homoj ne estus elpensintaj alfabeton, paperon, presmaŝinon ktp. ktp. Kaj la mirinda elpenŝaĵo Zamenhofs estus senutila, se ne ekzistus la modernaj trafikiloj kaj universala poŝto. Sed ili ekzistas kaj la plej reakciaj diktatoroj ne kuraĝus ordoni ilian detruigon. Sekve, kiam Hitler malpermesas la propagandon kaj publikan instruadon de nia lingvo en Germanio, tiam li per tio nur ridindigas sin antaŭ la estontaj generacioj. Lia malpermeso, cetere, estus senefika, se la milionoj da homoj, kiuj pli malpli kaŝe opozicias al lia regado havus la firman volon lerni kaj praktikadi esp-on. Eĉ se la presado de esp-aj lernolibroj en Germanio estus malpermesita, nia lingvo tamen povus tie disvastiĝi. La primitivaj kristanoj celebris la ritojn de sia religio en katakomboj dum tri jarcentoj, kaj fine venkis la kristanismo. La sukceso kaj nuna forto de Hitler kuŝas ĉefe en tio, ke liaj kontraŭuloj ĝenerale ne multe diferencas de li ideologie. La internaciismo estas nur ia nuancigita naciismo. Tial la socialistaj kaj komunistaj gvidistoj neniam interesiĝis pri nia afero.

Mi petas pardonon, ke mi ne sukcesis bremsi mian herezemon kaj eble per miaj diroj incitos vin. Almenaŭ ne timu, ke mia ĉeesto en "via" lando povus okazigi al la esp-a movado la saman sorton kiel en Germanio. Por konvinki vin pri tio, mi sendas la junian numeron de "**Tempo**", en kiu aperis intervjuo al mi fare de la redaktoro. Per ties legado vi konstatos, ke, miaopinie, la japanaj esp-istoj povas trafte propagandi nian aferon je pure naciista vidpunkto. Kaj, ĉar vi legis mian verketon "**For la Neŭtralismon**", eble vi memoras, ke sur iu paĝo estas dirita proksimume jeno (mi ne povas citi tute precize, tial ke mi ne havas kun mi ekzempleron) : "... Kiam esp-o sukcesas en burĝaj rondoj, tiam mi kompreneble ĝojas, tial ke mi havas la konvinkon, ke esp-o entenas en si econ revoluciigan". Sekve ne ekzistas kontraŭdiro inter la vidpunkto, esprimita en "**Tempo**" kaj tiu el la menciita broŝuro. Mi estas konvinkita, ke la homaro ne ĝuos definitivan pacon ĝis estos formalaperintaj la naciismo kaj la absolutismo el la spirito de l'homoj. Mi celas al mondregno kaj mia sennaciismo ne estas pensbla sen esp-o. Tial mi nenial volus kondukti laŭ maniero, kiu povus malutili al nia afero. Mi scias, ke la malpermeso al esp-o en Germanio kaj ankaŭ en Portugalio rezultas grandparte de tio, ke malsaĝuloj agitis politike malantaŭ

la ŝildo de esp-a grupo aŭ organizo. Tiuj blindaj fanatikuloj neniam komprenis la ĝustan, profundan signifon de sennacieca lingvo. Por ili esp-o ĉiam estis io akcesora, dum por mi ĝi estas io tre grava, fundamenta. Iam mi havis la iluzion esperon, ke eblos atingi, ke "Komintern" alprenu kaj utiligadu oficiale esp-on. Jam de longe forflugis de mi tiu iluzio. La fama organizo Moskva fariĝis propagand-aparato, laboranta en la nura intereso de l' naciismo Sovetia. Fariĝis por mi tute klare, ke la Stalina diplomatio laboras tute samcele kiel la cara. Nur blinduloj ne vidas tion ; nur dungitoj ne volas konfesi tion, se ili mem ekvidis la artifikon...

Ĉu mi intencas resti longe en Japanio, vi ankaŭ demandas. Tiun demandon mi ne povas respondi. Difinitajn intencojn mi ne havas. Mi ne ligis min per iu ajn plano. Almenaŭ nun mi ne sentas la deziron iri en alian landon. Povas esti, ke mi restos dum kelkaj jaroj en ĉi tiuj insuloj. Sed la milito, kiu komenciĝis dum tiu ĉi monato, portas en si neantaŭvideblajn konsekvencojn. Ĝi eble aliĝos en mondmiliton. Tamen ŝajnas al mi, ke viaj registoj elektis tre oportunan tempon por efektivigi sian bone pripensitan planon : nun Britio ne estas preta por militi ; ĝi unue devas efektivigi la gigantan armad-programon, kiun la Parlamento alprenis, kun la aprobo de l'Labor-Partio. La interna situacio en Sovetio ne estas tre firma. La fakto, ke Stalin estas devigata malliberigi aŭ mortigi preskaŭ ĉiujn malnovajn bolŝevistojn kaj aron da marŝaloj kaj generaloj atestas pri tio. En Francio ankaŭ la ĥaoso estas pli malpli latenta. Aliflanke la situacio en Hispanio devigas britojn kaj francojn teni militfortojn en la Mediteraneo. Unuvorte, mi kredas, ke Britio bridos sian militemon ĝis pli oportuna tempo. Sed mi ne dubas, ke la sorto de l'homaro por 50-60 jaroj armile decidiĝos en la Pacifiko dum pli malpli proksima estonto...

Se ial mi estos devigata forlasi Japanion, tiam mi verŝajne veturos al Aŭstralio, al Nov-Zelando, kaj poste al Sud-Ameriko. Kiam mi legas pri la politika situacio en Eŭropo ĝenerale kaj en Francio aparte, mi ne sentas emon reiri tien. Kiam la homaro denove tute frenezigiĝos kaj militos, tiam mi penos trovi lokon for de l'frenezulejo. Kelkfoje mi demandas min, ĉu ne estus preferinde esti freneza inter frenezuloj, malsaĝa inter malsaĝuloj, patrioto inter patriotoj kaj buĉisto inter buĉistoj. Sed ne

eblas ŝanĝi sian pensmanieron, same kiel oni ne povas aliformigi sian nazon, sian mentonon aŭ alikolorigi siajn okulojn.

Kredeble vi miros, ke mi skribis al vi ĉi tiun longan leteron. Eble ĝia lego tedos vin. Se tiel estus, bonvolu indulgi min, pensante, ke mi ne havas la eblon publikigi tute senĝene miajn herezajn pensojn. Tial hodiaŭ mi sentis la emon kvazaŭ malŝarĝi mian animon per tiu ĉi skribaĵo.

La vetero ĉi tie tre rapide ŝanĝiĝas ; jen la suno brilas nun kaj la cikadoj ektrilis. Mi enpoŝtigos ĉi tiun leteron nur morgaŭ kaj dume iros fari viziton al la 87 Buda-statuetoj, kiuj staras laŭlonge de vojeto, serpentumanta sur la deklivo de proksima monteto. Preskaŭ ĉiutage mi faras tiun "pilgrimon". La loko estas soleca kaj mi povas paroli kun la diversaspektaj enkorpiĝoj de Ŝakamunio. Plej ofte el la migdalformaj okuloj de l'statuetoj mi kredas vidi nepriskribeblan mokemon, subtilan ironion kaj rezignan kompatemon. Eble la fama saĝulo opiniis, ke la homaro kiel tuto estas nekuraceble freneza. Se tiel estas, mi emus konvertiĝi al la budaismo.

Kaj nun mi nepre metu la finan punkton al tiu tro longa babilado, salutante vin homece kaj sennaciece.

*

LETERO DUA

Al S-anoj E.J. kaj T.T.

Tokio, 13-4-37.

Estimataj Sinjoroj,

Al vi kore mi dankas pro via afabla letero, kiu pruvas, unu fojon pli, ke Esperantio ne estas regiono tute fikcia ; malgraŭ cirkonstancoj ne tre favoraj, tamen komuneco de sennacieca lingvo montriĝas reala ligilo...

Kredeble vi opinias, ke via demando pri mia pasporto forte embarasas min aŭ ke ĝi sendube estas sprita. Mi riverencas al vi pro la sprito, tamen rimarkigante, ke la plej bona ŝerco povas iafoje fariĝi nura malĝentilaĵo. Ĉu konvenus en ĉeesto de ĝibulo ŝerci pri ĝibo ? Ĉu decus fari spritaĵon ĉe funebra ceremonio ? Ĉu ne estus kruele moki liberemulon en lia karcero ? La samon oni povas diri pri mi mem, tial ke mia sopiro al senpasporta mondo,

al mondreg^b, unuvorte al sennacieca stato ne estas malpli forta ol tiu de enkarcerigito por liberiĝo.

Kvankam mi mense kaj kore sentas min **sennaciulo**, tamen mi ja devas konfesi, ke mi havas francan pasporton. Tiun dokumenton mi eĉ devas montri ĉe ĉiu transirota landlimo. Laŭpasporte mi do estas, se ne franco, almenaŭ franca civitano, kio tamen ne estas tute la sama afero.

Sed eble vi pensos, ke tiu mia lasta aserto estas nur vanta frazo. Ĉar vi ne povas rigardi en mian koron por kontroli, ĉu mi parolas sincere aŭ ne, mi mencias al vi **fakton**, kontroleblan fakton, kiu pruvas nerefuteble, ke mia korligiteco al Francio ne ekzistas aŭ estas vere tre malstreĉa : en la jaro 1915, kiam furiozis la patriotisma febro kaj tondris la kanonoj, - kiam Francio estis invadita de germanaj armeoj, tiam mi verkis artikolojn en kiuj mi elmetis tezon, laŭ kiu la venko de Germanio iel estus preferinda, ol tiu de "Entente".

Kompreneble neniu franca gazeto tiam povus aperigi tiajn artikolojn. Sed unu, ampleksa, tradukite aperis en Usono ; kaj tiu sama fine aperis ankaŭ en Francio deknaŭ jarojn poste, t.e. en 1934!... (1)

Ĉu tia fakto atestas favore al mia franceco ? Ĉu male ĝi ne pruvas, ke mia aserto estas plenehava frazo ?

Estas ankaŭ **fakto**, - kvankam ne facile kontrolebla, - ke, kiam okaze mi eldiris miajn herezaĵojn antaŭ ĝismedole aŭtentikaj francoj, tiam ne malofte mi konstatis, ke ili kolerete sulkgis la brovojn kaj eldiris : "Fi! vi devus honti!... vi ne estas franco..."

Mi povus mencii aliajn faktojn, kiuj donas bazon al mia pretendo esti **sennaciulo**. Sed kredeble ĉiuj faktoj ne havas valoron antaŭ viaj okuloj. Kio gravas por vi, tio estas, ke mi naskiĝis en Francio kaj ke mi havas en la poŝo francan pasporton. El tiu vidpunkto vi pravas kaj mi povas esti nur sennaciemulo. En diskutado kun harfendemuloj estus eĉ preferinde diri pliprecizige : sennaciecemulo. Sed tia diskutado estus nur ĵonglado per vortoj kaj pensigas pri disputoj inter diversekleziaj teologoj.

Bedaŭrinde, sed fakte, nacioj, patrioj ekzistas. Ili estas konkretaĵoj, kiujn neniu povas praktike ignori. Ĝuste pro

(1) La menciiita artikolo aperis en "La Voix Libertaire". (Kompil.)

tio mi devas havi pasporton. Mi ne volas rezigne vivadi ĉiam en la sama terparto, arbitre limigita ; mi volas ĝui la belaĵojn kaj bonaĵojn el nia komuna planedo kaj ne nur tiujn de unu el ĝiaj partoj, kaj tial mi malbenas ĉiujn land- kaj lingvolimojn kaj sopiras al unuregneco, al unulingveco, unuvorte al la efektivigo de l'sennaciismo.

Plie, mi kredas havi la rajton nomi min sennaciulo, tial ke mia preferata lingvo estas esperanto kaj ne la franca. Estas **fakto**, ke mi esprimas pli facile miajn pensojn per la artefarita, simpla, racia, sennacieca lingvo, ol per la natura, komplika, malracia, nacia lingvo franca. Cetere esperanto estis mia hejma lingvo dum 10 jaroj kaj jam de unu jaro mi tre malofte havis la okazon aŭdi aŭ paroli france. Kiu povus kontroli la sentojn en mia koro, tiu konstatus, ke reale, ne image, mi havas impreson de fremdo inter neesperantistaj francoj, dum mi sentas min hejme ĉie ajn sur la tero, kiam mi troviĝas kun esperantistoj. Antaŭ kelkaj jaroj mi diris en iu artikolo, ke mi preferas esti insultata en esperanto ol laŭdata en franca lingvo : tio estas vera, laŭfakta.

Eble vi pensos, ke mi estas nenormala homo. Pri tio mi mem ne povas havi objektivan opinion. Vi kredeble havas la konvinkon, ke la amo al la patrio estas io tute natura. Tion mi ne kontraŭdirus, se la vorto patrio estus konservinta sian originan signifon. Sed la loko, kie oni naskiĝis, kie entombiĝis la gepatroj kaj prauloj, estas tro malgranda kaj ne povas rilati al tuta nacio. La naciismo aŭ patriotismo (mi ĉiam uzas la du terminojn kun la sama senco) estas la rezulto de edukado. Ĝi naskiĝas en la lernejo kaj estas poste kulturata per la gazetaro kaj libraro. El ĉiu ajn infano oni povas fari ĉu francan, ĉu germanan, ĉu japanan patrioton, - tute same kiel eblas fari el ĝi ĉu kristanon, ĉu budaanon, ĉu islamanon. Kaj farinte tiun konstaton oni povas aserti, ke el ĉiu ajn infano oni ankaŭ povus fari mondĉivitanon. Sekve, la sennaciismo ne estas tiel fantazia teorio, kiel vi verŝajne pensas.

Aliparte, oni ne devas ignori la fakton, ke okazis - kaj daŭre okazas - en la mondo popolmiksiĝoj. Koncerne min, estas certe, ke mia patro estis nordano kaj mia patrino sudanino. Ambaŭ apartenis al du malsamaj rasoj, se mi uzas tiun terminon laŭ la senco donita al ĝi de kelkaj antropologoj. Mi naskiĝis en Normandio kaj estas historia

fakto, ke tiun provincon konkeris en la 9-a jarcento invadintoj el Skandinavio. Tiuj nordanoj - aŭ normandoj - konkeris, du jarcentojn poste, Anglion kaj fondis tie dinastion. Se mi devus havi specialan naturan amon por miaj prauloj, mi estus en granda embaraso kaj devus rigardi jen al Iberio, jen al Skandinavio.

Pri la nacia demando mi verkis libreton, kies titolo estas "**Naciismo**". Se vi do sincere deziras koni mian opinion, vi havas tiun eblon per lego de tiu verko. Estas memkompreneble, ke en letero mi povas eldiri nur kelkajn ĝeneralaĵojn pri la temo.

Se vere mi havus ankoraŭ emon al paradoksoj, mi povus pruvi al vi, ke fakte ekzistas sennaciuloj. Vivas en la mondo homoj, kiuj efektive apartenas al neniu nacio ; ili havas la "Nansen-pasporton", liveritan de la Ligo de Nacioj. Oni do povas esti sennaciulo kaj tamen havi pasporton. Sed la plimulto da tiuj homoj sopiras al iu nacio ; oni povas diri, ke ili estas patriotaj sennaciuloj ! La Versajla kontrakto, kiu starigis en Centra Eŭropo, plurajn malgrandajn ŝtatojn kaj arbitre difinis al ili limojn, kreis tiajn "sennaciulojn", kiuj estas naciemaj, tamen havas sennaciecan pasporton!...

Mia sennaciuleco estas do pli reala ol tiu de homoj, kiuj estas nur jure kaj ne kore sennaciaj, ĉar mi sincere sopiras al mondregno, al sennacia, senpasporta stato sur la tero. Ĉu pro tio, ke mi bedaŭrinde ne povas ignori la naciojn kaj devas havi pasporton, mi tamen devas riverenci antaŭ tiu realaĵo, kiun mi abomenas ? La naciismo estas la plej granda ideoforto el nia epoko ; mia sennaciismo sonas kvazaŭ voĉo en dezerto ; ĉu tio pravas, ke la unua ismo estas saĝa kaj la dua malsaĝa ? La naciismo povas sklavigi mian korpon, sed ne mian animon kaj mi certigas al vi, ke iafoje mi sentas neesprimeblan ĝojon ĉe la penso, ke mi persone havas nenian respondecon en la granda katastrofo milita, kiun preparas nun la ĉiea naciismo...

Rilate al via aludo pri la pensio, kiun mi ricevas de la "franca nacio", vi ne estas tute ĝuste informitaj. Pagas al mi pension la pariza urbo, ne la franca ŝtato. Tamen mi volonte konfesas, ke la pliprecizigo, kiun mi faras ne estas multvalora kaj indas je argumentado de harfendemuoloj, ĉar Parizo ja estas franca urbo. Sed mi enspezas tiun

sumon sen ia konscienciproĉo, tial ke eĉ en sennacia mondo, la instrua laboro, kiun mi faris dum 30 jaroj, estus same utila. Mi ne instruis patriotismon al miaj lernantoj, sed geometrian desegnon kaj manlaboron. Se Francio ne estus sendependa lando, suverena ŝtato, tamen tiu instruado estus farata en lernejoj.

Cetere, mi malkaŝe deklaras al vi, ke ne estus ĝuste riproĉi al proleto, pro tio, ke li plenumas taskon, kiu ne akordas kun lia konvinko. (Kaj tia ne estis mia kazo). Kiu volus vivi en la nuna mondo laŭ sia hereza idealo, tiu simple kondamnis sin al morto. Kiam oni aĉetas la plej simplan objekton, tiam vole nevole oni pagas imposton kaj per tio subtenas ŝtaton, eĉ se oni malbenas ĝian politikon.

Mi ne estas profeto kaj ne scias, ĉu iam efektiviĝos la sennaciismo. Por ke mi propagandu ĝin kaj provu laŭpove konformigi mian vivon al mia idealo, sufiĉas ke mi estu konvinkita pri ties efektiviginda. La sennaciismo ŝajnas al mi ne nur efektiviginda, sed laŭa al la historia procezo. Ĉu la starigo de mondregno okazos laŭ la ĝisnuna procedo permilita, kiu el provincoj faris nacion, aŭ per pli saĝaj procedoj, tion mi ne scias. Sufiĉas al mi havi la konvinkon, ke mia agitado estas evoluobeema kaj ne konservativa, reakcia, kiel estas tiu de la internaciistoj, kiuj senĉese kaj bombaste agitas por la rajto de l' popoloj al memdispono, t.e. por la starigo aŭ pluigo de sendependaj nacioj.

Verŝajne vi miros, ke viaj rimarkoj, kiuj eble estis en via intenco nur ŝercaj, instigis min skribi ĉi tiun longan leteron. Pardonu min! sed mia sennaciisma konvinko estas tiel forta kaj sincera, ke ĝi ne toleras ŝercon. Vi mem, kiuj kredeble estas sinceraj naciistoj, certe ne tolerus de mi ŝercon pri via nacio. Tion mi ne permesus al mi, - kaj estu certaj, ke kiam **patriotoj, naciuloj** el malsamaj landoj buĉas unuj la aliajn, mi trovas tion tute normala kaj eĉ laŭdinda...

Bonvolu akcepti, mi petas, kun sincera danko pro via pruvo de "Zamenhofa samideaneco" la sennaciulan saluton de laŭpasporta franco.

LETERO TRIA

Arbaro de Fontenblo

Sen dato (1).

Antaŭ kelka tempo mi ricevis vian leteron kaj estis tre surprizita, ke en tiel malproksima loko kiel ... estas persono, kiu interesiĝas pri mi. Sincere dirote, mi ekĝojis kaj eĉ fieris ĉe la legado de viaj komplimentoj. Kvankam poetoj prikantis min ; kvankam scienculoj pritraktis min en libroj, tamen mi devas konfesi, ke nenio estas al mi tiel valora kaj kara, kiel via simpla, senartifika eldiro de amanta koro. Precipe ĝojigis min la konstato, ke nun vi pli bone konas kaj komprenas nian komunan amanton.

Jam de multaj jaroj mi konatiĝis kun li. Antaŭ la milito li kelkfoje vizitis min bicikle ; sed tiam apenaŭ li amindumis min ; li ankoraŭ ne kapablis ĝuste taksi miajn belajn kaj ĉarmojn ; distrite, preskaŭ filistre li trakuris la komunajn vojojn kaj ne penis por eltrovi la kaŝitajn lokojn, kiujn mi rezervas por miaj intimaj vizitantoj. Unuvorte, li ankoraŭ ne amis min, kiel mi volas esti amata. Li ĝuis nur kelkajn el miaj eksteraj logaĵoj, kiel viroj kutimas ĝui pagatajn karesojn de prostituinoj. Komprenu min bone, kara amikino, kvankam mi estas nur arbaro, ligita per miliardoj da radikoj al la loko, kiun mi okupas, tamen mi havas animon, kaj mi volas, ke miaj amantoj malkovru kaj komprenu mian kaŝitan memon. Nur antaŭ kelkaj jaroj via - nia - amanto akiris tiun kapablon...

*

(1) En la arkivo, lasita de Lanti, ni trovis jenan leteron, kiun ni opinias inda aperi en ĉi tiu volumo. Ĝi montras unu el la trajtoj de nia K-do, kiun legantoj de liaj verkoj versajne ne konas. Klarigcele ni aldiru, ke la aŭtoro de tiuj leteroj dum pluraj jaroj kutimis ĉiŝafinde viziti la grandan arbaron de Fontenblo (Fontainebleau), kies plej proksima parto kuŝas 50 km. for de Parizo.

Ĉu la letero, kies malnetajon ni trovis, estis aŭ ne sendita al reala persono, aŭ ĉu Lanti nur fantaziis, pri tio ni ne havas intereson kaj kredeble la legantoj samopinios kiel ni. Ni nur rimarkigu, ke la **arbar-amanto** provis identigi sin kun la amatino kaj kvazaŭ parolas per ŝia buŝo. (Kompil.)

Ĉar vi fariĝis mia amikino, permesu, ke mi diru al vi miajn ĉagrenojn. Da ili mi havas multe. Ho ve! iel mi estas publikulino kaj devas akcepti ĉiun ajn. Inter miaj vizitantoj estas multaj maldelikatuloj. Precipe dimanĉe kaj dum la festotagoj venas amase tiaj homoj. Ili kondukas kiel petolemaj bubaĉoj ; eble eĉ la vorto barbaroj pli taŭgus por kvalifi tiajn krudajn personojn. Veninte kun korboj aŭ kestoj, en kiuj troviĝas manĝaĵoj, envolvitaj per papero, kun boteloj, ladskatoloj ktp, ili sin instalas en la plej oportunaj por si lokoj kaj poste foriras, lasinte makulitajn paperaĉojn, fruktoŝelojn, rompitaĵojn botelojn, malplenajn skatolojn kaj similan rubaĵon. Ĉu tio ne estas la faro de barbaroj ?

Sed kelkfoje mi eĉ devas elsuferi pli terurajn malbontraktojn. Dum varmaj, sunaj tagoj, okazas, ke homoj ĵetaŝ teren al sekaj folioj aŭ al filikoj brulantajn alumetojn aŭ neestingitajn cigaretojn. Kaj iajoje rezultas de tio grandegaj bruladoj, kiuj detruas ĉiun vegetaĵon sur ampleksa spaco. Por tiajn vundojn pli malpli bone kuraci, mi bezonas almenaŭ kvindek jarojn. Ĉu la faro de tiuj homoj ne estas kruela kaj signas barbarecon ?

Feliĉe inter miaj vizitantoj troviĝas bone edukitaj homoj, kiuj amas kaj respektas min. Inter ili estas via amato. Neniam li forlasas post si paperpecon aŭ iun ajn rubon, kiu povus difekte malbeligi min. Kaj ne estas timinde, ke li okazigu bruladon per ĵeto de cigaredo, ĉar neniam li uzas tabakon. Por li kaj similaj homoj mi rezervas sekretajn lokojn, nealireblajn bicikle aŭ aŭtomobile. Tie estas plej bele, plej solece, plej bonfare por la koro kaj la animo. Tie majeste staras miljaraj kverkoj ; fieraj, fortikaj fagoj kaj elegantaj pinoj ; tie blankŝelaj betuloj, delikataj juniperoj, fleksemaĵoj filikoj ombrelformaj, fungoj, muskoj kaj mil aliaj specoj de kreskaĵoj konkuras inter si por plibeligi min orname.

Por kvazaŭ kontraste elstarigi la riĉon kaj abundon de l' vegetaĵaro tiea, en apudaj lokoj kuŝas preskaŭ nur ŝtonegoj inter kiuj atrofie kreskas arboj. Enigme strangajn formojn havas kelkaj rokoj. Iuj konsistigas grotojn, kavernojn, kien povas rifuĝi miaj vizitantoj, kiam la ĉielo ial larmas pluve. Nia komuna amanto pasigis multajn horojn en tiuj naturaj grotoj. Liberigite de l'bruoj kaj tedoj de l' granda urbo, li tie parolis silente kun si mem, tiel konscianta pli forte ol kutime pri sia vera individueco. Kelkfoje li eĉ tranoktis en kaverno, kuŝante sur tavolo el kolektitaj

filikoj sekaj kaj el diversaj folioj. Tial mi ne plu havas por li sekretojn. Li aŭdis nokte la ululojn de noktuo kaj la kantojn de najtingaloj... kaj fine mi sentis, ke lia animo kaj la mia tute harmonias.

*

Kara amikino, mi ja tre bone konas vian amaton. Jam de kelkaj jaroj li kutimas veni al mi frue matene kaj foriri nur kiam eknoktiĝas ; kiam la cervoj k.a. daŭraj gastoj miaj eliras el siaj kaŝejoj por siavice ĝui libere mian noktan gastadon. Neniam li venas dimanĉe, tiel evitante renkontiĝon kun la "barbaroj", pri kiuj mi rakontis al vi. Nun, kiam mi skribas al vi, li estas en la proksimo kaj mi vidas lin salti de roko sur alian rokon. Eble baldaŭ li imitos la sciurojn kaj grimpos sur arbon kaj balanciĝos ĉe la plej supra branĉo. Tiajn malprudentaĵojn li ja kutimas fari kaj kelkfoje miras mi ĉe la konstato, ke li ankoraŭ ne rompis al si la kolon...

Eble tio mirigos vin, sed estas fakto, ke en ĉi tiu novembra tago sunas en la ĉielo. Mi estas certa, ke neniam nia amanto trovis min pli bela ol nun. La suno varmetas kiel en marto kaj la koloroj, per kiuj mi ornamis min, estas pli belaj ol tiuj el la printempo kaj somero. La fagoj kaj betuloj aspektas kvazaŭ ili estus kovritaj per oro, dum la abioj, ileksoj kaj juniperoj estas same verdaj kiel printempe. Cetere, estas eĉ kelkaj fagoj, kiuj konservis ankoraŭ parte verdetajn foliojn. La arboj, kiel la homoj, havas sian individuecon kaj ne konsentas blinde imiti unuj la aliajn. Kial ? Mi ne scias kaj cetere sentas min ĉirkaŭita de misteroj.

Jes, mi kredas esti tre bela en ĉi tiu aŭtuna tago. Kaj kokete mi ŝanĝis antaŭ kelkaj horoj mian vestaĵon. Matene mi estis prujne kovrita kaj aspektis tute blanka kiel ceremonie vestita junedzino. Sed en la deka horo mi demetis tiun blankaĵon kaj nun brilas per flavo, verdo, bruno, oro kun multaj diversaj nuancoj. Kaj mi estas pli kvieta, pli seriozspekta, pli emocidona ol en aliaj sezonoj. Mi ja scias, ke en ĉi tiu tempo vizitas min nur komprenemaj, fidelaj kaj amkapablaj homoj. Por pli konvene akcepti ilin, mi forigis, pelis en truojn la impertinentajn insektojn kaj la malicajn serpentojn. Mi donas min tute al la homo, al ĉiu homo, kiu komprenas kaj amas min...

... ..

Jen mi sentas malvarmeton kaj tio ekkonsciigas min, ke jam delonge mi babilas kun vi. La flava sunodisko pli kaj pli malleviĝas kaj baldaŭ tute malaperos malantaŭ la formiĝantaj nubojn, kiuj kronas ĉe la horizonto la altkreskajn, duonflavajn, duonverdajn kverkojn.

Nia amato ĵus surmetis sian dorsosakon kaj tuj sin direktos al la stacidomo. Unuhora marŝado, unuhora veturado per trajna kaj tiam la urbego estos rekaptinta la dizertinton. Cetere atendas lin amaso da poŝtaĵoj, alvenintaj el diversaj mondpartoj... Mi ne ĵaluzas vin, kara nekonatino, sed mi konfesos al vi, ke esperanton mi malamas, ĉar nur ĝi kapablas tute forlogi mian amanton kaj kaŭzi forgeson pri mi en lia cerbo. Sed eble estas pere de tiu lingvo, ke vi mem konatiĝis kun li ; eble ĝi estas la komprenilo inter vi ambaŭ. Se tiel estas, pardonu min kaj ne forgesu, ke arbaro ne bezonas artefaritan lingvon por diri sian amon kaj por logi amantojn...

*

LETERO KVARA

Al K-do Pl..., Germanio.

Parizo, 1931.

... ..

Se post 200 jaroj la pensmaniero de Kant ne estas ankoraŭ tute ĝuste komprenata kaj se oni devas funde koni la germanan lingvon por ĝin nur kompreneti, mi rezignas iam ajn akiri komprenon pri tiu tiel transcenda, nebule subtila, filozofio. Mi ja kelkfoje legis, ke la germana lingvo estas la lingvo de l'filozofoj ; sed mi ankaŭ aŭdis, ke necesas france traduki la germanajn aŭtorojn por igi ilin kompreneblaj. Mi kredas, ke Heine mem diris tion. Pri tiaj demandoj mi ne havas propran komprenon ; sed, ĉiaokaze, se la ĉi supraj asertoj estas pravaj, tio plifortigas mian opinion pri neceso bojkoti la naciajn lingvojn kaj penadi por esprimi sin per lingvo logika, sentradicia kaj komprenebla mondscale. Ĉu do vi kaj viaj sampartianoj ne tro malatentas unu el viaj principoj, nome, ke la homa volo ludas grandan rolon ? Raŭŝenplat, vi k.a. povus per obstina volo venki vian lingvan naciemon. Kiam mi renkontas iun malfacilon por traduki francan esprimon, tio ne igas min ŝati la francan lingvon, sed male cerbumadi por esperantigi la

france esprimitan penson. Kaj iafoje mi konstatas, ke penso fakte forestas, ke estas kvazaŭ ludvortoj. Mi tenas min ĉe la "klaraj ideoj" de Kartezio kaj tre skeptikas antaŭ ĉio nebula.

Via daŭra ŝanceliĝo pri "sollen" kaj "müssen" ne estas prava. Se la difino pri **devi** en la P.V. ne tute kontentigas vin, nu, proponu novan vorton, uzu ĝin en via tradukado kaj avertu la leganton per iu noto. Se la de vi tiele uzata vorto estas fakte necesa kaj bone elektita, vi havos imitantojn kaj la venontaj vortaristoj alprenos ĝin. Sed, verdire, mi kredas, ke vi troigas la malfacilon : ŝtono devas fali (se ĝi ne estas subtenata en la aero) ; ĝi tiel nepre obeemas la gravitan leĝon ; sed se iarimede oni tenas la ŝtonon en la aero, ĝi ne falas kaj do iel "pekas" kontraŭ la leĝo. Simile, por ke socia vivo estu ebla, la homo devas obei moralajn leĝojn ; sed la pasioj, la interesoj iafoje malhelpas kaj tial la homo pekas kontraŭ la leĝon, kiel la ŝtono arte tenata en la aero. Oni povas kompreni, ke morala leĝo povas esti same obeenda kiel fizika leĝo. Se socio ne povas funkcii kaj daŭre vivi, sen obeo al iuj moralaj leĝoj, nu, la pekoj kontraŭ tiuj leĝoj rezultigos la pereon de tiu socio, kaj tio pravas, ke la moralaj leĝoj estas nepre obeendaj. Simile : se la gravitaj leĝoj ial povus esti malobeataj, la mondo ĥaosigus.

Sed mi ne kredas, pli ĝuste ne komprenas, kiel povus ekzisti **per si mem** aprioriaj nocioj. La fizikaj leĝoj, kiujn oni ne povas malobei, estas nur la konsekvenco de iaj rilatoj, de ia ekvilibro inter diversaj fortoj. La gravita leĝo estas eĉ relativa kaj ne samefikas ĉe la ekvatoro kiel ĉe la poluso. Identigi la naturajn leĝojn kun iu dio aŭ nei la ekziston de dio ne havas laŭ mi ian intereson. Estas plej ofte disputo pri vortoj. Kio estas diskutibla kaj diskutinda estas la konkreta (jes) dio (eĉ se ĝi estas nur mito) de l'kristanoj. Tia dio ja parolis, suferis, agis, ĉar pri tio atestas la Biblio kiun legas kaj kredas milionoj da homoj. Mi tamen tute konsentas kun vi, ke tre malaltkvalita estas ĝenerale la kontraŭdia propagando de la t.n. liberpensuloj.

... ..

Se vi volas germanigi esperanton, anstataŭ esperantigi la germanan lingvon, estas evidente, ke ni ne povos interkonsenti pri la signifo de l'vorto **racio**. La difino donita en la P.V. ne estas eble la plej trafa - rimarku, ke mi ne

diras la plej ĝusta - sed ĝi estas la oficiala difino, kiun ĉiu esperantisto devas akcepti, se li volas esti komprenata de aliaj esperantistoj. Se mi volus francigi esperanton, mi ankaŭ dirus : **racionalizi** ; sed raciigi diras tute ĝuste, kion mi komprenas per la franca vorto "rationaliser" : apliki la racion al la agado, farado ; igi racia tion, kio estas kutime rezulto de hazardo aŭ de nesufiĉa pripensado.

Mi bedaŭrinde ne konas la klarigojn de Nelson pri la "praktika Racio" kaj sekve ne povas scii, ĉu ili kontentigus min aŭ ne. (Ĉi-okaze mi rediru, ke la esperantistaj ISK-anoj estas tre avaraj, rilate sian Nelsonan trezoron, ĉar ili gardas ĝin por si). Mi ja kredas, ke neniu filozofio povas rezigni pri metafiziko. Sed mi jam delonge konvinkigis, ke la diversaj filozofiaj sistemoj estas ĉiuj tre diskutablaj ; neniu ĝis nun povis akiri ĝeneralan konsenton. Iu sistemo pli malpli sukcese sin trudas nur dank'al la talento kaj kapablo de la elpensinto. Al la homoj, kiuj por trapasi la vivon, nepre bezonas havi precizajn klarigojn pri la mondo kaj ne povas konsenti kun la ekleziaj klarigoj, mi konsentas, ke filozofia sistemo povas utili al ili. Mi scias proprasperte, ke la dubo estas iafoje peza ŝarĝo ; sed kiel ĝin demeti, se la intelekto ne povas kontentigi per subtilaj metafizikaĵoj ? Almenaŭ mi ne dubas ... ke la dubo ne povas kontentigi la amason. Ĝi bezonas kredi, esperi, kaj ŝatas la asertojn aplombe eldiritajn. La potenco de l'marksismo grandparte konsistas el tio, ke ĝi ludas por la amaso la rolon de religio kaj la partio la rolon de eklezio. Moskvo, Romo, du grandaj potencoj!... Mi ne kredas, ke politikaj partioj povas eviti, ke iliaj anoj ofte - eble ne ĉiam - agu aliel ol per la instigo de iluzioj. Unu iluzio mortas kaj estas anstataŭata de alia. Malnovaj iluzioj baras, bremsas, malhelpas. Tial necesas, ke dubantoj, kritikantoj detruu la malnovajn iluziojn por ebligi la naskiĝon de novaj. Tian laboron faris malgranda nombro da homoj en ĉiuj epokoj. Ĉiam la herezuloj estis utilaj kaj mi ne vidas, ke ilia rolo baldaŭ ne plu estos necesa.

Vi diras, ke "Kant klare (?!!) montris, ke aprioriaj ekonoj ekzistas ktp...". Povas esti, sed mi dubas, kaj tio memorigas min pri diro de l'fama matematikisto Henriko Puenkare en sia verko **La Scienco kaj la Hipotezo**, mi kredas : "Ne ekzistas rezonado, kiu povas atingi la fundon

de la aferoj. La logiko, nu, ĝi taŭgas por instruistoj." La sama aŭtoro montris, ke la geometrio estas nur **oportuna**, ke oni ne povas prave paroli pri geometriaj veroj. Geometrio estas "oportuna" en tiu senco, ke ĝi helpas al ni konstrui pontojn kaj maŝinojn ; sed ekzistas diversaj geometrioj, kies aksiomoj ne tute similas kaj tamen per apliko de tiuj aksiomoj oni povas mezuri kaj konstrui.

Mi opinias, ke moralaj aksiomoj estas same necesaj por la vivo de socio, kiel la geometriaj por konstrui maŝinojn. Sed tio tute ne signifas, ke ili ekzistas per si mem kaj ke iuj estas pli "veraj" ol alij. Ne pro timo esti kondukata per dedukta rezono al agnosko pri ekzisto de Dio, mi ne konsentas al la Kanta vidpunkto. Mi eĉ povas diri, ke mi emas bedaŭri la neekziston de Dio. Pro iaj cirkonstancoj, pri kiuj estus tro longe rakonti al vi, mi estis antaŭ pli ol 20 jaroj metita kvazaŭ en la manojn de klera kaj tre lerta jezuita pastro, kiu devis helpi min retrovi la kredon. Post sufiĉe longaj diskutoj li diris al mi : "Nur unu granda rimedo povas redoni al vi la kredon: ĝi estas **difavoro**. Dio estas bona ; preĝu al li sincere kaj fervore kiel se vi kredus je ĝia ekzisto."

Paskal jam rekomendis tiun rimedon. Mi certigas al vi, ke ĝin mi aplikis tute serioze dum kelkaj semajnoj. Vane! Mi eĉ povas diri, ke tiu eksperimento definitive faris el mi ateiston. Mi memoris, ke ĉe la komenco de niaj diskutoj la jezuito diris : "Dio ŝuldas al ni la veron, se oni petas ĝin al li sincere kaj senigite je memintereso." Tion mi faris kaj konstatis... neniecon.

Kompreneble se Dio ekzistus, nia timo aŭ netimo pri lia ekzisto ŝanĝus nenion en la fakto. Sed, se Dio ekzistas, li ja ŝuldas al ni la veron. Kaj mi **spertis**, ke li ne pagas sian ŝuldon.

Nu, se Kant montris, ke neniam la homo povos konstati la ekziston de Dio, kian do valoron havas lia aserto, ke ĝi ekzistas ?

Ĉu la "palpanta animo" de J.F. Friz ne estas tio, kion oni nomas la intuicio kaj kiu estas unu el la ĉefaj kolonoj de l'filozofio de l'franclingva Bergson ?

... ..

Releginte mian skribaĵon, mi rimarkas, ke ĝi ne sufiĉe klare diras, kion mi pensas. Estas kredeble, ke vi ne tute ĝuste povas kompreni mian starpunkton antaŭ diversaj demandoj. Miskomprenoj estas do eblaj. Mi eĉ emas kredi,

ke neniam kaj per neniu lingvo oni povos transigi tute ekzakte penson de iu cerbo en aliu. Kredeble jam Rabelezo opiniis tion, kiam li ŝerce argumentigas Panurgon per signoj, per mimiko, okaze de publika debato kun iu fama angla teologo. Kaj la sama fama aŭtoro dediĉas kelkajn ĉapitrojn por mokvipi la "ekstraktantojn de kvin-tesenco".

La logika konsekvenco de tio, estus... silenti. Logiko ankaŭ ne ekzistas... Sed laŭsperte ni scias, ke necesas iom gimnastiki, se oni volas teni vigla sian korpon. La filozofiado ludas similan rolon, rilate nian intelekton. Ni tenu ĝin vigla por povi kiel eble plej trafe solvi empirie la ĉiutagajn praktikajn problemojn, kiuj senĉese sin trudas al ni...

*

LETERO KVINA(*)

Mi ja legis la diversajn presaĵojn de la "Internaciisto"-anoj, rilate al la lingva demando. Kaj sen ia ŝanceliĝo mi povas diri mian opinion. El la legado de tiu peza, plejparte nedigestebla intelektaĵo mi akiris la konvinkon, ke ties aŭtoroj havis ĉefe kiel zorgon ne herezi, ne deflankiĝi de la "ĝusta" partia linio. Tial ili ŝvite penadis por pravigi la ekziston de l'mondlingva movado per ŝablonaj frazoj, uzataj en partiaj programoj. Per filistraj kaj pli malpli nebulaj argumentoj tiuj "esperantistoj" provas malgrandigi, malgravigi la rolon kaj signifon de **artefarita** lingvo. Kaj estas tre karakteriza la fakto, ke ilia vidpunkto akordiĝas kun tiu de la plej reakciaj elementoj el la neŭtrala, burĝa movado.

Por ke mia respondo estu tute klara, mi citos kelkajn el la plej tipaj frazoj de korifeo en la "Internaciisto"-tendaro :

"Niaj teoriuloj de la lingvo internacia traktas esperanton, kiel internacian ilon por kunligo kaj interkompreno, kondiĉe utiligatan de difinitaj homgrupoj kaj en siaj nunaj formoj efikantan en la nuna tempospaco. Ni eĉ ne pretendas, ke la **estonta helpa**(1) lingvo internacia,

(*) La tri sinsekvaj leteroj aperis en **Sennaciulo** dum la jaro 1931 kaj apartenas al iu serio da dekdu. Tial ke ili estas nun ankoraŭ tre "aktualaj", ni opiniis utile ilin almeti. (Kompil.)

(1) La substrektoj en la tuta cito estas de mi. - E.L.

kiu jam estos akceptita de ĉiuj popoloj kiel fundamenta helpa ilo por internaciaj rilatoj, sed kiu ekzistos ankoraŭ samtempe kaj paralele kun lingvoj naciaj, ke tiu **estonta** lingvo internacia estos tute simila al la moderna esperanto.

"Ni konsideras, ke esperanto estas nur la ŝtupo al tiu **estonta** tutmonda **helpa** lingvo internacia, ke esperanto povas **iagrade** akceli formiĝon de tiu estonta lingvo internacia - sed ne pli."

"... Ni konsideras, ke **estonta helpa** lingvo internacia havos senduban influon sur la formojn de **estonta** lingvo komuna en tiu momento, kiam la liberigita homaro venos al la finformado mem de la tutmonda socialisma socio".(1)

Mi defias iun ajn doni alian kontentigan klarigon pri la ĉi supre elmontrita tre nebula vidpunkto de "esperantisto", ol tiun, ke li nepre volas lakee pravigi la indiferenton de Stalin pri la esperanta afero. Ĉe homo, kiu streĉas ĉiujn fortojn por ne deflankiĝi eĉ centimetron de la "ĝusta" linio, estas ja tre malagrabla la konstato, ke patentitaj marksistoj kaj plej aŭtoritataj gvidantoj ne estis, nek estas esperantistoj ; ke aliparte Zamenhof ne estis socialisto kaj eĉ ne profesia lingvisto...

Se mi ne timus tro longigi ĉi tiun leteron, mi citus aliajn dirojn de "Internaciisto"-anoj, kiuj argumentas, kvaŭ esperanto ne estis kreita de homo, sed de la "produkto-fortoj". Tiuj pseŭdoate-istoj fakte diigas la Produktofortojn, kiel aliaj diigas la Naturon - anstataŭ simple kaj pli konsekvence danki al Dio, pro tio, ke li kreis esperanton pere de Zamenhof, kiel tion asertis la prezidanto de la **Internacia Centra Komitato de la Esperanto-Movado**, s-ro Merĉnt (Merchant), en unu el siaj kongresparoladoj.

Pri tio mi petas, ke vi relegu en la n-ro 200 de "S-ulo" la artikolon kun titolo **Ĉu Zamenhof ekzistis?** kiun mi publikigis tiutempe por moki tiujn ridinde elementajn "marksistojn", kiuj ignoras la homon en siaj konsideroj pri la historia procezo.

Sendube la produktofortoj ludas grandan rolon en la vivo kaj aliĝoj de l'socio. Oni tamen ne devas forgesi, ke ĉe la komenco, ĉe la deirpunkto troviĝas la **Homo** - kun sia invent- kaj organizkapablo. La ilojn, la maŝinojn

(1) En la antaŭparolo de E. Drezen al **Kulturo nacia kaj internacia de J. Stalin**, pĝ. 9 kaj 10.

kreas la homoj ; esperanton kreis Zamenhof. Kaj kiuj ne atentis kaj ne volas utiligi tiun mirindan lingvan ilon, tiuj estas reakciuloj ; ili similas al tiuj kamparanoj, kiuj malemas uzi traktoron kaj preferas fruepokan plugilon.

Mi aprobas la kolosan, la grandiozan entreprenon, kiu sub la nomo de "Kvinjara Plano" celas industriigi Sovetion ; mi admiras la feran energion de Stalin, sed, rilate alian ignoron al nia mondlingva movado, mi maltime diras, ke ĝi estas reakcia, ke ĝi ne konformas al la interesoj de l'mondrevolucio. La sinteno de Stalin kaj de aliaj revoluciaj gvidantoj tiurilate ja tre similas tiun de la neprogresemoj, kiuj malemas al ĉio nova. Ne estus pli malfacile trudi la lernadon de esperanto en ĉiuj Sovetiaj lernejoj kaj al ĉiuj ŝtat- kaj partioficistoj ol devigi kamparanojn eniri kolĥozojn kaj tie funkciigi traktorojn. Kaj tial ke la anoj de la kompartioj estas ĝenerale tre disciplinaj, ne estus malfacile trudi al ili en ĉiuj landoj la lernadon kaj uzadon de nia lingvo...

Kiuj sincere deziras la kunfandiĝon de nacioj, la formorton de l'naciaj kulturoj kaj ne estas fervoraj adeptoj de artefarita lingvo, facile lernebla kaj tutmonde uzebla, tiuj ne agas konsekvence, sed perfide al la interesoj de l'proletaro.

Kompreneble tia "perfido" ĉe Stalin kaj ceteraj gvidantoj de Komintern estas nekonscia. Ili ankoraŭ ne konvinkigis pri la vivkapablo de artefarita lingvo ; ili mem ne lernis kaj aplikis esperanton. Sed la samon oni ne povas diri pri la "teoriuloj" el la CK de SEU. Sekve ilia sinteno en tiu afero estas klarigebla nur per karierista deziro ĉiam havi ortodoksan pozicion. Nu! bone, heroecon ni postulas de neniu, sed almenaŭ ni ne lasu nin trompi per ŝajne sciencaj argumentoj. Kortegan scienculojn ordinare ne multe antaŭenpuŝas la progreson...

Kiel do ni elmetu la demandon ? Ho! tute simple, kaj pri ĝi oni ne bezonas longe teoriumi. Ni precipe atentu la faktojn.

Unue estas neforgesinde, ke plej aŭtoritataj lingvistoj multe teoriomadis por pruvi, ke artefarita lingvo estas utopiaĵo. Kaj se nun multaj el ili konfesas ĝian ekziston, ili tamen profetas ĝian disfalon aŭ limigas ĝian rolon al elementa babilado ĉe hotelo ks.

Tamen esperanto nerefuteble pruvis per faktoj sian kapablon por solvi tute kontentige la mondlingvan problemon ; ĝi estas uzata por sciencaj kaj teknikaj verkoj, por poezio kaj por verkado de fantaziaj romanoj ; por diskutado kaj eĉ pasia disputado en kongresoj ; ĝi jam estas la hejma lingvo de relative multaj personoj ; estas do sunklare, ke ĝi estas tute taŭga kaj viva lingvo. Kaj uzas ĝin ankaŭ manlaboristoj kun tute elementa instruit-eco.

Dume la internaciistoj ignoras nian movadon. Ili daŭre elspezas grandajn monsumojn por pagi tradukistojn kaj interpretistojn, por eldoni en kvin, ses aŭ pli da lingvoj la samajn dokumentojn, la samajn gravajn verkojn. Unuvorte ili malŝparas la malfacile akiritajn monerojn de laboristoj. Ĉu do ni ne rajtas ĉe tia konstato paroli pri perfido al la interesoj de l'proletaro ? Jes, ni rajtas!... Kaj nur la forta sento, ke ni, esperantistoj, montras la bonan ekzemplon, signas la vojon, povas krei en nia movado la necesan entuziasmon kaj sindonemon por daŭrigi nian malfacilan laboron. Se ni, malfeliĉe, konvinkigus, ke nia agado nur utilas al tio, ke ĝi influas "sur la formojn de **estonta** lingvo komuna", ni perdus la kuraĝon labori por tia sen-signifa afero. Tial la "esperantistoj", kiuj provas malgravigi la rolon de artefarita lingvo, tre malbone servas nian movadon, kaj iliaj filistraj argumentoj devas esti ĝuste taksataj : ili ja estas absolute senvaloraj...

En sekva letero mi respondos al la demando pri eblo aŭ maleblo de kunfandiĝo de lingvoj.

LETERO SESA

En la antaŭa letero mi diris mian opinion pri la tre strangaj "esperantistoj", kiuj provas per filistre senvaloraj argumentoj malgravigi la rolon kaj signifon de artefarita lingvo. Tiuj homoj tamen konfesas, konsentante kun Lenin kaj Stalin, ke la homaro nepre evoluas al tutmonda unuigĝo, kio havos kiel rezulton la kunfandiĝon de ĉiuj lingvoj en unu komunan. Sed prefere mi citu laŭvorte la dirojn de Stalin mem pri tiu demando. En sia parolado ĉe la Deksesa Kongreso de Tutsoveta Komunista Partio li unue argumentis por pravigi sian naciecan politikon, kiu konsistas el tio, ke ĉiu nacio devas evoluigi propran kulturon. Poste li konkludis jene :

"Rilate la malproksiman perspektivon pri naciaj kul-

turoj kaj naciaj lingvoj, mi ĉiam akceptis kaj daŭre akceptas tiun Leninan koncepton, ke en la periodo de l' **mondskala** venko de l'socialismo, kiam ĝi plifirmiĝos kaj eniros la moraron, naciaj lingvoj neeviteble devos kunfandiĝi en unu komunan lingvon, kiu, kompreneble, estos nek la rusa, nek la germana, sed io nova..."

Oni unue rimarku kaj bone memoru, ke Stalin ne faras eĉ plej etan aludon pri artefarita lingvo. Kiel do li prezentas al si tiun lingvan kunfandiĝon ? Per kia mistera procedo ĝi okazos ? Ĉu la diigitaj "produktfortoj" kreos tiun unikan komunan lingvon ? Oni ne scias. Kaj bedaŭrinde neniu kongresano demandis al Stalin pri tio.

Eble li opinias, ke la preparolita kunfandiĝo okazos nepre kaj tute nature. Se tiel estas, ni devas kontraŭdiri. Tiu vidpunkto ja estas absolute erara. Ekzistas neniu tendenco al kunfandiĝo ĉe la grandaj **civilizaj** lingvoj. Paroli pri la estonta kunfandiĝo de la angla, franca, germana, rusa k.a. tradiciriĉaj lingvoj kun ampleksega literaturo kaj tute propra spirito estas ega sensecaĵo. Sendube tiuj lingvoj evoluas, aliĝas pli malpli rimarkeble dum la paso de l'jarcentoj ; sed tiu evoluo okazas ne en sama direkto, ne tendencas al iu unueca tipo. Ĉiu evoluas laŭ siaj propraj internaj leĝoj, laŭ sia propra spirito. Tion instruas la lingvoscienco.

Estas ja vere, ke tiuj lingvoj alprenas samajn novajn vortojn teknikajn kaj sciencajn. (Tamen ne ĉiuj kaj ne ĉiam. Ekzemple la germana lingvo estis alpreninta la vorton **telefono** kaj poste ĝin forlasis kaj anstataŭigis per **Fernsprecher**.) Sed tiu vortmaterialo adaptiĝas al la gramatika kaj sintaksa kadro de la respektiva lingvo. Oni do ne rajtas en tia okazo paroli pri kunfandiĝemo. Kompreneble miaj ĉi-supraj rimarkoj rilatas nur al la grandaj civilizaj lingvoj kaj ne al dialektoj aŭ al primitivaj lingvoj sen tradicio kaj literaturo.

Se oni malatentas la ekzistantan faktoron : **racia artefarita lingvo facile lernebla en la tuta mondo** kaj ignoras la esperantan movadon ; se oni konstatas la neblon de natura kunfandiĝo, restas nur unu hipotezo pri efektivigo de unulingveco en la mondo, nome, ke unu el la ekzistantaj lingvoj **imperialisme** sin trudu kaj forpuŝu ĉiujn aliajn. Unue mi rimarkigu, ke tiel ne okazus kunfandiĝo, sed **forpuŝo**. Nu, ne gravas la maniero, vi eble pensos.

Konsentite! kaj ni do ekzamenu, kiel povus okazi la forpuŝo.

Mi volonte konsentos, ke, se unu el la ekzistantaj lingvoj nekontraŭdireble reprezentus civilizon kun la plej alta grado da scienco kaj kulturo, ĝi sendube havus ŝancon fariĝi la komuna lingvo de ĉiuj popoloj. Ekzistas en la Historio kelkaj ekzemploj pri tia okazo. Mi citu nur unu, kiu estas tipa. Post la disfalo de la aŝemenida imperio, Ateno fariĝis la politika, artista kaj literatura centro en la tuta greka duoninsulo. La artistoj, filozofoj kaj poetoj de Atiko superis ĉiujn aliajn; tial ĝia dialekto fariĝis lingvo, kiu reprezentis la plej altan gradon da civilizo kaj sekve ĝi fariĝis komuna al ĉiuj grekoj de la 4-a jarcento antaŭ Kristo ĝis la 9-a post Kristo (1).

Sed tute alia estas nuntempe la situacio, rilate al la angla, franca, germana, rusa k.a. civilizaj lingvoj. Ĉiuj ja reprezentas se ne la saman, almenaŭ samvaloran kulturon. Nur blindaj ŝovinistoj povas kredi, ke ilia kulturo superas ĉiujn aliajn. Sekve ne ekzistas la necesaj kondiĉoj, kiuj povus ebligi la ripeton, laŭ pli granda skalo, de la procezo, kiu faris el la Atika idioma la komunan lingvon en la antikva Grekio.

Aliparte ni ne forgesu, ke la nacieca politiko de Stalin havos vole nevole kiel rezulton krei kaj plifirmigi subjektivajn fortojn, kiuj nepre kontraŭas naturan procezon de kunfandiĝo. Kompreneble lia pozicio rilate al la grandrusa naciismo, estas defendebla kaj iel prava. Rusigi la sesonon de l'mondo ja ne signifus ĝin sennaciigi. Ekzistas tamen ĉe mi neniu dubo, ke tiu rusigo nepre okazos, tial ke la rusa lingvo reprezentas pli altan gradon da kulturo ol ekzemple la ĉuvaŝa, la turkmena k.a. samnivelaj lingvoj.

Almenaŭ ni konstatu, ke la diroj de Lenin kaj Stalin pri kunfandiĝo de nacioj kaj lingvoj estas ĉe ili nur malpreciza esprimo, diktata de malklara intuicio pri la estonto. Multe pli frue burĝaj revolvoj jam eldiris tiajn pli malpli nebulajn pensojn pri unuecigo de l'homaro en unu tuton (2). Kaj dume nenio praktika estis konscie entreprenata por ebligi tian unueciĝon. Mi diras "konscie entre-

(1) Alia ekzemplo nuntempa: la serba lingvo, kies radcentro estas en Belgrado asimilas en la limoj de l'jugoslava reĝlando la diversajn dialektojn kaj fariĝas la komuna lingvo de l'tieaj popoloj.

(2) Kp. la artikolon: "**Ĉu ili estis sennaciistoj?**" en la n-ro 233 de "5-ulo" aŭ pĝ. 126-130 de "Vortoj".

prenata", tial ke evidente ĉiu maŝino plifaciliganta la rilatojn inter la homoj estas unu paŝo al tiu direkto.

Hodiaŭ fariĝas okulfrapa por ĉiu klarvida homo, ke la interesoj de ĉiuj popoloj pli kaj pli interplektiĝas, pli kaj pli fariĝas dependaj unuj de la aliaj. La Ekonomio postulas tutmondan mastrumadon kaj estas vanaj ĉiaj provoj de la plej grandaj nacioj por eviti la krizojn per naciecaj rimedoj. Kio plej forte baras al la racia solvo de l'problemo, tio estas la subjektivaj fortoj, enkorpiĝintaj en la tradicioj kaj naciaj kulturoj. Kiuj volas konscie kaj celkonforme agadi por detruu tiujn fortojn, tiuj nepre devas agnoski la grandan signifon de esperanto kaj de nia movado. Kiuj atendas la kunfandiĝon de l'nacioj kaj lingvoj per ia miraklo, per la mistera agado de l' "produktofortoj", tiuj estas parte konservativuloj, eĉ se ili estas aliparte revoluciuloj. Kaj la "esperantistoj", kiuj ne komprenas la grandan rolon, kiun povas ludi nia lingvo en la unuecigo de l'homaro, tiuj en plej bona okazo estas nur stultaj aŭ nesciaj ; en mala okazo ili konscie perfidas nian komunan aferon...

Mi petas pardonon pro tio, ke mia letero fariĝis pli longa ol mi projektis ; sed estas tamen evidente, ke la temo ne estas tute elĉerpita. Bonvolu do, karaj K-doj, pripensi mem la demandon kaj vi certe ektrivos plurajn bonajn argumentojn, kiuj apogas mian vidpunkton...

*

LETERO SEPA(*)

Kiel vi sendube jam scias per iu komuniko de la Direkcio, post kelkaj monatoj la gvidado de SAT devas transiri en alies manojn. Nun mi sentas min preskaŭ tute senŝarĝita je respondeco kaj povas do jam kvazaŭ de ekstere, de supre rigardi la aferojn. Ĉe tia pozicio, en tia spiritostato oni povas plej bone observi kaj senpaspie prijuĝi.

Dum la lastaj tri jaroj nia komuna entrepreno estis tre forte skuata de detruaj ventoj el partieca fanatiko, el stulta miskompreno, metitaj en la servon de senskrapula intrigo. Al tiuj detruaj fortoj aldoniĝas la terura

(*) Ĉi tiu kvazaŭa cigna kanto aperis komence de 1933 en **Sennaciulo**. Ni ne dubas, ke ĉiuj legantoj konsentos, ke estus domaĝe ne republikigi ĝin en ĉi tiu libro. (Kompil.).

ekonomia krizo, kiu senlaborigas tre multajn el la plej sindonaj SAT-anoj. Kaj malgraŭ ĉio, nia Asocio eltenis ; ĝi restas firma kaj alten flirtigas sian standardon, sur kiu restas skribite :

**Esperanton serve al la Proletaro!
Samlingvanoj ignoru inter si la landlimojn!
For la dogmojn!
Lojalon al ĉiuj klasbatalaj tendencoj!**

Dum dek tri jaroj tiuj devizoj gvidsignis al ni la vojon. Kun trankvila animo ekrigardante hodiaŭ malantaŭen, mi gardas la konvinkon, ke ne ekzistas por nia laborista esperanta movado pli taŭgaj gvidiloj por antaŭenmarŝi al la celo.

Verdire la vojo estas multe pli longa ol komence mi supozis kun la entuziasmo de nove bakita esperantisto. En la jaroj 1919-20, vidante, kiel malvigla estas la neŭtrala movado, kiel religiaĉe ĝi aspektas en la okuloj de klaskonsciaj laboristoj, mi opiniis, ke sufiĉos fari klaran apartigon for de la neŭtraluloj, por ke en la revoluciaj rondoj nia movado estu favore konsiderata kaj ke post kelkaj jaroj la laboristaj organizoj prenu sur sin la propagandon kaj instruadon de la lingvo kaj poste uzadu ĝin praktike. Tiu mia konvinko estis plifirmigata de la fakto, ke en aprilo 1920 disvastiĝis la famo, ke la Soveta Registaro alprenis esperanton kaj decidis lernigi ĝin en ĉiuj lernejoj. Ĉe tia ekscio la fama pacista verkisto Romen Rolan skribis al mi interalie jenon :

"...La decido, kiun alprenis la Soveta Registaro... estas historia okazaĵo, kies konsekvencoj estos grandegaj ; ĝi estos bonfarinta por la Homaro pli ol ĉiuj teoriaj diskutoj aŭ partiaj disputoj, en kiuj absorbiĝas la aktiveco de la okcidenta socialismo."

Ĉu do sen troa fantaziemo ne estis eble tiam opinii, ke baldaŭ nia mirinde racia kaj facila lingvo estos grand-skale metata en la servon de l'tutmonda revolucio? Por venki oni devas utiligi ĉiujn armilojn kaj esperanto estas ja unu el ili, same kiel aeroplanoj kaj radio-aparatoj.

Post kelka tempo oni bedaŭrinde eksciis, ke la informo fakte estas tute senbaza. Tamen estis ankoraŭ permesite havi la esperon, ke finfine Komintern esploros la aferon kaj alprenos decidon favore al iu internacia lingvo. Cetere

studkomisiono estis tiucele starigita okaze de ĝia Dua Kongreso. Sed la tuta afero estis nur la rezulto de blufemaj idistoj, kiuj sukcesis per tiu rimedo dum kelkaj tempo trompi la komunistajn partiojn el kelkaj landoj.

Post diversaj tiaj negativaj spertoj, faritaj ĉe partioj aŭ ĉe influhavaj personoj, mi baldaŭ alvenis al la konkludo, ke nia movado povas kreski nur malrapide kaj venki per la solaj fortoj de la esperantistoj mem. Tion mi jam diris en la jaro 1922 en artikolo kun la titolo : **En la lumo de la sperto**, aperinta en la malnova **Sennacieca Revuo**.

Ĉu post dek jaroj la situacio multe aliĝis ? Ĉu oni povas esperi, ke baldaŭ nia lingvo estos alprenata kaj uzata grandskale de la laboristaj organizoj? Ĉu la Sovetia Registaro priententas nun esperanton en siaj kvinjaraj planoj ? Al ĉiuj tiuj demandoj oni povas nur nee respondi.

Estas vere, ke nia movado pli kaj pli altiras al si la atenton de gvidantoj ; estas fakto, ke malgrandiĝas la nombro de tiuj, kiuj mokete levas la ŝultrojn ĉe la aŭdo de la vorto esperanto. Sed estus trompi sin mem, se oni konkludus el tio, ke proksima estas nia venko.

Kiam en kapitalistaj landoj oni propagandas esperanton al laboristaj gvidantoj, ili respondas iafoje jenon :

"Ni faru unue la revolucion kaj poste ni okupiĝos pri la lingva demando."

Nu, en Sovetio la revolucio estas farita ; kiel statas tie nia afero ? Se ni esploras la faktojn kun tute malfermitaj okuloj, ni konstatas, ke la esperanto-movado estas konsiderata de l'tieaj gvidantoj nur kiel eksperimento, kiu indas atenton, sed kondiĉe, ke la esperantistoj konfesu, ke ilia lingvo neniel povas pretendi fariĝi komuna kulturilo por ĉiuj popoloj. Ne kredu, karaj legantoj, ke mi pentras per nigraj koloroj. Vi juĝos mem per kelkaj citoj el la tezoj prilaboritaj de la **"Brigado de lingvo-konstrua fako"** kaj akceptitaj de la **Scienc-esplora Instituto de la Lingvo ĉe la Popolkomisario de klerigo RSFSR en Moskvo** kaj publikigitaj en la Tria n-ro de **"La Nova Etapo"** :

"... oni devas opinii, ke ĉiuj provoj starigi la demandon pri komun-universala lingvo nunmomente kiel vican aktualan taskon estas antaŭtempaj kaj utopiaj..."

"... La belanimaj celadoj de d-ro Zamenhof kaj de l'esperantistaj burĝaj propagandistoj al frateco de popoloj kaj al tutmonda harmonio

objektive estis, kiel ĉiuj etburĝaj iluzioj, helpilo de imperiismo. La plej bona montrilo de tio estas la provoj de la internacia socialfaŝismo (*) kontraŭmeti la esperantistan movadon al la proleta internaciismo kaj la ĉiam pli ardiĝanta batalo interne en la monda esperantista movado".

"... La kunproksimiĝo de naciaj lingvoj, kiu kondukos al unu monda lingvo, okazas sendepende de esperanto."

"... En la disvolviĝ-procedo de la burĝa socio estis kreitaj sennombraj projektoj de helpaj lingvoj, inter kiuj plej vivkapabla sin montris la projekto konata sub la nomo "lingvo esperanto". Ni ne devas tamen malakcepti utiligon ankaŭ de aliaj internaciaj lingvoj, se ilia disvastigiteco faras tiun utiligon ebla..."

Mi dezirus pli amplekse citi, se la loko permesus ; sed mi opinias, ke la ĉi-supraj citoj sufiĉas por konvinki la legantojn, ke nia afero en Sovetio estas tute miskomprenata kaj ne troviĝas en tre favora situacio. Ni tute ne povas esperi, ke baldaŭ Komintern solvos la lingvan problemon laŭ niaj ĉiamaj postuloj. En la tuta tezaro oni vane serĉus iun eldiron, kiu povus esperigi, ke post pli malpli longa tempo esperanto fariĝos la oficiala lingvo ĉe la internaciaj Kongresoj de Komintern kaj por la publikigo de dokumentoj kun tutmonda intereso.

Ni sekve devas daŭrigi la batalon kaj tiucele ni bezonas ĉiujn niajn unuigitajn fortojn. Pli firme ol iam ajn ni konvinkigu, ke la venko venos nur de malsupre kaj per la faroj de la esperantistoj mem.

Ĉe la konstato, ke longa, tre longa estas la vojo ĝis la fincelo, eble kelkaj K-doj perdos la emon daŭrigi la iradon. Al tiuj malkuraĝemuloj mi diru : "Ne la celo estas la ĉefa afero, sed la antaŭeniĝo al ĝi. En la irado mem, en la batalo mem ni devas trovi la necesan instigilon por daŭrigi." Okaze de ĉi tiu 400-a n-ro permesu al mi fari konfesion. Dum dek-tri jaroj mi batalis por nia komuna afero ; ĉe la komenco mi havis iluziojn ; hodiaŭ ili estas for ; la celo ne ŝajnas al mi atingebla dum mia pli ol duone forviva vivo ; tamen neniel mi bedaŭras mian ekiron. Male, mi forgesas ĉion tiurilate - kaj ĝojas ĉe la penso, ke la insultintoj devis almenaŭ uzi esperanton por eldiri siajn malicaĵojn. Insultado forigas **fremdon**. Tio estas tre grava!... Pripensu tion, Gek-doj. Fremdo estas

(*) Tiam la samaj personoj, kiuj hodiaŭ aplombe kaj bombaste agitas por la unueco, konsideris SAT-on kiel "socialfaŝistan" organizon...(Kompil.)

pli malbona eco ol malestimo. Fremdo estas nerenvers-
ebla baro sen komuna lingvo, dum malestimo povas iafoje
esti kaŭzata de kalumnio aŭ miskompreno kaj sekve for-
iĝas tuj, kiam malaperas la kaŭzo. Fremdon forigas
esperanto kaj tio estas netaksebla merito. Eĉ se mi havus
nun la certon, ke neniam nia lingvo fariĝos ĉies posed-
aĵo, mi tamen nenial bedaŭrus esti dediĉinta al ĝi tem-
pon kaj energion kaj daŭrigus la batalon. Plej alcelinde
estas penadi por senĉese plilarĝigi sian horizonton.
Esperanto jam nun donas tiun eblon. Krome la Zamen-
hofs artefaritaĵo fariĝis mia hejma lingvo, kaj la kons-
tato, ke ĝi kvazaŭ fremdigas la francan lingvon en mia
menso, estas por mi tute aparta, tre neordinara plezuro,
kiun mi bedaŭrus ne ĝuadi...

Volante de nun esti nur simpla soldato de nia SAT-
ana armeo, mi tamen sentas min pli forte ligita al ĝi ol
iam ajn antaŭe kaj restas ĉiam preta bataladi por ties
sukceso. Sed en ĉi tiu kvazaŭa "cigna kanto" mi deziras
konvinki la junajn batalantojn pri tio, ke la fincelo devas
esti nur flanka afero en iliaj zorgoj kaj esperoj. Insiste
mi rediras : vi trovu en la agado mem, en la uzado mem
de la lingvo la ĉefajn instigilojn por antaŭenmarŝi.

Se mi ne timus miskompreniĝon, volonte mi proponus,
ke sur nian standardon oni skribu novan frazon, nome :
Ni estu unue esperantistoj, SAT-anoj.

En mia penso tio signifas, ke oni ne povas esti kon-
sekvenca anarkisto, komunisto, socialisto, ne celante
detruji la lingvajn barojn, kiuj apartigas, fremdigas la
homojn. Paroladi pri tutmonda unuigo de la laboristaro
kaj obstine ignoradi esperanton, tio estas ĉu stulto, ĉu
malsincero, ĉu kaŝa aŭ nekonscia ekspluatemo. Esti en
SAT unue esperantisto, tio ne signifas, ke en sia partio,
en sia sindikato oni ne devas esti ankaŭ tie unue
partiano, unue sindikato. Tio nur signifas, ke por ak-
ceptigi esperanton al niaj organizoj ni devas esti unuig-
itaj, kaj nia unueco povas esti garantiata nur se en la
esperantaj rondoj ni vole bridas niajn personajn politik-
ajn konvinkojn. Se tion estus kompreninta la granda
numero da K-doj, kiuj aliĝis al SAT ekde ĝia fondiĝo,
ĉi tiu 400-a n-ro povus esti eldonita 20.000-ekzemplere.
Ni meditadu pri tiu fakto, se ni sincere deziras sukcese
almiliti la laboristajn organizojn, por trudi al ili esper-
anton...

Sed, kiam oni prikonsideras la situacion, en kiu nuntempe baraktas la homaro, eble estus pli saĝe gratuli al si, ke nia gazeto povis atingi ĉi tiun 400-an numeron. Do, antaŭen! por ke ĉe la 500-a la estonta gvidanto povu paroli pli entuziasme. Kun neŝanceliĝa unuecemo kaj kun la certo, ke ili faras utilan kaj pozitivan laboron, la SAT-anoj spitu la batojn de l'sorto kaj antaŭeniru!...

*

LETERO OKA

Al Parizaj Gek-doj

Osaka, 20-9-1937

... ..

Kiam mi relegas miajn skribaĵojn, nemalofte okazas, ke la stilo ne tute kontentigas min. Bualo(1) ja estis prava, kiu rekomendis dudekfoje reprimlabori verkaĵon. Kaj Flobert(2) ne estas mokinda, kiu, liadire, ŝvitis dum 12 horoj por verki nur du-tri paĝojn.

Kiam oni verkas, tiam kompreneble gravas la senco, la ideoj esprimotaj. La formon oni devas prilaboradi poste. Sed la konstato, ke ideoj, kiuj ŝajnas al la verkinto, ankaŭ al aliaj homoj, klare esprimitaj kaj kiuj tamen ne estas tute ĝuste komprenataj de ĉiuj legantoj, starigas gravan demandon. Mi aludas al mia artikolo : **Vivu la Neŭtralismo!** (3). Ĝus mi relegis ĝin kaj sincere dirote, mi estas mirigita, ke kelkaj legantoj povis kompreni la malon de tio, kion mi ironie esprimis. Kaj malgraŭ via aldono de la difino pri ironio sur alia paĝo!... Bonvolu konigi al mi ĉiujn rimarkojn, kiujn vi aŭdis aŭ ricevis pri tiu artikolo. Eble eĉ estus trafe fari kvazaŭ enketon, petante la legantojn, ke ili eldiru sian opinion. Sed la bedaŭrindaĵo

(1) Boileau, franca verkisto el la 17-a jarcento. Jen la versoj de Bualo:

Sur stablon dudekfoje remetiu la verkaĵon

Poluru ĝin senĉese kaj ree ĝin poluru. - (Kompil.)

(2) Flaubert, franca verkisto el la 19-a jarcento. (Kompil.)

(3) Ĝi aperis en la maja numero (1937) de **Sennaciulo** kun la subskribo: **Arigato Gozaimazu.** (Kompil.)

kuŝas en tio, ke jam vi diris, ke la senco de la artikolo estas ironia. Kio estus interesa kaj valora, tio estus ekkoni la **freŝan impreson** de legantoj tuj post la legado.

Por kvazaŭ fari duan eksperimenton, mi sendas al vi duan artikolon, verkitan ankaŭ laŭ la sama ironia maniero (4)...

*

Ĉar prezentiĝas la okazo priparoli lingvajn aferojn, mi profitu ĝin por eldiri, ke mi tute ne ŝatas la rezonadon de Karlo Minor en "La Lernanto". Mi eĉ malkaŝe diros, ke liaj "Lingvaj Notoj" ne taŭgas por tia organo, kies nura celo estas instruadi nian lingvon al lernantoj kaj ne pridiskuti ĝin. Lingva diskutado estas allasebla nur en **Sennacieca Revuo** aŭ en **Sennaciulo**.

Aliparte, mi havas la impreson, ke Minor estas ...idisto! Jes, en tiu senco, ke li tro alte taksas logikon en lingva fako. Lingvo ne estas matematikaĵo, abstraktaĵo. La grava eraro de Kutura (5) k.a. idistoj konsistis ĉefe el tio, ke ili volis apliki en la lingvo-fako absolutajn principojn, kiuj taŭgas nur rilate matematikon.

En lingvo efikas du ĉefaj "leĝoj" (fortoj, kaŭzoj) : **Leĝo de analogio kaj leĝo de minimuma peno**. Kvankam plurrilate esperanto estas logika lingvo, tamen tiuj leĝoj kelkokaze povas esti pli fortaj ol la logiko. Tial ke en esperanto ĉiam troviĝis formoj kiel Alĝerio, Aŭstralio, Aŭstralazio, Bizantio, Bolivio, Bosnio, Kaledonio, Lombardio, Ontario, Rodezio, Sicilio, Sirio, Tasmanio, Tunjzio, ktp., estis tute nature, ke la leĝo de analogio instigu al la apliko de **io** ĉe ĉiuj landnomoj. Kaj la sama leĝo ankaŭ efikis en tiu rilato, ke estas ridinde diri, ekzemple : supujo kaj Svisujo, pomujo kaj Polujo ktp. ktp...

Via piedpaĝa rimarkigo, ke ne SAT, sed UEA, kiam ĝi estis gvidata de Hodler, enkondukis la uzon de **io** ĉe landnomoj estas ĝusta, sed iel kastro. Ĉiu devas scii : 1) ke nun la plimulto da esperantistoj forlasis la formon

(4) Tiu artikolo havas kiel titolon : "... Tial mi konvertiĝis al la budismo". Ĝi aperis en la novembro n-ro (1937) de **Sennacieca Revuo**, kun la subskribo : **Arigato Gozaimasu**, kaj ankaŭ en **Nia Gazeto**, kaj tie estas subskribita : **E.L. Deska**. (Kompil.)

(5) France : Couturat. (Kompil.)

ujo, 2) ke nur por ne konflikti kun la Akademio Teo Jung ĉesigis la uzon de **io** en "Heroldo", kaj deklaris, ke li tamen preferas ĝin al **ujo, 3)** ke en "Plena Gramatiko" de K. Kaloĉai kaj Varingjen estas jeno dirita : "Sed, krom multaj neŭtraluloj, ĉiuj laboristaj rondoj uzas la io-formojn malgraŭ la oficiala malaprobo. Tiel la esperantistoj dividiĝas nun en io-anojn kaj ujo-anojn. **Laŭ la nuna stato de la afero, la unueco ŝajnas pli facile atingebla per la cedo de la Lingva Komitato ol per plua rezisto kontraŭ la sufikso**" (Substreko mia - p.88).

Aliparte vi scias, ke la sennaciistoj ne povas konsenti al la eternigo de la ujoj por nacioj t.e. la landlimoj. Kaj tio memorigas min pri la interparolo, kiun mi havis siatempe kun S-ro Kar (1). Li ja konfesis, ke ne eblas pravigi la uzon de **uj** ĉe landnomoj, starante ĉe sennacisma vidpunkto.

Pri la idismo de K. Minor mi sendos al vi baldaŭ artikolon (2).

*

Ĉar mi citis el la **Plena Gramatiko de Esperanto**, mi volas aldoni, ke mi admiras la lingvan kompetenton de la du aŭtoroj, sed opinias, ke ili tamen faris malbonan servon al nia afero. Mi konfesas, ke neniam mi havis sufiĉe da kuraĝo por tralegi la 370-paĝan volumon ; sed mi legis sufiĉe por konvinkiĝi, ke kontraŭulo de esperanto aŭ de artefarita lingvo, povas ĉerpi en tiu verko tre trafajn, - mi ne diras bonajn, - argumentojn. Kaj mi mem eble neniam estus lerninta esperanton, se mi ekscius pri la ekzisto de tia ampleksa gramatiko...

(1) France : Cart ; li estis dum pluraj jaroj la prezidanto de la Akademio. Pri la menciita interparolo, la legantoj eksciuj, ke en "Vortoj de Kdo Lanti", paĝ. 118-9 troviĝas pri ĝi raporto. (Kompil.)

(2) La menciita artikolo aperis en la oktobra n-ro (1937) de **Sennaciulo** kun la subskribo **E.L. Itansa**. Tial ke la demando havas specialan interreson, ni opiniis utile represigi ĝin. Vd. apudan paĝon. (Kompil.)

FOR LA IDISMON !

Tial ke s-ro K. Minor tradukis la verkon **Natan la Saĝulo**, tio ne pruvas nepre, ke li mem fariĝis pro tio tute saĝa. Almenaŭ lia rezonado prilingva en la julia n-ro de **La Lernanto** (Kompatindaj lernantoj!) emigas pensi, ke lia saĝo estas kelkrilate mankohava.

"Oni ne uzu a-vortojn substantive...", ordonas nia honorinda L.K.-ano. Ĉu vere ? Tia ordono estas tro aplomba kaj eĉ ofenda al la aŭtoro de nia lingvo. Zamenhof ja multfoje uzis a-vortojn substantive. Pri tio mi estas tute certa, kvankam nun mi ne havas ĉemane verkaron de nia Majstro, por kontroli kaj cite ĉerpi ekzemplojn (1). Kaj insistas Minor klarige : "Oni ne diru ekzemple "la riĉaj estas enviindaj". Se tiel oni volas instrui al la lernantoj, necesas ankaŭ aldoni : "**Ne legu Zamenhofajn verkojn ; ne imitu la stilon de la aŭtoro de esperanto...**"

Kvankam tia Minora instruo sur la paĝoj de SAT-gazeto estas vere incita, tamen ni sobre ekzameni la aferon. Kial s-ro Minor havas tian komprenon pri nia lingvo ? Senhezite mi respondas : tial ke li estas idomena. Kio karakterizas idiston, tio estas lia logikemo - lia deziro importi sur la lingvan kampon disciplinon, kiu taŭgas nur en matematika fako. Evidente, pli logikas diri : "La riĉuloj estas enviindaj", ol "la riĉaj estas enviindaj". Tamen ambaŭ formoj estas tute klaraj, tial ke eĉ la plej etcerba leganto kapablas scii, ke en la dua formo la vorto **homoj** estas subkomprenata.

Jes ja, s-ro Minor rezonas kiel la idisto ; li volas, ke nian lingvon regu la absoluta logikeco, la matematikeca spirito de Kutura, kiu taŭgas nur rilate abstraktaĵojn, sed ne estas allasebla en la lingva fako, tial ke en ĝi la **sento** vole-nevole ludas rolon. Lingvo ne estas komparebla kun matematikaj signoj. En la funkciado de lingvo la emocio, la pasio efikas ne malpli forte ol la racio.

Kiam oni ekkomprenis la koscian aŭ nekoscian idomon de K. Minor, tiam oni facile klarigas al si, kial li ekbatalas kontraŭ la formoj **aliel**, **aliam** ks. Logike ja

(1) La aserto de la aŭtoro estas tute prava. La legantoj, kiuj ne emus traserĉi, notu, ke en **Plena Gramatiko** de Kaloĉai kaj Varingjen troviĝas pluraj ekzemploj cititaj. (Komp.)

devus esti "alijiel" ks. Sed li ŝajne ne scias, ke en tia kazo la leĝo de **minimuma peno** efikas. Se sufiĉas uzi la plej simplan formon por esti komprenata, nenia logikeca, teorieca konsidero povas en la praktiko kontraŭpezi sukcese la simpligemon.

Rilate al la alpreno de tiuj ŝajn-neologismoj efikis alia lingva leĝo, nome tiu de **analogio**. Kiu funde lernis kaj asimilis la tabelon de korelativaj vortoj, - miaopinie ĝi estas la plej genia elpenaĵo el nia lingvo, - tiu tute nature kaj senkonscie eldiras frazojn kiel ekzemple jenajn: **"Ne tiel rapide, aliel mi ne povos akompani vin plu! Ies mensogo ne pravigas alies trompon. Ne ĉiam ni estis amikoj, tamen iam kaj aliam ni servis al ni reciproke. Ĉi tie estas malagrabla, ni iru alien. K.s.**

Jam ekzistas en Esperantio kelkaj homoj, por kiuj esperanto ne estas "helpa lingvo", sed la ĉefa, la hejma esprimilo. Mi opinias, ke tiaj esperantistoj konsistigas pli bonan fundamenton por la estonto de nia movado ol teori-umado logikeca. Almenaŭ mi havas la firman konvinkon, ke la lingvaj rezonaĵoj de K. Minor ne devus aperi en "La Lernanto". Ili neniel povas helpi lernantojn kompreni kaj ŝati nian lingvon.

Prefere oni instruu pri diversaj manieroj, formoj, por eldiri la saman penson ; oni kritiku la pezajn esprimojn kaj malklarajn frazojn, tro ofte renkonteblaj en la gazetararo kaj libraro. Oni provu konvinki la novan generacion esperantistan pri tio, ke nia lingvo entenas latente trezorojn, kiujn Zamenhof mem ne povis elfosi. Esperanto ne venkos per komercistoj kaj turistoj. Tiu kampo jam estas okupita de la angla lingvo. Esperanto sin trudos per sia literaturo, kiam troviĝos geniaj homoj, kiuj, ensuĉinte la esencon de l'Zamenhofa iniciataĵo, verkos **sennaciece** por tutmonda publiko. Kaj pro tiu konsidero ankaŭ oni devas ekkrii : **For la idismon**, ĉar la aŭtoroj de tiu abortaĵo ne volis, ke artefarita lingvo estu literatureca.

Espereble s-ro K. Minor pruvos al mi "substantive", ke li estas **sagulo**, ne sentante sin ofendita per ĉi tiu mia senpretenda skribaĵo.

*

LETERO NAŬA

Al profesoro G. Varingjen

En via recenzo pri la libro de Sturmer, vi mencias mian "malpravon" vidpunkton, rilate al la rolo kaj signifo de esp-o. Ne kredu, ke mi intencas polemiki kontraŭ vin pri tio. Tute ne! Mi ja scias, ke ne mankas ŝajne bonaj argumentoj por montri mian "malpravon". Tamen mi restas ĉe la opinio, ke esp-o supervenkos la naciajn lingvojn, aŭ... **neniam** venkos, neniam ludos eĉ la rolon, kiun Zamenhof kaj la plimulto da esp-istoj difinis al la artefarita lingvo.

Ne intencante longe argumentadi por surbazigi mian tezon, mi simple faros jenajn rimarkigojn kun la nura celo montri, ke mi ne tiel fantazias, kiel oni povas supozi ĉe unua ekpenso pri la temo.

Unue mi diru, ke la dezirindo aŭ nedezirindo, ĉu esp-o anstataŭos aŭ ne la naciajn lingvojn estas ekster la diskuto : niaj deziroj aŭ timoj estas tute sen influo en tiu afero, **se ni utiligas kaj praktikadas esp-on**. Kiu fakte timus, ke esp-o povus forpuŝi la karajn naciajn lingvojn, tiu devus nepre forlasi la esp-an movadon kaj provi mallerni nian lingvon.

Oni do bonvolu pripensi jenon : se esp-o posedas la kvalitojn, kiujn ni atribuas al ĝi ; se post pli malpli longa tempo la uzado de nia lingvo ĝeneraligĝos ĉie en la mondo, tiam ŝajnas al mi neeviteble, ke la naciaj lingvoj tendencos pli kaj pli fariĝi duagradaj, rilate sian teknikan, literaturan, kulturan rolon. Aŭtoro preferos eldoni siajn verkojn en lingvo tutmonde konata de milionoj kaj centmilionoj da homoj. Famaj naciistaj verkistoj irlandaj (ekz. Jets (Yeats), la poeto) certe ne konsentos rezigni anglalingvan verkadon, eĉ se iam la irlandaj naciistoj sukcesus revivigi la gaelan idiomon tra la tuta insulo. Estas natura deziro ĉe aŭtoro havi kiel eble plej vastan publikon.

Ĉu mi estas tro pesimista, opiniante, ke verŝajne forpasos almenaŭ duonjarcento, antaŭ ol ĝeneraligĝos la uzado de esp-o ? Aliflanke, ĉu estas signo de troa fantaziemo antaŭvidi, ke post tiu relative longa tempo la okazoj kaj rimedoj, por ke la homoj el ĉiuj kontinentoj alproksimiĝu kaj interrilatiĝu, fariĝos neimageble pli oftaj kaj pli oportunaj ol ili estas nun inter diversaj provincaj en iu ajn nacio ?

Se ne estas tro malsaĝe havi tian opinion, ŝajnas al mi, ke la danĝero pri disdialektiĝo estus reala, nur se, per mi ne scias kia miraklo, nia lingvo tuj estus alprenata kaj uzata. Unuvorte mi bazas mian opinion sur tiuj konsideroj, ke esp-o finvenkos nur post longa tempo, kaj ke tiam la nunaj kaŭzoj pri disdialektiĝo ne plu ekzistos.

Mi jam diris sufiĉe por ke vi sciu, ke mi ne estas tiel fantaziema, kiel oni povus kredi ĉe la legado de via diro pri la demando. Permesu tamen, ke mi aldiru ankoraŭ kelkajn vortojn pri mia propra sperto ĉiutaga.

Esperanto estas mia hejma lingvo ; per ĝi mi ĝenerale esprimas miajn pensojn pli facile ol per la franca lingvo. Kaj tia konstato naskis ĉe mi la esperon, ke estonte pli kaj pli da homoj akiros la saman sperton. Se inter ili troviĝos geniaj verkistoj - kiaj ankoraŭ ne ekzistas en nia movado - tiam nia lingvo ricevos nedetruieblan fundamenton, sur kiu elkreskos mondliteraturo, kapabla forpuŝi duarangen la naciajn lingvojn kaj eĉ iom post iom entombigi ilin...

Kaj se mi fantazias, oni bonvolu pardoni tiun tute sendanĝeran manion. Nia movado eble estus multe pli vasta, vigla kaj firma, se ĉiuj nunaj esperantistoj fariĝus veraj, ĝisostaj **esperantistoj**, t.e. homoj ĉe kiuj la artefarita lingvo fariĝis viva, fariĝis la hejma, la preferata esprimilo...

Kun sennacieca saluto (1).

*

(1) Ĉi tiu letero aperis en "Literatura Mondo", n-ro de aŭg.-okt. 1935. Laŭ la peto de prof. V. ni almetis la tekston pridiskutitan de Lanti : "La demando, ĉu E. iutage anstataŭos plene la naciajn lingvojn, estas aludita en tiuj ĉi notoj, kun referenco al L., kiu unue elmetis ĝin. Mi ne kredas tion ebla, nek precipe dezirinda : la ekzemplo de la latina lingvo disdialektiĝinta en la romana imperio, kaj tiu de la angla lingvo, kiu komencas alpreni en Usono aspekton pli kaj pli distingan disde tiu, kiun ĝi konservas en Anglujo, pruvas, ke lingvo ĉiutage uzata en la vulgara vivo ne povas evolui unudirekte sur iom vasta teritorio..." (Kompil.)

LETERO DEKA (1)

Al K-do M. M., Oslo

Parizo, 27-1-1925

Unue mi rimarkigu, ke la spiona maniero per kiu la antaŭparolo venis en viajn manojn ŝajnas ne tre aprobinda, laŭ etika vidpunkto. Sed, kompreneble, tiu rimarko ne koncernas vin, kiu nur ludis en la afero pasivan rolon.

Mi ja komprenas vian indignon kaj vian suspekton al mi. Vi demandas vin : kiam do Lanti parolas sincere ? Ĉu kiam li parolas al SAT-anoj, aŭ kiam **komisiite** li verkas raporton por Komintern ?

Antaŭ ol respondi tiun demandon, permesu, ke mi demandu vin jene : ĉu vi ne opinias kiel mi, ke tre grave estus, se Komintern oficiale sin deklarus favora al esperanto ? Ĉu estas eble, ke objektive pensanta homo kaj sincera esperantisto malatentu la fakton, ke favora decido de Komintern ĉesigus kaj malebligus la blufan agadon de idistoj kaj fortege antaŭenpuŝus la esperantan aferon en Sovetio kaj en la Kompartioj ĉiulandaj ? Plie, tia decido signifus pli malpli baldaŭan enkondukon de esperanto en la sovetiaj lernejoj. Tial, akceptinte verki la koncernan raporton, mi ĉiam prezentis al mi la grandan atingotaĵon, kiun celis mia laboro. Mi provis meti min en la spiritostaton de advokato, kiu dum li pledadas **nur** konsideras la bonon de sia kliento. Li uzas **ĉiujn argumentojn**, kapablaj igi la juĝistojn favoraj al la juĝato. Kaj kiam okazas, ke advokato pledas por akuzito, kiun li eĉ opinias kulpa kaj tamen provas senkulpigi, oni pro tio ne kutimas riproĉi al la advokato.

Nu, por kompreni mian sintenadon en tiu afero, necesas kvazaŭ kompari ĝin kun tiu de advokato. Mi konfesas, ke mi metis maskon de sklavece obeema komunisto. Antaŭ vi mi demetas la maskon kaj deklaras, ke **unue** mi estas SAT-ano kaj due komunisto...

Post tiu mia konfeso, skribita konfeso, vi tenas en viaj manoj la eblon okazigi mian eksigon el la Kompartio

(1) Kopion de la du sinsekvaj leteroj ni trovis en la SAT-arkivo. Ni publikigas ilin pro du ĉefaj motivoj : a) ili montras, ke Lanti estis dum sia gvidado lojala al ĉiuj tendencoj kaj neniam partieca, - b) ili liveras konindajn sciigojn al tiuj, kiuj deziras havi klaran komprenon pri la kaŭzoj de l'skismo en nia movado. - (Kompil.)

Sufiĉas, ke vi komuniku tiun ĉi mian leteron al la persono, kiu spione havigis al vi la tekston de la antaŭparolo de mia raporto, por ke baldaŭ mi estus denunciata kiel eksiginda partiano. Nu, okazu kio ajn. Eksigon el la partio mi antaŭvidas sen tremo. Cetere, mi konfesu al vi, ke ĉi tie en Parizo du el miaj konatuloj, kiujn mi tre estimas, estis lastatempe eksigitaj. Tiuj du K-doj nomigas Monatte kaj Rosmer. Se mi partoprenus aktive en la laboroj de la ĉi tiea Kompartio, mi tutcerte estus aliĝinta al la vidpunkto de la eksigitaj kaj sekve havus la saman sorton.

Sed ne temas pri tio. Temas pravi ĉu **fakte**, ne nur parole, mi lojale kaj sincere servis la SAT-aferon laŭ la statuta senco, laŭ la spirito de la gvidrezolucioj de niaj kongresoj.

Kamarado, hodiaŭ kiel hieraŭ, kiel ĉiam mi restas ĉe la konvinko, ke SAT devas esti "TEKNIKA APARATO, kiun povu utiligi anarkistoj, komunistoj, socialistoj, unuvorte ĉiuj klaskonsciaj laboristoj kaj NE politika aparato". Kaj se vi volas senpasi kaj malvarmsange esplori la ĝisnunan mian agadon vi devos konfesi, ke mi **kiel eble** provis atingi tiun celon. Sed mi petas, ke vi ne forgesu, ke ne estas ĉiam eble iri rekte al la celo. Okazas, ke sur la vojo oni renkontas barojn, kiuj devigas iafaĵe zigzagi. Unu el tiuj baroj estas la partia fanatiko de multaj anoj, ĉu komunistaj, ĉu anarkistaj. Mi memorigu al vi, ke, kiam mi raportis pri mia vojaĝo en Rusio, kelkaj komunistoj riproĉis, ke mi ne parolis kiel partiano, sed iafaĵe kiel la kontraŭuloj de l'bolŝevismo... Ne forgesu, ke en Moskvo estas kelkaj "komunistoj", kiuj celas pere de S.E.U. kapti en siajn manojn la gvidadon de la esperanta movado laŭ internacia skalo. Kaj por tion fari ili ne preterlasas la okazon prezenti min kiel ne tre ortodoksan komuniston. Unuvorte, mi sincere konfesu al vi, ke, se mi ne estus plurfoje kontraŭbatalinta vigle la emon de kelkaj komunistoj, viaj timoj pri intrigoj flanke de la komunistoj por regi SAT-on estus tute pravaj. Nu, ĉu do vi ne povos facile ekvidi, kiel sagace mi devis en kelkaj okazoj agadi por baro al la emo de partiuoj fari el SAT politikan organon. Mi kompreneble en letero ne povas liveri al vi ĉiujn pruvojn pri la vero de mia aserto. Domaĝe, ke vi ne estas ĉi tie en Parizo ; mi povus montri al vi la dokumentojn, kiuj tutcerte konvinkus vin. Mi do povas nur

citi al vi kelkajn faktojn, pri kiuj mi petas vin sufiĉe atente pripensi.

Cetere, per la apudmetita letero de K-do L. Revo, vi povos konstati, ke ne estas tute ĝuste kulpigi min laŭ plena respondeco pri la enhavo de "mia" antaŭparolo. Se okaze ne estas inter vi iu scipovanta la francan lingvon, mi traduku por vi la blukrajone ĉirkaŭstrekitaĵajn partojn.

"Mi estas preta preni sur min etan parton de la laboro : verki tiun antaŭparolon. Post kelke da tagoj mi sendos al vi projekton de antaŭparolo, kiun vi utiligos laŭ via bontrovo. Mi konsideras, ke estas necese elstarigi en tiu antaŭparolo, sur la bazo de la decidoj de la 5-a Kongreso, ke K.I. kaj la K.P. (Kompartio) devas pli okupiĝi pri la frakcioj en la esperanta movado, samkiel okazas en la sindikatoj, kooperativoj, sporto ktp..."

Sed, vi demandos, kial vi konsentis enmeti antaŭparolon, kiu ne akordiĝas kun via aparta pensmaniero ? Respondon al tia demando vi trovu en la dua parto, blukrajone ĉirkaŭstrekita, de la letero de Revo :

"Ni antaŭvidu novan atakon de Dre... Antaŭnelonge, li diris, ke estus necese, ke la raporto venu en "niajn manojn" (t.e. en la manojn de la Komfrakcio de C.K. de S.E.U.) antaŭ ol esti prezentata al K.I. Miaopinie, la raporto POVAS esti prezentata al la Komfrakcio de la C.K. de S.E.U., samkiel al aliaj k-doĵoj, kies opinio estas al ni ŝatinda, por havi ilian konsilon, sed la Centra Oficejo (Bäsler Leipzig) de la Komfrakcio de SAT NE ESTAS DEVIGATA tion fari..."

Nun konante la kondiĉojn, laŭ kiuj mi devis plenumi mian taskon, ĉu do vi ne konsentos kun mi, se mi diras, ke mi estis devigata akcepti la antaŭparolon de Revo. Eksciu, ke tiu K-do oficas ĉe la sidejo de Komintern kiel tradukisto. Li do bone konas la argumentojn, kiuj kapablas influi sur la nunajn gvidantojn de la Agitfako, al kiu estis adresota la raporto. La vera vero estas, ke, konsciante pri la intrigoj de Dr... kaj aliaj kontraŭ SAT, mi ne devis liveri al ili pretekston por ataki min kiel ne tre ortodoksan komuniston.

Sed, vi rebatos, la faktoj cititaj en la antaŭparolo de via raporto estas veraj : la gvidpostenoj de SAT estas en la manoj de komunistoj. Antaŭ ol esplori, ĉu tio estas tute vera, necesas ekscii, ĉu tio estas rezulto de intrigoj

flanke de la komunistoj aŭ nur rezulto de hazardo. Kiam nekomunisto montris sin kapabla, sincera kaj laborema, neniam mi provis forpuŝi lin de respondecaj postenoj en SAT. Vi ne povas dubi pri mia diro, ĉar mi insiste petis vin kandidati por la posteno de D.K.-ano. Se komunistoj troviĝas ĉe respondecaj postenoj, tio rezultas el tio, ke ili sin montris agemaj kaj spertaj ; sed ne pro ilia komun-isteco ili estas elektitaj.

Nun ni ekzameni ĉu **fakte** la komunistoj havas en manoj la tutan gvidadon de SAT. En la P.K. estas tri komunistoj (Lanti, Glodo, Banmer), unu anarkisto (Minji), unu anarkiema senpartiuulo (Piron) kaj unu socialistino (Frida Noel). En la D.K. estas (estis) du komunistoj : J. Rot kaj Goldŝtejn. La aliaj estas anarkistoj, socialistoj aŭ senpartiuuloj, kiel ekz. Demidjuk. Bonvolu mem esplori la aferon kaj vi devos konstati, ke "miaj" diroj en la antaŭparolo de la raporto estas nur **advokatecaj** diroj.

Lau tia vidpunkto, mi povus same bone diri, ke SAT estas plene sub la influo de anarkistoj, citante la multajn artikolojn el "S.R." kaj "S-ulo", kiujn represis anarkistaj organoj. Rilate la eldonaĵojn de la SAT-kooperativo, mi povus citi, ke la unua verko eldonita estis anarkistema libro (Tri Verkoj de Tolstoj) kaj ke baldaŭ grava verko de Kropotkin estos eldonata (La Etiko). Pri tiu ĉi eldonotaĵo mi konigu al vi, ke antaŭ unu jaro mi persone elspezis 1000 fr.fr. por tiu speciala eldono. Ĉu tio estas la faro de fanatika komunisto, kiu celas nur obei la decidojn de la kongresoj de Komintern ? Kaj necesas ankaŭ aldoni pri tiu temo, ke "Dokumentoj de Komunismo" estis eldonataj nur por kontraŭpezi la influon de Dr..., kiu tiutempe klopodadis por akiri influon sur la komunistajn membrojn de SAT kaj por tio eldonis "La Kvinjaro de Sovetlando" kaj aliajn malpli gravajn verkojn. Se mi povus meti al via dispono la leterojn, kiujn mi interŝanĝis tiutempe kun Bartelmes el Dusseldorf, vi estus plene konvinkita pri la vero de mia aserto.

Mi supozas, ke vi ne riproĉas pro la fakto, ke neniam aperis en niaj organoj artikoloj en kiuj troviĝas atakoj kontraŭ Sovetio. Ĉu tio ne estas tute lau la spirito de nia Statuto kaj de la gvidrezolucioj de niaj kongresoj ? Se ni akceptus tiajn artikolojn, ni ja enkondukus en SAT la diskutpunktojn, kiuj disigas nun la laboristaron. Sed neniam teoria defendo por la anarkismo estis rifuzita. Oni

do povas diri tute prave, ke niaj organoj estas "Libera Tribuno" por ĉiuj tendencoj de la laborista movado.

Pri tiu aserto, ke neniam aperis kontraŭkomunistaj artikoloj en niaj organoj, mi povus rimarkigi tamen, ke ĝi estas ankaŭ **advokateca** aserto. Vi povos mem juĝi pri tio, se vi memoras, ke aperis en S.R. du longaj artikoloj de Civinski R. Leliva (pseŭdonimo) kiu akre atakis marksismon. Ankaŭ artikolo de Veder en "S.R." kaŭzis, ke la idistoj en "Nia Standardo" povis skribi : "Sennacieca Revuo kontre Komintern".

Nun, unu rimarkon pri via diro, ke mi malhelpis fondon de frakcio el liberecanoj. K-do, tia via aserto mirigas min. La vero estas, ke mi nur malkonsilis fondon de organizo **ekster** SAT. Kvankam K-do Minji, al kiu mi fidis, asertis al mi, ke tiu organizo ne celas malbonon kontraŭ SAT, mi tamen restas konvinka, ke en tia apartiĝemo kuŝas danĝero. La sperto ja montras, ke la propagando frakcie farata estas pli fruktoporta. Sed SAT per sia adresaro ebligas tiun frakcian laboron. Oni ne bezonas alian organon. La frakcia laboro en la kadro de SAT estas konsekvenco de la funkciado de nia aparato profite al ĉiuj tendencoj. Sed tiel ne estas, kiam temas pri aparta memstara organizo el esperantistaj anarkistoj.

Tiu letero estas jam longa kaj tamen mi ne diris la duonon el ĉio dirinda. Mi cetere emas pensi, ke skribante plue mi tamen ne povus tute konvinki vin. Necesus, ke vi povu legi mem en la profundo de mia konscienco. Neeble. Mi petas nur, ke vi pripensu jenon : Lanti neniam aktive laboris en la kompartio ; lian tutan energion li dediĉis al SAT. Tiakondiĉe, ĉu estas psikologie, morale ebla, ke li ruzaĉe celas meti SAT-on sub la kontrolon kaj regadon de Komintern ?

K-do, se mi ne sukcesis konvinki vin pri mia sincero kaj lojalo, rilate mian agadon en SAT, se vi suspektas, ke mi celis trompi vin kaj la aliajn nekomunistajn K-dojn, nu, almenaŭ mi esperas, ke vi restos en SAT, se eĉ estas nur kun la sola celo kontraŭbatali min. Mi ne povas supozi, ke vi imitos la Frankfurtajn K-dojn, kiuj ekzigis, tial ke ili supozas, ke la malakcepto de siaj proponoj rezultas de la agado de komunistoj. Se multaj nekomunistaj elementoj forirus, kompreneble, la nun neekzistanta danĝero pri "komunistiĝo" de SAT povus fariĝi reala danĝero.

Laŭ via peto, mi do demetis antaŭ vi la maskon - la advokatecan maskon - kiun mi surmetis por verki mian raporton. Nun mi atendas vian senpasion, senpartiecan, vere SAT-anecon juĝon. Kia ajn ĝi estos, mia konscienco restos kvietaj, tial ke mi ĉiam sincere nur celis la bonon kaj prosperon de SAT. Kompreneble, se vi deziras pluajn klarigojn pri iuj ajn punktoj, mi restas al via dispono...

*

LETERO DEK-UNUA

Al K-do J.V.M., Amsterdamo

Parizo, la 30-6-1933.

Jam de kelka tempo oni trandonis al mi vian leteron, sed nur hodiaŭ mi trovas la necesan tempon por fari konvenan respondon.

Facile mi komprenas, ke mia artikolo en la maja n-ro de "S.R." ne plaĉis al vi. Min ankaŭ cetere ĝi ne tute kontentigis. K-do Bartelmes povus eĉ atesti pri mia ŝanceliĝo en la decido ĝin publikigi. Alian artikolon mi estis verkinta, kiu estis certe pli klara, ne lasis ian dubon pri mia opinio, sed por aperi en nia senpartieca organo ĝi estis vere tro drasta kaj pro tio iris en paperkorbon.

Sed nun mi povas tute senĝene skribi, havante la opinion, ke vi estas sufiĉe memstara kaj honesta por ne misuzi mian konfeson. Temas ja pri kvazaŭa konfeso en tiu senco, ke mi tute perdis la kredon en tio, ke Sovetio estas ankoraŭ revolucieca faktoro en la batalo de l'proletaro por sia emancipiĝo, kaj ke Moskvo estas la "metropolo de l'mondrevolucio". Kredu, ke tiu perdo de kredo estis por mi sufiĉe dolora. Dum longa tempo mi estis kvazaŭ en la spiritostato de edzo, kiu amegas sian edzinon kaj ekhavas dubojn pri ŝia fidelo : ĉio? kio povas forigi tiujn dubojn, li ĝoje bonakceptas kaj eĉ iafoje riproĉas al si, ke li dubis. Sed kiam fine li akiris la konvinkon, ke lia amatino trompas lin, tiam doloras lia koro. Kaj okazas eĉ, ke li envias aliajn homojn, kiuj same estas trompataj, sed pri tio ne scias, ne havas dubojn kaj estas do feliĉaj...

Ekzistas ja ankoraŭ multaj sinceraj revoluciuloj, kiuj firme kredas, ke la nuna Sovetio estas ĉiam la centro, el kiu ekmarŝos en oportuna tempo la batalionoj de l'tut-

monda revolucio ; ke tie almenaŭ estas la revolucia stabo el la plej lertaj kaj harditaj gvidantoj de l'proletaro. Tian kredon mi definitive perdis kaj eĉ akiris la konvinkon, ke por Stalin kaj K-io la tutmonda revolucio estas tute akcesora afero kaj ke iliaj ĉefaj zorgoj estas gardi en la manoj la regadon. Tiucele ili starigis la programon pri efektivigo de socialismo sur unu "sesono de l'mondo" kaj faris el tiu mondparto grandan malliber-ejon, kie 90 % el la homoj nuntempe malsatas, vivas en kondiĉoj pli malbonaj ol tiuj de senlaboruloj en kelkaj kapitalistaj landoj. En Sovetio ne vidiĝas iaj signoj pri socialismo ; ekzistas tie **ŝtata kapitalismo** kun **privilegiita burokrataro**, kiu elsuĉas la plusvaloron eĉ pli avida kaj senhonte, ol tion faras la privatkapitalismo. La laboristoj kaj kamparanoj neniel regas, sed G.P.U., la sola ŝtata aparato, kiu mirinde bone funkcias, kaj kiu sekvas la tradicion de la cara "Okrana". En Sovetio, kiel en kapitalistaj landoj, ekzistas bankoj, kiuj prunteprenas monon kaj pagas rentojn ; oni tie eĉ okazigas grandskale loteriojn (trovu ĉi-apude ekz-on de bileto, kiun havigis al mi K-do). En Sovetio la kulto al la nacia armeo, la honoro por la "ruĝa soldato" estas propagandataj tute same kiel nun en Germanio, kun la sola diferenco, ke en ĉi tiu lasta lando la honoratoj estas la "Ataktaĉmentoj" ; en Sovetio la registaro rekompencas siajn fidelulojn per ordenoj k.a. glorigiloj ; en Sovetio ekzistas oficiala nova religio, nomata "marksism-leninismo", kies pastroj persekutas, malliberigas kaj eĉ mortigas la herezulojn...

Pri ĉio tio mi estis jam de kelka tempo konvinkita, sed plifirmigis mian opinion la raporto, kiun faris al mi antaŭ kelkaj tagoj inĝeniero, ĵus veninta el Sovetio, restinta tie 9 monatojn. Li tamen iris al Moskvo kun la entuziasmo de homo, kiu legas "L'Humanité"(1) jam de 10 jaroj kaj sekve akiris per tiu legado la konvinkon, ke en Sovetio oni "konstruas socialismon".

Tiu homo gvidis fabrikon, ricevis tre altan salajron, havis al si dispone aŭtomobilon, tutan dometon kun ĝardeno, servistino, unuvorte estis tre bonstata - dum la laboristoj vivas mizere, sen komforto, loĝas tri- kvarope

(1) La **Homaro**, ĉiutaga ĵurnalo de l'franca kompartio. Tre notinde estas, ke tiu persono ne estas **Ivon**, kiu restis en Sovetio dum 10 jaroj, sed alia amiko de Lanti : **Paŭlo Miŝal**. (Kompil.)

en ĉiu ĉambro. Sed almenaŭ unu aĵo ne mankas : la **vodka** ; la laboristoj havas la eblon ebrigi kaj multaj tion faras ; nemalofte li renkontis ebrulojn, surstrate kuŝantajn. Kaj infanoj svarmas ; nenie li vidis tiom da junuloj, kiom en Sovetio ; al la geknaboj oni unue kaj ĉefe instruas krii : **Vivu Stalin!** kiel en Germanio : "Heil Hitler!". La portreto de Stalin estas ĉie ; oni ne povas turni la kapon, ne vidante grandegajn aŭ malgrandajn portretojn de la gvidanto. Sed li citis al mi fakton, kiu estas pli karakteriza ol ĉio pri la speco de "socialismo", kiun oni tie konstruas : estas en Sovetio malpli da aŭtomobiloj ol en Okcidento, sed la proporcio da **luksaj** aŭtomobiloj estas multe pli granda ol ĉi tie. Li estis vere indigne surprizata, vidante, ke la regantoj el la Kremlo uzas nur tiajn aŭtomobilojn, eĉ 80-ĉevalajn "Lincoln"-ajn, fabrikitajn en Usono!... Kaj en la dua kvinjarplano estas projektita la konstruado de tiaj luksaj veturiloj!... Dume la popolo vojaĝas premite en malpuraj, senkomfortaj vagonoj...

Unuvorte, tiu mia amiko revenis el Sovetio kun la konvinko, ke la tiea popolo estas pli krude ekspluatata ol en kapitalistaj landoj. La plusvaloro anstataŭ iri en la poŝojn de privatkapitalistoj, servas por teni en bona stato nenombreblan burokrataron kaj teknikularon. Sed la juna generacio facile akceptas tion, tial ke ĉiutage ĝi legas en la gazetaro, ke Sovetio estas "revolucia lando, kiu staras ĉe la unua vico en la civilizo kaj kulturo". Neniu havas la eblon kontraŭdiri tian aserton per presaĵo kaj kiuj diras laŭte ian neortodoksan opinion, tiuj estas pelataj en malliberejon aŭ ekzilon.

Nu, ĉu miri pri tio, kiam oni konstatas, ke ankaŭ la klera germana popolo 80-pocente nun aklamas kaj adoras Hitleron ?

Nun vi certe komprenas, ke mi estas en simila spirito-stato kiel tiu de viro, kiu finfine akiris la konvinkon, ke lia amatino jam de kelkaj jaroj trompas lin.

La suspektoj, kiuj naskiĝis en mia spirito antaŭlonge, aliĝis en la firman opinion, ke en Moskvo Stalin kaj K-io perfidas konscie aŭ nekonscie la interesojn de l'tutmonda proletaro, farinte el la naciaj sekcioj (t.e. la Kompartioj) de Komintern nur aparatojn por la sovetie **nacieca** propagando. (Notu, ke mi ne diras "naciisma" ; la reakcia procezo ne ankoraŭ atingis tiun gradon). Ĉiu kapitalista

registro elspezas grandajn sumojn por sia eksterlanda propagando ; Stalin pere de G.P.U. tre lerte utiligas la Kompartiojn por tia propagando. En Francio, ekzemple, dum jaroj "L'Humanité" publikigis ĉiutage, ke la franca armeo prepariĝas por ataki Sovetion, ke tiu atako estos tre baldaŭa, ktp... Sed kiam la kapitalistaj ĵurnaloj publikigis antaŭ kelkaj monatoj, ke generalo el la ruĝa armeo venis Parizon por ofici kiel milita ataŝeo, dum franca kolonelo iris al Moskvo por okupi tie la saman postenon, la kompartia gazeto konigis la fakton - ĝi ja ne povis tute silenti - nur per kelkaj linioj kaj kun la komento, ke "sub la premo de la amasoj Francio devis rezigni pri tuja milito". La premo de la amasoj, bedaŭrinde, estis nur mito. Kiam faŝistaj militŝipoj vizitas en la Nigra Maro sovetiajn havenojn kaj estas tie amike akceptataj, la kompartiaj gazetoj tute silentas. Mil similajn faktojn oni povus citi por montri, ke fakte ne ekzistas **esenca** (komprenu ĝuste la signifon de la substrekitaj vorto) diferenco inter la Stalina, Musolinia kaj Hitlera diktatorecoj.

Antaŭ du-tri jaroj plifortigis miajn dubojn la konstato, ke kelkaj burĝaj ĵurnalistoj raportis favore al Sovetio. Por inĝeniero, por ulo, apartenanta al la reganta klaso, estas evidente, ke lando, kie la laboristoj ne havas la rajton striki, ne havas la eblon organizi kontraŭstaron al la ekspluatado, tia lando estas iel ideala. Antaŭ unu jaro la laboristoj havis ankoraŭ unu rimedon por protesti kontraŭ la abomenindaj vivkondiĉoj, kiujn ili devas elsuferi : estis forlasi la laborejon kaj iri alien por sperti, ĉu ne estas tie pli bone. Nun, post la restarigo de la **carisma pasportsistemo**, ili estas devigataj resti en la loko, kiun la burokrataro difinas al ili.

Ĉu vi estas informita pri tiu monstre sklaviga sistemo ? Se ne, vi povas peti klarigojn al Sovetianoj mem. Tamen mi devas averti vin, agu sagace ; ne forgesu, ke ekzistas **P.E.K.**, kies celo estas koncentrigi la tutan esp-an korespondadon por ke nur la **oficiala** "vero" estu konata. Se viaj korespondantoj apartenas al I.P.E. kaj al la burokrataro klaso, vi ekscios nenion ĝustan. Tamen ekzistas K-doĵ, kiuj sopiras havi fidindan korespondanton; ili estas eĉ relative multaj, sed ne kuraĝas eldiri malkaŝe sian opinion. Jam okazis, ke Sovetianoj estis senditaj en ekzilon, tial ke iu eksterlanda P.E.K.-ano komu-

nikis iliajn leterojn al C.K. de S.E.U. Nun estas por mi pli kaj pli klare, ke Dre... kaj K-io facile sukcesis fari la skismon en nia movado, ĝuste tial, ke la tuta klopodado de la Stalina diktatoreco estas utiligi ĉiujn laboristajn organizojn por sia nacieca kaj mensoga agitado. Se vi volas mem ekscii la veron pri Sovetio, necesas, ke vi akiru la konfidon de viaj korespondantoj. Tiucele vi devas unue ne korespondi sub via nomo, tial ke vi, kiel SAT-peranto, estas konata kaj sekve enregistrita de CK. de SEU kiel "danĝerulo" ; due vi devas starigi tute precizajn demandojn kaj averti vian korespondanton, ke la ŝamajn vi antaŭmetis al aliaj korespondantoj. Mi parolas laŭsperte kaj mi scias tute certe, ke neniu sovetiano nun kuraĝus senpere korespondi kun mi. Mi eĉ ĉagrene konstatis lastatempe, ke tri el miaj korespondantoj tute silentas kaj el tio mi konkludas, ke ili verŝajne sidas en malliberejo.

Nu, mia letero longiĝas kaj mi konstatas, ke al via demando, ĉu la ruĝa armeo devus ekmiliti kontraŭ Hitle-rio, mi ankoraŭ ne respondis. Sed, konante nun mian opi-nion pri Sovetio, verŝajne vi eĉ ne demandus min pri tio. Antaŭ nelonge Trocki pritraktis tiun saman demandon kaj diris, ke la ruĝa armeo ja havus kiel devon defendi la germanajn komunistojn, ke plie Sovetio mem havas gran-dan intereson al tio, ke Hitler ne regu en Germanio ; sed li aldonis : "nuntempe, pro la stultaj politiko kaj mastrum-ado de Stalin, estus katastrofo, se la ruĝa armeo ekmilitus tial ke ĝi certe estus venkata."

Kian valoron havas tiurilate la diroj de Trocki ? mi ne scias. Oni ja povas sin demandi, ĉu la situacio tre dife-rencus en Sovetio, se anstataŭ Stalin, regus Trocki en la Kremlo. Pri tio oni povus vane longe diskuti.

Konklude mi diros, ke ĉio, kio lastatempe okazis, pli-firmigas mian opinion : 1) ke socialismo ne povas esti starigota en unu sola lando ; 2) ke la ĝisnuna kaj ankoraŭ daŭranta organizsistemo de la laboristaro povas konduki nur al malvenko ; 3) ke la tuta movado devas esti re-konstruata ĉe la bazo mem kaj ke tio postulos longan, tre longan tempon ; 4) ke la organizado devas esti ne internacia, sed **laŭindustria**, tutmonda kaj sekve sennacie-eca.

Se oni povus konvinki la laboristojn pri tio, ili ankaŭ ekvidus la nepran neceson de esp-o, kaj SAT estus por ili modelo de organizado, en kiu la nacioj estas sisteme

ignorataj...

Sed ŝajnas, ke mi deflankiĝis. La celo de ĉi tiu letero estis klarigi al vi la ĝustan signifon de mia artikolo kaj mi ne scias, ĉu mi sukcesis. Almenaŭ komprenu, ke mia ĉefa celo estis instigi la legantojn al memstara pensado, al kritikado kaj al serĉado de novaj vojoj. La fakto, ke falĉileto kaj martelo ornamas vagonojn kaj domojn en Sovetio, havas saman mensogan signifon kiel en Francio la vortoj : **Liberio, Egalo** kaj **Frateco**, kiuj estas gravuritaj sur ĉiuj ŝtataj kaj urbaj konstruoj. Mi celis averti la laboristojn, ke ili ne multe atentu vortojn kaj insignojn, sed prefere la faktojn, la realaĵon.

Verŝajne la homaro marŝas al nova mondmilito, en kiu oni vidos Sovetion partopreni alianco kun kelkaj kapitalistaj landoj. Nu, laŭ ideologia vidpunkto, ĉu ne estis en 1914 ankaŭ monstraĵo, ke la franca respubliko, la liberala Britio havu la caran Rusion kiel aliancanon ? Estas tre ĉagrene konstati, ke la proletaro ne akiris sufiĉe fortan kaj viglan klaskonscion por ne povi esti influebla per naciecaj konsideroj. Unu el la plej gravaj kaj urĝaj taskoj estos detruigi ĝisfunde, ĝisradike la naciismon. Tion ne ebligas la internaciismo. Tiam taskon plenumis neniu el la ĝis nun ekzistantaj lab. organizoj.

Prave, malprave mi ĉiam pli malpli malkaŝe celis encerbigi tiun ideon al miaj legantoj. Se mi ne estus mem konvinkita pri tio, la valoro de esp-o ŝajnus al mi tre malgranda kaj mi ne dediĉus mian tempon kaj energion al la prosperigo de la mondlingva movado.

Rilata al la dua punkto de via letero, nome la bojkotado de germanaj varoj fare de Sovetio, estas evidente, ke se oni ne faras diferencon inter la landoj, kie regas la faŝismo, kaj tiuj, kie regas burĝa demokratio, ebliganta al la kompartioj fari laŭleĝe sian agitadon, la sinteno de Stalin estas tute logika kaj tiel pravigebla. Sed se oni faras diferencon ; se oni opinias, ke estas preferinde ricevi 10 bastonfrapojn ol 100 ; se aliparte oni scias, ke Hitler havas ju pli da ŝancoj pluigi sian regadon, des pli li iel aŭ aliel sukcesos forigi senlaborecon, tiam la bojkotado fare de lando, kiu pretendas reprezenti la interesojn de l'tutmonda proletaro, estas nepra morala devo.

Nun vi konas mian opinion. Mi ne plu havas dubojn pri Sovetio, sed **konvinkon**. Tiun konvinkon mi akiris per longa esplorado kaj pripensado. Bonvolu tamen ne mal-

atenti jenon : homa konvinko ne povas signifi **certon**. Sekve nenial mi deziras, ke vi akceptu fideme mian konvinkon kiel veron. Esploru mem ; pripensadu mem kaj akiru konvinkon - ian ajn - per via propra sperto. Almenaŭ mi sincere diras al vi, ke mia konscienco riproĉas pro tio, ke dum jaroj mi permesis, ke sur la paĝoj de l'SAT-organoj estu farata blufa, trompa agitado por la Stalina Sovetio. Kaj tiu mia hodiaŭa konvinko estas unu plia kaŭzo, pro kiu mi ne plu volas nuntempe havi respondecan postenon en nia Asocio.

*

LETERO DEK-DUA

Al K-do J.U.M., Amsterdamo

Parizo, 18-9-1932.

... ..

Rilate al via situacio en la Kompartio, mi simple notas, ke ĝi konfirmas miajn dirojn en letero de l'25-a de marto. KREDU, ke mi ŝatus esti tiam erarinta. Konsilon pri via sinteno en tia afero mi ne donos. Obeu vian konsiencen. Almenaŭ kREDU, ke oni tute ne povas starigi estonthavan movadon, ignorante moralajn principojn. Mi tamen konsentas, ke en **eksterordinara** okazo iu **honest**a homo kiel Lenin, ekzemple, mensogu, se tion postulas la cirkonstanco, por doni la venkon al la revolucio. Sed mensogado, kalumniado kaj la **perĉiarimedeco** aplikata ĝenerale kaj grandskale de Komintern ne kondukas la proletaron al vera emancipiĝo. Tia agmaniero simple helpas nun al starigo de nova privilegiita klaso (la burokrataro) en Sovetio mem. Nu, mi asertas kaj ne pravas. Memoru tamen mian diron kaj post kelkaj jaroj vi mem povos decidi, ĉu mi malpravas aŭ ne ; nur bone kaj atente observu la faktojn kaj la evoluon de la aferoj.

Hieraŭ mi havis la viziton de Latvia K-do, kiu rakontis al mi jenon : lastatempe estis en Moskvo Delegitaro el usonaj negroj kun la celo paroladi tra tuta Sovetio pri la malbontraktado al la negroj en Usono. Tiuj K-doĵ estis tre mirigitaj kaj preskaŭ indignis, kiam tute neatendite oni sciigis al ili ke la projektitaj paroladoj ne povos okazi. Ili demandis kial, sed ne ricevis respondon. La afero tamen ŝajnas al mi facile klarigebla : Usono nun serĉas apogantojn por sia kontraŭjapana politiko en Ĉinio kaj la

tuta Pacifiko. Lastatempe duoficialaj komunikoj aperis en la gazetaro pri intertraktoj de Usonaj kaj Sovetiaj gravuloj kaj pri eblo, ke baldaŭ la Sovetia regno estos oficiale agnoskata de Usono. Eble post pli malpli longa tempo ni vidos aliancon inter la kapitalista Usono kaj la... ŝtatkapitalista Sovetio (1)! Tiam Komintern rekomendos aŭ simple ordonos al la Usonaj komunistoj, ke ili partoprenu en la milito kontraŭ la Japana imperialismo!!! Kaj tiu mia hipotezo klarigas, kial en la kontraŭmilita agitado de Komintern oni ĉiam parolas nur pri **imperialisma** milito kaj eĉ aprobas militon por nacia liberiĝo. La artificio estas tre simpla kaj per ĝi oni povas "dialektike" pravigi la partoprenon al ĉia ajn milito. Cetere tia politiko estas la natura konsekvenco de la Stalina vidpunkto pri eblo starigi socialismon en unu sola lando. Komprenu min bone : mi skribas al vi tion nur por instigi vin observi kaj pripensi. Tion ja mi ne volus diri publike kaj eĉ tre deziras, ke la estonto montru, ke mia hipotezo estas erara (2).

Kun SAT-anece saluto de via

*

LETERO DEK-TRIA

Al K-do H.B.

Parizo, 5-10-1933.

Se vi observas la okazojn en la mondo, vi certe povas konvinkiĝi, ke miaj diroj en la letero al K-do M. (3) ne estis tute subjektivaj pensoj. Ŝajnas eĉ, ke la situacio pli rapide evoluas ol mi eĉ povis konjekti. La vojaĝo de Erjo (Herriot) kaj precipe tiu de Ko (Cot) la franca ministro por aviado, en Sovetion estas tre signifoplena. Estas tute certe, ke kreiĝas en Sovetio nova ekspluatanta klaso, kiu povos verŝajne esti forigata nur per nova revolucio. Almenaŭ la centro, la ĉefa faktoro de l'mond-revolucio ne plu troviĝas en Moskvo. Kiam en 1928 Stalin akceptigis sian teorion pri konstruado de socialismo

(1) Principe Lanti ne eraris, sed la alianciĝo okazis ne kun Usono, sed kun Francio. - (Kompil.)

(2) La "estonto" tute pravigis la hipotezon de Lanti : ekzemple en Francio la komparto fariĝis patriota, sovinsta. (Kompil.)

(3) Lanti estis komunikinta kopion de sia letero al tiu K-do kaj la legantoj povas legi ties tekston sur la paĝo 49.

en unu sola lando, tiam konscie aŭ senkonscie li perfidis la mondrevolucion. Cetere, estas tre notinda fakto, ke de tiam Komintern ne plu kongresis (!!??). La plej necesa tasko nuntempe estas detruiri en la menso de l'sinceraj homoj la mistikan kredon pri la rolo de Moskvo por la emancipo de l'proletaro. Ĉio estas rekonstruenda ĉe la bazo mem kaj malhelpas al tio la kredo, ke la Tria Internacio estas ankoraŭ revolucia faktoro. Verdire mi ne kredas, ke Kvara pli bone sukcesos ol la antaŭaj.

Dum la vojaĝo ĉirkaŭ Skandinavio mi ankaŭ spertis, ke ĝenerale la esperantistoj mem ne komprenas la ĝustan signifon de artefarita tutmonde uzebla lingvo. Kaj tio estas la kaŭzo pro kiu malrapide kreskas nia movado.

Rilate al ĉiaj kaj multaj koruptoj, perfidoj ktp. en laboristaj marksismaj organizoj, ni ne miru ; la malo estus miriga. Moralajn principojn ortodoksaj marksistoj ne obeas, eĉ ne agnoskas ; por ili ĉio estas nur rilato, proporcio de fortoj inter si batalantaj. Starante ĉe tia vidpunkto, por gvidanto la tuta problemo konsistas nur en tio : kiel agi por akiri aŭ teni enviindan postenon. Kiom longe la proletoj konsentos, ke iliaj gvidantoj havu pli bonajn vivkondiĉojn ol siajn proprajn per la kotizoj, kiujn ili mem pagas, tiom longe ekzistos la ŝancoj, por ke okazu post revolucio nur ŝanĝo de ekspluatistoj, - dum temas forigi ĉian ekspluaton !

Jes, ripetigos la sama trompo, kiel en 1914. Se mi volus konsili, mi rekomendus, ke neniu sennaciisto pro **ia ajn motivo** partoprenu en tiaj militoj. La internaciistoj eble povas trovi ŝajnon da pravigo en sia sinteno batali kontraŭ faŝisma militanta ŝtato ; sed tio estas konsekvenco de nekonsekvenca sinteno rilate la organizadon de la mondproletaro. La sennaciistoj forkuru ien ajn, en Laponio, en Groenlandon, aŭ alien, sed ili **nenial** konsentu partopreni naciecan militon.

Ejnŝtejn estas sendube genia scienculo, sed li havas nenian komprenon pri la demando, kiun mi priparolas. Ekzistas ĝis nun **neniu** lando, kie regas socialismo ; sekve neniu estas por proleto defendinda !

... ..

*

LETERO DEK-KVARA

Parizo, februare 1932.

"Inter la riproĉoj, kiujn skismigantoj de nia movado direktis al vi, troviĝas multaj, kiuj ja ne indas rebaton. Sed ĉu vi ne opinias utile klarigi, kial vi estas "dualisto", se vi fakte estas tia?"

Tiun demandon mi povus tute ignori. Ĉu mi estas dualisto aŭ monisto, tio estas mia propra afero kaj nenie en la Statuto de nia Asocio estas dirite, ke nur monistoj povas aliĝi. Se mi tamen konsentas liveri kelkajn klarigojn pri tiu temo, ne estas do kun la intenco forviŝi la riproĉon pri aparteno al iu dualisma skolo, sed nur por helpi al kelkaj, ke ili akiru pli precizan komprenon pri tiuj terminoj.

Laŭ ĝenerala akcepto, dualisto estas homo, kiu kredas, ke en la mondo ekzistas du principoj : la materia kaj la spirita. Monisto estas tiu, kiu kredas nur je la ekzisto de unu sola principo, ĉu materia, ĉu spirita. Sekve la ideistoj, kiuj neas la ekziston de la materio - ekzistas tiaj filozofiaj skoloj (1) - estas ankaŭ monistoj. En la antikva tempo, Aristotelo, Pitagoro, Platono estis dualistoj. Poste kristanaj metafizikistoj kontraŭbatalis ilian sistemon, argumentante, ke ĝi entenas gravajn kontraŭdirojn ; tiuj kristanoj estis do... monistoj. Monistoj ankaŭ estis la ideistoj Hegel, Lajbnic, Spinoza!...

Tiuj konstatoj plej bone montras, ke la riproĉo pri "dualismo" fakte signifas nenion. Sed kompreneble estas pli facile doni ian dubesencan kvalifikon al kontraŭulo ol pruvi, ke liaj ideoj estas eraraj.

La K-doj, kiuj bedaŭrus, se mi estus "dualisto", bonvolu do trankviligi. Fakte, la monismon, kiel ĝi estas

(1) Ideistoj argumentas proksimume jene ; ĉiuj pensuloj interkonsentas pri ĉi tio, ke ni ne povas scii, ĉu ni vidas la eksteran mondon **tia, kia ĝi estas**. Nu, se ni ne konas ĝin, kiel ni povus aserti, ke ĝi ekzistas ? Ni scias nenion certan pri ĝi, kaj ni devas tamen prezenti al ni la mondon nur per tio kion ni konas. Alidire, tio ne estas filozofii, sed fantazii. Kion ni do konas pri la mondo ? Ni konas niajn ideojn kaj nur ilin. Klarigi la ekziston de tiuj ideoj kiel venintaj al ni el la ekstera mondo, kiun ni ne konas, tio estas klarigi malklaraĵon per io ankoraŭ pli malklara. Kredeble tiujn ideojn donis al ni iu spirito, iu dio. Tio almenaŭ estas logika.

klarigita de Buĝner, Hekel, Le Dantek k.a. materialistoj, mia komprenpovo pli volonte akceptas ol aliajn filozofiajn klarigojn. Mia intelekto ja ne ribelas al tio, ke en la mondo ekzistas nur unu sola kampo, tiu de la materia **substanco**, kaj ke tiu substanco, kiu plenigas la spacon, estas ĉiam la sama sub diversaj formoj. La tezon de Buĝner : "Ne ekzistas materio sen forto, nek forto sen materio", mi ankaŭ senpene akceptas. Laŭ tiu monismo la ideoj, la pensoj simple rezultas de aliĝoj en iu difinita kvanto da substanco, simile al tio, ke elektra lampo donas lumon, kiam la koncerna lumaparato normale funkcias. Kiam ni pensas, ŝanĝiĝo okazas en nia pensaparato - la cerbo. Facile mi akceptas la eblon, ke iam la fiziologia-psikologia scienco povos noti tre precize tiujn cerbajn ŝanĝiĝojn. Ho! mi konas la argumentojn, kiujn oni povas kontraŭmeti al tiu tezo, sed ili ne estas por mi tre valoraj.

La ideoj sekve, kiel ĉiuj aliaj fenomenoj propraj al la materio estas naturaj fortoj. Konsekvence tiuj fortoj kapablas agi, efiki, okazigi aliajn ŝanĝiĝojn en la mondo. Kaj kredeble tie kuŝas la vola aŭ nevola miskompreno ĉe tiuj, kiuj metis sur min la etiketon "dualisto" aŭ "ideisto" Kiam ideo naskiĝis en la cerbo de homo, kaj se ekzistas favoraj kondiĉoj, por ke aliaj homoj ankaŭ akceptu tiun ideon, tiam gravaj transformiĝoj povas okazi en la socio. Ne ŝajnas al mi eble aliel klarigi la grandan rolon, kiun ludis kaj ankoraŭ ludas la diversaj religioj. Tiuj religiaj ideoj sendube estas eraraj, sed ĝuste pro tio ili tre bone adaptiĝis al la mistikeca tendenco, kiu superregis - kaj ankoraŭ nun bedaŭrinde superregas - la plimulton de la spiritoj ; trovinte favoran grundon por enplantiĝi, ili konsistigis grandegan forton, kies efikoj povas daŭri tre longe.

Agnoski la fakton, ke ideoj estas potencaj faktoroj en la transformiĝado de la homaj socioj, tio neniel signifas, ke oni konsentas kun la ideista skolo, kiu instruas, ke la ideoj estas la spirita substanco de l'mondo, ke ili nedetru-eble ekzistas per si mem.

Sed erara ankaŭ ŝajnas al mi la vidpunkto de tiuj, kiuj argumentas, kvazaŭ ili ignorus la fakton, ke la homo estas animalo, havanta ideojn. Ne sufiĉas laŭ mi la scio pri la produktokvanto de karbo, ferminaĵo, elektro ktp. en iu lando por antaŭdiri ĝian evoluon. Tiuj materiaj

kondiĉoj estas sendube neniel malatentindaj, sed ne sufiĉaj por liveri kontentigan klarigon pri iu historia situacio.

La homo estas unu el la plej malfortaj bestoj en la mondo. Tamen li fariĝis reĝo super la tuta bestaro. Kial? Ĝuste tial ke pro iaj cirkonstancoj en lia cerbo naskiĝis ideoj, kaj organiziĝis lia racio, t.e. la kapablo koncepti, abstrakti, starigi aksiomojn, regulojn, metodojn - kaj ankaŭ hipotezi, anticipi. Kompreneble okazis plej ofte, ke liaj hipotezoj estis eraraj. Tial ekzistas religioj kaj pli malpli fantaziaj metafizikaj sistemoj.

Kiel kaj kial naskiĝis tiu kapablo en la homa cerbo? Neniu povas doni tute precizan respondon al tiuj demandoj. Sed la fakto, ke mi parolis pri **naskiĝo** de la ideoj, de la racio, tio montras, ke, miaopinie, la homoj ne ĉiam posedis tiun kapablon. Kaj nuntempe ne ĉiuj samgrade posedas ĝin. Ekzistas eĉ ankoraŭ primitivuloj, ĉe kiuj forestas ĉiu ero da racio; ili ne kapablas abstrakti; ili ne havas ian komprenon pri nombroj. Por ili arbo estas ĉiam io konkreta, io tuŝebla aŭ videbla; ĝi estas ĉu kverko aŭ fago, dum por ni la nocio **arbo** pensigas, pri kiu arbo temas.

En la antaŭparolo al **Naciismo** mi parolis pri du tendencoj, kiuj kunekestas en la menso de l'homoj: la **mistikeca** kaj la **teknikeca**. Kaj tio kredeble liveris al iuj pretekston por aserti, ke mi estas "dualisto". Sed tiuj kritikantoj, se ili estus lojalaj, devus ne malatenti mian eldiritan esperon, ke venos la tempo, kiam la racio plene superregos; tiam la mistikeca tendenco malaperos kaj sekve ĉia dualismo estos for.

Sed, mi ripetas, ne estas mia celo pravigi min ĉe riproĉo pri dualismo. Mi havas la pretendon esti multe pli funde monista ol tiuj pseŭdo-materialistoj, kiuj faras el la marksismo religion. Sed mi eĉ ne volas riproĉi al tiuj novspecaj religiuloj. En iu "Inter Ni" mi diris: "Se la marksismo fariĝus nova religio, tiom altirpova por la laboristaj amasoj, ke ĝi kolektus ilin milionope en ĉiuj landoj, la socialismo povus esti konstruata eĉ se la historia materialismo ne estas senmanke fundamentita"(1). Mi ne ŝanĝis mian opinion tiurilate. Estas evidente, ke en Sovetio la **objektivaj** kondiĉoj por la starigo de socialisma socio estis malpli favoraj ol en Anglio, Germanio

(1) "Vortoj", pĝ. 108.

aŭ Usono, kie la industrio atingis pli altan gradon. Nu, la objektivajn kondiĉojn anstataŭigas Stalin per **subjektivaj** farante el la marksismo oficialan kredon, devige instruatatan en la lernejoj. Tiel tiu kredo fariĝas potenca faktoro en la efektivigo de l'"kvinjaraj planoj". Per laŭcela predikado, agitado k.a. rimedoj la bone konata mistikemo de l' rusa popolo estas metata en la servon de l'socialisma konstruado. La eksperimento estas vere originala, granddioza kaj sukcesinda. Ĉiaokaze oni povas esti optimista pri la estonto : la marksismo, kies esenco estas teknikeca, ne povos dum tre longa tempo ludi religian rolon. Kiam en Sovetio la socialismo estos finkonstruita, tiam la mistiko perdos multe de sia efiko...

Espereble miaj klarigoj iomete helpos al vi kompreni pli bone, kia estas la demando pri dualismo kaj monismo. La riproĉo, kiun oni direktis al mi, estis, kiel vi vidas, absolute senbaza. De nun mi ne plu perdos tempon por respondi al similaj demandoj ! Sed intertempe aliaj problemoj stariĝis kaj eble mi pritraktos ilin ankaŭ en tiu familiara formo de leteroj.

Dume estu moniste salutata de via

*

LETERO DEK-KVINA

Al K-doj Dem. kaj Nek., Moskvo

Parizo, 23-6-1925

... ..
Mi legis la programprojekton, ĉi-kune resendatan, kaj konsentas kun ĝi en multaj punktoj. Mi faru tamen du ĉefajn rimarkojn : 1) mi ne vidas neceson prezenti al la Kongreso tian programon ; 2) mi firme opinias, ke ĝi tro similas la tezojn, kiuj estas kutime prezentataj ĉe kongresoj de politikaj organizoj. Vi ja diras, ke SAT estas servaparato, sed ne sufiĉe akcentas pri la servoj farataj, fareblaj kaj farindaj. Insiste mi diru mian tutan penson pri la temo. Se ni ne sukcesos doni al nia organizo karakteron tute specialan, neniel similan al la aliaj laboristaj organizoj, SAT certe pereos post tempo pli malpli longa. SAT devas efektive servi al la esperantistaro laborista. Nu, estas fakto, ke nun U.E.A. pli utilis al laboristo migranta en la mondo por serĉi laboron aŭ pro alia motivo ol SAT. La neŭtrala organizo ja havas reprezent-

antojn en pli granda nombro da urboj. En via programo vi tute forgesis diri, ke SAT celas helpi la elmigrantojn por trovi laboron, la forkurantojn por trovi rifuĝejon, la vojaĝantojn ktp. Laŭ mi tiu tasko de nia organizo estas eble la plej grava, la plej atentinta, la plej zorgenda. Necesas insisti pri tio ; necesas meti la servotaskon unuavice en nian programon. La cetero estas malpli grava ; aŭ, se vi preferas, la cetero malpli pravigas la ekziston de nia organizo.

Mi ja certe ne forgesas la edukan taskon, sed ni atentu, ke ankaŭ nacilingve oni povas eduki. Cetere, la praktikaj servoj estas edukaj per si mem. La faktoj pli instruas ol la paroloj. Bedaŭrinde, ni devas konstati, ke nuntempe tre malmulte da membroj bezonas la servojn pri kiuj mi aludis. Kaj tio estas baro en la malvolviĝo de nia entrepreno. Sed mi restas konvinkita, ke ne ekzistas alia vojo ol la praktika aplikado de nia lingvo, por ke estu firmstara la esperanta movado ĝenerale kaj la SAT-movado aparte. Hodler per UEA savis la esperantan movadon en iu kriza periodo. Ni ne malatentu tiun fakton. En la unua rezolucio, kiun mi voĉdonigis en Praha, mi diris, ke SAT devas esti la UEA de l'proletaro. Mi ne ŝanĝis tiurilate mian opinion. Mi petas, ke vi bone pripensu pri tio, tial ke pli kaj pli vi prenos sur vin parton da respondeco pri la gvidado de SAT. Almenaŭ tion mi esperas.

... ..

Pri la organiza temo. Se mi komunikus al vi la leteron, kiun mi sendis al Bart. ĉe la ricevo de l'kajero, enhavanta la unuan artikolon de Kolŝinski, vi povus konstati, ke mi ne konsentas kun lia vidpunkto kaj precipe pri lia taktiko. Mi ege riproĉis al Bart. pro la enmeto de tiu artikolo sen mia antaŭa aprobo. Mi tamen estus konsentinta pri la enmeto, sed kun kelkaj ŝanĝetoj kaj aldonaj rimarkoj. Sed kiam la vino estas verŝita ĝin oni devas eltrinki, diras franca proverbo. Estas ega sen-sencaĵo kompari I.L.H. (1), I.R.H. (1) kun SAT. Tio pruvas ke Kolŝ. k.a. juĝas tre supraĵe. Por aliĝi al la ĉi-supre nomitaj organizoj necesas nur... pagi kotizon, dum por esti aktiva membro de SAT necesas lerni esperanton. Kaj

(1) Internacia Laborista Helpeo, Internacia Ruĝa Helpeo. (Kompil.)

ni devas bedaŭrinde konstati, ke tio estas malfacila por multaj laboristoj. Nia SAT-movado povas do progresi nur malrapide ; ĝi tute ne povas esti elamasa movado. Ni nepre devas averti la blindajn entuziasmulojn, kiuj la realon ne vidas. Necesas, pli ofte ol ĝis nun, montri la veran karakteron, la veran fizionomion de nia movado kaj ĝiajn eblojn. La malrapida kreskado de SAT kapablas malkuraĝigi oportunemulojn, kiuj fariĝos pretaj konsenti kun ĉiuj kritikantoj, kun la vidpunkto de Spr..., Deu... k.a. amikoj de verda internaciaĉo. Mi preskaŭ riproĉas min, ke mi ne pritraktis la temon en "S-ulo" jam de longe. Lastan semajnon mi sendis tri artikoletojn kaj intencas aperigi ĉiusemajne similajn sub la rubriko : "Inter Ni". Necesas ŝirmi nian organizon kontraŭ la delogoj de l' "verdaj internaciistoj". Mi konsilas, ke viaflanke vi ne preterlasu la okazon en alia rubriko citi, noti faktojn, kiuj apogas nian vidpunkton. Ni eĉ ne devas timi ripete diri la samon. Oni tro ofte forgesas, ke la instruado estas ripetado. Ni grave erarus, se ni kredus, ke multaj SAT-anoj komprenas la veran signifon de nia movado.

... ..

Sed la sperto montris, ke estas tute neeble al mi efektive "gvidi" de ĉi-tie. Vi nun konas la ĉefan motivon de mia ekŝiĝo. Mi povis nur esti **konsilanto**, - konsilanto kies konsilojn oni komprenas aŭ ne. Mi tamen ne volas, ke vi vidu en mia diro riproĉojn kontraŭ Bart. Li ĉiam montriĝis tre konsentema en siaj leteroj kaj tre verŝajne li kulpas nur en tio, ke li ne komprenis la gravon de miaj admonoj aŭ konsiloj. Vera gvidado necesigas intervenon en multajn detalojn. Por gvidi efektive mi devus esti en Lajpzig. Tial ke mi povas nur esti konsilanto en kelkaj gravaj okazoj, mi do tiris la konsekvencon de la fakto kaj ekŝiĝis. Se pli longe mi konsentus, ke mia nomo aperu sub la titolo de l'gazeto, tio signifus, ke mi estas nur vanta persono kiu kontentiĝas per "honora" titolo.

Plie, mi ekŝiĝis el la P.K. (1) tial ke mi volis pruvi al Minji kaj aliaj anarkistoj, ke mi tute ne celas ian ajn personan diktatorecon ; tial ke mi ankaŭ konvinkiĝis, ke la gvidado de aparato plejparte funkcia en Lajpzig estas malfacila. La ĉi-tieaj K-doĵ el P.K., krom Minji, vizitas min ĉiudimanĉe matene, aŭ okaze pli ofte, kaj petas konsilojn pri ĉio. Niaj rilatoj restas kiel antaŭe tre amikaj. Kun Minji mi ankaŭ ne grave disputis. Ni ne estas malamikoj, sed li ne plu fidus min kiel antaŭe,

precipe de kiam li legis la antaŭparolon de mia raporto al Komintern.

Nun vi konas la ĉefajn motivojn de mia ekzigito, sed por paroli sincere mi devas konfesi, ke kelkfoje mi sentis laciĝon kaj dubon, eĉ naŭzon por mia laboro, kiu tre ofte konsistis nur en flikado de la truoj, faritaj de diverstendencaj fanatikuloj aŭ ambiciuloj. Ankaŭ vizitis min skeptiko, ne nur pri la ekzistebleco de nia entrepreno, sed pri la progresebleco mem de la homa speco. Nur unu motivo retenas min : se ekzistas io bona en la mondo, tio povas esti nur io farita sindone. Se okazas progreseto, tio rezultas de sindonaj progresemluloj. Se malaperus tiuj sindonaj progresemluloj el la mondo, verŝajne la homaro revenus al la moroj pratempaj. La malbonuloj estus ankoraŭ pli malbonaj, se ili ne devus iafoje atenti la riproĉojn de la bonuloj. Do, kiel vi vidas, multaj kaŭzoj kunaj instigis min elpaŝi en la kampon de l' simplaj vicanoj. Sed kompreneble mi restas kore ligita al SAT kaj preta batali laŭpove kontraŭ la intriguloj kaj ĉiusecaj filistroj. Ne kredu, ke mi forkuris malkuraĝe...

... ..

En la nuna stato de la afero, se Komintern volas starigi "Studkom", ni ne devas rifuzi ĝin partopreni. Ni devas klopodi tre vigle, por ke taŭgaj K-doĵ reprezentu la vidpunkton nian. Ŝajnas al mi eble atingi, ke esperanto estu iel favorata. Estos facile montri la sensecaĵon de propono, celanta interkonsentigi esperantistojn kaj idistojn sur la lingva kampo.

Kio ajn okazos, ni almenaŭ konvinkigiu, ke neniu pli malpli oficiala institucio solvos praktike la mondlingvan demandon. La finfina oficialigo de internacia lingvo okazos, kiam sufiĉe vasta publiko jam utiligos ĝin de kelka tempo. Ĉia alia espero estas iluzia. Aprobaj de famuloj kaj institucioj valoras nur kiel reklamiloj. Ni do ne bazu nian laboron sur tia fundamento.

Mi komprenas bone, ke vi estas devigataj paroli iom malprecize pri kelkaj aferoj. Mi simple diru, ke, kvankam mi malaprobas la sintenon de l'kulpinto (1), mi tamen ne povas konsenti pri la puno. Ĉu tia forigo signas forton aŭ malforton ? Mi esperas, ke mia elpaŝo pri "advokatecaĵ diroj" nenial kaŭzis la punon. Mi tre deziras, ke vi sciigu min pri tio.

(1) Temas pri K-do Levandovski, kiu jam en tiu tempo estis malliberigita pro herezo. - (Kompil.)

La aperaĵoj en Heroldo vekis ĉe mi pli da kompatoj ol da kolero. Sed ja vi estas prava : pli estiminda, almenaŭ pli ŝatinda estas malamiko el fremda rondo ol ambicia stultulo en la propra. La ekzisto de tiaj uloj klarigas, kial la plej indaj entreprenoj iafoje fiaskas. Malnobla plenumanto de nobla tasko malnobligas nepre la taskon.

Jam de longe mi babilas, kaj tamen konscias, ke mi ne diris ĉion dirindan, sed, kiel vi, mi ne povas dediĉi mian tutan tempon al nia afero...

Fratece la via.

*

LETERO DEK-SESA

Al K-do U. Ves, Amsterdamo.

27-an de aŭgusto 1930.

Via letero de la 22-8-30 estis laŭlegata ĉe nia hieraŭa kunsido, kaj mi ricevis komision respondi. Via demando : "Ĉu policistoj povas esti SAT-anoj?" estas iom embarasa, vi kredis tion. Prikonsiderante ĝin laŭ pure idealista, principeca vidpunkto, oni tuj alvenas al **nea** respondo. SAT estante organizo, kiu servas la interesojn de l'Proletaro, devas sekve batali kontraŭ ĉion, kio malhelpas al la emancipiĝo de tiu klaso, kaj tre ofte la policistoj ja servas ĉefe la interesojn de l'burgaro. Aliparte, la policistoj tamen apartenas al la proleta klaso - kies interesojn ili plej ofte devas perfidi. Sed ĉu nur la policistoj perfidas sian klason ? Ĉu do la laboristoj, kiuj fabrikas la armilojn, vestojn ktp. de l'policistoj, ankaŭ ne perfidas sian klasan intereson ? Ĉu la laboristoj, kiuj konstruas malliberejojn, kazernojn, preĝejojn k.s. stultigejojn, ankaŭ ne perfidas ?

Nun ni rigardu la problemon laŭ praktika vidpunkto. Ni supozu, ke en SAT oni malakceptas policistojn. Ni devus sekve eksigi la G.P.U.-anojn el Sovetio, kiuj sendube troviĝas en niaj vicoj... Kaj vi kredeble scias, ke tie tiuj policistoj estas konsiderataj kiel la plej fidindaj bolŝevistoj ; ili ofte eĉ okupas respondecajn postenojn en la organizoj...

Eksciu ankaŭ, ke en Aŭstrio policistoj aliĝas la socialdemokratian partion kaj eĉ povas okupi postenojn en la partio, se mi ne eraras.

Kiel vi vidas, se SAT ne volas esti sekto el samopini-anoj, sed resti malfermita al ĉiuj tendencoj de l'laborista movado, ĝi ne povas kontraŭstari al reguloj, kiuj gvidas laboristajn partiojn.

Cetere, la policistoj, kiujn oni konas, tial ke ili portas uniformon, ne estas la plej danĝeraj. La plej timindaj estas la spionoj, la sekretaj policistoj, kaj neniu organizo povas esti tute certa, ke tiaj uloj ne troviĝas inter ĝiaj anoj. La sperto milfoje montris, ke en la plej revoluciaj organizoj, ĉe la anarkistoj, ĉe bolŝevistoj el la cara epoko, estis relative multaj tiaj policistoj.

Ni ĉiam prikonsideru la problemojn laŭ praktika vidpunkto ; ni zorgu, ke policistoj kaj similuloj neniam akiru influon en SAT. Mi ekzemple forte kontraŭstarus al tio, ke policisto havu respondecan postenon en SAT. Oni povas bone argumenti, ke lia speciala funkcio en la socio malebligas, ke li vere agu sen ia ĝeno por la interesoj de l'laboristaro.

Kvankam mi respondas en la nomo de l'Direkcio, vi tamen bonvolu ne forgesi, ke ĉi tiu respondo eldiras ĉefe mian propran opinion, ĉar oficiale neniam estis alprenita decido pri tiu demando. Se ni bone memoras, ĝi estis tamen iom debatita ĉe la 2-a Kongreso de SAT, kiun mi ne ĉeestis. Kaj okazis io amuza : K-do J. Roth, kompartiano, unu el la organizantoj de l'Kongreso, estis... policisto dum la revoluciaj tagoj en Germanio. Bonvolu konsideri jenon : se la komunista kaj socialdemokrata partioj en Nederlando akceptas policistojn, ĉu via Federacio povas malakcepti ilin ?

Eble mia respondo ne tute kontentigos vin, sed atentu, ke la problemoj estas tre delikata kaj malfacile solvebla. Ne forgesu, ke neniu el ni - nek mi, nek vi - povas, en la nuna socio konsekvence agi, t.e. tute obei en la praktiko al la principoj, kiujn ni propagandas.

*

LETERO DEK-SEPA

Al S-to R.K., Up., Svedio.

Narvik, aŭguste 1933 (1).

... ..
Oni transdonis al mi vian leteron en Stokholmo, sed dum mia restado tie mi ne trovis sufiĉe da tempo kaj trankvilo por ĝin respondi. Tio klarigu al vi, kial respondo venas el tiom malproksime.

Vi ne bezonis peti senkulpigon pro viaj demandoj. Estu certa, ke tre volonte, eĉ plezure mi respondas ilin. Mi nur bedaŭras, ke mi ne havis la oportunon renkonti vin en Svedio, kaj tiel respondi buŝe. En letero ne eblas tiel detale, kiel dezirinde priparoli temon pri kiu jam aperis abunda kaj ampleksa literaturo. Ekzistas ja en Parizo eĉ asocio, kies nura celo estas studi la vivon kaj verkaron de Rabelezo kaj la epokon en kiu li vivis. Tiu asocio konsistas el plej eminentaj profesoroj kaj ĝi publikigas revuon, tute dediĉitan al la demandoj, kiujn mi ĵus menciis.

Unue mi konfesu, ke ne mirigis min via "miro" pro tio, ke por lekcii antaŭ laborista publiko mi elektis paroli pri aŭtoro el la 16-a jarcento. Evidente, se mi parolus pri Marks, pri Kropotkin, pri Prudon aŭ pri Jores, tio ŝajnus pli kongrua al la situacio kaj cirkonstancoj. Kaj tamen mi restas ĉe la konvinko, ke en nia epoko neniu aŭtoro ŝajnas al mi pli... aktuala ol Rabelezo. Kiu observas nian epokon kun tute malfermaj okuloj, tiu povas trovi similaĵojn inter la spiritostato de niaj samtempuloj kaj tiu de la kristanoj el la 16-a jarcento.

Estas vere, ke niaepoke katolikoj kaj protestantoj povas en la sama loko vivi pace, dum antaŭ 400 jaroj ili buĉis unuj la aliajn. Rilate al ekleziaj aferoj, regas ja nuntempe pli da toleremo ol en la mezepoko. Sed starigis

(1) Dum tiu jaro okazis en Stokholmo la 13-a Kongreso de SAT. Eksterĝia programo funkciis "Laborista Universitato", ĉe kiu lekciiis Lanti pri jena temo : **la granda herezulo el la 16-a jarcento, Rabelezo**. La fakto, ke ĉi tiu letero estas skribita en urbo el la nordo de Norvegio klariĝas per tio, ke post la Kongreso nia K-do veturis al diversaj urboj el Svedio kaj poste iris en Norvegion. La malmetaĵo estas trovita, kun tiu de la teksto de la lekcio, en la SAT-arkivo.

(Kompil.)

alia dogma religio : la patriotismo kun diversaj konfesioj : la **nacioj**. Tiu kredo ne ekzistis en la tempo de Rabelezo. Popoloj akceptis indiferece la regadon de eksterlanda reĝo. Tiurilate ili estis pli saĝaj ol nun. Necesis tamen, ke la reganto havu la saman religian kredon kiel la plimulto el siaj regatoj. Ĉiu kristano preferus morti ol fariĝi islamano aŭ pagano. Simile, hodiaŭ ĉiu ajn patrioto estas preta oferi sian vivon por konservi sian naciecon. Nekontraŭdireble la patriotisma kredo fariĝis eĉ pli potenca, pli efika ol la religia, ĉar dum la lasta mondmilito samreligianoj, ekzemple katolikoj, mortigis sin reciproke en la nomo de sia aparta nacio. Oni do povas prave diri, ke en la 20-a jarcento la absolutismo regas la spiritojn same forte kiel dum la 16-a.

Ne nur rilate al la patriotismo preskaŭ ĉiuj nuntempuloj estas absolutemaj, sed ankaŭ rilate politikon. Kaj se mi elektus paroli pri Marks, facile mi povus montri, ke lia doktrino fariĝis dogmo, kiel la Biblio por kristanoj. La mezepokaj teologoj kaj la Moskvaj "ingĝenieroj de la animoj" (Stalina esprimo) apartenas al la sama familio mensa. La Hegela dialekto, laŭ **tezo, antitezo kaj sintezo**, kiun imitas la Marksistoj, esence parenas kun la skolastika rezonmaniero per silogismoj, kiun tiel trafe mokiĝ, tiel forte vipis Rabelezo. Ne kedu, ke mi troigas. Antaŭnelonge mi legis tradukon de artikolo, aperinta en tajlora fakgazeto el Moskvo, en kiu la aŭtoro celas montri, ke la vestoj devas esti "dialektike" tranĉataj. Kaj vi mem eble povis legi en la tria kajero (1932) de "La Nova Etapo" la tezojn de kompatindaj esperantistoj, kiuj ŝvite cerbumadiĝ por pravigi la ekziston de la esperanta movado laŭ marksisma vidpunkto. La titolo per kiu la redaktoroj de l'revuo enkondukis la tezojn estas tre karakteriza kaj almenaŭ mi citu ĝin : **Marksisma lingvo-scienca turnas sin vizaĝe al la problemo pri lingvo internacia.**

Miaopinie, la Moskvaj "lingvoscienculoj" tute fiaskis en sia provo akordigi la ekziston de artefarita lingvo kun la ortodoksa marksismo Stalina. Sed la fakto restas, ke ili tion provis fari. La ĉefa zorgo nuntempa de ĉiuj sovetianoj estas montri aprobon, ŝaton, admiron al la nova dogmo, devige instruata sur unu sesono de l'mondo. La literaturo, arkitekturo, biologio, la arto tranĉi vestojn, la lingvoscienco ktp...., ĉio devas esti ortodokse marksista. La ortodokson difinas la regantoj kaj la

herezuloj estas ĉiel persekutataj, malliberigataj kaj eĉ mortigataj. Ĉu tio ne pensigas nepre pri la mezepoka inkvizicio ?

Mi do povas prave aserti, ke nia epoko havas multajn similajn trajtojn kun la jarcento, dum kiu vivis Rabelezo, kaj mi tre bedaŭras la mankon de homo, kiu povus kiel li tiom forte kaj trafe moki la nuntempajn kredulojn ĉiuspecajn. Necesas ja substreki, ke la aŭtoro de **Gargantuo kaj Pantagruelo** atakis ne nur la katolikojn sed ankaŭ la protestantojn. Estas ja tre menciinda la fakto, ke iu Kalvinano, Robert Estjen (Estienne), kiu devis forkuri en Svison por eviti la persekutojn de Parizaj teologoj, skribis en Ĝenevo, dum la jaro 1553, leteron al siaj persekutantoj, por riproĉi ilin pro tio, ke ili ne "bruligis kun lia libro la blasfemulon Rabelezon". El tio oni povas dedukti, ke se la fama aŭtoro vivus nuntempe, ne nur li ne volus morti por defendi iun nacion kontraŭ alia, sed ankaŭ mokus la Trockiajn marksistojn kiel la Stalinajn. Tial mi pretendas, ke iarilate Rabelezo estas pli "aktuala" ol multaj el ĉi tiu jarcento.

*

Sed facile mi kredas, ke vi mem ne trovis intereson en la legado de la Rabeleza verkaro. Kvankam mi ne scias kigrade vi posedas la francan lingvon, tamen mi volonte konsentas, ke ne estas pro nesufiĉa scio, ke vi ne komprenis tiun aŭtoron kaj seninteresiĝis pri lia verkaro. La grandega plimulto da francoj ankaŭ ne komprenas la verkojn de Rabelezo kaj ne legas ilin. La popolo ĝenerale konas tiun aŭtoron nur per kelkaj el liaj plej krudaj, maldelikataj frazoj kaj per anekdotoj pri li. Cetere, necesas, por kompreni **Gargantuon kaj Pantagruelon**, havi eldonon, en kiu estas aldonita glosaro. Kelkrilate la lingvo de Rabelezo estas artefarita. Li prenis radikojn en la greka, latina, hebrea, araba lingvoj kaj ankaŭ ĉerpis el la provincaj dialektoj. Se vi ne havis en via dispono tian glosaron, evidente vi povis kompreni malmulton. La hodiaŭa franca lingvo tre diferencas de tiu uzata de Rabelezo.

Rilate al via malŝato por lia kruda, maldeca parolmaniero, mi ankaŭ facile komprenas ĝin. Sed necesas scii, ke en tiu epoko tia maldelikata lingvaĵo estis kutima kaj ofendis nenies orelojn. Eĉ pastroj kaj episkopoj tiele parolis. Rabelezo neniel devis timi persekuton pro siaj maldecaĵoj. Mi pensas, ke li intence alprenis fantazian

kaj krudan formon por kaŝi sian herezon. Cetere, tion li mem aludis en la antaŭparolo al **Gargantuo**. Tie li avertas la legantojn, ke ili kvazaŭ devas imiti hundon, kiu inter rubo trovis oston kaj rompas ĝin por suĉi ties medolon. Per tio li klarigas, ke oni ne devas atenti la krudan eksteraĵon de liaj verkoj, sed serĉi la "substanco-riĉan medolon", kiu en ili sin kaŝas.

Kiam, ekzemple, oni legas la titolon de l' 13-a ĉapitro de **Gargantuo**, tiam oni ne tuj divenas, ke ĝi entenas tre trafan kritikon pri la rezonmaniero de l'Sorbonaj teologoj:

Kiel Grandgorgŭlo ekkonis la mirindan inteligenton de Gargantuo laŭ lia elpenso de postajviŝilo.

Dum la citado de ĉiuj viŝiloj (60), kiujn li provis, la knabo deflankiĝis kaj lia patro diras :

" - Ni revenu al la temo.

" - Kiu ? demandas Gargantuo. Ĉu feki ?

" - Ne, diris Grandgorgŭlo, sed viŝi la postajojn.

" - Sed, rimarkigis Gargantuo, ĉu vi pagos al mi barelon da bretona vino, se mi devigas vin, konfesi vian eraron?

" - Jes, certe, konsentis Grandgorgŭlo.

" - Nu, ne estas necese viŝi al si la postajojn, se sur ĝi ne estas malpuraĵo ; malpuraĵo ne estas, se oni ne fekis; sekve, necesas unue feki antaŭ la postajojn viŝi.

" - Ho! diris Grandgorgŭlo, kiom saĝa ci estas, knabo! Baldaŭ mi akceptigos cin kiel doktoron ĉe la Sorbono... Ci daŭrigu cian postajviŝilan argumentadon".

Gargantuo ja faris tre korektan silogismon, imite al la skolastika argumentmaniero. Laŭ tiu teksto estis tro facile ek trovi, ke la potencaj teologoj tiamaj estis celataj ; tial en la sekvanta eldono Rabelezo anstataŭigis la esprimon "doktoro ĉe la Sorbono" per "**doktoro en gaja scienco**".

En la tuta verkaro de Rabelezo troviĝas ne nur drastaj kritikoj al la teologoj, sed ankaŭ al la monakoj, al la juĝistoj, al la leĝistoj, al la militistoj, eĉ al la kuracistoj. Nia aŭtoro tamen estis mem kuracisto, sed li ne havis iluzion pri la medicino. Liadire, li verkis por distri pacientojn kaj pli fidis al tia kuracrimedo ol al drogoj por resanigi ilin.

*

Sed eble mi tre mirigos vin per mia aserto, ke la fama herezulo estis pioniro por artefarita lingvo.

Kaj ne nur pro tio, ke lia lingvo mem estas grandparte artefarita, sed per jena lia diro, kiu troviĝas en la 19-a ĉapitro de lia tria libro :

"ESTAS ERARO DIRI, KE NI HAVAS NATURAN LINGVON : LA LINGVOJ EKZISTAS PER ARBITRAJ INSTITUCIOJ KAJ KONVENCIOJ DE L'POPOLOJ : LA SONOJ (KRIOJ), KIEL DIRAS LA DIALEKTIKULOJ NE HAVAS NATURAN SED LAŬPLAĈAN SIGNIFON" (1).

Profesoro Paŭlo Stapfer, en iu dika libro, aperinta en 1918, eldiras sian bedaŭron, ke Rabelezo tiurilate eraris. Al tiu eminentulo oni povus apliki la latinan proverbon : **Sutor, ne supra crepidam** (2). Ĝuste en la sama jaro aperis : **La Lingvoj en la Nova Eŭropo**, de A. Meje (Meillet), en kiu estas dirite : "LINGVO ESTAS SOCIA INSTITUCIO TRADICIA. LA VOLO DE L'HOMO SENĈESE INTERVENAS EN LA LINGVO".

Ĉu ne estas tre rimarkinde, ke la aserto de aŭtoritata kaj mondfama lingvisto tute akordiĝas kun tiu de genia nefakulo el la 16-a jarcento ? Pro tiu sola sia eldiro prilingva, Rabelezo indas esti konata kaj honorata de ĉiuj esperantistoj. Same meritas niajn mokojn la nuntempuloj, kiuj ankoraŭ kredas, ke artefarita lingvo estas utopiaĵo.

Sed la plej mokindaj kaj vipindaj sendube estas la marksistaj esperantistoj el Moskvo, kiuj en siaj tezoj jenon eldiris : "Pri la elpelo de naciaj lingvoj per la lingvo esperanto oni ne povas eĉ paroli. La kunproksimiĝo de naciaj lingvoj, kiu kondukos al unu monda lingvo okazos sendepende de esperanto".

*

For de mi la opinio, ke la tuta verkaro de Rabelezo estas valora, ŝatinda, ĝuebla! Kelkaj partoj eĉ ne estas amuzaj kaj fakuloj ne interkonsentas pri ilia ĝusta signifo. Sed tio ne forigas la fakton, ke antaŭ kvarcent jaroj en Eŭropo vivis homo, kies menso estis liberigita de dogmoj kaj kiu trafe mokis ĉiujn dogmulojn. Kalvino, Lutero ankaŭ vivis en tiu epoko kaj ili vigle kontraŭbatalis la katolikan dogmon, sed profite al iuj aliaj dogmoj, trov-eblaj en la Biblio. Kie la protestantoj fariĝis la plej fortaj,

(1) Originala teksto : "C'est abus de dire que ayons languaige naturel : les languaiges sont par institutions arbitraires et convenances des peuples ; les voix, comme disent les dialecticiens, ne signifient naturellement, mais à plaisir".

(2) Ne juĝu ŝuisto preter la ŝuo. - (Kompil.)

tie ankaŭ funkciis punbrulejoj. Por pravi mian aserton, sufiĉu menci la brulmortigon al Miĥaĉelo Serve (Servet), per la instigo de Kalvino.

Hodiaŭ la herezaj marksistoj estas en Sovetio persekutataj, sed mi havas la konvinkon, ke se Trocki regus en la Kremlo, anstataŭ Stalin, ne multo estus ŝanĝita, krom tio, ke eble ĉi tiu lasta estus en ekzilo anstataŭ la unua.

En nia epoko veraj liberpensuloj ne svarmas. Male, ĉie oni renkontas etcerbulojn, kies vid- kaj komprenpovo ne transiras la limojn de sia partio, eklezio aŭ sekto. Kio okazis en nia movado, tio estas plorinda pruvo pri mia aserto. La sendogmeca Statuto de SAT, kiu estas akceptema al ĉiuj tendencoj el la internaciistaro, ne povis longe esti respektata de dogmemaj socialistoj, komunistoj kaj eĉ de kelkaj anarkistoj. Unue disputoj kaj fine skismo. Tial mi decidis ekŝigi el la Plenum-Komitato de SAT por povi tute senĝene iel imiti la grandan herezulon el la 16-a jarcento. Sed mi bedaŭras, ke mankas al mi lia klero kaj talento. Rabelezo ja estis unu el la plej kleraj homoj el sia epoko. Kaj kiam oni scias, ke li lernis la grekan lingvon, dum li estis en iu monakejo, en kiu la malklero estis konsiderata kiel virto, tiam nepre oni sentas admiron por tia memstare pensanta homo.

*

Rilate al via demando, ĉu eblus traduki la verkojn de Rabelezo en esperanto, mi devas kontraŭdirece respondi: ne kaj jes. Ne, se oni volus utiligi nur la vortprovizon, kiun posedas nun nia lingvo ; jes, se imite al Rabelezo mem, kiu enkondukis multajn fremdajn vortojn en la franca lingvo, oni alprenus la necesajn radikojn. Sed la vorto "esperruquancluzelubelouzerirelu", kiun vi citas k.a. similaj estas facile tradukeblaj, tial ke ili fakte ne havas signifon. Per tiaj monstraj vortoj la aŭtoro de Pantagruelo celis nur doni al la leganto la aŭdan impreson de konfuzo, kiu rezulto de interpuŝigo kaj interbatigo. Sufiĉus do tute simple redoni la sonojn per esperantaj literoj.

Ekzistas dekkvin malsamaj tradukoj en la angla lingvo; sep en la germana ; kvin en la itala ; kvin en la rusa ; kvar en la ĉeĥa ; unu en la dana ; unu en la holanda ; unu en la pola kaj unu en la ukraina. Pri la valoro de

tiuj tradukoj mi persone havas neniun scion. Sed mi legis, ke kelkaj estas tute fuŝaj, kriplaj, absolute senvaloraj.

*

Mia letero longiĝas kaj tio pruvas, ke mi ŝatas paroli pri Rabelezo. Kiuj konas min intime, tiuj scias, ke plej ofte mia humoro ne estas ridema. Temperamente mi estas pesimisto kaj ĉiam miras, kiam io sukcesas laŭ mia deziro. Eble pro tio mi ŝatas aŭtoron, kiu nepre naskas ridon ĉe komprenpova leganto. La rido estas saniga kaj ĝi estas iu "apartaĵo de l'homo", kiel diras la aŭtoro de **Gargantuo** en la atentigo al la legantoj. Bestoj ja ne ridas. Rido forpelas koleron, malamon kaj nepre naskas indulgon. Sekve, la plej bonfaraj homoj estas tiuj, kiuj ridigas.

Necesas tamen substreki la vorton **rido** kaj ne konfuzi ĝin kun la rideto, kiun iu Volter, iu Anatol Frans naskas ĉe legantoj. Rideto povas enteni malestimon, malamon, venĝemon, sed ne plengorĝa ridado.

Oni ne posedas aŭtentikan portreton je Rabelezo. La bildoj, kiujn mi vidis pri li, ne montras gajan mienon. Povas do esti, ke lia humoro ankaŭ ne estis gajema. Ne eblas diveni la eksteran aspekton kaj la humoron de aŭtoro per liaj verkoj.

Almenaŭ estas eraro opinii, ke Rabelezo instigas al drinkado kaj manĝegemaĉo. Trinki ne estas samsignifa kiel drinki. Kvankam la personoj en la Rabeleza verkaro trinkas barelojn da vino kaj englutas tunojn da manĝaĵo, tamen ili kutime ne ebriiĝas kaj malsaniĝas pro maldigestado. Kaj se tio okazas, puno sekvas. Gargamelo, la patrino de Gargantuo, ja manĝis tro da tripoj kaj pro tio mortis.

Volonte mi konsentas esti nomata Rabelezano, se per tio oni volas diri, ke mi aprobas la difinon, kiun nia fama herezulo donis pri **pantagruelismo** ; ĝi estas **ia gajhumoro plena je malatento pro okazeblaĵoj, kian havas kutime homo sana, vigla, preta trinki, se al li estas proponite...**

Kaj kiel konkludon al ĉi tiu eble tro longa letero mi proponas al via medito ĉi tiun verson, kiu troviĝas en la 65-a ĉapitro de la **Kvara Libro de Pantagruelo** :

**Tiu furiozas kaj saĝon ne havas,
Kiu ŝate trinkas kaj trink' lin ne ravas (1)**

(1) Originala teksto : **Furieux est, de bon sens ne jouist,
Quiconque boyt et ne s'en réjouist.**

LETERO DEK-OKA

Al K-do N.Ŝ., Sovetio

Parizo, la 17-an de marto 1930.

Povas esti, ke ni ne komprenis vin ; sed vi certe ankaŭ ne komprenis la ĝustan signifon de nia letero, opiniante ĝin "koleran". Ni ja havas sufiĉe da motivoj por esti singardaj, kaj sekve povis kvazaŭ flari ian kaptilon en viaj skriboj pro ilia strango kaj iela kontraŭdiro sed, fakte, via letero ne kolerigis nin, sed nur amuzis.

Ni dankas al vi pro via instigo esti kuraĝaj kontraŭ la malicaj, senbazaj atakoj de C.K. de SEU. Ne ni bezonas kuraĝon en tiu okazo, sed la Sovetiaj SAT-anoj mem, kiuj konscias pri la malbonaj intrigoj kaj deziras bari al ili. Ni ja ne riskas ĉi tie perdi niajn vivrimedojn aŭ esti sendotaj en ekzilon, tial ke ni rebatas la atakojn de Dre... Ni bone scias, ke en Sovetio multaj K-doj malaprobas la agitadon kontraŭ la Direkcion de SAT, sed tio ne multe helpas, ĉar ili ne kuraĝas publike elpaŝi por defendi sian vidpunkton. Vi mem ne konsentas, ke ni sciigu vian nomon (estu tute trankvila pri tio, vi povas tute fidi je nia diskreto), okaze se ni publikigus viajn skribojn. Ni do ripetas : ne ni mem bezonas kuraĝon, tial ke Dre... neniel timigas nin persone. Ni nur timas pro la unueco de la laborista esperanta movado, kiu povas esti endanĝerigata de la atakoj, kiujn vi konas...

Por konvene respondi al viaj priorganizaj demandoj, necesus verki tutan broŝuron. Vi do komprenu, ke tio estas al ni tute nebla. Cetere, vi trovos tiurilatajn respondojn en "For la Neŭtralismon!" kaj en "La Laborista Esperantismo", se vi povas havigi al vi tiujn du verketojn.

Vi diras, ke vi "pridubas ĉion". Ne prave! Ĉu do vi dubas pri la ekzisto de la letero, kiun vi sendis al ni kaj pri ĉi tiu nia respondo ? Certe ne, sed vi certe rajtas dubi, kiam oni asertos al vi, ke en Francio, Britio aŭ alie la laboristoj estas tiel mizeraj, ke ili nepre baldaŭ ribelos kaj starigos proletan diktaturon ; vi rajtas dubi, kiam vi aŭdas, ke la Direkcio de SAT "revizas", "krimas" ktp ; sed vi ne povas dubi pri ĉio ajn...

Nek mi, nek L. Revo, kredeble, povus liveri kontentigan respondon al viaj aliaj demandoj. Eĉ plej famaj filozofoj ne sukcesis kontentige por ĉiuj homoj liveri tiaspecan respondon por si mem. Mi konstatas, ke mi vivas

(kiel kaj kial mi ne scias, kaj tio cetere ne gravas) ; mi sentas en mi bolantan energion, kiu devas elspeziĝi ; mi konstatas, ke milionoj da samspeculoj ankau devas elspezi energion. Tiucele ne ĉiuj agas same. Unuj diboĉas, malhigiene vivas, kartludaĉas aŭ pasigas sian tempon laŭ maniero, kiu ŝajnas al mi ne imitinda ; mi do serĉas aliajn vojojn por disŝuti mian energion. Per komparo super diversaj vivmanieroj, mi elektas inter ili kaj tiel formas al mi ian vividealon, kiu fariĝas por mi obeinda leĝo. Kiam mi agas laŭ la principoj, kiuj konsistigas tiun idealon, tiam mi sentas internan moralan ĝojon ; kiam mi malobeas ilin, tiam mi sentas malestimon al mi.

El tio eblas starigi ian celon al la vivo ; sed oni ne devas forgesi, ke tiu celo neniel estis antaŭdestinita, ke sekve ĝi estas tute relativa. Ĉiu ajn vivulo havas kiel celon, malvolvi ĉiujn siajn poveblojn. Kaj por homo ne ekzistas, laŭ mi, pli inda maniero ol sin dediĉi al iu nobla tasko, kiu celas la bonon de l'tuta homa speco.

Tiu recepto sufiĉas al mi ; ĉu ĝi taŭgos por vi, tio estas alia demando.

Almenaŭ komprenu, ke tiu mia tro rapida respondo estas nur pruvo, ke mi fidas al via sincero kaj ne plu kredas, ke via unua letero entenis kaptilon.

*

LETERO DEK-NAŬA

Al K-do H.B., Letc..., Anglio

Parizo, 17-11-1931

Al mi la enhavo kaj sincera tono de via letero plaĉis. Mi bone komprenas vian surprizon ĉe la konstato, ke SAT-anoj nomis vin "sinjoro". En Svedio mi mem faris la saman sperton kaj tiam sentis min preskaŭ ofendita. Sed oni klarigis, ke tiel estas la kutimo tie en laboristaj rondoj, eĉ inter konatuloj. Se oni prikonsideras la aferon laŭ historia vidpunkto, oni povas klarigi al si, ke la kvalifiko "sinjoro", kiam ĝi rilatas al laboristo, estas signo pri konkerita digno en la socio. Kaj mi timas, ke la vorto **kamarado** perdos en la estonto sian nunan signifon. Same la himno "La Internacio", post kiam ĝi estos tro ofte ludata en oficialaj cirkonstancoj.

Lastatempe mi legis, ke okaze de vizito de "K-do" Litvinof al la faŝista Mustafa Kemal Paŝa en Ankara la

tiea muzikistaro ludis "La Internacio"-n kaj ĉe tiu ekscio mi havis kredeble similan impreson al tiu, kiun vi spertis aŭdante, ke oni nomas vin "sinjoro". Ni ne forgesu, ke la franca oficiala himno "La Marseljezo" estis ankaŭ revolucia kanto. En ĝi oni rekomendas mortigi la reĝojn ; sed jam multfoje venis en Francion reĝoj, al kiuj honore oni ankaŭ ludis tiun himnon !...

Estas tamen tre strange, ke tiuj SAT-anoj el Bir... aliĝas al B.E.A. Ili tute ne estas konsekvencaj. Se ili estus anoj de UEA, mi komprenus ilian sintenon, sed, ĉar ili estas SAT-anoj, ilia loko estas en BLEA. Sed ni ne forgesu, ke la homoj ne forlasas sian malnove akiritan idearon en unu tago. Se tiuj SAT-anoj legas "S-ulo"-n ili certe iom post iom perdos sian malnovan percepton pri esperantaj aferoj. Neniam preterlasu la okazon klarigi al tiuj neŭtralemuloj, ke ili pli bone servus la esperantan aferon, se ili agus konsekvence laŭ la vidpunkto difinita de SAT.

Vi ja devas esti preta ricevi insultojn de viaj sampartianoj. Kaj mi avertas vin pri neceso prepari vin spirite por neesti maljusta poste pro maljustaĵoj faritaj al vi. Ni estas en kriza tempo, kiu tre favoras la demagogiajn procedojn de senskrupululoj aŭ fanatikuloj. Sed la grava demando tamen estas : difini la ĝustan pozicion por la estonto de nia movado. Mi restas ĉe la konvinko, ke la nia estas la plej ĝusta ; tial ni povas trankvile atendi la ŝanĝon de l'cirkonstancoj. Nur post du- tri- kvar jaroj eĉ pli ni povos havi la certon, ke ni ne eraras. Dume ni laboru kaj varbu aron da honestaj kaj fidindaj homoj, ĉiam pretaj oferi kaj sin dediĉi al la SAT-movado ; ili formu la fortikan kernon, kiu tenu la ekvilibron inter la diversaj partianoj.

... .. *

LETERO DUDEKA

Al K-do H.B., Letc..., Anglio

Parizo, 23-5-1932.

Ne mirigas min via sciigo : mi ja antaŭvidis, ke en Moskvo la Dre...a bandaĉo malebligos vian eniron en Sovetio. Kaj tiu fakto estas nova, plia pruvo, ke nur la plej serveme Stalinaj elementoj povas iom libere spiri

en Sovetio. Dum plej sindonaj kaj aŭtentikaj malnovaj komunistoj estas en malliberejoj, karieristoj kaj servaĉemuloj okupas la bone pagatajn kaj privilegidonajn postenojn. Mi ne volas fari amarajn komentojn pri tiaj konstatoj, sed almenaŭ ni firme konsciu, ke prirevoluciajn lecionojn la karieristoj ne rajtas doni al ni...

Por ke vi havu tute klaran bildon pri la severa kontrolo super leteroj, precipe super tiuj venantaj el Parizo, eksci, ke du el miaj korespondantoj estas nun persekutataj pro tio, ke la cenzuro ektrovis, ke ili ricevis de mi korespondaĵojn. Sur leterkovertoj la adreson mi ĉiam skribis maŝine kaj la leterojn mi ne subskribis per mia nomo ; sed okazis tamen, ke sur banderoloj por presaĵoj mi skribis mane. Tiun mian skribmanieron oni ektrovis kaj por pruvi la "krimon" de tiuj du K-doĵ (Beŝ... kaj Ŝĉe...) en la lasta n-ro de la ruslingva revuo de SEU estas publikigita la faksimilo de mia manskribo!... Notu, ke la presaĵoj ("S-ulo", Protokolaro, Manifesto ks.), kiujn mi sendis, estis kaŝe envolvitaj en ekz-oj de franclingvaj komunistaj gazetoj.

En Francio oni iafoje diras : "Kiel bela estis la Respubliko dum la Imperio!". Kaj tio signifas, ke la respublikanoj faris tiam al si pri la Respubliko tute alian bildon ol tiun, kiun ĝi fakte prezentas hodiaŭ. La malnovaj bolŝevistoj, kiuj ne okupas nun bonajn postenojn, sendube povus ankaŭ diri : "Kiel bela estis la komunismo dum la cara regado!".

Tio tamen neniel signifas, ke oni devas bedaŭri la caran tempon ; tute male, sed la sinceraj revoluciuloj ne povas havi alian sintenon ol jenan : **Ĉiam esti kun la persekutatoj kontraŭ la persekutantoj**, - kiam la unuaj, kompreneble, ne celas restarigi la regnon de malnovaj persekutantoj. Batalante nun por ke en Sovetio regu libero kaj demokratio, oni fakte servas la revolucion, la komunismon. La libero estas iu stato senĉese minacata kaj konstante pribatalenda...

La Stalina "komunismo" iel similas la nunan katolikismon, kompare al la primitiva kristanismo. Ĉe la komenco la kristanoj estis persekutataj kaj martirigataj kaj poste ili fariĝis siavice persekutantoj kaj martirigantoj.

Mi volas konigi al vi ankaŭ tre signifan fakton : Lastatempe turka ĵurnalisto intervjuis Litvinov pri la vizito de Ĥmet paŝa k.a. turkaj regantoj en Sovetio. Jen ekstrakto laŭ la **Orienta ĵurnalo**, 12-5-1932 : "Rilate al la

vizito de via ĉefministro, ĝi malfermis novan horizonton por la amikeco inter ambaŭ landoj. Ĉe tiu horizonto brilas komunintereso kaj senlima reciproka sekuro. Ĉiam ni amis Ismet paŝa ; sed post tiu nova alproksimiĝo kun li kaj la pli kaj pli intima interkonatiĝo kun la grandaj estroj el via lando, kaj spertinte la sinceron kaj simpatian, kiuj estas al li propraj, mi nun tute simple sentas veran amon por via ĉefministro. KREDU MIN : Ĉiuj gvidantoj de Sovetio pensas tute kiel mi. En la persono de Ismet paŝa ni sentas nun por Turkio senton pli fortan ol amikecon."

Dume la Kompartio estas tie nelaŭleĝa organizo kaj ĝiaj anoj severe kaj eĉ kruele persekutataj!... La Stalinaj komunistaj gazetoj el ĉiuj landoj kompreneble prisilentas tiajn faktojn, tial ke iliaj redaktoroj estas nur dungitoj, kiuj plejparte verkas komunisme hodiaŭ, kiel ili verkos faŝisme morgaŭ...

Pardonu min, kara K-do, sed mi ne povis bridi mian deziron eldiri en ĉi tiu letero tion, kio ne estas direbla en nia gazeto, tial ke miaj diroj kredeble estus miskomprenataj kaj liverus denove motivon al iuj blindaj fanatikuloj kaj al karieristoj pretekston kriaci, ke ja fakte mi estas "malamiko de Sovetio"...

... ..

*

LETERO DUDEK-UNUA

*Al la Redakcio de "Nervio"(1)
Buenos-Aires*

Parizo, 13-4-1932.

Vi faris al mi tro grandan honoron per la sendo de via demandaro. Ĝia tripunkta, mallonga enhavo estas tiom riĉa, ke indas ĝin ricevi nur homoj kun enciklopedia scio. Tia demandaro malagrabla sentigis al mi mian nekompetenton por taŭge kaj aŭtoritate respondi. Kaj mi vere admiros la homojn, kiujn ne timigos viaj demandoj, se ili sukcesos liveri respondon, kapablan atendi favoran

(1) Al la enketo, organizita de la revuo "Nervio" respondis pluraj eminentuloj kaj famuloj el diversaj landoj. Ĉi tiu letero trovis bonan akcepton kaj aperis hispanlingve. La sama revuo ankaŭ publikigis tradukon de la verko de Lanti kaj Ivon : "Ĉu Socialismo konstruiĝas en Sovetio?"

- Kompil.)

prijuĝon de la estonto...

Tamen mi ne volas tute rezigni, se vi konsentos, ke mi limigu mian pritrakton per nura konsidero al la Tria punkto de via demandaro, nome :

"En la tuto de la sociaj, spiritaĵaj ktp. movadoj kun universalisma tendenco, kiel viaopinie oni povus realigi ponton super la Atlantiko inter la malnova kaj nova kontinentoj?"

Ĉu ne estas tre signifa kaj pripensiga la konstato, ke malgraŭ la senĉesa inventado kaj aplikado de rimedoj, kiuj faras nian planedon malgranda kaj fizike pliproksimigas la popolojn, montriĝas tamen neniu gravega signo pri tio, ke morale, spirite tiuj popoloj proksimiĝas kaj pretas rezigni siajn naciecajn apartaĵojn? Ni ja vidas, male, la naskiĝon de nacioj kun limoj kanone ŝirmataj kaj starigon de novaj spiritaĵaj bariloj. Mi kredas ne erari, dirante, ke ĝuste en Suda Ameriko la diversaj ŝtatoj tre sukcesas per laŭcela edukado fari el filoj de italoj, francoj, irlandanoj, turkoj k.a. nacioj tre bonajn patriotojn - argentinajn, braziliajn, ĉiliajn, peruajn, kolumbiajn k.c.

Por ke la problemo estu klare elmetita antaŭ niaj okuloj, ni nun rigardu al Eŭropo. Kion ni vidas ? Jen estas ridinde malgrandaj ŝtatoj, kies anoj estas ĉiam pretaj morti kaj mortigi por gardi ties suverenecon ; ĉiam pretaj ĉion oferi por defendi sian naciecon. Ili scias, ke la venonta milito per gasoj, venenoj k.a. multspecaj mortigiloj pereigos milionoje infanojn, virinojn kaj senkulpajn homojn, sed malgraŭ tio, por ordinaraj franco, anglo, germano aŭ italo estas eĉ nepenseble, ke ilia nacieco povus formalaperi. Tiuj naciistoj prefere konsentus pereji, plej abomene mortaĉi ol prezenti al si staton en kiu Anglio, Francio, Germanio, Italio, Polio kaj ceteraj nacioj havus nur geografian signifon, ne plu ĝuus sendependecon, ne plu reprezentus apartan kulturon kun aparta lingvo. Katoliko preferus ankaŭ morti ol ĉesi esti katoliko.

La naciisma religio tiom profunde infektis la spiritojn, ke eĉ revoluciaj partioj kultas al ĝi, instruas ĝin. Ni vidas, ekzemple, ke la franca kompartio kaj ĝia filio C.G.T.U. (france : "Confédération Générale du Travail Unitaire", Ĝenerala Unuecema Konfederacio de l'Laboristaro) agitas por la nacia sendependeco de... Korsiko! - la malgranda insulo el la Mediteraneo. Kaj estas bone konate, ke la politiko de Stalin celas krei aŭ revivigi naciajn lingvojn kaj kulturojn en Sovetio.

Tiaj estas la faktoj, la donitaĵoj de l'problemo. Tial, kiam oni ~~oni~~ malvarme pripensas ilin, via demando pri starigo de ponto inter Eŭropo kaj Ameriko aspektas kvazaŭ ironiaĵo. Kiel Eŭropo povus havi ian ajn emon al unuiĝo kun malproksima kontinento, kiam ĝi ne kapablas mem unuiĝi, sed male senĉese plialtigas, plifortigas la murojn inter la disigitaj popoloj ?

Mi tamen ne neas la ekziston de "universalismaj" tendencoj ; sed ili estas vere tre malfortaj. La demando sekve estas : kiel oni povus konsiderinde plifortigi ilin ? Kiaj estas la plej laŭcelaj kaj efikaj rimedoj por atingi, ke la "universalismo" (mi uzas vian terminon) enplantiĝu sur nia suferplena planedo, kaj disrompu la naciajn barojn ? Mi limigos min per la mencio de nur unu el tiuj rimedoj.

Estas sendube banalaĵo diri, ke la homo estas socia estaĵo. Sed socio supozigas rimedon por interkompreniĝo. Kiel do oni povas paroli pri universalismo, tiom longe, kiom la homoj restas apartigitaj per lingvaj baroj kaj en sia grandega plimulto staras unuj kontraŭ aliaj kiel besto antaŭ homo ? Fakuloj asertas, ke **origine** la lingvo estis plivere faktoro ol socia produkto. Kiuj celas plifortigi la universalismajn tendencojn, tiuj devus do unue klopodi por ke la lingvo ludu inter la popoloj faktoran rolon kiel ĉe la origino inter la individuoj, kiam simpla krio jam estis ago. Konsekvenca universalisto devas do nepre meti ĉe la bazo de sia konstruo, ĉe la deirpunkto de sia agado la lingvan unuecon. Se tion li ne faras, li agas nur diletante, amatore, necelkonforme, kvazaŭ pro la nura plezuro agadi.

Se oni konsentas kun miaj premisoj, tuj alia demando starigĝas : Kiun lingvon oni elektu por esti la komuna, la universala interkomprenilo ? Ĉu la anglan, la hispanan, la francan, la rusan, la ĉinan ? Mi ne volas insisti por montri, ke tiele starigante la demandon oni tuj trafas en senelirejon.

Esperable ĉiuj universalistoj facile konsentos, ke la karakterizaĵo de nia epoko estas la ĉiuflanka raciigado. Tiu raciiga tendenco estas nehaltigebla. Kial do ĝi ne invadus ankaŭ la lingvan kampon ? Fakte tiel jam okazis. Estas interese noti, ke en 1629 Kartezio (Descartes) starigis larĝtrajte la principojn, laŭ kiuj 258 jarojn poste Zamenhof liveris al la mondo raciigitan lingvon, tiel perfektan kaj vivkapablan, ke neniu el la postnaskitaj

surogatoj sukcesis konkurence vivi kaj enpenetri la praktikon. Esperanto (tiel oni nomas tiun lingvon) estas la kvintesenco el la hindo-eŭropaj lingvoj kaj ĝia grado da raciigado atingis la maksimumon. Estus ekster la temo, se mi montrus al vi la mirindan logikan strukturon de tiu lingvo, kiu estas almenaŭ 20-oble pli facile lernebla ol kiu ajn nacia lingvo. Mi nur aldonu, ke ĝia esprimkapablo estas nesuperebla kaj ĝia riĉo senlima.

La ilo necesa por ke disvolviĝu normale la universalismaj tendencoj pri kiuj vi parolis ĉe la tria punkto de via demandaro jam ekzistas, funkcias kaj pli kaj pli disvastiĝas en la tuta mondo kaj sur ĉiuj kampoj de l'homa aktiveco. Centoj da gazetoj estas redaktataj en esperanto, pluraj miloj da libroj, ĉu traduke, ĉu originale jam aperis en tiu lingvo. Esperanto fakte fariĝis vivanta lingvo de vivanta popolo, kies anoj estas disŝtitaj en ĉiuj partoj de nia planedo. Mi do ne teoriumas, kiam mi parolas pri la ekzisto de la lingva unuecigilo necesa por ke la universalismo havu konkretan subtenilon kaj povu logike celi al praktika efektiviĝo.

Por disbati kaj venki la naciismon, kiu, malgraŭ la senĉese plivastiĝantaj trafikiloj, reprezentas nuntempe la plej potenčan ideo-forton, la plej danĝeran, sangan kaj pereigan religion, ne ekzistas, miaopinie, pli taŭga rimedo ol la alprenado kaj **praktikado** de universala lingvo. Ĉiuj konsekvencaj universalistoj havas do la devon eklerni esperanton kaj fariĝi ĝiaj fervoraj praktikantoj.

Ne nur la lingvo jam ekzistas, sed ankaŭ la organizoj, kiuj ebligas ĝian praktikan utiligadon. Mi citos nur unu, kies celo kredeble trovos simpatian ĉe la universalistoj : **Sennacieca Asocio Tutmonda**, kiu en sia organizformo ignoras la naciojn kaj kies lingvo dum la kongresoj kaj por ĉiuj eldonaĵoj estas sole esperanto.

Por kunigi la popolojn, por meti unuigan ponton inter Eŭropo kaj Ameriko la plej urĝa tasko kaj principe la plej facile plenumebla estas forigi la lingvajn barojn ; estas laboradi al la kreado de tutmonda kulturo.

Aliparte la universalistoj nepre devas konsenti al tio, ke la tero apartenas al ĉiuj teranoj. Sekve, estas tute nenormala stato, ke en Argentinio, ekzemple, troviĝas nur 11 000 000 da loĝantoj sur 2 800 000 kv. km., dum en Francio troviĝas 42 000 000 sur 550 986 kv. km. Se oni volas agadi en la direkto al kiu puŝas nin la historia procezo, oni devas havi kiel celon la starigon de universala

administra aparato, kies tasko estu racie organizadi la produktadon kaj juste distribuadi la produktaĵojn. Tia stato supozigas universalan komunan lingvon. Tiu lingvo ekzistas kaj la universalistoj, kiuj ne jam utiligas ĝin, nekonscie perfidas sian idealon.

Malgrandaj kaŭzoj povas iaforte havi grandajn efikojn kaj la sperto multfoje montris, ke la plej modestaj taskoj zorge kaj fervore plenumataj donas sencon al la vivo. La esperantistoj grupiĝintaj en **Sennacieca Asocio Tutmonda** forte konscias, ke, per sia praktikado de esperanto laŭ tutmonda skalo, ili pozitive laboras al la konstruado de la ponto, per kiu vi projektas kunigi Eŭropon kaj Amerikon.

*

LETERO DUDEK-DUA

Al K-do J.Št..., Plzen, Ĉeĥoslovakio

Parizo, 14-11-1934.

... ..

Al la demando, kiun vi faras pri iu frazo el "La Laborista Esperantismo" mi respondas jene : se oni akceptas la vidpunkton, ke la homo apartenas al la animala regno kaj ke ĝia animo ne estas donita al ĝi de dio, oni devas elpensi alian klarigon pri la fakto, ke la homo fariĝis la reĝo super la aliaj animaloj, malgraŭ tio, ke ĝi estas malpli forta ol multaj aliaj. Mi ne trovas alian pli malpli akcepteblan hipotezon ol ĉi tiun, nome, ke la homo cerbo posedas (kial? neniu scias) ian specialan kapablon, kiu forestas ĉe la aliaj animaloj, la kapablon **abstrakti**, formi **abstraktajn** konceptojn, elpensi hipotezojn, starigi teoriojn, sistemojn kaj sekve inventi ilojn, maŝinojn ktp. Tiun kapablon mi nomis **vivilo** por la homo, tial ke sen ĝi verŝajne ne ekzistus la **homo sapiens** (homo saĝa). Sen tiu kapablo la homoj malvenkus en la batalo kontraŭ aliajn animalojn kaj sekve malaperus, kiel malaperis aliaj specoj. La scienco, kiu estas la rezulto de kolektiva pensado, fariĝis por la homaj socioj ia **vivilo**, kiel la elpensemo estis por la primitiva homo **ilo** por venki en la batalo por la vivo.

Se oni konsentas kun tiu hipotezo - kaj mi kredas, ke Marks mem konsentus - ŝajnas al mi tute nelogika la eldiro de Engels, ke "La determinantaj kaŭzoj de tiu aŭ alia metamorfozo aŭ revolucio ne devas esti serĉataj en

la kapoj de l'homoj..., sed en la metamorfozoj de l'produktado kaj interŝanĝado." La produktilojn kaj interŝanĝilojn inventis la homoj kaj sekve en ilia kapo troviĝas la kaŭzo de la aliigoj en la sociaj kondiĉoj. Sed, evidente pro la fakto, ke la homoj kreis aliajn vivkondiĉojn, ili siavice devas adaptiĝi - almenaŭ provizore - al tiuj novaj kondiĉoj. Por ke vi pli bone komprenu mian penson mi citu ekzemplon : la homo inventis la biciklon, sed kiam li uzas ĝin, li devas obei al la ekvilibraj leĝoj postulataj de tiu veturigilo, por eviti rompi al si la kolon. (Pri tio bv. kp. pĝ. 75 de "Naciismo").

Se V... asertas, "ke la mano estas la kaŭzo de l'pensado", nu, tio signas, ke li tre **kredeme** akceptas iun ajn hipotezon. Oni ja ne devas forgesi, ke sur tia kampo ekzistas nur hipotezoj kaj neniuj certajoj. Pri hipotezoj pli malpli ĝenerale akceptitaj nuntempe eble ridos la scienculoj de venontaj generacioj. Almenaŭ mi volas tuj rimarkigi al vi, ke la termitoj ne havas manojn kaj tamen estas neeble diri, ke ili ne havas pensojn. Ili scipovas konstrui loĝejojn, urbojn, citadelojn, kiuj estas detruoblaj nur per eksplodaĵo. Termitoj estas arkitektoj, kemiistoj, bredistoj, soldatoj ktp.; iliaj societoj superas la niajn laŭ kelkaj rilatoj. Iuj scienculoj eĉ eldiris la penson, ke eble la estonto apartenas al la insekto, ne al la homo. Se vi povas havigi al vi librojn en kiuj estas priskribita la vivo de formikoj kaj precipe de termitoj, mi forte konsilas al vi tralegi ilin.

Ni do estu modestaj kaj ne havu la pretendon tutposedi la veron, kiam temas pri doktrinoj, teorioj aŭ sistemoj. Se la historia materialismo estus science demonstrita, se ĝi liverus solvon kontentigan por ĉiuj sociaj problemoj, la kompetentaj fakuloj ne disputus inter si. Sed la fakto, ke ekzistas eĉ diversaj marksistaj skoloj, estas la plej bona pruvo, ke la marksismo ne estas scienco, sed **ideologio**, kiu ial havis la bonŝancon larĝe disvastiĝi. La genio de Marks estas unu el la kialoj de tiu disvastiĝo, kvankam en lia verkaro troviĝas eraroj, neklaraĵoj, mankoj kaj kontraŭecoj. Mi havas la konvinkon, ke se Marks vivus nuntempe, li hontus pri disĉiploj el la speco de V... k.a. papagoj...

Pro la fakto, ke en la marka verkaro troviĝas kontraŭecoj, estas facile elĉerpi frazojn por apogi plej

diversajn vidpunktojn. Lastatempe mi legis el la plumo de tre kompetenta marksisto (mi volas diri de homo, kiu funde konas la verkaron de Marks) jenan konfeson, kiu ŝajnas al mi tre karakteriza :

"La marksismo povas resti si mem nur kun la kondiĉo de konstanta analizo super la realaĵo, kiu evoluas kaj devigas ĝin (la marksismon) evolui siavice. Marksisto povas esti "ortodoksa", nur kondiĉe, ke li senĉese repri-diskutas la ŝajne akiritajn verojn, eĉ la parolojn de l' majstro."

... ..
"Ekzemple, la nacieca demando starigās aliel hodiaŭ ol en la mezo de l'lasta jarcento. Estus absurde ripeti aŭtomate en 1933 la naciecajn agitvortojn, eldiritajn de Marks kaj Engels en 1848, 1866 aŭ 1870-71." (Lucien Laurat, "La Critique Sociale", aprile, 1933). Vi certe konsentos kun mi, ke laŭ tia kompreno pri la doktrino oni povas facile pravigi la sennaciismon, starante ĉe marksisma vidpunkto!... Cetere, bonvolu ne forgesi, ke neniam naskiĝis ĉe mi la intenco kontraŭstari al la anoj de nia Frakcio (1), kiuj volas nepre akordigi la sennaciismon kun la marksismo. Ankaŭ estas notinde, ke mi mem akceptas la marksismon laŭ la proporcio de 60-70 %. Estas tamen tute vere, ke neniam, eĉ kiam mi estis kompartiano, la marksismo tute kontentigis min. Ĉiam mi havis la opinion, ke en la historia materialismo la ideologiaj, moralaj, psikologiaj faktoroj ne estas sufiĉe alte taksataj. En ordinara tempo ili povas ja ludi nur tre malgrandan rolon kaj esti tamen decidaj en eksterordinaraj cirkonstancoj. La vivo mem de Marks iel kontraŭdiras lian propran teorion. Aŭ li ĉiam havis la iluzion, ke tre baldaŭ la proleta revolucio triumfos (tiaokaze lia juĝkapablo estis tre mankhava) kaj sekve li havis intereson aliĝi al la laborista movado ; aŭ li aliĝis simple pro tio, ke kuŝis en lia koro kaj animo la sento pri justo, la deziro al io nobla kaj ideala. Mi emas pensi, ke la ĉefa instigilo de lia agado kaj sinteno estis la motivo eldirata en la lasta parto de l'dilemo. Sed tia lia aliĝo al proleta movado estas malfacile klarig-ebla, krom per sofismoj, laŭ la pura ekonomiiismo.

Sed, mi rediras, al marksismo komprenata laŭ la maniero de Lora (Laurat, aliel Revo), mi povas konsenti.

(1) Sennaciista Frakcio - (Kompil.)

Mi kontraŭdiras nur al tiuj, kiuj faras el la doktrino dogmon. Oni scias laŭsperte, ke tio kondukas al situacio simila al la mezepoka inkvizicio. En Sovetio la nova dogmo estas oficiale kaj devige instruata en ĉiuj lernejoj kaj la herezuloj estas persekutataj, malliberigataj kaj eĉ kaŝe mortpafataj de G.P.U.-anoj en iu kelo. La spirito stato de V...oj kondukas al tia situacio, neeviteble. Pro tio mi opinias necese moki aŭ vipi la fanatikulojn.

En la komprenmaniero de Lora pri marksismo kuŝas tamen ankaŭ danĝero. Se necesas senĉese apliki la marksisman dialektikon por difini ĝuste la politikon kaj taktikon de partio aŭ de organizo, tio necesigas la ekziston de **klarigantoj**, de **aplikantoj**, de homoj, kiuj funde studis la doktrinon kaj neeviteble kreiĝus nova klaso da homoj, novspecaj teologoj, al kiuj oni devas konsenti privilegiojn, por ke ili povu ĉiam esti en taŭga stato por bone klarigi kaj apliki la sanktajn principojn. Kaj plie oni povas antaŭvidi, ke tiuj aŭguristoj ne ĉiam interkonsentos. Tiam devos esti ĉefaŭguristo, nova papo. Fakte Stalin estas tia papo en Sovetio kaj en la dekadenca Tria Internacio.

Tiurilate estas tre interese rimarki, ke la dogmo pri la senerareco de l'katolika papo ekzistas nur de l'jaro 1870. Kaj ĝi estis akceptata de koncilio ĝuste pro tio, ke teologoj disputis, kaj iafoje tre akre, jam de tre longe pri kelkaj demandoj kaj ne povis interkonsenti. Por ĉesigi tiun disputadon necesis akcepti la dogmon pri la senerareco de l'papo, rilate ekleziajn aferojn. Tiu povo de l'papo cetere estas unu el la kaŭzoj, pro kiuj la katolikismo estas la plej forta el ĉiuj kristanaj eklezioj...

Sed ni volas esti liberpensaj homoj, ĉu ne ? kaj sekve neniu doktrino, neniu teorio aŭ sistemo devas por ni fariĝi dogmo. V... kaj liaj similuloj havas ankoraŭ senkonscie la spiritostaton de religiuloj, de kreduloj : ili bezonas absolutajn "verojn" kaj malfacile povas toleri la staton de dubo en sia spirito. Mi konfesas, ke ofte la dubo estas nekomforta stato por la menso. Sed la homoj fariĝos vere toleremaj kaj respektemaj por la ideoj de siaj proksimuloj, nur kiam ili estos forigintaj el sia cerbo la miljaran emon al la absolutaj veroj. Kiom longe la homoj ne akceptos la relativismon, tiom longe nia libero estos latente minacata.

Kvankam mi konsilas, ke vi ne alprenu kontraŭmarksisman vidpunkton por defendi la sennaciismon kontraŭ V... aŭ aliaj t.n. marksistoj (male, vi provu ĉerpi en la marka

verkaro eldirojn, kiuj povas apogi nian ismon. Ĉi-okaze mi altiras vian atenton al la artikolo, kiun mi aperigis en la n-roj 314-315 de "S-ulo"), mi tamen konfesas al vi, ke mi ne povus sincere pravigi la ekziston, aŭ pli ĝuste la vivkapablon de artefarita lingvo per la historia materialismo. La provoj faritaj tiurilate de Sovetianoj ŝajnas al mi tute fiaskaj. Tamen esp-o ekzistas, la esp-a movado estas **fakto** kaj neniu saĝa homo povas nei, ke unueco de lingvo estas grava faktoro en la unuiĝo de l' popoloj. Fakte la rusa lingvo pli kaj pli sin trudas al la tuta Sovetio kaj la aliaj tieaj lingvoj pli malpli frue perdos sian kulturan signifon kaj fariĝos iaj provincaj dialektoj. Sekve, kiuj volas sincere kaj konsekvence labori por unuigi la mondon, tiuj devas konfesi, ke esp-o povus ludi tre gravan rolon tiurilate. Tial ke la laboristaj gvidantoj ne komprenas tion, ili estas do konservativulaj kaj ne konsekvencaj revoluciuloj. Neniu el la plej lertaj sofistoj sukcesos rebati tiun mian argumentaĵon.

Cetere, inter la gvidantoj estas kelkaj, kiuj bone komprenas la aferon, sed ili havas nenian intereson al tio, ke foriĝu la lingva ĥaoso ; male, kiam ili estas poliglotoj. Tiaj burokratoj estas konsciaj perfiduloj de l' laborista klaso...

... ..

P.S. - Releginte mian leteron, mi nun sentas la deziron aldoni pri marksismo. Mi citis el artikolo de kompetenta marksisto kaj diris, ke laŭ tia kompreno mi ankaŭ volonte akceptas la ismon. Tamen necesas, ke vi eksciuj, ke en la sama artikolo, Lora diras, ke la lastatempaj okazintaĵoj plene pravigas (!) la marksan vidpunkton. Pri tio mi absolute ne konsentas, kaj trude sin prezentas al mi la penso, ke la fama franca episkopo Bosue (Bossuet) antaŭ du jarcentoj kapablis en siaj verkoj : **Politiko laŭ la sankta Skribo kaj Traktato pri la universala Historio**, kontentige por la plimulto de siaj samtempuloj, klarigi kaj pravigi ĉiujn okazintaĵojn laŭ sia teologia vidpunkto. Multaj el la klarigoj de l'nuntempaj marksistoj estas samvaloraj.

Al niaj novspecaj ekzegezistoj mi emus demandi : Ĉu, jes aŭ ne, Marks diris, ke la kapitalismo kreas sian entombigonton, la proletaron ? Ĉu, jes aŭ ne, la socialismo ne devus fali el la kapitalisma arbo kiel matura frukto ? (La respondo povas esti nur jesa, ĉar ne eblas forstreki tiujn dirojn el la verkoj de Marks). Nu, vi

asertas, ke la kapitalismo, atinginte sian lastan stadion, disfalos. Pri tio eĉ konsentas kontraŭuloj de l'socialismo. Kial do la proletaro malvenkis kaj sklaviĝis ĝuste en la lando (Germanio), kie la kapitalismo estas la plej elvolv-iginta ?

Mi konsentas al la aserto en "La Kom. Manifesto", ke "**La regantaj ideoj de ia tempo estis ĉiam tiuj de l'reg-anta klaso.**" Jes, sed tio ne klarigas, kial, ekzemple, la ideoj en Japanio malsimilas al tiuj en la eŭropaj landoj, kvankam jam delonge la kapitalisma produktomaniero enkondukiĝis en la mikada imperio. Eĉ en Eŭropo mem estas konstatebla sufiĉe granda diferenco inter la diversaj landoj. Kaj en Turkio la ideoj aliĝas ne pro tio, ke la kapitalismo vaste enplantiĝis en la lando, ĉar tio ankoraŭ ne okazis, sed dank'al la influo, agado kaj propa- gando de Kemal paŝa.

Sed la plej karakteriza fakto estas, ke en Sovetio venkis socialism-cela revolucio, kvankam tiutempe la ka- pitalismo estis ankoraŭ tie en embria stato. Per la dikta- turo, per unueca propagando kaj edukado kaj pro manko de ĉia libera gazetaro kreiĝas tie nova, sklaveca spirito- stato, kies bazo estas la Marksa ideologio. Do, la tiaj (Turkio kaj Sovetio) regantaj ideoj tute ne rezultas de la aliĝoj en la produktmaniero, sed male antaŭas ilin.

Ideoj estas fortoj - kaj tiuj de Marks plej bone pravas tion. La marksismo estas iu **ideologio** kaj ne ekzakta scienco.

Mi konsilas, ke vi ĉiam tenu en la memoro kelkajn el la bazaj principoj de la historia materialismo kaj komparu ilin kun la faktoj, kun la okazaĵoj kaj vi povos facile starigi demandojn al kiuj V... povos respondi nur per el- turniĝoj, alivorte per sofismoj.

Pro la fakto, ke regas la spiriton de l'plimulto da ho- moj la absolutismo, mi emas pensi, ke ĉiuj provoj por starigi "ĝustajn" soci-politikajn teoriojn kaj program- ojn, povas havi kiel konsekvencon nur semi ĝermojn de disigo en la laboristajn rondojn. La simpla, la plej sen- kultura proleto ne bezonas tiajn tezojn por kompreni, ke li estas ekspluatata, ke li ne ricevas la ĝustan parton el la sociaj riĉaĵoj. Unuvorte, ĉiu normala homo posedas la senton pri **justo** kaj **ĝusto**. Tiuj konceptoj estas kvazaŭ percepteblaj per la sentumoj. Sekve mi opinias, ke unu el la plej necesaj kaj efikaj rimedoj, por fari revoluci- ulojn, estas vibrigi la senton pri justo en la koro de l'

homoj...

Mi nepre volas ĉesigi ĉi tiun babiladon, kvankam restas multo dirinda pri la temo.

*

LETERO DUDEK-TRIA

Al U. Ŝt., Germanio

Parizo, 19-2-1934.

Mi ĝojas ekscii, ke vi bonfartas kaj ke la situacio en via lando pli kaj pli boniĝas, dank'al la genia viro, kiu finfine metis ordon en la homaj interrilatoj. Tia viro nun mankas en Francio, bedaŭrinde (1). Neniam mi dubis, ke vi tutklare ekvidos la trompon kaj iluzion, kiu kuŝas en la agitado de l'marksistaj partioj...

Tiurilate eble interesos vin, ekscii, ke iu s-ro M. Ivon, kiu estis dum pluraj jaroj ano de nia U.E.A., kaj kiu, logite de l'Moskva bluvo, iris en Sovetion en la jaro 1923, revenis Francion antaŭ ses semajnoj. Li do restis en la tiea "paradizo" dum pli ol 10 jaroj. Tie li eĉ edziĝis kaj nun havas sesjaran knabon. Li flue parolas la rusan lingvon kaj vojaĝis al ĉiuj partoj de Sovetio. Li estis dum du-tri jaroj direktoro de fabriko en Ĥabarov (Siberio), kvankam, origine, li estis nur simpla meblisto. Kiam li forlasis la kapitalisman Francion, li estis ano de l'bolŝevista partio, kompreneble! kaj foriris kun granda entuziasmo por la lando, kie oni "konstruas socialismon". Unuvorte, tiu persono perfekte konas la historion de l'rusa revolucio kaj detale la tiean nunan situacion. Nu, mi povis longe interparoli kun li kaj aŭdi per propraj oreloj konfirmon pri tio, kion mi jam konis per korespondantoj el Stalino. Notu bone en la memoron, ke tie la marksismo estas oficiale kaj **devige** instruata en ĉiuj lernejoj. Tamen la situacio de l'tuta loĝantaro, precipe tiu de l'kamplaboristoj, estas terurega : preskaŭ ĉiuj homoj malsatas. M.I. mem, kiu tamen estis iom privilegiita, ricevis nur 1 kg. da viando monate kaj devis veturi 12 km. por ricevi ĝin kaj post longa enviciĝa starado. Kaj eksciu, ke mankas papero por envolvi la viandon ; la ricevonto devas mem kunporti paperon, se li ne volas teni la sankmakulitan pecon en la manoj mem. Papero estas preskaŭ luksa

(1) La legantoj bv. rimarki, ke Lanti parolas ironie kaj laŭ maniero, kiu trompus eventuale cenzuriston. - (Kompil.)

objekto. Mi citas nur tiun fakton, sed pri similaj oni povas rakonti dum horoj. Kaj la plej terura afero por M.I. estis, ke necesas granda kuraĝo por nur silenti kaj ne ĉiuokaze krii : vivu Stalin!... Unuvorte, laŭ la opinio de tiu persono la Sovetia reĝimo estas la plej abomeninda, kiun oni povas prezenti al si. Sed la tiea nova generacio, kiu konas nenion pri la vivkondiĉoj ekster Sovetio, kompreneble kredas facile la mensogojn, kiuj plenigas la paĝojn de l'Stalinaj gazetoj kaj sekve la gejunuloj pli kaj pli fariĝas ŝovinista, opiniante, ke la lando, kiu faris "la plej grandan revolucion el ĉiuj tempoj kaj lokoj" staras ĉe la pinto de l'progreso!....

Tiel estas! Tiel iras la mondo!... Se la judo K.M.(1) povus vidi la belan aplikadon de sia doktrino, li eble pentus kaj ekkonscius, ke la ekonomiaj faktoroj ne estas ĉio en la vivo de l'socioj. Pli kaj pli mi konvinkiĝas, ke por konstrui humanan socion, oni ne devas malatenti la moralajn principojn. La homo ne vivas nur per pano : ĝi havas cerbon kaj koron. Normale funkcia socio devas atenti juston kaj rajton, kiel pont- aŭ maŝin-konstruantoj devas atenti geometrion. Mi gratulas al vi, ke vi neniam lasis vin tute delogi per la abomeninda marksisma agitado kaj ĉiam restis idealista homo, kiel nia majstro Zamenhof...

Eble interesos vin ekscii, ke Lanti (2) pli kaj pli ekkonscias, ke la homaro iras al pereco, se ĝi ne ŝanĝas sian direkton. Li ĵus fintradukis verkon, kiu kontraŭbatalas la marksismon. Liadire, la verko verŝajne aperos post du-tri monatoj.

Dankante al vi pro la informo pri s-ro Dojb..., al kiu vi okaze transdonu mian koran saluton, kaj dezirante al vi ĉion bonan, mi salutas vin...

(1) Karlo Marks. - (Kompil.)

(2) En sia korespondado kun faŝistaj landoj Lanti ne uzis sian nomon kaj adreson ; aliaj malpli konataj personoj konsentis peradi la leterojn kaj pruntedoni sian nomon. La verko aludita estas : **Skizo pri Filozofio de la Homa Digno.** - (Kompil.)

LETERO DUDEK-KVARA

Al K-do John Karlsson, Norrköping

Parizo, 3-11-1934.

Eble vi jam legis en "Sennaciulo", ke K-do Štadler ekŝiĝis kiel prizorganto super la **Sennaciista Frakcio**. Kvankam nevolonte, mi tamen konsentis preni sur min la taskon anstataŭi la ekŝiĝinton. Tio klarigu al vi, kial vi ricevas respondon al via letero de la 1-7-34 el Parizo anstataŭ el Plzen.

Inter la materialo transsendita de K-do Štadler mi ja trovis vian skribaĵon kaj ĝia legado naskis en mi la deziron iom babili kun vi pri la temo al ni komuninteresa.

Tuj mi diru, ke vi estas tute prava, dubante, ke sennaciismo estas imuna kontraŭ sofistoj. Neniu teorio, neniu doktrino povas havi tian pretendon. Prave ankaŭ vi dubas, ĉu la "amasinstinkto" havas la kapablon starigi kaj funkciigi socion, el kiu forestus ĉia ekspluatado kaj trompo. La amaso certe havas sian parton da respondeco pri tio, ke ĉiam ĝis nun sub la masko de plej belaj kaj noblaj teorioj stariĝis novaj formoj de ekspluatado. Ĉu aliel okazos en la estonto, mi tute ne scias. Neniu scias...

Ni, sennaciistoj, estu do modestaj kaj evitu aspekti kiel homoj, kiuj eltrovis universalan kuracilon. Sed, tial ke la amaso suferas pro maljusto kaj malegalo, oni tamen povas supozi, ke ĝi konsistigas la plej favoran grundon por dissemi ideojn pri justo kaj egalo - aŭ ekvivalento. Mi ja kredas, ke ĉe ĉiu normala homo ekzistas sento pri justo. Per laŭcela edukado eblas cetere malvolvi tiun senton. Ĉiu do postulu egalan parton el la socia riĉaĵo; neniu rajtu havi privilegiojn.

Sed tiuj konsideroj eĉ ne havas ion specife sennacisman. Oni ja povas prezenti al si staton, en kiu la homoj fariĝis tiel saĝaj, pacemaj kaj bonkoraj, ke ĉiuj nacioj povus vivi unu apud la aliaj kiel amikaj najbaroj. Ekzistas tiaj patriotoj, kiuj ne deziras ataki alian nacion, sed volas nur defendi la sian.

Por teorie pravigi la sennacismon, necesas do trovi alian bazon ol justemon kaj pacemon. Sufiĉas tamen konsideri la aferojn el la mondo laŭ konkreta maniero. Fakte estas, ke ĉiuj nacioj pli malpli amasigas armilojn por laŭdire sin ŝirmi kontraŭ atakoj de aliaj kaj tio havos

kiel neeviteblan rezulton okazigi militojn. Aliparte, nacioj ekzistas multaj, kiuj ne havas sian sendependecon. En ĉi tiuj lastaj, homoj agitas kaj pretas batali por konkerti tiun nacian sendependecon. Politikaj partioj kaj laboristaj organizoj subtenas tiun agitadon. Ĉu tio estas utila kaj profita al la laboristoj el tiuj "subpremataj nacioj"? Jen la donitaĵoj de l'problemo. La sennaciistoj respondas, ke la **laboristoj** ne havas intereson partopreni batalojn por defendi sian nacion aŭ por akiri nacian sendependecon. Burgoj kaj intelektuloj ja havas en tio ian intereson, sed ĝi eĉ ne valoras vivoferon.

Miaopinie, tiuj konsideroj jam sufiĉas por pravigi la ekziston de sennaciisma tendenco. Sed pli grava ŝajnas al mi jeno : en la nuna stato de l'teknika malvolviĝo estas neeble solvi la sociajn problemojn laŭ naciaj kadroj. La laboristoj neniam sukcesos tute forigi la ekspluatadon, se ili daŭre konservas menson de naciisto. Kaj laŭ miaj observoj kaj konstatoj ĉiuj internaciistoj estas diversgrade naciistoj. Ekzemple, en Sovetio la ekzisto de la t.n. ruĝa armeo klarigas kaj iel pravigas la restarigon de klasoj kaj sekve novan formon de ekspluatado.

En nia **Manifesto** estas dirite, ke "fermitan sekton, apartigitan de la cetera laborista movado, la sennaciistoj ne celas formi" (pĝ. 31). Ni ne devas forgesi tion. Laŭ mi, sufiĉas, ke ni ĉiam metu la akcenton sur tiun punkton, nome, ke urĝe necesegas, ke ĉiel la naciisma, patriotisma religio estu vigle kaj senindulge kontraŭbatalata, por ke nia **tendenco** havu sian ekzistorajton kaj pravigu sin antaŭ la laborista movado.

Sed mi rimarkas, ke mia babilado malmulte rilatas al la enhavo de via letero. Prefere, mi do respondu al via demando : "... ĉu ne povos aperi sennaciistaj demagogoj?" Jes, certe, mi kredas, ke tiaj uloj povus sin ŝovi en nian movadon, se ĝi fariĝus amasa. Sed ne baldaŭ ĝi estos tia. La homaro verŝajne devos fari ankoraŭ multajn terurajn kaj sangoplenajn spertojn, antaŭ ol ekzistos favora grundo por la dissemo de niaj ideoj. Dume temas nur teni vivaj tiujn ideojn kaj tio estas ebla sole per diskonigado de ili al tiuj, kiuj kapablas ilin kompreni kaj akcepti.

Antaŭ ol fini, mi volas konfesi al vi, ke la ĝisnun eldonitaj n-roj de nia **Bulteno** malmulte entenis ion esence sennaciisman. Espereble la venontaj havos alian karakteron, se mi trovos la necesan tempon por redakti ilin laŭ mia plano.

Kara K-do, laŭ la enhavo de via letero, vi ŝajnas al mi pripensema kaj kritikema ; estu pro tio gratulata. Mi esperas, ke vi laŭpove helpos en tio, ke nia **Bulteno** akiru vere sennaciisman karakteron...

*

LETERO DUDEK-KVINA

Al K-do Laval, Parizo (1)

Parizo, 2-12-1935.

Koran dankon pro la komuniko de la letero el Minsk. Ĝin mi transkomunikas al IVON (2) kaj ni atendu lian respondon.

Mi gratulas al vi pro tio, ke vi ne volas "kredi" min. Vi devas ja proprarimede, proprasperte akiri ne kredon, sed **konvinkon**. Mi nur petas, ke vi ne dubu, ke neniu pli ol mi deziras, ke oni montru al mi mian eraron, se fakte mi eraras. Nenian intereson mi ja havas por kontraŭbatali la Stalinan regadon. Male! Mi klarigu : en la jaroj 1924-25 mi estis korespondanto por Siberia ĉiutaga gazeto. Mi verkis en esperanto kaj unu el la redaktoroj tradukis. Por ĉiu artikolo mi ricevis 6 dolarojn kaj oni kontante pagis al mi ĉe Pariza banko. Post eble 6-7-monata kunlaborado, la Redakcio sciigis al mi, ke miaj artikoloj ne multe plaĉas al la legantoj ; ne pro tio, ke ili ne estas interesaj, sed tial ke ŝajne mi ne opinias, ke la franca kapitalismo staras ĉe la rando de bankroto ; ankaŭ pro tio, ke mi ne raportis sufiĉe optimisme pri la "progresoj" de l'kompartio. Unuvorte, mi povus multe pli facile gajni miajn 6 dolarojn, simple kompilante el "L'Humanité"(3). Sed mi verkis originale kaj diris laŭ mia opinio. Mi do ĉesigis mian kunlaboradon. Intertempe,

(1) La kvar sinsekvaj leteroj havas specialan intereson en tio, ke ili montras la manieron, laŭ kiu Lanti akiris propran opinion pri Sovetiaj aferoj kaj ankaŭ la tre notindan fakton, ke li ne deziras, ke oni kreu liajn dirojn. Sed ke oni kontrolu kaj esploru mem por eltrovi la veron. Estas plie rimarkinda fakto, ke li preferis rezigni bone pagitan kunlaboradon al Sovetia ĵurnalo ol blufi kaj trompi ties legantojn. - (Kompil.)

(2) IVON estas amiko de Lanti, kiu vivis dum pli ol 10 jaroj en Sovetio kaj revenis en Francion en 1935 ; li konas la rusan lingvon kaj lia atesto pri sovetiaj aferoj estas tre valora.

(3) "La Homaro" : ĉiutaga ĵurnalo de la franca kompartio. - (Kompil.)

miaj duboj pri la regado en Sovetio pli kaj pli fortiĝis. Kiel pruvon vi bonvolu legi la kopion de letero, kiun mi komunikas al vi. Kaj ĉi-okaze vi certe rimarkos, ke Barbus (1) ne deziris koni la veron pri Sovetio, ĉar en sia respondo li tute ignoras mian proponon. De tiu tempo mi ekdubis pri la sincero de Barbus. Pri lia juĝkapablo, mi sciis pro lia volontuliĝo en la armeon en 1914!...

Ekzistas diferenco inter la bruna (Hitlera) faŝismo kaj la nigra (Musolinia). Ambaŭ diferencas ankaŭ rilate al la ruĝa (Stalina). Sed ili ĉiuj havas **komunajn trajtojn**. Kaj diru al mi : en kiu lando laboristoj bezonas pasporton por iri de urbo al urbo ? En kiu lando lokomotiv-kondukisto estas mortpafata pro akcidento ? Nur tiuj du neneigeblaj faktoj sufiĉas por ke oni povu konkludi, ke la sorto de simpla laboristo estas pli bona en Germanio kaj en Italio ol en Sovetio.

Se la laboristaro ne kapablas organizi la produktadon per **liberaj** sindikatoj kaj la distribuadon per **liberaj** kooperativoj, tio pruvus, ke ĝi ne estas matura por emancipiĝo kaj ĝi fariĝos sklavaro, servutularo de ŝtatkapitalismo. Ĉu tion ni volas ?

*

LETERO DUDEK-SESA

Al K-do Laval, Parizo

Parizo, 22-12-1935.

Mi resendas al vi la leterojn, kiujn vi bonvolis komuniki. Se mi jam delonge ne estus firme konvinkita, ke la PEK-afero (2) estas aranĝita por faciligi la taskon de l'cenzuro kaj meti esperanton ekskluzive en la servon de la Stalina politiko, tiuj leteroj preskaŭ sufiĉus por malfermi miajn okulojn...

Kiel vi povas konstati, la unua komunikita letero surhavas neniun subskribon. La dua estas manskribita J. RU, sed tre verŝajne ne estas la tuta nomo kaj eble eĉ estas ia fantazia nomo. Por mi estas klare, ke tiu "PEK-perantino" simple plenumas sian taskon kiel faras kutime pli

(1) Henri Barbusse, la fama franca verkisto, kiu estis la honora prezidanto de la unua SAT-Kongreso.

(2) Proleta Esperanta Korespondado. - (Kompil.)

malpli fervora oficisto. Eble ŝi ja traserĉis en "Izvestia", sed sen entuziasmo, sen ia vera deziro eltrovi la koncernan sciigon. Sekve mi opinias, ke ne estus trafe kulpigi nur unu personon, kiu fakte mem ne respondecas persone pri la fia tasko, kiun ŝi plenumas. Estas la tuta sistemo kiu estas kondamninda. Mi do decidus publikigi noton pri la afero en la 5-a n-ro de "Herezulo" kun la necesaj kaj kongruaj komentoj.

Ĉar mi havas la okazon skribi denove al vi, mi do demandu : ĉu ne ŝajnas al vi stranga la insista atentigo, ke en Minsk oni volas ricevi nur **komunistajn, ortodoksajn** gazetojn ?!

Se vi ankoraŭ ne akiris firman opinion pri la vera situacio en Sovetio, nu, vi povas ja provi ekscii ion per la PEK-artifikaĵo ; miaopinie vi perdos vian tempon, kaj afrankmonon. Sed tio estas via propra afero. En "Absolutismo" mi jam diris, kiel oni devas procedi por akiri neoficialajn informojn el Sovetio. Sed tiu procedo postulas multe da klopodoj, da pacienco kaj da prizorgemo.

Nu, ĉu almenaŭ vi ne jam opinias, ke la intereso de la esperanta movado entute postulas, ke ĝi ne estu metata serve al l'blufo kaj mensogo? Post kelkaj jaroj pluraj el tiuj, kiuj nun insultas miĝ estos komprenintaj, ke mi fakte estis prava. Almenaŭ mi povas obei nur mian konsciencon...

P.S. Jes, mi legis la artikolon de Ŝazof en "La Patrie Humaine". Mi havas la impreson, ke li bridis sian emon diri pli ol li fakte diras. Sed kio ĉagrenas min, tio estas la penso, ke homoj entuziasme klopodas por forĝi al si ĉenojn. Neniam pli granda minaco al la libero ekzistis en la mondo ol nun.

*

LETERO DUDEK-SEPA

Al K-do Laval, Parizo

Parizo, 5-1-1936.

Mi ĵus havis la viziton de IVON. Bonŝance li konservis ankoraŭ la n-ron de "Izvjestja" (1), en kiu aperis la kon-

(1) Bv. noti, ke neniu Sovetiano kuraĝus skribi al mi senpere. La leteroj, kiujn mi ricevas el Stalinio iafaĵe venas trans Svedion, Svision aŭ Nederlandon. Mi kutime komunikas ilin al Ivon por havi lian opinion kaj por ke li kontrolu la informojn. Li ja ricevas ĉiutage "La Pravda" kaj la "Izvjestja"...

cerna informo. Li lasis al mi la eltranĉaĵon kun la traduko kaj li tenos la tutan gazeton je la dispono de ĉiu ajn, kiu volus kontroli. Cetere tiu informo estas representita (en la rubriko **Gazetara revuo**) laŭ la gazeto "za Industrialization" (organo de la pezindustrio, mi kredas) de la 8-5-1935...

Vi mem "flaris", ke tiu via korespondanto, "poranima inĝeniero", mensogas. Sed eble vi ne scias, ke en la koncernaj institutoj, lernejoj, oni preparas tute cinike la arton mensogi, blufi kaj trompi.

Mi supozas, ke vi konsentos konigi al mi la nomon de la mensogulo kaj plie ke mi publikigu parton de la komunikita letero en "H-ulo", en raporteto pri la afero. Laŭ Ivon, la tuta letero el Minsk estas cinike verkita kun la intenco trompi kaj blufi.

Kara K-do, mi esperas, ke vi volos propraokule konvinkiĝi kaj ke vi faros, kion ordonas la konscienco por senmaskigi la mensogulon. Mi ne volas konfidi al la poŝto la eltranĉaĵon pro timo pri eventuala perdo. Eble vi havos la okazon viziti min...

LETERO DUDEK-OKA

Al K-do Laval, Parizo

Parizo, 2-2-1936.

Via letero ĝojigis min ĉe la konstato, ke fine viaj okuloj tute malfermiĝis pri la "PEK"-afero. Mi ne pretendas esti pli saĝa, pli klarvida ol aliaj, sed mi havis pli da okazoj observi, aŭdi, konstati ol multaj bonfidaj K-doĵ. Jam en la jaro 1928 mi aŭdis el la buŝo de Dre... mem ĉe nia Kongreso en Gotenburgo, vortojn kaj aludojn, kiuj igis min pripensi kaj observi. Kaj finfine, antaŭ 3 jaroj mi plene konvinkiĝis, ke PEK en Sovetio nur ludas rolon de helpado al G.P.U. Pripensu, ke okazis, ke eksterversovetiaj K-doĵ kaŭzis la enkarcerigon al siaj sovetiaj korespondantoj per tio, ke, ricevinte leterojn, kiuj diris la veron, tiuj K-doĵ opiniis, ke nur "kontraŭ-revoluciuloj" povas skribi tiajn leterojn. Ili komunikis al C.K. de S.E.U. tiujn skribaĵojn kaj neniam plu oni aŭdis de aŭ pri tiuj kompatindaj korespondantoj Sovetiaj. Kredu, ke mi preferas ricevi insultojn kaj esti bojkotata ol akcepti respondecon en tia hontinda entrepreno per mia silento. Pardonu, kara K-do, sed iafoje mia koro krevas...

*

LETERO DUDEK-NAŬA

Al K-do L.B., Patizo

Madrido, 3-7-1936.

... ..

Vi demandas, ĉu mi retrovis animekvilibron. Kara Amiko, ne! Mi eĉ ne esperas ĝin retrovi. Verdire, neniam en mia vivo mi ĝuis tian ekvilibron ; neniam mi sentis animtrankvilon kaj ĉiam sopiris al tio, kion mi ne posedas, al tio, kion mi ne konas ; unuvorte mi ĉiam estis... malsaĝa.

Kiam mi havis la gvidrespondecon pri SAT, tiam la laboro, la zorgoj, la bataloj forgesigis, aŭ almenaŭ bremsis mian animkirligon. Kvankam mia tiama laboro havigis al mi insultojn, kalumniojn ktp., tamen tiu tempo kredible estis la plej bona el mia vivo. SAT estas nia komuna ido kaj por ĝi mi portas en la koro patrecan senton. Vi kaj la aliaj K-doj estu certaj, ke mi ĉiam ĝojos kaj kontentos, kiam SAT prosperos kaj ĉagreniĝos ĉe ekscio de malprospero. Vi funde konvinkiĝu pri tio kaj konvinku la aliajn K-dojn pri neceso havi en la vivo indan taskon, al kiu oni donacu ĉion plej bonan, kion oni portas en si...

Sed eble vi preferus iom ekscii pri mia aventurema vagado. Nun ne eblas rakonti al vi detale pri tio. Eksciu tamen, ke en Barcelono estas tre lertaj poŝostelistoj. Unu ŝtelis la fontoplumon, kiun mi tenis en la ekstera poŝo de mia jaketo. Poste mi rimarkis, ke neniu portas videble fontoplumojn. Kaj K-do R. rakontis al mi, ke antaŭ du monatoj lia biciklo, staranta ĉe trotuaro, estis tuj forŝtelita, dum li turnis la dorson por eniri butikon.

Kia kontrasto kun tio, kion mi vidis en Skandinavio, kie bicikloj staras ekstere kaj ne observite dum horoj, eĉ dum tuta tago!...

Kiel vi povis legi en francaj ĵurnaloj, en Hispanio multaj preĝejoj estas bruligitaj. El tiaj mi vidis sole unu ĝis nun en Madrido kaj ĝi estas nur parte detruita. Tia vidaĵo kaŭzis ĉe mi amarajn pensojn. Mi estas konvinkita, ke la menso de ties bruligintoj ne estas liberigita je dogmaj superstiĉoj. Kaj la rezulto de tia detruado verŝajne estos, ke la religiuloj kaj reakciuloj emos revenĝi al la t.n. revoluciuloj. Nur kiam homo kapablas rilati al preĝejo kun la sama sento, laŭ kiu li rilatas al megalitoj aŭ al la Egiptiaj piramidoj, nur tiam li povas pretendi

esti tute liberigita je religiaj superstiĉoj.

Estas okulfrape, ke la lando bolas febre : ĉie oni renkontas armitajn virojn kaj eĉ en la trajnoj deĵoras ĝendarmoj kun pafiloj. Eble Hispanio baldaŭ mirigos la mondon per siaj... frenezaĵoj. Mi ja ne kredas, ke eblas ĉi tie pli bone ol en Sovetio starigi socialisman reĝimon. Cetere la kapitalistaj landoj ne tolerus tion. Sendube vi pensos, ke mi estas tre pesimista. Eble, eble... Mi deziras, ke la optimistoj estu pravaj...

Mi ne laciĝos ripeti, ke la laboristaro ne povas emancipiĝi laŭ nacia skalo ; ke la homaro neniam akiros pacon, tiom longe, kiom la granda plimulto da individuoj restos naciemaj kaj absolutemaj.

*

LETERO TRIDEKA

Al Parizaj Gek-doj

Lisbono, 11-7-1936.

... ..
Ĝoje mi notas, ke vi estas forte konvinkitaj, ke nur ni, SAT-anoj, povas efike kontraŭbatali la naciismon. Bedaŭrinde kelkaj teruraj, sangoplenaj spertoj okazos, antaŭ ol la laborista klaso estas kapabla kompreni, ke la lernado de esperanto estas nepre necesa, ke ĝi estas la unua devo de ĉiu homo, kiu celkonscie kaj sincere agadas por starigi pacon kaj juston en la mondo...

Ĉi tie preskaŭ ĉiuj francaj ĵurnaloj estas haveblaj. En "Je Suis Partout"(1) mi legis favoran raporton pri la nova partio de Dorjo(2). Ekzistas ŝancoj, por ke en Francio ankaŭ malvolviĝu faŝisma movado. Dorjo lernis ĉe la bolŝevistoj la demagogiajn procedojn, per kiuj eblas logi kaj entuziasmigi popolamasojn. Mi tute ne kredas, ke Blum sukcesos atingi ion pozitivan, rilate al la situacio en Francio ; male mi antaŭvidas konfuzon, egan kaŭson. Social-demokratoj ankaŭ regis en Germanio antaŭ la venko de Hitler. Kaj tio memorigas min, ke Blum iam skribis en iu artikolo el "Le Popu"(3), ke la "Hitlera dan-

(1) **Mi estas Ĉie**, semajna, faŝistema, grandformata ĵurnalo, aperanta en Parizo. (Kompil.)

(2) France : Doriot. Eks-kompartiano, kiu celas imiti al Musolini kaj Hitler. Lanti konatiĝis kun li en Moskvo. - Vd. pĝ.16-17 en "Vortoj de Kdo Lanti". (Kompil.) (3) Mallongigo por "Le Populaire", oficiala ĉiutaga organo de l'franca Socialista Partio. (Kompil.)

ĝero jam forpasis". Tio pruvas, ke la antaŭvido kaj juĝkapablo de la nuna idolo de l'popolfrontanoj ne estas senmankaj...

Rilate al la akcelo de la historia procezo, la alianciĝo de Francio kun Germanio estus pli efika ol tiu kun Sovetio. Nun la situacio estas preskaŭ simila al tiu, ekzistanta en 1912-14. Tiam temis en Francio kontraŭbatali la germanan imperiismon, kaj tiucele la francoj konsentis aliancon kun la cara Rusio. Nuntempe la agitfrazo estas kontraŭbatali la faŝismon kaj por tion fari oni interligiĝas kun la ruĝa faŝismo Sovetia!... Nur la vortoj estas ŝanĝitaj.

Vi konas mian simpation por la germana popolo - ne kun ĝiaj registoj - kaj sendube vi memoras, ke post la eksplodo de l'milito mi defendis la tezon, ke la venko de Germanio estus la malpleja malbono. Mia opinio ne aliĝis : se tiu potenco estus venkinta, Ĉekoslovakio, Bulgario, Jugoslavio, Belgio k.a. ŝtatetoj verŝajne malaperus kaj nun ekzistus malpli da ĝerموj por konfliktoj. Sed Francio ne plu estus "granda potenco" ; ĝi fariĝus dua- triaranga. Kaj tian penson eĉ toleri ne povas patrioto.

La milito ŝajnas al mi neevitebla ; ĝi estas nur prokrastebla. Ni do povas nur esperi, ke malgraŭ ĉio la esperanta movado ne tute detruigĝos. Ni devas prizorgi kaj flegi ĝin, kiel oni faras al juna, malforta estaĵo.

... ..

Atendis min **Poste Restante** letero de **Japana Esperanto-Instituto**, per kiu mi estas informita, ke ĝi ne povas preni sur sin la respondecon fari oficialajn klopodojn por faciligi mian akcepton en Japanio. Ĝentile oni klarigas, ke tio povus endanĝerigi la ekziston de la Instituto, okaze se en miaj estontaj diroj aŭ faroj mi ne rilatus favore al Japanio. Se mi sukcesos surlandiĝi, mi do tie devos esti kvazaŭ muta. Nu, mi vidos...

Ĉi tieaj Kdoj ankaŭ konsilis, ke dum mia ĉeestado mi ne publikigu ion tro malfavoran al Portugalio, por ne riski forpelon. Al vi mi povas almenaŭ diri, ke nenie mi vidis tiom da almozpetantoj kaj ĉifone vestitaj homoj kiel ĉi tie. Kiam oni sidas sur iu publika loko, tiam aro da knaboj aŭ junuloj sieĝas onin kaj proponas purigi kaj ciri onies ŝuojn. En Hispanio kaj Portugalio la ŝupurigado estas preskaŭ industrio. Ie ajn vi povas dungi ŝupurigiston. Kaj en barbiraj butikoj mi vidis virojn, kies kapo, manoj

kaj piedoj estis **samtempe** prizorgataj : barbiro razis aŭ tondis ; virino prizorgis la ungojn de l'manoj kaj viro purigis la ŝuojn...

Dudek kilometrojn for de Lisbono estas rave bela loko, nomita Sintra. Kvankam tie la vivkostoj estas pli altaj ol en Lisbono, tamen mi baldaŭ iros tien por pasigi kvin aŭ ses semajnojn...

... ..

*

LETERO TRIDEK-UNUA

Al Gek-doj Robert, Manĉestro

Sintra (1), 23-8-1936.

Pere de K-do B. mi estas informita, ke vi konsentas preni sur vin la prizorgon super la **Sennaciista Frakcio** anstataŭe de K-do Bubo, kiu devas ial forlasi tiun taskon. Ĉar mi iniciatis la starigon de tiu organizeto kaj ĉiam estis en pli malpli intima kontakto kun la sinsekvaj prizorgintoj ; ĉar antaŭ du jaroj mi metis "Herezulo"n dispone al la Frakcio, tial mi opinias utile skribi al vi. Unue por gratuli vin pro via fervoro por nia afero ; due por koncize sciigi, kia nun estas la stato de nia entrepreno.

Pro tio, ke mi fariĝis senhejma vagulo, sen fiksa adreso, ne plu eblas en tiaj kondiĉoj certigi regulan aperon de "H-ulo". Krome, la nombro da abonantoj pagis nur 2 n-rojn de la revueto kaj sekve la 2 aliajn mi devis pagi el mia propra poŝo kaj per la helpo de kelkaj subtenantoj. Sed nun mia emerita salajro ne plu permesas, ke mi tiom oferu kiom antaŭe kaj tio estas la ĉefa kaŭzo, pro kiu la revueto ne plu aperos proksiman jaron. La kontakto kun la Frakcianoj povos okazi nur per Bulteno, kiel estis antaŭ la apero de "H-ulo". Ĉar vi akceptis prizorgi la frakciajn aferojn, mi do supozas, ke vi povos aperigi tian multobligotan organon. Ĝia enhavo rilatu al la interna vivo de l'Frakcio kaj pritraktu nur demandojn, kiuj, pro la ĝenerala spiritostato de SAT-anoj, ne povas nun esti diskutataj en la SAT-organoj.

La sennaciismo ne estas pravigebla je pure marksista vidpunkto, ĉar ni neas, ke la ekonomiaj faktoroj ludas la

(1) Portugalio. - (Kompil.)

plej gravan rolon en la historia procezo. Ni opinias, ke la ekonomio **kondiĉas**, sed ne kaŭzas la ŝanĝojn en la socio. Sufiĉus tamen formeti marksistajn okulvitrojn por vidi, ke nuntempe malgraŭ tio, ke la ekonomio postulas liberan cirkuladon de l'varoj tra la mondo, tamen ĉie plialtiĝas kaj dikiĝas la limaj baroj inter la nacioj. La nacieca ideologio estas do pli forta ol la ekonomio mem. Kaj malgraŭ tiu okulfrapa fakto oni bedaŭrinde konstatas, ke neniu politika organizo prenis sur sin la taskon elradikigi la naciecon. Male, ni vidas, ke ĉiuj politikaj partioj konkuras inter si favore al la patriotismo. La sukcesoj de l'franca kompartio en la lastaj balotoj rezultas ĉefe de tio, ke ĝi faris ŝovinistan agitadon. Se neniu granda organizo difinis al si kiel taskon detruiri la ĝermojn de nacieco, estas certe pro tio, ke ĉiuj malatentis la lingvan demandon. Sed estas nepardonebla peko, ke ankaŭ esperantistoj konduku kiel internaciistoj. Tial, la **konsciaj** sennaciistoj devas senkompromise ataki la naciismon, kuraĝe kontraŭbataladi la monstron...

... ..
 K-do B. raportis al mi pri vi tre simpatie kaj diris sian konvinkon, ke vi bone plenumos la taskon, kiun vi konsentis akcepti. Vi estas junaj kaj havas estonton antaŭ vi. Se vi permesos, mi diros la sperton de blankbarbulo. Nun kiam mi vagas preskaŭ sencele, puŝata de la nostalgio al nekonataĵo, mi konstatas, ke la plej belaj tagoj el mia vivo estis tiuj, dum kiuj enlitiĝinte mi ekdormis kun la konscio, ke mi faris ion pozitivan, bonan, indan. Estis la tempo, kiam korpe kaj anime mi dediĉis min tute al SAT. Vi scias, kia estis la rekompenco: kritikoj malsinceraj, insultoj kaj kalumnioj. Sed tio ne malhelpas, ke nun mi tre klare konscias, ke miaj tagoj la plej enhavaj estas tiuj, kiujn mi dediĉis al SAT. Vi eble demandos: "Kial do vi rezignis la gvidadon?" Nu, tial ke mi nenial volus, ke mia personeco estu baro, ĝeno al la rekuniĝo de la disigitaj fortoj kaj ankaŭ pro tio, ke aliaj K-doĵ devas senti sur siaj ŝultroj la pezon de gvida respondeco. **Movado, kia ajn, ne devas dependi nur de ĝia iniciatinto; movado devas celi al tio, ke neniu el siaj anoj estus nepre bezona; movado, kiel junulo, devas emancipiĝi de kuratoroj...**

*

Al Parizaj Geb-doj

Surŝipe de Marsejlo al Port-Said, oktobre 1936.

Miaopinie la P.K.(1) ne devas subskribi iun ajn deklaron, alvokon k.s., kiuj havas politikan karakteron. Mi ne komprenas, ke SAT-ano povas pri tio ŝanceliĝi. Tio ne signifas, ke la P.K. ne devas okaze publikigi alvokojn, deklarojn ktp. en la SAT-organoj. Sed tia publikigo ne signifas, ke la P.K. aprobas aŭ malaprobas ties enhavon. La respondecaj gvidantoj simple demandu sin : ĉu tiu organizo havas la karakteron de tiuj, al kiuj SAT laŭstatute devas helpi. Tamen, kiel apartaj individuoj, la P.K.-anoj rajtas en sia propra nomo havi politikan opinion kaj eldiri ĝin publike.

Vi certe komprenas, ke mi aludas al la "aperta" letero, kies tekston vi komunikis al mi. Kaj pri la enhavo de la letero mem mi diru tute malkaŝe, tamen konfidence, ke mi havas nek simpatian, malpli admiran por Zinovjev kaj K-io : ĉiuj el ili estas mense pli malpli el la speco de Stalin ; ili aplikus la samajn procedojn al ĉi tiu lasta, se ili gajnus en la fia ludo politika. Stalin estas malaminda, sed iel oni povas admiri lin pro lia lerto en la ludaĉo. Trocki kaj ceteruloj perdis, sed ĉiuj kun malpli da majstr-eco ludis la saman ludon ; por ili temas pri **proporcio** de fortoj ; moralo en la homaj rilatoj estas "burga antaŭjuĝo". Lenin mem kulpas, kiu rekomendis la **ĉiurimedcon**. Mi tre hontas, ke iam mi apartenis la bolŝevistan partion. Sed, fakte, mi ne konis ĝin. La legado de "Stalin" de Boris Suvarin instruis min kaj nun mi komprenas pli bone kelkajn aferojn, kiuj antaŭe ne estis al mi klaraj.

Mi ja ricevis siatempe ekstrakton el "The M.G."(2). Kun granda intereso mi legis ĝin kaj okaze transsendos al korespondanto. Kompreneble mi ĝojas konstati, ke iom post iom tio, kio estas al mi sunklara jam de du-tri jaroj, aperas tia ankaŭ al aliaj personoj. Mi ŝatus ekscii la nunan opinion de Kiam li sendis sian abonon por "Herzulo", li skribis proksimume jenon : "Mi abonas, tial ke via opinio estas neniel malatentinda, sed mi devas averti vin, ke vian vidpunkton mi malaprobas..."

Kio ne estas al mi klara nun estas ĉi tio ; mia hodiaŭa firma opinio, bazita sur observado de faktoj naskiĝis intuicie, okaze de mia vizito en Sovetio. Vi scias, ke jam

(1) Plenum-Komitato. - (Kompil.)

(2) "The Manchester Guardian". - (Kompil.)

en tiu epoko mi estis kritikata de pluraj K-joj (i.a. Revo) pro tio, ke mi raportis pesimiste pri Sovetio. Tamen mi ne diris tute malkaŝe, kion mi sentis ; tiam mi ne povus argumenti kiel hodiaŭ, menciante faktojn ; tamen mi jam estis tute konvinkita, ke la Oktobra Revolucio fiaskos. Jes ja, tiu konstato en la analizo super mia intelekto starigas filozofian problemon, kiun mi ne kapablas solvi. Eble neniu kapablas... Racio? Intuicio?...

...Jes, mi memoras pri la "malsimpatia ulo". Sed li parolas same malsaĝe, kiel antaŭ jaroj, kiam li diras, ke oni devas "faligi" la tiranon el la Kremlo, por liberigi la sovetian popolon. La problemo ne estas tiel simpla. Mi jam diris komence, ke la viktimoj, kiel Zinoviĉev k.c., tute parencis mense al Stalin... Ĉio en la revolucia movado estas rekonstruenda ĉe la bazo mem ; novajn vojojn oni devas ek trovi kaj sekvi. Tion mi nun diras ankoraŭ intuicie ; necesus dika volumo por racie surbazigi mian konvinkon. Mi memoras tamen, ke en la konkludo de mia raporto pri Sovetio, publikigita antaŭ 14 jaroj, mi diris, ke por ordigi kaj savi la homaron, du aferoj ŝajnas al mi alcelendaj : internacia mono kaj internacia lingvo. Hodiaŭ mi uzus la terminon **sennacieca**. La liberala kapitalismo kvazaŭ kolapsas ; tio estas fakto, sed la socio ne povas tamen trovi resaniĝon en burokrata ŝtatsocialismo, aŭ ŝtatkapitalismo. Oni devas trovi socisistemon, kiu ebligus individuan iniciativon, ĝuadon de la planedaj riĉaĵoj kaj kiu tamen malebligus la ekspluatadon de homo super alia homo.

Mi skribas ĉi tion, kiam la "Tigre" preterveturas Korsikon. La ĉielo estas nube kovrita kaj ankaŭ kelkaj montoj de la insulo estas kronitaj per nuboj. Ĉe la vido al tiu sovaĝa mondparteto, en la cerbon venas la nomo Napoleono. Kaj mi ne povas forteni min de la penso, ke estas bedaŭrinde, ke li fiaskis en la entrepreno unuigi Eŭropon. Tamen ĝi devas unuigi. La internacia laborista movado estas nur embrio sen ia efika vivo. Kiu unuigos Eŭropon? Ne estas Britio, kies politiko daŭre klopodas male malhelpi tian unuigon kaj eĉ ne volas toleri, ke iu ajn nacio sur la kontinento havu hegemonion. Se oni priatentas la fakton, ke Germanio, kun 75-miliona popolo en la centro de Eŭropo, kun sia organiz-kapablo, kun sia altgrade malvolviginta tekniko, reakiris grandan militan potencon, ŝajnas al mi, ke estus tute reakcie kontraŭstari al eventuala provo unuigi Eŭropon fare de Germanio.

Ĉu vi legis atente la paroladon de Hitler en Nuremberg ? Estas en ĝi tre atentindaj diroj ; ekzemple, pri la malapero de la 16 "Landtags", de la 16 naciaj flagoj, de la 16 tradicioj ktp. Fakte necesis la alveno de Hitler por finunuigi Germanion. Je tiu vidpunkto Hitler agas en la direkto de la historia procezo, dum la bolŝevistoj kun sia agitado por la sendependeco de Korsiko, Bretonio ktp. ludas reakcian rolon.

La fakto, ke Hitler devigas elementojn el ĉiuj klasoj kunvivi kaj **manlabori** en la t.n. laborkampoj helpas al forigo de l'kasteca menso, kiu karakterizis la oficiraron kaj junkraron... Kial mi faras tiajn rimarkojn? Ne kredu, ke estas pro simpatio al la **naciisto** Hitler. Ne! Sed mi volas prijuĝi aferojn laŭ konkreta maniero. Kaj la faktoj estas jenaj : En Sovetio regas ruĝa faŝismo ; en Germanio, bruna ; en Italio, nigra... Nu, ĉu iun ni subtenu prefere aliu ?...

Mi facile komprenas, ke Sid... post la sperto, kiun li antaŭnelonge faris, tamen kuraĝas skribi al mi kaj deziras denove interrili per esp-o. Tia fidelo al nia lingvo memorigas min pri iu diro de Demidjuk ĉe la kongreso en Lajpzig. Vi scias, ke li mem devis kritiki mian gvidadon, sed ne faris tion tiel forte kiel Drezen. Post la batalo kaj ilia malvenko mi havis la okazon interparoli duope, intime kun Demidjuk. Mi diris al li mian miron, ke ili fariĝis konsentemaj ĉe la fino de l'kongreso kaj responde li diris kun tono, kiu impresis min : "Nu, vian politikan linion **ni devas** ja kontraŭbatali ; sed ni ne povas fari tion tre akre, tial ke en la fundo de nia koro ni estas unue esp-istoj"... Eĉ Drezen... Mi sentis, ke Demidjuk parolis sincere kaj pli poste mi komprenis pli bone ol antaŭe la signifon de tio, kion esprimis Zamenhof per sia "interna ideo". Kiam oni konas la situacion en Sovetio, oni povas esti indulga eĉ al Drezen. Kompreneble mi ne admiras liajn farojn, nek tiujn de Demidjuk, Nekrasov k.c. Mi admiras Krijukov(1), kiu kuraĝis... silenti. Sed la eksterversovetiaj bolŝevistoj povus agi iom honeste, eĉ ne havante animon de heroo. La sinteno de iaj Kibl, Bubu, Ĵanere (neniam forgesu, ke tiu ĉi lasta fotis dokumenton, kiun mi metis dispone al la Kontrol-Komitato, kaj sendis

(1) Sed pri la sorto de tiu kuraĝa K-do neniu povis ĝis nun ekscii, ĉu li estas en malliberejo aŭ mortpafita.

la foton al Moskvo ; ne forgesu - neniam -, ke li kaj Berĵje subskribis prihonoran deklaron, ke ili traktos plej konfidence la dokumentojn, kiujn ni liveris al ili) k.c. estis vere fia, tial ke ili ne bezonis timi kiel niaj kompatindaj K-doj el Sovetio.

Tre grava estas la informo pri U.E.A. Fakte la verko de Hodler estas detruita... Kaj SAT devus fariĝi la natura heredanto de la Hodleraĵo. Mi kredas, ke estas eble kun iom da takto kaj persisto varbi al SAT inter la malnovaj U.E.A.-anoj. Komprenoble tiuj, kiuj ludis elstaran rolon, ne aliĝos, tial ke ili ne estas sufiĉe modestaj por resti simplaj anoj en SAT dum kelkaj jaroj... U.E.A. pereis pro fuŝgvidado kaj ambiciero de uloj. Ĝia starpunkto ankaŭ ne estis tute ekvilibra ; ne eblis akordigi la Zamenhofan esp-ismom kun plena neŭtralo. Se Hodler vivus, eble li SAT-anigus !

La raporto de Atli en "L'Oeuvre" estas senvalora. Mi atentigas vin pri la nefidinda enhavo de tiu ĵurnalo ; nur Lafuŝardjer (La Fouchardière, - Komp.) eldiras ion saĝan en tiu gazetaĉo.

En "La Révolution Proletarienne" Luzon daŭre baraktas en kontraŭdiroj, kiam temas pri naciismo, imperiismo k.s. Ekzemple, parolante pri Etiopio, li diras, ke eĉ militajn sankciojn oni devus apliki al Italio. Nu, bone, sed kial kritiki registaron, kiu pligrandigas militbuĝeton?

Entute sur la ŝipo estas 9 pasaĝeroj. Ni ĉiuj manĝas en la sama ĉambro kun la kapitano. Nur mi iras ĝis Japanio ; la aliaj pasaĝeroj elŝipiĝas en Singapuro. Mi gratulas al mi, ke mi elektis tian varoŝipon ; estas nur unu klaso kaj mi havas fakte ĉambron, ne kajuton. Plie, la ŝipo haltas pli longe en havenoj, ol faras pasaĝerŝipoj kaj tio ebligas al mi viziti urbojn survoje. La manĝaĵo estas laŭ la skandinava maniero, abunda kaj sufiĉe bongusta. Kvankam tiu kompanio estas norvega, tamen la ŝipo estis konstruita en Francio ĉe la konstruejo "Normandie" kaj nur per la angla lingvo mi povas iomete interkompreniĝi kun norvegaj maristoj!...

*

LETERO TRIDEK-TRIA

Al K-do L.B., Parizo

Surŝipe inter Hongkong kaj Ŝanghai, 16-11-1936

Ne ĉio okazis, kiel dezirite kaj aranĝite. Kiam ni forlasis Singapuron, tiam mi havis la esperon, ke la ŝipo haltos 2-3 tagojn en Hongkong, kiel antaŭe diris al mi la kapitano. Fakte, mi alvenis vespere kaj foriris matene, la postan tagon, tiel ke mi kompreneble trovis ferma la poŝtejon. Eble vi sendis tien poŝtaĵojn kaj mi malĝojiĝas pro seniĝo de ĉiuj ligiloj kun miaj geamikoj. Tamen mi havis agrablan sperton : la unuan fojon depost mia forveturo el Lisbono mi havis la okazon paroli esperante. Vizitis min japana kaj ĉina esperantistoj. Ili venis al la ŝipo kaj poste ni iris kune promeni en la urbo. La ĉino parolas flue kun angla akcento ; la japano nur balbutis, kvankam li eklernis esp-on antaŭ kvin jaroj. Sed li neniam havis la okazon interparoli kun eksterlandano, pli ĝuste, kun eŭropano.

Mi tute ne scias, kiu estas la filozofi-politika opinio de tiu homo, sed mi certigas vin, ke neniam antaŭe mi estis tiel kortuŝata per la elmonro de samideaneco, de amikeco, kiel okazis kun tiu esperanta balbutanto japana. Mi sentis, ke li preskaŭ fizike suferas ĉe la konstato, ke li ne povas, kiel li deziregis, diri al mi afablaĵojn. Ĉe la disiĝo je la 1-a en la nokto, li mem prenis al mi la manon kaj plurfoje, longete premis ĝin. Li diris, ke granda estas lia bedaŭro, ke mi ne restos almenaŭ tagon en Hongkong; se male okazus, li volus, ke mi vizitu lian hejmon kaj konatiĝu kun liaj edzino kaj du infanoj. Aŭdante tion mi estis tre surprizita, tial ke mi taksis lian aĝon je 17-18 jaroj. Verdire li aspektis kiel knabego ; li estas tiel malaltkreska, ke apud li mi aspektis kiel altkreskulo.

Mi diris mian miron, ke li propr-iniciative premis al mi la manon, ĉar mi kredis, laŭ diversaj informoj, ke tiu kutimo ne ekzistas en Japanio ; insiste mi klarigis, ke mi mem ne volus aletendi la manon, tial ke nenial mi celas trudi okcidentajn kutimojn. Sed mia interparolanto klarigis, ke la "novaj" (t.e. novspiritaj) japanoj emas alpreni tiun kutimon.

De post Hongkong mi estas la sola pasaĝero sur la ŝipo ; de post Singapuro, la sola loĝanto en la granda kajuto. En la manĝo-ĉambro mi renkontiĝas sole kun la

kapitano kaj mi ne povas multe babili pro mia nura balbutado en la angla lingvo. Mi povas preskaŭ flue legi, sed formi mem frazojn kaj ĝuste elparoli, tio estas tute alia afero. En tiu lingvo la vortoj havas ĝenerale tiom da signifoj, ke oni vere konfuziĝas. Ekzemple, vi certe miro, eksciante, ke "barrow" signifas puŝveturileto (brouette), teramaso, porkviro ktp. (Ne aludu pri tio kun nia bona K-do Barrow!)

De Singapuro al Hongkongo la maro estis... malica; ondoj ofte surakvigis la ferdekon kaj en la ĉambro estis preskaŭ neeble sidi kaj skribi. Cetere mi ne sentis min bone en sida pozicio; sed kiam mi sterniĝis sur la lito aŭ kanapo la vomemo baldaŭ ĉesis. Ĝis nun mi vere ne havis marmalsanon. Kredeble mi kutimiĝis al la balanciĝado inter Lisbono kaj Singapuro. En Hongkongo la temperaturo estas jam ne tro alta kaj nun survoje al Ŝanghai pli kaj pli ĝi malaltiĝas.

En Hongkongo mi ne povis dum la nokto aĉeti anglan ĵurnalon, tial mi nun scias absolute nenion pri okazoj en la mondo. Nu, verdire, tio fariĝas al mi ofte indifera. Mi tute ne enuas, kiam mi povas marŝadi sur la ferdeko aŭ sidi sole en mia kajuto. La fakto, ke mi vivas kvazaŭ mutulo ne tre ĝenas min. En Parizo ankaŭ mi ofte ne multe pli parolis kun K-dino Limuzin ol nun kun la ĉi-tiea kapitano. Sed konstante mi silente parolas kun mi mem - kaj ne ĉiam interkonsentaj estas miaj mutaj diroj.

Almenaŭ neniam mi sentis mian spiriton pli libera je teorioj kaj kredoj ol nun. Mi volas rigardi, observi kaj studi ĉion sen ia ajn antaŭjuĝo. La mondhistorio tute ne malvolviĝas laŭ niaj deziroj, laŭ bele argumentitaj sistemoj, kiuj pli malpli lamas, tial ke senkonscie la aŭtoroj atentigas ĉefe la faktojn, kiuj apogas ilian vidpunkton.

*

LETERO TRIDEK-KVARA

Al K-do L.B., Parizo

Tokio, 14-1-1937.

... ..

Vian leteron de l'17-a de decembro mi ricevis jam de kvin tagoj. Kiel vi scias, kutime mi tuj respondas. Kun plezuro mi ja preparolas kun vi aferojn, pri kiuj ni daŭre havas komunan intereson. Kaj tamen ĉi-foje mi prokrastis, tial ke nun mankas al mi la emo, la energio, eĉ la kapablo por ordigi tion, kio nur fantomas en mia cerbo.

Vi jam scias, ke mi estas kvazaŭ en **kvaranteno**. Sed tiu stato verŝajne daŭros pli ol kvardek tagojn. Se mi konus la japanan lingvon, pli facile mi elportus mian izolon. Sed prezentu al vi, ke ne eblas eĉ ekkoni la nomon de la stratoj, de la placoj ktp. Por orientiĝi tra la urbego - Tokio estas pli granda ol Parizo - mi unue sekvis la relojn de l'tramveturiloj. Mi rimarkis, ke kelkaj, ne ĉiuj, surhavas numeron per latinaj ciferoj. Mi do notis la numeron de l'tramoj, kiuj preteris mian hotelon aŭ alvenas ne tre malproksime de ĝi. Iom post iom mi riskis veturi trame laŭ relative longa distanco. Sed dufoje jam okazis, ke mia esplorejo kondukis min for de l'konataj tramvojoj kaj tiam mi devis uzi aŭtomobilon por reveni al mia loĝejo. Nun mi almenaŭ scias, kie staras la ĉefa stacidomo, la ĉefa poŝtoŝtacio, la palaco de l'mikado, kelkaj grandaj bankoj kaj magazenoj ktp. Mi konas vojojn por iri piede el mia hotelo al la "Ginza", kiu estas strato iom simila al la "Grands Boulevards" en Parizo, en tiu senco, ke en ĝi svarmas promenantoj kaj gapantoj. Kompreneble mi mem estas unu el ĉi tiuj lastaj. La "Ginza" tamen ne estas komparinda kun la Grandaj Bulvaroj parizaj, sed ĝi estas por mi multe pli interesa. La Tokia popolamaso formas bildon pli pitoreskan ol la Pariza. Precipe la virinoj kun siaj kolorriĉaj vestaĵoj konsistigas ĉarman kaj nepriskribeblan vidaĵon. Kaj la fakto, ke okcidentaĵoj kaj orientaĵoj intermiksiĝas senplane kaj senkollizie, kreas vere apartan kaj ĝuindan atmosferon: Sed ĉe ĉiu paŝo mi staras antaŭ nekompreneblaĵo kaj tiam amare malbenas la multlingvecon, kiu pli ol io ajn alia fremdigas la homojn inter si.

Mi jam rakontis al vi en iu antaŭa letero, ke en Joko-

hama la cenzuro forprenis de mi la libron de Upton Close : "Le Danger Japonais"(1), kiun vi mem aĉetis por mi en Parizo. Sed en Lisbono mi aĉetis du aliajn librojn, kiuj estis ĵus aperintaj kaj kiuj raportas pri Japanio. Nu, ironio de l'sorto! la forprenita libro ĝenerale raportas tute simpatie kaj kompetente pri la lando kaj popolo, dum la du aliaj raportas malsimpatie, supraĵe kaj eĉ laŭ kelkaj rilatoj erare. Tion mi jam povis konstati. Upton Close vivis en Japanio pli ol 10 jarojn, dum la du aliaj aŭtoroj pasigis tie nur kelkajn monatojn. Kial do la stulta cenzuristo konfiskis ĝuste la plej valoran kaj objektive verkitan libron? Vane oni cerbumus pri tio. Eble pro la titolo, kiu cetere estas dubesenca : **La Japana Danĝero**. Tamen la aŭtoro celas nur pruvi, ke la industriigo de Japanio endanĝerigas la pozicion de Usono kaj Eŭropo sur la mondmerkato. Sed eble la kaŭzo de l'konfisko estis nur ke la titolo estas ruĝe presita...

Mi mencias tion, por ke vi komprenu, ke estas al mi malagrabla pensi, ke mia situacio ĉi tie, rilate al la polico, dependas eble de hazardo, de humoro, de bon- aŭ malbona funkciado de ies stomako. Mi estas tro maljuna por volontuliĝi en la japanan armeon kaj tiel pruvi mian lojalon al la mikado!... Nu, kion fari?...

"Bunka"(2) staras nur kelke da paŝoj for de l'sidejo de J.E.I.(3). Mi esperis havi la oportunon viziti la Instituton kaj tie legi la esperantan gazeton. Tion mi ja faris dum la unuaj tagoj. Sed post la esplorado de l'polico, pri kiu mi jam rakontis al vi, la atmosfero aliĝis kaj mi ne plu kuraĝus eniri kaj sidi. Sed mi ne povas neniigi la fakton, ke mi donis mian adreson ĉe J.E.I. al multaj korespondantoj. Du monatoj estas almenaŭ necesaj por ke mi povu senpere ricevi poŝtaĵojn. Ĉiutage mi iras matene al la sidejo de J.E.I. En tiu tempo deĵoras fraŭlino, kiu ne scipovas paroli en esperanto. Ŝi donas al mi la ricevitaĵojn aŭ nee movas la kapon, se nenio venis. Espereble la cenzuristoj bone komprenos, ke J.E.I. havas nenian respondecon en miaj eventualaj "malbonfaroj". Sro Mijake, unu el ties oficistoj, kun kiu mi skribis rilate antaŭ mia alveno, agis nur "samideanece", konsentante, ke mi uzu la adreson de la Instituto kaj sekve ĝi nenial respondecas pri kvalito, speco aŭ enhavo de la

(1) La Japana Danĝero. (Kompil.)

(2) Nomo de la hotelo, kie loĝis Lanti. (Kompil.)

(3) Japana Esperanto-Instituto. (Kompil.)

poŝtaĵoj, al mi senditaj. Mi esperas, ke miaj korespondantoj ankaŭ bone komprenos, ke necesas forviŝi la "makuilon" de mia kariero, nome, ke iam mi estis kompartiano kaj SAT-ano. Unuvorte, Lanti mortis kaj de nun vivas nur la emerito Adam.

Sed en miaj deklaroj al la polico mi akcentis, ke mi daŭre restas fervora esperantisto, kore kaj anime ligita al tiu movado. Espereble la kompetenta instanco bone komprenos, ke mi deziras esti informata pri ĉio, kio okazas en Esperantio. La problemo por vi estas dozi la pilolojn per konvena proporcio da ortodoksaĵoj kaj herezaĵoj...

... ..

Malgraŭ ĉio ne kredu, ke mi bedaŭras mian foriron el Francio, el Parizo. Ne! Estis por mi vere tre malagrabla sento konstati, ke en la urbo, kie dum multaj jaroj mi dediĉis min tute al la laborista esperanta movado, mi eĉ ne plu povis viziti la kunvenojn de l'Grupo, tial ke tie la atmosfero estis al mi vere tro malvarma. Nu, ĉi tie ankaŭ mi ne povas viziti kunvenojn kaj eĉ esperantistoj forkuras de mi, kvazaŭ mi estus pestulo!...

Kelkfoje mi pensas pri la frazo de Ibsen en lia teatraĵo "La Malamiko de l'Popolo". La heroo deziras la feliĉon de l'popolo, sed li herezas kaj pro tio estas konsiderata kiel malamiko. Kiel konsolon li diras al si : "La fortulo, ĝi estas la solulo". Nu, kompreneble ĉiu ajn provas pravigi, trankviligi sin iel ajn.

Tamen estas de mi spertita fakto, ke la forta sento esti prava donas grandan forton. Kaj mi certigas al vi, ke nenian malamon, sed nur kompatemon mi havas por la naivuloj, kiuj fakte kredas, ke mi estas "malamiko de Sovetio", tial ke mi denuncas la tie regantan ruĝan faŝismon...

*

LETERO TRIDEK-KVINA

Al Parizaj Gek-doj

Tokio, 3-2-1937.

Dum la du lastaj semajnoj mi plurfoje prenis skribilon por babili kun vi kaj ĉiufoje rezignis post la skribo de kelkaj linioj. Mi ja opiniis, ke estas malutile transversi mian pesimismon en vian animon... Jam de unu monato mi ne aŭdis esp-an vorton kaj iu hazarda interkonatiĝo

kun franclingve parolanta japano dum kelka tempo preskaŭ forblovis tion, kio estis de mi iel konsiderata kiel mia lasta iluzio. Mi rakontu. Antaŭ proksimume tri semajnoj mi sidis en biertrinkejo kaj regalas min per "suzumŭaki" (estas fiŝetoj trapikitaj per pinta bastoneto kaj tiele rostitaj) kaj nigra biero. Mi rigardadis kaj observis, kaj tia okupo ĉiam estas por mi interesa. Tre ofte en kafejo aŭ restoracio mi ĝuas spektaklon, kvazaŭ mi estus en kinejo. Kompreneble mi fantazias en miaj juĝoj pri la ĉirkaŭantaro. Tamen kelkfoje mi vetus, ke ĉi tiu aŭ tiu estas tia aŭ alia. Sed, kompreneble, mi mem en Tokio estas objekto de observado. Kiel blankhaŭtulo kaj blankbarbulo mi estas tuj rimarkata. Nu, post kelka tempo, servistino kunportis al mi paperfolion, sur kiu estis german-, angl- kaj franclingve skribita jeno: "Ni deziras trinki bieron kun vi ; se vi konsentas, venu al nia tablo". La propono amuzis kaj interesis min kaj kunportante mian glason mi iris altabliĝi kun du viroj, kiuj angle kaj france klarigis, ke ili longe diskutis por decidi pri mia nacieco. Pro la biero ili unue pensis, ke mi estas germano ; sed poste ial venis al ili la penso, ke mi estas usonano kaj fine ili interkonsentis, ke mi estas franca artisto, aŭ profesoro, ĉiaokaze " eminentulo". La angloparolanto estis tute ebria ; la francoparolanto estis nur duonebria (mi eble estis kvaronebria) kaj diris, ke antaŭ tri monatoj li estis ankoraŭ en Francio, kie li ekspoziciis pentraĵojn ĉe "Salon des Tuileries" ; li vivis dum kelkaj monatoj en Grenoble kaj konas tie la pentriston Flandin. Li parolis pri Francio, pri Parizo ktp. Mi konstatis, ke mia kuntrinkanto parolas preskaŭ flue la francan lingvon, kvankam malkorekte ; sed ankaŭ francoj ne ĉiam uzas "klasikan lingvon" en babilado, ĉu vere ? Ĉe la disiĝo mi interkonsentis kun Sugano (tiel nomiĝas la artisto) pri morgaŭa renkontiĝo por vespermanĝi kune en iu pure japanstila restoracio. Okazis tiel kaj poste preskaŭ ĉiutage ni vespermanĝis kune, promenadis ktp. Li eĉ kondukis min al sia hejmo, kie mi konatiĝis kun liaj patrino (vidvino) kaj fratino, ankaŭ vidvino kun tri filoj. Tial ke ili havas tutan domon kun ĝardeneto kaj liberan ĉambron, li proponis al mi ludoni tiun ĉambron, klarigante, ke per tia aranĝo mi ŝparos kaj ne estos tiel sol-eca, kiel okazas en mia nuna loĝloko. Mi ne scias kial, sed tia komplezemo efikis al mi iom trude kaj mi ne tuj akceptis, klarigante, ke mi devas pripensi la aferon, ke

cetere mi jam pagis por unu monato (estas ĉi tie kutimo antaŭpagi almenaŭ unu monaton ; en kelkaj hoteloj aŭ gastejoj oni eĉ postulas dumonatan antaŭpagon) ktp.

Okaze de mia vizito en la hejmo de Sugano ni interparolis ankaŭ pri esp-o. Li eldiris senĝene sian opinion : "... La afero estas tute utopia, sensenca kaj superflua..." Li aldonis, ke li jam havis la okazon interrilati kun kelkaj japanaj esp-istoj kaj konstatis, ke ĉiuj estis etcerbuloj (tous avaient l'esprit étroit). Dum lia senĝena kritiko pri nia afero, mi aŭskultis silente kaj afektis indiferenton. Kiam li haltis, dum kelka tempo regis ĝena silento. Kaj fine mi eldiris resume jenon : "Sinjoro Sugano, povas esti, ke vi estas tute prava en via opinio pri esp-o kaj esp-istoj. Mi mem ne povas esti juĝanto kaj juĝato, ĉar tiu afero plenigis multajn jarojn en mia vivo ; ĉar esp-o estis dum 11 jaroj mia hejma lingvo ktp... Sed estas evidente, ke, se vi pravas en via prijuĝo super japanaj esp-istoj, viaj argumentoj ankaŭ valoras rilate min kaj sekve mi estas mirigita, ke vi trovas iom da intereso en rilatoj kun mi..."

Eble mi estus daŭriganta samtone, se ne intervenus lia patrino, kiu ial eniris la ĉambron. La temo de l'konversacio aliĝis kaj fine mi foriris, penante esti afabla, kvazaŭ mi sentus nenian vundon. Sed mi ne povis dormi en la nokto kaj cerbumis, ĉu la afero estu finata kun Sug. per silento mia, aŭ ĉu mi skribu por malŝarĝi min de tio, kio pezas en mia animo. Post kelktempa ŝanceliĝo mi ekprenis skribilon kaj skribis laŭ ironia tono tre formale ĝentilan leteron, plenan je subtila malico. Almenaŭ estas tute certe, ke se mi mem ricevus tian leteron, rilatoj kun la sendinto estus rompita. Nu, mi apenaŭ estis enkovertiginta la leteron, kiam Sug. alvenis, kunportante vazon kun floroj kiel donacon al mi!... Li kondukis tre afable, kvazaŭ nenio malagrable estus okazinta inter ni. Mi ne povis rifuzi la donacon kaj dum kelka tempo mi hezitis por decidi, ĉu mi donu aŭ ne la leteron, kuŝantan sur mia tablo. Nu, malgraŭ floroj kaj afablaĵoj mi fine enmanigis al Sug. la leteron, dirante, ke en ĝi estas nenio urĝe legenda, ke li legu ĝin hejme. Ni pasigis la vesperon kune kaj disiĝis, kvazaŭ ĉio estus normala en niaj interrilatoj. Sed mi estis scivola pri la efiko de la letero. Nu, la postan tagon Sug. venis al mi kiel kutime kaj kondukis tute same kiel antaŭe. Unue mi pensis, ke li forgesis legi la leteron kaj demandis lin pri tio. Li res-

pondis : "Oui, oh! très intéressant, seulement un mot je n'ai pas compris : **plaidoyer...**" Mi klarigis la signifon de tiu vorto kaj Sug. aldiris : "je comprends, je comprends très bien..." Ĉe tia konstato mi sentis fortan emon ekrid-egi. Mi konvinkigis tiam, ke fakte Sug. preskaŭ nenion komprenis el mia letero. Cetere, franca elementulo, ordinarulo ankaŭ ne komprenus la ĝustan signifon de miaj ironie malicetaj diroj. Sed Sug. estas eks-studento de l' Tokia Universitato ; li legis la verkaron de Anatol Frans, de Flober, de Mopasan ktp. - liadire. Sekve franco kun tia grado da klero certe komprenus la ĝustan enhavon de mia letero kaj respondus per simila aŭ simple ĉesigus rilatojn kun mi.

Tia konstato kvazaŭ savis min. Jam de kelka tempo mi ja estis en stato de "mortiga peko", rilate al nia esp-a afero. Eble sen tia okazaĵo mia intereso por esp-o formortus. Mi klarigu iomete pri mia spiritostato dum du semajnoj. La konstato, ke esp-o ne utilas al mi, ke neniun esp-iston mi hazarde renkontis en Tokio, dum plurfoje oni alparolis min en angla lingvo ; la konstato, ke la esp-istoj, kiuj scias pri mia ĉeesto, kiuj loĝas tute proksime de mi, tamen ne havas la kuraĝon viziti min kaj eĉ evitas renkonti min surstrate (mi ja konstatis, ke unu, kiu estis tre helpema dum la fruaj tagoj de mia alveno, forflankigis kaj ŝanĝis sian direkton ĉe mia ekvido), tio igis min pensi, ke eble mi dediĉis senrezulte, senutile, vane, mian tempon kaj energion al tute utopia afero. Dum pluraj tagoj mi ja dronis en seniluziigo, amaro kaj malespero. Nur sarkasmaj pensoj naskigis en mia cerbo kaj mi eĉ serĉis ian ekvilibron per biero, **sakeo** (rizvino) k.s. Mi memoris, ke mia agado por esp-o havigis al mi precipe insultojn, kalumniojn k.s. ; mi eĉ pensis, ke en Parizo mem esp-istoj ĝenerale konsideris min kiel strangulon, ĝenulon ktp. Jes ja, mi sentis malesperon kaj iafoje malemon al la vivo. Kaj unu fojon pli mi konstatis, ke Marks eraris en sia provo klarigi ĉion per ekonomiecaj konsideroj. "La religio estas opio por la popolo", sed homoj kiel Pasteŭr, Branli k.a. scienculoj estis katolikoj - kaj Lanti kun pensio, kiu egalas la salajron de kolonelo en la Japana armeo, kun viglaj muskoloj kun ebloj kontentigi la korpajn bezonojn, tamen sentas sin malespera pro manko de idealo al kiu sin dediĉi... Sed necesus pri tio verki libron kaj neniu el-donejo verŝajne akceptus la manuskripton.

Nu, mi deflankiĝis... La konstato, ke klera homo, kiu vivis en Francio kaj legis multajn francajn librojn kaj tamen ne tutkomprenas francan leteron, skribitan de konatulo, igis min konkludi, ke perfekta interkompreniĝo ne eblas, se la homoj ne lernis la signifon de l'vortoj en la sama libro. Tiu penso jam igis min iniciati la eldonon de la P.V. Sed plifirmiĝas mia konvinko, ke **mond-kulturo** ne eblas sen **mondliteraturo** kaj ke la kreo de ĉi tiu lasta postulas nepre **mondlingvon SENNACIECAN...**

Sed mi volonte kredas, ke Sugano kelkriate pravas en sia opinio pri esp-istoj : ne nur ekzistas tiuj stultuloj, kiuj kredas meti esp-on serve al la Laboristaro per PEK-laboro, dum ni bone scias, ke tia entrepreno estas nur filieto de G.P.U. en la esp-aj rondoj ; sed, verdire, la grandega plimulto da ĉiutendencaj esp-istoj ne komprenas la ĝustan signifon de la ilo, kiun ili pripropagandas, sed malmulte ellernas kaj utiligas. Kiam mi konstatas, ke milionoj estis elspezataj de la neŭtraluloj por preskaŭ tute sensignifaj entreprenoj, mi ĉagreniĝas, ke neniam mi sukcesis... gajni en la loterio kelkajn milionojn... Memoru, kion mi celis entrepreni kun Meras ; ne forgesu, ke preskaŭ mi sukcesis akiri 500 000 fr. prunte pere de tiu sinjoro. Estis ne sufiĉa sumo por mia plano, tamen mi ne dubas, ke ion vere pozitivan kaj efikan mi estus farinta. La P.V. estas nur abortaĵo de mia projekto, kiu konsistis, maldetale dirite, liveri al la tutmonda publiko ian "Petit Larousse"(1)... Kelkaj milionoj ja estas necesaj por tia entrepreno. Sed ili estus kolekteblaj en la neŭtrala movado. Mi rememorigas ĉion tion, por ke vi pli bone komprenu mian animstaton : vivo estas signifa, plena, nur se la homo havis la eblon malvolvi, apliki siajn povoblojn (virtualités). Neniam mi sopiris al popularo, al aplaŭdoj, al gloro, sed mi ĉiam ŝatis bone faritan laboraĵon. Kiam mi scipovis perfekte, senmanke fari meblojn, tiam mi ne plu trovis intereson en tiu metio ; sed kiam mi lernis, tiam mia plej granda ambicio estis atingi la lerton, la kapablon de tiuj, kiujn oni nomis "bonne lame"(2).

Kara Banje, mi diras al vi tion, tial ke sur viajn ŝultr-ojn pezas respondeco pri entrepreno, kiu restas al mi kara malgraŭ ĉio. Vi diras vian bedaŭron pri kelkaj man-

(1) Franclingva enciklopedieto 1770-paĝa. - (Kompil.)

(2) Lerteguloj.

koj en via kapablo. Mi gratulas al vi pro tia konfeso, sed bv. ne malatenti ĉi tion : kiu konscias pri siaj mankoj, tiu ne estas malsaĝulo, fuŝulo. Fuŝas kaj detruas tiuj, kiuj havas tro favoran opinion pri si mem. Vi havas administran kapablon, kiu estas alte taksinda. Neniu homo posedas ĉiujn kapablojn kaj estas bone konate, ke genuloj estas iafoje kelkrilate tre stultaj. Per interkonsiliĝo kun la aliaj P.K.-anoj mi ne kredas, ke vi povas fari malsaĝaĵon. Kompreneble mi povas nur doni ĝeneralajn, principajn konsilojn, ĉar mi ne plu estas informata pri la movado, ĉar jam de preskaŭ du monatoj mi ne vidis esp-an gazeton. Sed mi almenaŭ povas insisti pri la neceso teni firman ekvilibron inter la diversaj tendencoj.

Vi konsilas, ke mi "verku, verkadu". Nu, mi konsentas kun vi, ke tia okupo povus iom kuraci mian nostalgion al... neekzistanta lando. Neniel mi nun sopiras reveni al Francio, ne eĉ al Eŭropo. Mi tre bone scias, ke tie ankaŭ mi sentus min fremda. Dum la lastaj ses monatoj antaŭ mia forveturo mi ja sentis fremdon en Parizo mem. Verki? Kiu eldonus? Kaj se mi kapablas nur eldiri pesimismajn pensojn, ĉu ne estas pli saĝe silenti? Cetere, ne kredu, ke mi disponas multan tempon : al la lernado de la angla lingvo kaj al la legado de anglaj tekstoj mi dediĉas almenaŭ 3-4 horojn ĉiutage. Al promenado kaj vizitado en la grandega urbo mi dediĉas multajn horojn; mia korespondado kun personoj el multaj landoj ankaŭ plenigas plurajn horojn ĉiusemajne. Plie, mi jam spertis, ke por taŭge pritrakti kelkajn temojn, mankas al mi dokumentoj, libroj, mia enciklopedio, kiu kuŝas ĉe Glodo. Sed verdire, plej ofte mi rezignas, pensante : neutilus! "à quoi bon!"(1).

La eldiroj de la ĉino, kiun raportas Glodo en sia letero, konfirmas mian tezon, eldiritan en "H-ulo" aŭ alie. Fakte, praktike, la angla lingvo estas la tutmonda interkomprenilo. Antaŭ mia foriro el Lisbono mi estis konvinkita pri la eraro de tiuj, kiuj volas trakti esp-on kiel alian lingvon (tezo de PEK-emuloj), sed mia vojaĝo ĉi tien pruvis al mi, ke tiu tezo estas ne nur erara, sed stulte senbaza. En ĉiuj havenoj, kie haltis la ŝipo, mi povis aĉeti anglalingvajn ĉiutagajn ĵurnalojn kaj ĉi tie, kiel mi jam diris, aperas tri tiaj ĵurnaloj. Se ne estus la konsidero, kiun mi elmetis pli supre, koncerne mian

(1) Kion helpus ĉi tio?

franclingvan konaton ĉi tian, mi forlasus la esp-an aferon. Sed mi spertas, ke jam de pli ol 4 monatoj mi lernadas la anglan lingvon ĉiutage kaj ĝi restas por mi vere fremda. Nu, antaŭ 13 jaroj mi dediĉis relative multan tempon kun Frida Noel al la lernado de tiu lingvo. En Parizo mi legis ofte anglajn tekstojn, tamen, mi rediras, la angla lingvo restas por mi maltaŭga **interkomprenilo**, sed ne vera lingvo kiel estas la esp-a aŭ la franca. Komprenigi sin ĉe hotelo, restoracio ktp., komprene legi ĵurnalon kun ofta helpo de vortaro, tio ne estas scipovi lingvon. Tiaj konsideroj estas laŭfaktaj kaj pravigas la esp-an aferon ; sed la Malfer- Bubuj kaj alies P.E.K.-ana vidpunkto estas vera... peko kontraŭ la simplan saĝon. Traduko kaj publikigo de esp-aj tekstoj estas utila nur je propaganda celo por nia lingvo kaj nenio pli...

... Se la filoj de R... estas "croix de feu"(1), tio nur signifas, ke... Marks eraris, asertante, ke la ideologio estas **rezulto** de ekonomiaj faktoroj, ke la "jura superstrukturo **rezultas** de la ekonomia strukturo". Ideoj estas fortoj. Kaj nunepoke la naciismo estas la ideologio, kiu kaptas la plej grandan nombron da cerboj. Kio okazis en Germanio, kaj ĉefe en Sario, kie voĉdonantoj povis tute libere esprimi sian deziron - devus enigi dubon en la cerbo de ĉiu pripensema kaj ne tute stulta "marksisto". Sed ĝuste pro tio, ke ideologio konsistigas forton, la marksistaj kreduloj estas regataj de la **marksa ideologio** mem. La marksismo kaptis multajn cerbojn, tial ke ĝi estis prezentata kiel "scienca socialismo", ĝuste en epoko, kiam la **Scienco**, ĉefe por nescienculoj, fariĝis kvazaŭ religio. Povas ja ekzisti superstiĉo pri scienco. Tion mi konstatas ĉi tie. Ĉu vi kredos, ke preskaŭ ĉiuj homoj portas sur la nazo maskon, kiu laŭdire ŝirmas kontraŭ influenco ? Sed pluraj **scienculoj** mokas la aferon kaj mem ne surmetas maskon. Japanoj ĝenerale ankaŭ havas grandan ŝaton, respekton por titoloj, por diplomoj ktp. Kiam mi havis la okazon interparoli - angle - kun personoj, kiuj laŭ mia ekstera aspekto opiniis, ke mi estas "profesoro", aŭ diplomito iaspeca, ili konsterniĝis, ĉe la aŭdo, ke mi eĉ ne posedas "certificat d'études primaires"(2) Posedo de diplomo sendevigas posedi realan kleron kaj kompetenton. Pro tio, ke mi ne estas universitatano,

(1) Fajro-kruculoj, faŝista organizo.

(2) Atesto pri elementa lernado.

diplomitaj esp-istoj ĉi-tieaj, kiuj povus pro sia pozicio ne timi la policon, ne esprimis sian deziron konatiĝi kun mi.

Vi demandas pri mia farto. Korpe ĝi estas bona, eĉ iom pli bona, ol ĝi estis en Parizo. Ĉiam temis pri mia anima, spirita farto. De pli ol unu monato mi ne manĝis panon, sed nur rizon. Jam trifoje mi manĝis krudan fiŝaĵon kaj mi kredas, ke baldaŭ mi ĝuos tian manĝaĵon kiel la japanoj. Sed mi ankaŭ manĝis **kuiritajn** ostrojn! En Parizo oni manĝas ilin ĉiam krudaj. Mi manĝas diversajn aĵojn, kies nomon mi ne konas. Kelkfoje mi demandas min, ĉu estas viando, fiŝo aŭ vegetaĵo. Kiam oni ne havas forketon kaj tranĉilon, la manĝaĵo kompreneble devas antaŭe esti dispecigita. Mi konstatas, ke homoj estas palate naciecaj ; sed oni ankaŭ povas sennaciigi sian palaton. Mi faris grandan progreson tiurilate. Nun mi povas sufiĉe bone uzi la "o-haŝi"-n (manĝbastonetoj) kaj vere ĝuas la verdan, sensukeran teon, kiun mi trovis tre malbongusta ĉe la komenco. Ĉio estas afero de kutimo, de edukado, de tradicio. Kiam oni firme konvinkigis pri tio, tiam oni plene komprenas sennaciismon.

El la 3 libroj, kiujn mi legis pri Japanio surŝipe, nur unu estis vere leginda kaj relative objektiva. Cetere, estis la sola, kiu raportis favore pri ĉi tiu lando, kaj ĝuste tiun libron konfiskis la kontrolisto ĉe mia elŝipiĝo. Policistoj ne povas esti ĝuste informitaj pri ĉio ; cetere ne ĉiuj estas inteligentaj kaj kelkaj pro troa elmontremo de fervoro povas agi maljuste. Nur tion mi timas...

Nu, vi ne plendos, ke mi ne sufiĉe babilis, eble vi bedaŭros, ke vi mem invitis min tion fari...

LETERO TRIDEK-SESA

Al K-do H.B., Nederlando

Jamaŝiro-maĉi, 14-5-1937.

Via letero atingis min en urbeto, situanta proksime de l'Japana Maro (Tokio troviĝas ĉe la Pacifiko), kaj en la domo de esperantisto, ĉe kiu mi estas gasto (paganta).

... ..

Mia gastiganto estas budaisto kaj eldonis en nia lingvo broŝuron kun titolo "Budao". Jam en la jaro 1933 mi legis tiun verketon, kaj malgraŭ tio, ke la lingvo estas ne ĉiam korekta kaj kelkaj partoj ne facile kompreneblaj, tamen mi trovis ĝin interesa kaj diskoniginda. Laŭ tiu verketo la budaismo **esence** estas sendia religio. Ŝakamunio, kiu estas

konsiderata kiel la plej eminenta budao(1) kaj fondinto de l'budaismo, neniam pretendis esti dio kiel Jezuo, aŭ peranto de dio kiel Mahometo. Sed en la budaismo, same kiel en ĉiuj aliaj religioj, la bonzoj perfidis la veran karakteron de la instruoj de Ŝakamunio kaj fariĝis la servistoj de potenculoj, ekspluatistoj kaj parazitoj ĉiuspecaj...

Mi do nun loĝas en dometo, staranta meze en rizkampoj kaj povas observi la laboron de l'kamparanoj. Ĝi postulas multe da atento, da zorgoj kaj eĉ da lerto. La kulturado de tritiko aŭ de terpomoj estas neniel komparinda kun tiu de rizo.

Ĉe la horizonto staras montaroj, surkovrataj per arboj kaj eĉ floroj, trairataj de riveroj kaj torentoj ; en la urbeto estas varmaj fontoj kaj ekzistas komuna banejo, senpaga por la loĝantoj, kiuj pagas imposton al la urbo. Mi elspezas ĉi tie multe malpli ol en Tokio kaj intencas resti dum la tuta somero. Sed vintre ne estus al mi agrable loĝi ĉi tie, tial ke la domoj estas tute el ligno kaj havas tre maldikajn murojn. Verdire, ne estas muroj, sed ŝoveblaj vandoj, kiuj tute ne povas ŝirmi kontraŭ la malvarmo...

Kion vi legis pri **Oomoto**, tio estas vera... Deguĉi, la gvidanto de tiu religia sekto, pretendas esti surtere vivanta dio kaj tia pretendo ne povas esti tolerata en Japanio ; tial li sidas en malliberejo. Por ortodoksuloj nur la **Tenno** (Ĉiela Reĝo) ; en Eŭropo oni diras imperiestro, sed tio estas erara esprimo) estas la sola surtera, vivanta dio ; en li enkorpiĝas la spirito de l'prauloj, de l'tuta nacio - kaj tiel jam okazis ekde 2 596 jaroj per la sinsekvo de "tennoj" el la **sama familio**. Sincere dirite, mi ne trovas tiun kredon pli stulta, ol tiun de entuziasmuloj, kiuj vidas savanton en la persono de Musolini, de Hitler, de Stalin kaj eĉ de Blum! Almenaŭ la kulto por la "Tenno" estas tre diskreta. Tre malofte aperas lia portreto en la ĵurnaloj kaj nenie ĝi estas videbla. Dum en Sovetio la portreto de Stalin troviĝas en ĉiu loko kaj kelkaj estas vere gigantaj... Unuvorte, ekzistas multaj manieroj por elmontri malsaĝon. Inter tiuj manieroj la malpli malsaĝa ŝajnas al mi esti la plej diskreta...

(1) **Budao** signifas staton de homo, kiu atingis perfektan saĝon.

Mi jam legis pri la konfliktoj kaj eĉ bataloj inter la diversaj partioj el Hispanio. Neniel mi estis mirigita pro tio : por starigi pacon en la mondo necesas ne nur, ke malaperu la naciismoj, sed ankaŭ la **absolutismo** el la spirito de l'homoj...

"S-ulo" kaj "S.R." mi ne vidis jam de 5 monatoj ; nur kelkajn eltranĉojn en kovertoj mi ricevis. Cetere, mi instrukiis, ke oni ne sendu al mi tiujn gazetojn ; sed lastatempe mi nuligis mian instrukcion, tial ke estus al mi nun malpli malagrabla esti forpelata ol en la unuaj semajnoj. Sed, ĉu tiaj legaĵoj alvenos al mi, tio estas demando ne respondebla nun.

Kun plezuro mi eksciis, ke vi renkontis bonan kaj amindan kunulinon ; kaj tutkore mi deziras, ke vi ambaŭ trovu feliĉon en reciproka amo, helpemo kaj bonvolemo.

*

LETERO TRIDEK-SEPA

Al A.v.d.H., Getm....

Jamaŝiro, 9-5-37.

La ricevo de via letero kaŭzis al mi apartan plezuron. Kvankam plej ofte mi dronas en pesimismo, tamen ĉe la konstato, ke ĉie tra la mondo troviĝas kelkaj, bedaŭrinde malmultaj, homoj komprenemaj kaj boncelemaĵoj, mi kelkfoje sentas espereton pri la estonto de l'homaro. Certe mi ne forgesis, ke vi estis unu el la plej valoraj helpantoj en nia komuna entrepreno ; sed ŝajne vi ne estas tute ĝuste informita pri la reala stato de la aferoj en la estinta komuna familio. La kuratoroj de la infano restas fidelaj al la ideoj de l'patro kaj ĉi tiu lasta cetere havas kun ili daŭre nevideblajn ligilojn... La infano vivas, pliguste vegetas, tial ke nutraĵojn ĝi povas trovi nur sur tre limigita kampo. Vastaj areoj ja fermiĝis al ĝia agado. Tial ke la ruĝaj jezuitoj ne sukcesis mortigi nian infanon, kaj naskis nur abortulon, ili nun provas reamikiĝi kun ĝiaj kuratoroj kaj kompreneble tie kuŝas danĝero. Tamen, mi kredas, ke la fuŝuloj ne sukcesos en siaj planoj.

Vi parolas pri miaj "ŝajne" absurdaj ideoj kaj mi ne scias tute ĝuste, kiujn el ili vi celas. Sed unu el miaj ideoj estis, ke **nur personoj havantaj scion, konon pri io devas pri tio havi la eblon influi.** La demando pri demo-

kratio kaj aŭtokratio estas malfacile solvebla. Demokratio ja ofte aliĝas en demagogion kaj aŭtokratio en tiranion. Volonte mi konsentas, ke la t.n. universala voĉdonrajto estas absurdaĵo, almenaŭ kiel ĝi estas ordinare praktikata. Sed broŝuron kaj ne leteron mi devus skribi por nur iomete elĉerpi la temon. Prefere mi rakontu ion pri mia nuna vivo.

Jamaŝiro situas apud la Japana Maro, dum Tokio troviĝas ĉe la Pacifiko. S-ro T. posedas dometon, kiu staras meze de rizkampoj kaj nun mi povas observi la laboron de l'kamparanoj. Ĉe la horizonto staras montaro, surkovrita per arboj kaj mi do havas je mia dispoŝo belajn lokojn por ekskursadi. Mi estas sana kaj sentas min vigla kiel 30-jarulo kaj sekve mi devus esti feliĉa homo, ĉar mi estas tute liberigita de deviga laboro kaj povas vojaĝi ien ajn, - krom en la ruĝan faŝistan landon. Tamen mi ne sentas min feliĉa kaj bedaŭras la tempon, kiam mi laboris tage kaj nokte por esperanto. Mia vivo ŝajnas al mi malplena, sencela, senutila. Kiu ne havas infanojn, familion, tiu povas trovi sencon en la vivo, nur se li estas ligita al utila tasko. En Tokio mi kelkfoje plezuracĉe vivis, sed baldaŭ sentis naŭzon. Kiel vi vidas ni estas spirite, anime parencaj, ĉar vi konfesis al mi, ke muziko kaj cetero ne povas anstataŭi vian poresperantan agadon. Mi ĝojis ĉe la ekscio, ke nun nia lingvo estas utiligata en via lando por la komerco. Mi jam skribis en iu verketo (1) ke esperanto portas en si mem ion...(2) bonan. La ĉefaĵo nun estas, ke ĝi ne mortu, ke ĝi povu elteni ĝis venos pli favoraj cirkonstancoj. Mi devas ĉesigi mian babiladon, tial ke eble mi enuigus vin - aŭ farus ion pli malbonan. Mi ja ne scias tute ĝuste kiel statas ĉe vi kelkaj aferoj.

P.S. Ekfermonte la koverton, mi memoris, ke mi forgesis danki al vi pro la foto, kiun vi almetis. Mi mem havas kelkajn, kiuj eble interesos vin. **Ito** estas banloko kun varmaj fontoj kaj situanta ĉe la Pacifiko, 60-70 km. sude de Tokio. En tiu urbeto mi pasigis tri tagojn, akompanate de franclingve parolanta artpentristo, kun kiu mi hazarde konatiĝis. La apudestantoj miaj estas la geservistoj de la hotelo.

Ĉi tie en Jamaŝiro ankaŭ estas varmfontoj, eĉ pli varmaj ol tiuj el Ito. Ovon oni povas kuiri en tiu akvo.

(1) **For la Neŭtralismon!** (Kompil.)

(2) Econ revoluciigan, pĝ. 16 (Kompil.)

Ekzistas en la urbeto komunuma banejo senpaga por la geloĝantoj. De la mateno ĝis la vespero ĝi estas plena de banantoj. Maljunuloj kaj knaboj svarmas tie. Tre pitoreske!

Mi sendos al vi ekzempleron de verketo, kiun tradukis mia gastiganto. Ĝi estas tre leginda ; bedaŭrinde la traduko estas malbona. Esperanto estas malfacila por japanoj. Komprenoble eŭropaj naciaj lingvoj estas multe pli malfacilaj. La fakto, ke la angla lingvo estas instruata devige en la lernejoj jam de multaj jaroj kaj ke malgraŭ tio tre malmulte da japanoj povas ĝin uzi, estas plej bona, eksperimenta pruvo pri la fiasko de tia instruado.

*

LETERO TRIDEK-OKA

Al Han Rinert(1)

Jamaŝiro-maĉi, 25-5-1937.

Kara Majstro kaj Amiko,

Mi gratulas al mi, ke mia karto atingis vin, malgraŭ la malprecizo de la adreso, kiun mi skribis, kaj ĉefe, ke ĝi naskis ĉe vi la deziron ĝin respondi per kora parolo. Sed vi starigis al mi nefacile respondeblajn demandojn kaj pro tio semajnon post semajno mi prokrastis por diri, kion mi scias pri la sekto **Zen** kaj kion mi pensas pri la japana animo.

... ..

Mallongan tempon mi bezonis por lerni la uzadon de la "haŝi" (bastonetoj, kiuj anstataŭas forketon); mi jam povas ĝue gustumi la "suŝi" (tranĉaĵeto el kruda fiŝo iomete acidita kaj metita sur amaseton da rizo) kaj la

(1) HAN RINER estis filozofo-verkisto, kiun Lanti varbis al esperanto antaŭ pluraj jaroj. Li scipovis komprene legi nian lingvon, sed estis tro maljuna kaj tro okupata por funde lerni ĝin. Foje li diris, ke la skribaĵojn de Lanti li ŝate kaj interese legas. Plie, li alte taksis lian juĝkapablon kaj pro tio demandis lin pri budaista sekto kaj pri la japana menso. La tuta letero estus certe publikiginda en ĉi tiu volumo; tamen ni forstrekis grandan parton, kiu estas ripetaĵo de tio, kio estas aliforme dirita en aliaj leteroj. Notinde estas, ke H.Riner mortis en januaro 1938. - (Kompil.)

"magurotĉazuke" (tranĉoj el fiŝo nur surverŝitaj per bolanta teo), same kiel mi povis en Parizo manĝi ne nur krudajn, sed... **vivantajn** ostrojn ; unuvorte mi faris grandan progreson en la sennaciecigo de mia palato. Mi povas ankaŭ marŝi kun **getaoj** ĉe la piedoj kaj ne plu metas erare la plandojn de miaj ŝuoj sur lokojn malpermesitajn -laŭ la hejma moro ĉi-tiea. Sed estas baro al kiu mi senĉese kolizias ; ĝi estas la lingva. Tiu limo ne estas ia mito kiel tiom da aliaj ; ĝi estas reala, kvazaŭ tuŝebla per la okuloj kaj oreloj. Ĉie kaj ĉiam tiu malbeninda baro staras antaŭ mi kaj pro ĝi estis al mi malfacile ĝis nun iomete penetri en la intimon de l'homoj inter kiuj mi vivas.

... ..
Tamen, mi kredas povi jam prave aserti, ke ne ekzistas, kiel iuj asertas, abismo inter la animo de flavhaŭtuloj kaj tiu de l'blankhaŭtuloj. Ekzistas nur diferencoj en ties esprimado kaj elmonro, sed la homoj, ŝajnas al mi, estas esence la samaj ĉe ĉiuj latitudoj.

Vi eble jam scias, ke mi estis manlaboristo, ke mi estas ankoraŭ nun ia sub-elementulo, kiu ne posedas la plej signifikantan ateston pri lernado. Tial ke dum mia vivo mi manipulis rabotilojn kaj segilojn, estis tute nature ke mia atento estu altirata al la maniero, laŭ kiu laboras lignaĵistoj kaj meblistoj japanaj. Mi estis vere mirigata ĉe la konstato, ke tiuj metiistoj havas ilojn, kies formo tre diferencas, kompare al tiu de similaj iloj en Eŭropo. La maniero laŭ kiu japanaj lignaĵistoj manipulas siajn ilojn ankaŭ malsamas je tiu de siaj kolegoj el Okcidento. Sed la rezulto sur la prilaborataĵon estas tute sama. Sekve inter la du malsamaj procedoj ne ekzistas esenca diferenco.

Mi emas kredi, ke sur la kampo de la abstrakta penso estas tute same. La budaista saĝo, la asketismo de kelkaj religiaj societoj, ĉu kristanaj aŭ aliaj, la stoikismo de Zenono kaj de Epikteto, la materialismo de Epikuro, ktp. ks., ĉio tio eble reduktiĝas je la senutila demando, nome, ĉu estas preferinde funkciigi rabotilon, ŝovante ĝin antaŭen, kiel en Eŭropo, aŭ tirante ĝin al si, kiel en Japanio...

Niaj ideoj, kutimoj, gustoj ne entenas ion absolutan. Ili rezultas de la hazardo, de la imitemo, de la bezono, de la tradicio pli malpli trudata, de ĉio ajn krom de tio,

ke ili estas esence diferencaj kaj apartaj al ĉiu raso.

Laŭ tio, kion mi povis ĝis nun observi, ekzistas ia similo inter la antikvaj mitologioj (greka kaj romana) kaj la ŝintoismo. La ideo pri unika Dio, kreinto kaj disponanto pri ĉio, ŝajne tute ne ekzistas en la penso de l' japanoj. Iliaj dioj, diinoj, herooj ktp., ilia kulto al la prauloj, ĉio tio tre parencas al la menso de la antikvaj grekoj kaj romanoj.

Nekontraŭdireble, la japana popolo, konsiderata kiel tuto, estas spiritualisto. Ĝi kredas, ke bestoj kaj eĉ senvivaĵoj havas animon. La vulpo estas objekto por kulto kaj ĝia statuo troviĝas ĉie en la proksimaĵo de temploj. Ĝi estas ordinare vestita per la ruĝa antaŭtuko, kiu estas ligita ĉirkaŭ la kolo. Antaŭ nelonge mi legis en "The Japan Advertiser" informon laŭ kiu **samisena**(1) fabrikanto elspezis 4 000 jenojn por la enterigo de dordlotita kato. Sepdek pastroj partoprenis la funebran ceremonion. Mi suspektas, ke per tio la industriisto celis reklamon por siaj fabrikaĵoj. Tamen restas la fakto, ke la japana popolo konsentas sen miro kaj sen protesto, ke kato estu pompe enterigata...

En la sama ĵurnalo, n-ro de la 9-a de februaro, estis bildo pri lernantinoj de kudra lernejo, kiuj partoprenis ĉiujaran feston de la **kudriloj**. Ĝi estas la okazo por religia ceremonio favore al la "animo" de la rompita kudriloj! Ĉiujare kolekto da tiaj iloj estas sendita al la sanktejo **Aŭaŝima**, kie sidas la diaĵo, kiu protektas la "animon" de l'kudriloj.

Tio ŝajnas al mi vere ĉarma! Laŭ ia vidpunkto la kredo, ke objekto havas animon, ne estas pli stulta ol tiu pri unika Dio en tri personoj, aŭ tiu pri sankta virgino-patrino. Cetere oni ne devas forgesi, ke la adorantoj de unika Dio loĝatigas la ĉielon per amaso da sanktuloj, sanktinoj kaj anĝeloj. Kaj ilia infero ankaŭ estas plenigita per granda nombro da demonoj kun satano kiel supera estro. Do ne temas pri esenca diferenco inter la kredoj. Ĉie la homoj sentas la bezonon apogi sian malforton sur lambastonojn el ia ajn kredo. La fabrikistoj de spiritaĵoj, lambastonoj t.e. la bonzoj, pastroj, filozofoj el diversaj skoloj ktp. ne uzas ĉiuj la samajn ilojn kaj ne donas tute la saman formon al la fabrikitaĵoj, sed ĉiuj trovas pli malpli grandan klientaron. Necesas esti

(1) **Samisen** estas muzikilo.

Han Riner por fabriki por si mem lambastonojn kaj ne celi reklami ilin kiel la sole utiligindajn.

En Japanio ekzistas tamen io tute speciala : la dieca karaktero de l'Mikado. Kiam oni preterpasas la ĉefan enirejon de la ĉirkaŭemparo, kie loĝas tiu surtera dio, tiam ne malofte oni povas vidi piulojn kun kunigitaj manoj, kun kliniĝinta kapo, kiuj preĝas dum kelkaj minutoj fronte al la sankta loko. Kaj neniu preterpasas tiun lokon, ne demetinte la kapveston kaj ne farante pli malpli grandan riverencon. Estas ankaŭ tre notinda apartaĵo, ke jam de 2 597 jaroj (laŭ tradicio pri kies kredindo eble necesas fari rezervojn) seninterrompe la sama familio el mikadoj prezidis super la destinoj de la lando. Ŝendube, por iu ajn, kiu kutimas kredi aŭ aŭdi, ke reĝoj aŭ imperiestroj ricevas sian regrajton de iu unika Dio, kiu loĝas en la ĉielo, por tiu la pretendo de mortonto esti dio sur la tero kaj ŝuldi al neniu krom al si mem sian aŭtoritaton, povas ŝajni sent-ofenda. Sed kiam oni sincere penas por kompreni la fakton, aŭ ĝian signifon rilate al la medio kaj cirkonstancoj, tiam la unua mirsento baldaŭ malaperas. Notinte la fakton, ke la japana popolo estas politeisto, la ideo pri dio, kiu enkorpiĝas en la sama familio por gvidi nacion ne ŝajnas aparte absurda ; male, ĝi estas logika konsekvenco de premiso pridubinda.

Kiam homoj kiel generalo Nogi kaj admiralo Togo estas post sia morto la objekto de dia kulto, tio ankaŭ estas logika konsekvenco de la politeismo. Estas pli facile al la simpla popolo akcepti la ideon pri iu aparta dio, kiu enkorpiĝis en ĉiu el tiuj viroj kaj dotis ilin per eksterordinaraj kapabloj, ol serĉi klarigojn pri iliaj venkoj en strategiaj konsideroj.

Kion ajn oni opinii pri ĉio tio, estas alia fakto inda je mencio kaj prikonsidero. La kulto per kiu la japana popolo honoras la Mikadon estas deca, diskreta, delikata ; ĝi ŝajnas al mi malpli groteska ol la bruaj kaj spektaklecaj manifestacioj, kiujn oni povas vidi en Moskvo, en Romo, en Berlino honore al la respektivaj diktatoroj. Ilia portreto ja troviĝas ĉie, en ĉiuj formatoj, laŭ ĉiuj pozoj. Precipe en Moskvo la bildo de Stalin estas vera trudobjekto por la okuloj. Tial mi preskaŭ eksentas simpatian por la "dio", kiu diskrete tenas sin apartigata en sia modesta palaco. Nenie en Tokio aŭ alie la vido estas logata per bildo de l'Mikado ; malofte lia portreto aperas en ĵurnaloj...

Mi pensas, ke estus erara la supozo, ke ĉiuj japanoj kredas je la dieco de l'Mikado. Sed se iu multmemulo permesas al si eldiri publike sian dubon pri tio, ĉiam troviĝas iu fanatikulo por severe puni tian pekulon. Lastan jaron d-ro Tatsukiĉi Minobe, senatano, spertis mem pri tio. Elmetinte tezon, konsideratan hereza, pri la situacio de l'Mikado rilate al la Konstitucio, li ne nur devis ekŝigi el la Senato, sed plie estis viktimo de atenco. Iu ano de reakcia organizo, Jusso Ota, 32-jara, pafis al d-ro Minobe per revolvero, sed atingis nur, ke la vundito devis resti en hospitalo dum unu monato.

Tia fanatiko ne estas io aparta al Japanio. Sufiĉas memori pri antaŭnelongaj okazintaĵoj en landoj, kie diktoro regas absolutisme, por kompreni, ke la krimo pro estreco-ofendo ne estas malpli severe punata ol tiu pro dieco-ofendo en la "Lando de l'Leviĝanta Suno".

Jen mi ekrimarkas, ke ĉi tiu letero longiĝas kaj tamen mi ankoraŭ ne diris, kion mi eksciis pri la budaista sekto **Zen**. En Japanio ĝi havas tri grandajn templojn, de kiuj dependas 14 000 aliaj pli malpli gravaj kaj disaj tra la lando. La zenanoj pretendas esti la plej fidelaj klarigantoj pri la pura doktrino de Gotama Ŝakamunio. Ili asertas, ke la Saĝulo ne ĉiam eldiris sian veran penson, tial ke li kutimis stari ĉe la sama nivelo de komprenkapablo kiel liaj aŭskultantoj. Sed unu el liaj disĉiploj, inter la plej intimaj, Mahakasjapo, komprenis kaj komprenis la "verajn interparolojn de Gotama". Pli poste, Bodhidharma diskonigis la "puran doktrinon" en Ĉinio. En la 7-a jarcento ĝi estis konata en Japanio, sed ne povis enplantiĝi. Nur en 1228 Dogen, post sia reveno el Ĉinio, sukcesis fondi templon en Uĵi, apud Kioto. Dum la tuta feŭda epoko la sekto Zen havis grandan nombron da adeptoj inter la samurai-oj (nobeloj-militistoj)...

Mi dubas, ĉu via filozofio estas kapabla naski ĉe iu la deziron konstrui templon kaj, plie, esti ŝatata de militistoj. La aserto de via amiko japana estas klarigebla nur pro lia nescio pri la temo : aŭ li ne konas bone la historion pri la sekto Zen, aŭ li ne ĝuste komprenis vian penson.

Tamen, povas esti trovebla ia parenceco inter la aŭtoro de la "Veraj Interparoloj de Sokrato"(1) kaj la instruoj de la bonzo Dogen, en tiu senco, ke ĉiu homo devas trovi en si mem la veron. Per meditado la zenanoj serĉas

(1) Titolo de unu el la verkoj de H. Riner. (Komp.)

ĝin kaj pretendas trovi en iu intuicia ekkompreno. Tamen ili legas la **Skribaĵojn** kaj enkalkulas 28 saĝulojn depost la fondiĝo de la sekto. La fakto, ke ili atribuas nur al kelkaj homoj la kapablon fariĝi saĝulo, kontraŭdiras, ŝajnas al mi, la aserton, ke ĉiu homo povas kaj devas trovi en si mem la veron t.e. la saĝon ; aŭ oni povas akiri la veron per meditado kaj tiaokaze ĉiuj zenanoj devus esti saĝuloj ; aŭ nur kelkaj homoj posedas tiun kapablon kaj sekve la unua aserto estas senvalora.

Sed, se estas vere, kiel asertas hinda aŭtoro, P.L. Narasu, ke ĉio, kio ne estas racia, tio ne povas esti atribuata al Ŝakamunio, tiaokaze mi facile konsentos, ke via penso estas budaeca. La libro, en kiu la aŭtoro klarigas tiun tezon, havas kiel titolon : "The Essence of Buddhism" (La Esenco de l'Budaismo). Mi komencas la legadon de tiu verko pro du motivoj : unue, la temo interesas min ; due, mi estas gasto ĉe liberpenso budaisto, kiu komencis ĝin traduki esperanten. Sed, ĉar li ne konas la anglan lingvon, li tradukas el japana traduko, kio estas bedaŭrinda. Kvankam mia scio de la angla lingvo estas ne profunda, tamen mi kredas povi iom helpi en tiu traduka laboro, komparante la tradukitan tekston kun la originalo.

... ..

La budaistaj sektoj estas multnombraj. Ĉiu pretendas instrui pli bone ol la aliaj la "veran" penson de l'Majstro. Tiurilate la historio pri budaismo tre similas al tiu pri la kristanismo. Ekzistas tamen notinda diferenco inter ambaŭ movadoj religiaj : la fanatiko de la admirantoj de Budao neniam atingis la gradon de furiozo, kiun havis mezepoke la adorantoj de Kristo. Nenio estas trovebla en la historio pri la religiaj sektoj el Oriento, kio estas komparebla al la Inkvizicio, al la "Dragonnades"(1), al la proreligiaj militoj, kiuj sange makuladis la duan duonon de la deksesa jarcento en Francio kaj alie.

Tia fakto ŝajnas al mi tre grava. Se la orientanoj estus pli bone informitaj pri la kristanismaj aferoj, neniam kruco superstarus la plej malgrandan templon en Ĉinio kaj Japanio. Verdire, ŝajnas, ke en ĉi tiu lasta lando la kristanismo jam atingis sian apogeon. Mi ne diros, ke ĝi

(1) Persekutoj kontraŭ la protestantoj en suda Francio post nuligo de l' Nanta edikto. (Dragonoj estis la ĉefaj ekzekutantoj.) (Komp.)

jam nun malleviĝas ; tamen estas certe, ke ĝia influo estas sensignifa kaj tre ofte rezultas de konsideroj, kiuj havas nenion komunan kun la deziro aliĝi al la "vera religio".

Tiu ĉi letero estas jam tro longa kaj pro tio mi petas vian indulgon, tamen, por respondi al la demando, kiun vi starigis pri via **Ahasvero**(1), necesus verki tutan volumon. Cetere, mi ne havas la necesan kompetenton por ekstrakti tian temon. Tial mi nur tradukos por vi kelkajn alineojn el antaŭparolo anglalingva de japana libro, aperinta en 1911. Ĝi havas jenan titolon : **Historio pri la Antikva Japanio**, kaj la nomo de la aŭtoro estas **T. Kimura**.

"La celo de ĉi tiu verko estas montri, ke nia praularo havis greko-latinan originon ; ĝi disvastiĝis kiel konsekvenco de la **Amfiktionioj** (Kunvenintaroj de delegitoj senditaj de la federaciitaj popoloj el la antikva Grekio) okazintaj en la lando Na'iri (Malgrandazio) t.e. la lando de la lago Van. Mia esplorado celas pruvi, ke niaj prauloj unue loĝis en Grekio, ke ili migris en Egiption kaj Abisenion kaj, post kiam ili subigis Persion, Hindion kaj Siamon, ili fine venis en niajn insulojn..."

"... La rezulto de mia kompara studo super mitoj kaj lingvoj naskis en mi la konvinkon, ke la japana popolo apartenas al la grek-latina raso..."

"... La japana lingvo estas unu el la plej antikvaj. Pluraj vortoj el mortaj lingvoj kaj aliaj, kiuj ekskutimiĝis, estas ankoraŭ uzataj ĉi tie. Multaj nomoj de lokoj en Okcidento, kies deveno aŭ signifo estas nekonata, ricevas klarigon en la lumo de nia lingvo. Multaj kutimoj kaj moroj el Okcidento, kies origino estas konsiderata kiel netrovebla, estas bone klarigataj per komparo kun tiuj el Japanio..."

Se la tezo de tiu aŭtoro estas iom kredinda, estas evidente, ke la demando ĉu via "Ahasvero" estas pli japaneca ol judeca ne plu havas la saman intereson. La "subteraj fratecoj" pri kiuj vi aludas, facile klariĝas.

Mi ne kuraĝas eldiri opinion pri la ideoj de s-ro Kimura. Tamen oni eble povus apogi ilin per aliaj konsideroj ol tiuj de kompara studo super moroj kaj lingvoj. La japana popolo konsistas el tre diversaj tipoj, escepte blondharajn. Mi havis okazojn vidi virinojn, kies haut-

(1) "Ahasvérus", titolo de unu el la verkoj de H.Riner.

koloro estas pli blanka ol tiu de hispaninoj aŭ de francinoj el la suda regiono. En la malgranda urbo, kie mi nun estas, kelkfoje mi renkontis junulon, kies fizionomio pensigis min pri alĝerianoj pro similo en la trajtoj. Estas eraro kredi, ke ĉiuj japanoj estas malaltkreskaj : unu el la policistoj, kiuj demandadis min en Tokio, havas almenaŭ 180 cm. da alto kaj la luktistoj, kies portreton publikigas preskaŭ ĉiutage ĵurnaloj, estas kolosoj, kiuj pezas pli ol 100 kg. Se la plimulto de la nazoj estas platkurbaj, aliaj estas rektaj, kaj mi eĉ vidis kelkajn, kiuj estas aglaj. Nur la formo de la okuloj estas vere karakteriza kaj mi ne vidis homojn kun rondaj, "fiŝaj okuloj". Japanoj ja uzas iafoje tiun bildon moke, parolante pri okcidentuloj...

Konvenas, ke mi bremse haltigu mian skribemon. Eble vi ne kuraĝos legi ĝis ĉi tie. Mia senkulpiĝo estu, ke vi starigis demandojn, kiuj instigis mian babilemon, sendube bagatela. Atentu nur mian bonan intencon kaj indulgu vian malbonan disĉiplon, kiu ne havas alian meriton pri via atento ol sia sincera kaj admira amikeco al vi.

*

LETERO TRIDEK-NAŬA

Al S-ro J.E., Sidnejo.

Iŝikaŭa-ken, 9-6-1937 (1)

Viaj letero kaj presaĵoj atingis min ĉi tie, kie jam de pli ol unu monato mi estas la gasto de s-ro T.

La ligna dometo de mia gastiganto staras izole ĉe la rando de malgranda urbo kaj ĝi estas tute ĉirkaŭita de rizkampoj. Mi do jam povas vidi ties prisemadon kaj poste plantadon de l'trunketoj ; por vidi ankaŭ la rikolton mi intencas resti ĝis la fino de septembro. Verdire la ĉi-tiea klimato ne estas tre agrabla : ofte pluvadas kaj la sunaj tagoj estas maloftaj, esceptaj. Ĉie estas koto ; sed mi jam kutimiĝis marŝi kun getaĵoj ĉe la piedoj kaj sekve ne multe atentis koton.

En la urbeto estas varmegaj fontoj kaj komuna, senpaga banejo. Ĉe la unuaj tagoj post mia alveno mi vizitis tiun banejon, sed ne plaĉis al mi la banado kun amaso da homoj. Mi do nun vizitadas banejon de hotelo, kiu ankaŭ

(1) Ĉi tiu letero aperis en "Suda Kruceto" (1937 juli-septembra n-ro) el Aŭstralio. (Kompil.)

estas komuna, sed ne tiel vizitata, kiel la senpaga. Tial ke mi iras tien frue, okazas kelkfoje, ke mi troviĝas sola. Mi vivas preskaŭ kiel asketo kaj elspezas malpli por ĉio ol nur por la ĉambro en Tokio. Kaj tamen mi pagas al mia gastiganto duoble pli ol li mem difinis. Mi rakontas tion al vi, por ke vi bone komprenu, ke malgraŭ la granda valorreduktiĝo de l'franko, tamen mi estas nun konsiderata kiel "riĉulo". En Aŭstralio mi estus malriĉulo. Tamen mi ne forlasis la ideon iam veturi al via urbo, kaj nun firme tenas laesperon viziti novan kontinenton post eble unu jaro.

Rilate al via demando pri perforto mi simple diru, ke neniam ĝis nun mi mem uzis ĝin. Kiam mi parolis pri **klasbatalo**, tiam ne prezentigis al mi bildo pri sanga batalo. Striko estas batalo ; Gandhi estas ia batalanto kaj Zamenhof ja parolis pri "pacaj batalantoj". Ordinare kiam **ĉiuj** ekspluatatoj strikas kaj sencede "batalas", tiam plej ofte ili venkas. Tiel longe, kiel **justo** ne regos sur la tero, tiel longe tiaj bataloj estos necesaj. Kiam homoj ne akiris aŭ perdis senton kaj komprenon pri justo, tiam ekzistas aŭ kreiĝas klasoj, kastoj, privilegioj, ks. Mi tamen ne pensas, ke ĉiuj ekspluatatoj havas senton kaj komprenon pri justo.

Kiam bonŝanco favoras proleton, tiam nemalofte li fariĝas mem ekspluatanto kaj emas pensi, ke ĉio en la mondo estas bonorda. Mi scias, ke mortigitoj povus esti ekzekutistoj. Konvinkita mi estas, ke multaj viktimoj de Stalin agus simile al li, se ili estus la plej fortaj, se ili venkus en la fipolitika batalo partia. Tamen estas nature, ke oni kompatas la viktimojn.

Sed mi volas paroli al vi tute sincere kaj malkaŝe : mi ne emus sistemece propagandi senperforton ; mi pensas, ke tia propagando povas nur efiki sur homojn, kiuj nature estas pacemaj, konsentemaj, rezignemaj. La perfortemuloj povas nur trovi instigon ĉe la scio, ke ili riskas nenion malagrablan, se ili perfortas pacemulon. Mi neniam uzis perforton, sed ne scias, kiel mi kondukus en neantaŭvidebla okazo. Tial mi ne emas surbazigi mian agadon per principa senperforto.

Mi ekiras de la koncepto pri **justo** ; ĉiu normala homo povas senti kaj kompreni juston. En kelkaj lingvoj la ideoj pri ĝusto kaj justo estas esprimataj per la sama vorto. Tio estas facile klarigebla : aĵoj, objektoj ne bone alĝustigitaj pensigas pri io malorda kaj sekve malbona.

Same kiel homoj povas per la okuloj vidi, ke io estas malĝusta kaj alia ĝusta, same ili ankaŭ povas kompreni juston. Kaj se la homoj celus mem agadi juste, tiakaze la mondo estus bonorda kaj paca. Rezigni pri justo, tio estas kuraĝigi maljustulojn...

Tiu mia vidpunkto estas idealista. Cetere perfekta ĝusto, perfekta rondo ankaŭ estas io ideala, kiu en la praktiko ne ekzistas absolute. Sed bona metiisto celas al perfekta ĝusto ; bona radofaristo streĉas la volon por atingi perfektan rondecon. Por la marksistoj la idealismo estas io "kontraŭevolucia", almenaŭ hereza. Laŭ la "historia materialismo" la socia problemo rilatas nur al proporcio de fortoj inter la klasoj kaj individuoj. Moralo ne konsistas el idealaj principoj, sed estas la **rezulto** de la rilatoj inter la homoj. Lenin rekomendis uzadi **ĉiajn** rimedojn por venki la malamikon. Hodiaŭ ni povas admiri la belan rezulton de tiu rekomendo. Kiam bolŝevistoj estis mortigintaj aŭ malliberigintaj ĉiujn burĝojn, socialistojn kaj anarkistojn, tiam ili poste mortigis kaj malliberigis unuj la aliajn. Por ili ja temas esti la plej forta. Stalin tre lerte aplikas la principojn aŭ, pli ĝuste, la senprincipecon de Lenin ; tial ĉia opozicio en Sovetio estas iel aŭ aliel likvidata kaj dum kongresoj la fortulo ricevas 100 %-an aprobon.

Fakte Lenin elpensis nenion novan tiurilate. La jezuitoj jam delonge klarigis, ke "la celo pravigas la rimedojn". Nu, kiu rajtas dubi, ke Stalin havas bonan celon? Li ja volas starigi socialismon eĉ en unu sola lando! - kvankam Lenin diris, ke tio ne eblas...

Sed mi estas konvinkita, ke konscie aŭ ne, la sovetia diktatoro estas ĉefe instigata de la deziro, de la **pasio** por regado, por komandado. Ĉe multaj homoj tiu pasio estas pli forta ol ĉiuj aliaj. Kaj la stulta amaso, kiu serveme aplaŭdas kaj incensas, plifortigas tiun pasion ĉe regemulo. La regema pasio estas eble pli danĝera, pli malbonfara ol la riĉiĝema pasio. Tial inter la gvidprincipoj de "Herezulo"(1) troviĝas unu, laŭ kiu neniu homo devas fariĝi gvidisto...

Sed mi fariĝis tro babilema pri tiu temo. Prefere mi diru al vi, ke lastatempe mi havis la plezuron konstati, ke mia nura ĉeesto ĉi tie kaŭzis bonan propagandon por nia lingvo. En la ĉiutaga ĵurnalo de ĉi tiu regiono aperis

(1) Revuo, kiun eldonis Lanti post sia ekŝiĝo el la Plenum-Komitato de S.A.T. (Kompil.)

maliceta artikolo kun jena titolo : **Du internaciaj stranguloj renkontiĝis** (temas pri s-ro T. kaj mi). Kaj kiel subtitoloj : **Unu el la francaj pensuloj venis ĉi tien kiel vento - Aŭtoritatulo pri esp-o, s-ro Lanti, modeste vivas en dometo ĉe Jamaŝiro - Per la artefarita lingvo okcidentulo kaj orientulo interkompreniĝas**. Kvankam la ĝenerala tono de la artikolo estas maliceta kaj moketa, tamen estas tute certe, ke esperanto estas senintence tre trafe propagandata.

S-ro T. konjektas, ke la Polico donis la informojn kaj foton (pasportan) al la redaktoro kaj li ne bone komprenas la kialon pri apero de tia artikolo. Sed ĝi havis kiel sekvon, ke korespondanto de multe legata ĵurnalo el Osaka venis kun fotisto por min intervui kaj foti. Mi ne rifuzis kaj sekve aperis dua artikolo, en kiu esp-o ankaŭ estas plurfoje menciata...

*

LETERO KVARDEKA

Al K-ino Rober

Jamaĉiro-maĉi, 27-6-1937.

Alproksimiĝas la dato de l'SAT-Kongreso kaj, konsidere la grandan distancon, kiu apartigas min de Britio, nun mi pensas, ke venis la tempo por skribi kelkajn vortojn al la kunvenontaj sennaciistoj. Supozeble vi havas iom da intereso ekscii maldetale pri mia sorto, de kiam mi forlasis Eŭropon, t.e. antaŭ 8 monatoj. Sed, por ke vi komprenu ĝuste mian situacion ĉi tie, necesas, ke mi iomete rakontu en kiaj cirkonstancoj mi venis en Japanion. Nun mi havas la firman konvinkon, ke nur ia hazardo ebligis mian surlandiĝon en Jokohama. Mi klarigu: el Portugalio mi siatempe informis al **Japana Esperanto-Instituto** pri mia deziro viziti la Landon de l'Leviĝanta Suno kaj tie resti dum pli malpli longa tempo. Mi petis informojn pri vivkostoj ktp. kaj klarigis, ke neniel mi intencas agiti politike, sed nur deziras helpi al la esp-a afero, se eblas. Responde mi ricevis leteron, per kiu mi estis informita pri la vivkondiĉoj kaj atentigita pri tio, ke mia "**esperantista kariero estas bone konata de la Tokia Polico**". Unuvorte oni malkonsilis, ke mi venu. Tamen mi sciigis al J.E.I., ke tute ne ĝenos min la severa observado de l'polico, tial ke mi ne venos kun

kaŝinda celo ; ke mi nur deziras konatiĝi kaj se eble intimiĝi kun orienta popolo kaj sekve ke eĉ la polico iel povus helpi min en tio. Kaj samtempe mi informis la sinjorojn, ke mi ekvojaĝos komence de oktobro sur norvega varŝipo kaj atingos **Kobeaon** fine de novembro. Mi ankaŭ donis adreson ĉe restanta poŝto en la urboj, kie la ŝipo haltos. Mi ricevis de J.E.I. leteron per kiu oni informis min, ke mi kompreneble trovos helpon de samideanoj ĉe mia alveno, sed ke la Instituto mem opiniis necesa informi la Policon pri mia vojaĝo, kaj pri la dato de mia alveno en **Kobe**. Nu, mi ja aĉetis en Lisbono bileton por veturi ĝis tiu urbo. Sed en Ŝanghai mi eksciis, ke la ŝipo veturos unue al Jokohama kaj nur poste al Kobe. Tio estas iel stranga, ĉar ĉi tiu lasta urbo kuŝas pli sude ol la unua, sed tiel estis. Ĉe tiu ekscio mi aranĝis kun la kapitano de l'ŝipo, ke mi finu la vojaĝon en Jokohama, kiu troviĝas proksime al Tokio. Tiel okazis. Post duonhora esploro de policistoj sur la ŝipo mi ricevis la necesan stampon sur mia pasporto, tiel ke s-ro **Adam** povis surlandiĝi. En Kobe la polico estis informita pri mia alveno kaj bone sciis, ke Adam kaj Lanti estas unu sama persono ; sed tion ne sciis la policistoj el Jokohama, almenaŭ tiuj, kiuj venis sur la ŝipon.

El la jarlibro de U.E.A. mi estis notinta la adreson de delegito en Jokohama kaj ĉe la hotelo mi telefonigis al tiu esp-isto. Post du horoj venis al mi ne la delegito, sed alia esp-isto, kiu tre ĝentile kaj helpeme bonvenigis la samideanon Adam. Al tiu bonveniganto mi petis, ke li telefonu al J.E.I. por informi pri mia alveno en Jokohama. Du-tri horojn poste venis el Tokio al Jokohama unu el la sekretarioj de J.E.I. Ankaŭ li estis afabla, tamen lia mieno estis kvazaŭ funebra, kompare kun tiu de la aliaj esp-istoj, kiuj vespere estis kunvenintaj por akcepti min t.e. s-ron **Adam**. Tiam nur la funebra mienulo sciis, ke mi estas Lanti!...

Sed ne utilas, ke mi longe babilu pri tio. Nur mi diru, ke kvar tagojn post mia alveno en Tokio, mi havis la viziton de 4 policistoj, kiujn akompanis 2 interpretistoj, unu esp-isto (ĝuste tiu, kiu venis el Tokio al Jokohama renkonte al mi) kaj unu france parolanta. Dum pli ol du horoj mi estis demandata kaj ĉe la fino aŭdis, ke post du tagoj mi ricevos demandaron, kiun mi respondu skribe. Tiel okazis kaj finfine mi estis informata, ke mi ne devas havi rilatojn kun japanaj eks-SAT- aŭ IPE-anoj, nek kun

iu ajn, kiu herezas politike. Verdire mi antaŭvidis tion, sed pensis, ke almenaŭ mi povos **neŭtrale** rilati kun **neŭtraluloj**. Sed kiam tiuj lastaj eksciis, ke mi estas **Lanti**, tiam ili kvazaŭ forkuris de mi. Kvankam la hotelo Bunka, kie mi loĝis en Tokio, staras je 1-minuta paŝado de J.E.I. tamen mi ne rilatis kun ties multnombraj vizitantoj. Okazis eĉ, ke unu el la esp-istoj, kiu estis al mi tre afabla ĉe mia alveno, forflankeniris ĉe mia ekvido sur la trotuaro, kie hazarde mi marŝis renkonte al li. Multajn similajn faktojn mi povus mencii por pravigi mian konjekton, ke, se mi veturus al Kobe, la tiea polico ne permesus mian elŝipiĝon. Mia neantaŭvidita surlandiĝo en Jokohama havis kiel rezulton, ke la polico vidis en tio ruzaĵon, artifikon miaflanke kaj tial mi kredeble fariĝis pli suspektinda ol eĉ antaŭe...

Inter la neŭtraluloj troviĝis tamen unu, kiu kuraĝis ekinterrilati kun mi. Eksciinte pri mia ĉeesto en Tokio, s-ro Takeuĉi-Tooĉiĉi venis al mi el sia tre malproksima provinco kaj proponis, ke li estu mia gastiganto dum kelkaj monatoj. Li faris pli : li vizitis la esp-an fakon ĉe la centra policejo kaj tie klarigis, ke en sia malgranda urbo li estas la sola esp-isto, ke tie neniu parolas fremdan lingvon kaj sekve, ke ne ekzistas ebloj, por ke mi povu infekti iun per herezo. La argumentado estis ne rebatebla kaj s-ro Takeuĉi ricevis la deklaron, ke nenio malagraba okazos al li pro mia nura ĉeesto en lia hejmo. (Notinde : la Polico rajtas aresti kaj malliberigi japanon dum 29 tagoj sen ia klarigo pri la motivo). Tial mi loĝas nun en ligna dometo, izole staranta meze de rizkampoj. Dum la unua semajno de mia ĉeesto ĉi tie policistoj venis ĉiutage unu aŭ du fojojn por ekscii, kie mi estas, kion mi faras ktp. Ili plie observis en la ĉirkaŭaĵo por ekscii, ĉu "misteraj" homoj ne vizitas min. Kaj nun la situacio estas jena : interkonsentite kun mia gastiganto kaj la Polico, kiam mi foriras por viziti unu el la apudaj urboj, tiam la ĉi tiea Polico estas unue informata pri mia foriro kaj ĝi siavice informas telefone la policon de l'koncerna urbo vizitota. Sed la observado super mi estas farata diskrete kaj ĝi tute ne ĝenas min.

Mia nura ĉeesto en ĉi tiu provinca regiono havis almenaŭ bonan efikon rilate al la diskonigo de esp-o. Aperis unue artikolo en la ĉiutaga regiona ĵurnalo pri mi kaj mia gastiganto kun jena titolo : **Du internaciaj stranguloj renkontiĝis** kaj kun jenaj subtitoloj : **Orientulo kaj**

Okcidentulo interkompreniĝas per esp-o. S-ro Lanti verkis plurajn librojn en tiu lingvo. La artikolo estas malicete verkita kaj mia gastiganto konjektas, ke la polico mem donis la informojn al la ĵurnalo. Estas en ĝi ja menciite, ke mi ricevas pension de la franca ŝtato ktp. kaj la portreto, kiu ilustras la artikolon estas pli-grandigita foto pasporta, kiun havas la polico.

La apero de tiu artikolo havis kiel sekvon, ke regiona korespondanto de la granda ĉiutaga ĵurnalo el Osaka venis por intervjui min. Li eĉ estis akompanata de fotisto kaj du tagojn poste aperis denove artikolo, en kiu esp-o estas menciita kaj ĝia signifo substrekita. Sed en tiu artikolo mi estas nomata Adam!...

Kiel vi povos konkludi mem, estis tute vana mia provo kvazaŭ mortigi Lanti-n. Cetere nun ne estus al mi tiel malagrabla esti forpelata, kiel estus ĉe la unuaj semajnoj de mia alveno. Kvankam mi deziras resti ankoraŭ dum pli malpli longa tempo, laŭ la cirkonstancoj, tamen mi ne plu estas tiel retenema, kiel ĉe la komenco. Tial volonte mi ricevos la bultenon de la Frakcio kaj ĉion ajn, kio povas tiurilate utili al mi por havi ĝustan rigardon super la afero.

Kredeble mi tro parolis pri mi mem kaj estus preferinde tuj priparoli la Frakcian aferon. Lastatempe mi pensis, ke la 3 000 ekz-oj de la Manifesto estos baldaŭ elĉerpitaj, kaj ke ni ne plu havos propagandan materialon. Tamen mi pensas, ke dua eldono de tiu broŝuro ne estas nun oportuna. Tial mi planis verki 30-40-paĝan broŝuron kun jena titolo : **La Fiasko de la Internaciismo**. Se mi estus certa, ke nia Frakcio posedas la rimedojn por la eldono de tia broŝuro, tiam mi ekverkus. Sed la valor-reduktiĝo de l'franko kaj la ĉi-tiea plialtiĝo de l'vivkostoj ne ebligas, ke mi mem monoferu por nia afero. Tial ĝis nun mi ne havis la kuraĝon verki, pensante, ke eble mi vane laborus. Sed okaze de la Frakci-kunsido en Roterdam vi eble povos pridiskuti tiun **Aferon** kaj se vidiĝos la eblo pri eldono, tiam mi certe surpaperigos ideojn, kiuj trude naskiĝis en mia cerbo pri la problemo **internaciismo-sennaciismo**.

Tial ke mi ne estas informita pri via laboro dum la interkongresa jaro, mi do ne povas kritiki nek gratuli. Sed mi ne dubas, ke vi faris vian eblon kaj havas trankvila la konsciencon. Kredeble la rezulto atingita ne estas granda. Pro tio vi tamen ne malkuraĝiĝu. Pensu, ke la

sennaciistoj estas pioniroj inter pioniroj. La unua pionir-eco estas la poresp-a kaj neniam forgesu, ke la sennaciismo estus ridinda utopiaĵo sen esp-o. La nacilingva propagando por nia ismo estas pravigebla nur en tiu senco, ke ĝi povas instigi homojn lerni esp-on, se ilin logis la ideo pri sennaciismo. Ĉu mi bezonas diri, ke, de kiam mi forlasis Francion, de tiam ĉiutage mi koliziis kun la lingvaj baroj ? Ili ja estas io tre konkreta, vere terura. En Japanio mi relative facile sennaciecigis mian palaton kaj kutimiĝis al la vivkondiĉoj ; nun mi ne sentus min fremda ĉi tie, se ne estus tiu terura lingva apartigilo. Kaj eĉ kiam oni sukcesis akiri la kelkajn lingvajn elementojn, kiuj ebligas elturniĝi ĉe hotelo, restoracio aŭ fervojo, tio tute ne signifas, ke forfalis la lingvaj baroj. Pri tio mi nun ĉiutage spertas kun mia gastiganto. Li ja nur supraĵe konas nian lingvon ; li ne sufiĉe praktikis ĝin lege, skribe kaj aŭde por povi tuj ekkapti diversajn nuancojn de parolo. Sekve eĉ inter ni ambaŭ ne tute forfalis la lingva baro. Estas do la nepra devo de ĉiu serioza sennaciisto ellerni esp-on, finakiri la kapablon pensi **rekte** en la sennacieca lingvo kaj ne kvazaŭ traduki el sia gepatra. Por labori trafe kaj celkonscie al la sennaciigo de l'mondo ni devas unue sennaciecigi nian propran menson, nian memon. Kaj ni devas neniam forgesi, ke ni portas en ni naciecajn bacilojn...

Mi estas konvinkita, ke daŭra **pa**co ne ekzistos en la mondo tiom longe, kiom ekzistos nacioj, suverenaj unuoj. Sed eĉ se jam ekzistus mondregno, tio tamen ne certigus pacon inter la homoj. Necesas plie, ke ilian spiriton ne plu regu absolutismo. La okazintaĵoj en Sovetio kaj Katalunio(1) liveras bedaŭrinde tro freŝajn kaj sangajn argumentojn por pravigi mian aserton ; sekve, mi ne bezonas insisti. En nia propagando ni ĉiam estu toleremaj kaj komprenemaj. Neniam ni forgesu, ke homoj, kies spirito estas en iu tempo sub la influo de religia, patriota aŭ partia pasio, ne povas tiam kompreni niajn argumentojn. Ili estas en simila stato kiel tiu de ebrulo. Por

(1) La verkinto interalie aludas la murdon, fare de anoj de l'rusa G.P.U., al la 12 membroj el **Liberecana Junularo Barcelona**. Tiam en Hispanio tiu organizo estis la sola, kiu publike protestis kontraŭ la "procesoj" en Moskvo, kie estis mortkondamnitaj, pro opozicio al Stalin, malnovaj bolŝevistoj, kunuloj de Lenin.- (Kompil.)

komprenigi al ebrulo, ke la drinkado estas malbona por la sano, necesas atendi la senebriigon kaj la kapdolorojn, kiuj sekvas. Estus malsaĝe, se abstinulo drinkus, por havi la oportunon alpropagandi drinkemulojn. Same malsaĝe agus sennaciisto, se li memvole partoprenus en bataloj kun internaciismaj celoj, aŭ internaciismaj konsideroj. Ĉiu probatalu sian propran batalon. Sennaciistoj konsentu oferi sian vivon nur pro sennaciisma celo. En la nuna epoko la vivo de unu sola sennaciisto konscia estas pli valora ol tiu de 10 000 internaciistoj. Ĉiu do plenumu sian apartan taskon. Se la grandega plimulto da homoj elektis malĝustan direkton, tio ne sufiĉas, por ke ni sekvu ilin. Ni havas la firman konvinkon, ke, se ĉiu homo funde lernus esp-on, senigus sian menson je nacieco kaj absolutemo, en tia kazo paco kaj harmonio povus regi sur la tero. Kiu penadis tiucele kaj sukcesis, tiu ne havas respondecon en la fiaskoj de ĉiuj klopodoj faritaj por pacigi la mondon. Tiuj respondecas, kiuj elektis malĝustan direkton kaj ne penadis akiri mem spiritostatton de mondĉivitano.

Karaj Gekamaradoj! mi ne volas fini ĉi tiun leteron ne dirinte, ke mia sola ĝojo dum mia senhejma, vagada vivo estas la penso, ke en la plej diversaj mondpartoj mi havas amikojn, samideanojn. Kaj nun, paŝante malsupren sur la deklivaĵo de l'vivo, mi tre klare vidas, ke la plej valoraj tagoj el mia ekzisto estis tiuj, kiujn mi povis plenigi per utila, sindona laboro. Ne laciĝu en via malfacila tasko kaj ne malkuraĝiĝu, se vi ne tuj povas rikolti el la grajnoj dissemataj. Per la penso mi estos kun vi en Roterdamo.

*

LETERO KVARDEK-UNUA

Pri Moralo, Historia Materialismo kaj cetero

Jamaĉiro-maĉi, julie 1937.

S-ro Nakahara el Kioto, eldonanto de l'gazeto "Tempo", publikigis la tekston de intervjuo, kiun li havis kun Lanti, interalie estas raportita jeno : "Lia intelekto estas priokupata de moralaj demandoj, tial la "buŝido", la budaismo, unuvorte la tuta orienta kulturo, kies bazo estas ĉefe moraleca, tute nature altiris lin. Nun li studas la budaisman literaturon..."

Pri la rezulto de lia studo ni konigu, ke la artikolo : "... Tial mi konvertiĝis al la budaismo", kiu aperis en "Sennacieca Revuo" kaj estis subskribita : **Arigato Gozaimasu**, fontas el la plumo de Lanti. La tuta skribaĵo estas ironia kaj montras, ke nia eslorema K-do ne trovis en la budaismo, kion li serĉas. (Kompil.)

Estimata Redakcio,

En la junia n-ro de via ŝatinda gazeto vi publikigis kelkajn notojn, kiuj spegulas sufiĉe bone mian nunan spiritostaton. Sed en tia konciza formo evidente ne eblis eviti, ke kelkaj legantoj povus iom miskompreni la raportitaĵon. La afero ne estus tre grava ; tamen, se vi permesos, mi ŝatus aldoni kelkajn klarigojn pri unu punkto el via raporto, nome, ke mia "intelekto estas priokupata de moralaj demandoj".

Kelkaj legantoj ja povis pensi, ke mia kontraŭstaro al la "historia materialismo" signas, ke mi fariĝis adepto de iu metafizika doktrino, aŭ eĉ falis en mistikismon. Tiel ne estas! Mia nuna studado super budaismaj verkoj ne ankoraŭ konvinkis min pri la reala ekzisto de budaoj, t.e. de homoj, kiuj akiris scion pri ia unuigo kun la "Supera Vero". **Avalokitesvaro**, tiu "Dia Memo", same kiel la kristana "unika" Dio el "tri personoj" ŝajnas al mi nun, kiel antaŭe, fantaziaj elpenaĵoj, kiuj havas nenion komunan kun la racio, eĉ kun la simpla saĝo. Mi do ne agnoskas metafizikon kaj mia starpunkto estas pozitiva.

La Erareco kaj Senetikeco de la "Historia Materialismo".

Kiel eble plej koncize mi provu komprenigi mian opinion pri moralo. Ĉu moralaj principoj ekzistas? Kie ili estas troveblaj?

Por la anoj de dogmaj religioj la afero estas tre simpla : Dio, per revelacio, sciigis al la homoj pri sia ekzisto

kaj pri sia volo ; sufiĉas do obei la ordonojn de tiu mistera estaĵo por agi morale. Plie, la malobeintoj estos punataj per ĉeesto eterna en la infero aŭ longdaŭra en purgatorio, dum la obeintoj ĝuos senliman kaj eternan feliĉon en la ĉielo. Por di-kredanto la problemo estas do facile solvebla. Sed malgraŭ plej sincera deziro kaj laŭcelaj klopodoj, pri kiuj mi ne povas raporti ĉi tie, mi ne sukcesis akiri kredon pri la ekzisto de Dio. Konsekvence, mi ne trovas en religio moralan fundamenton. Tiurilate mi povas facile interkonsenti kun la anoj de la "historia materialismo" kaj tamen tiu doktrino ŝajnas al mi ne nur erara, sed eĉ malbonfara. Por la ortodoksaj marksistoj moralo estas ia **rezulto** de ekonomiaj faktoroj. Mi citu el Marksa verko mem :

"Por la socia produktado de siaj vivrimedoj, la homoj daŭre havas determinitajn, necesajn interrilatojn, kiuj estas **sendependaj de ilia volo** ; interrilatojn por produktado, kiuj respondas aliu determinata stadio de elvolviĝo de iliaj produktfortoj. La tuto de tiuj interrilatoj por produktado formas la ekonomian strukturon de l'socio, la realan bazon sur kiu stariĝas jura kaj politika superstrukturo, al kiu respondas sociaj kaj difinitaj formoj de konscio... **Ne la konscio de l'homoj determinas ilian staton, sed male ilia socia stato determinas ilian konscion.**" (Antaŭparolo al la **Kritiko de l'Politika Ekonomio**).

Se la vortoj ion signifas kaj se do ne temas pri dialektika ĵonglado, la logika konsekvenco de tiu Marksa aserto estas, ke la sentoj, la pasioj, la ideoj, la idealo ne ludas rolon en la historia procezo de l'homaj socioj. Ke tiel estas en la penso de Marks, pri tio ni trovas konfirmon el la plumo de lia plej intima kaj aŭtoritata disĉiplo, nome, Frederiko Engels. Ĉi tiu lasta ja skribis :

"La determinantaj kaŭzoj de tiu aŭ alia socia metamorfozo aŭ revolucio **ne devas esti serĉataj en la kapo de l'homoj...**, sed en la metamorfozoj de l'produktado kaj de la interŝanĝado." (**La Revolucio de l'Scienco de sinjoro Diring**) (**Dühring**).

Diistoj klarigas ĉion per la volo de Dio ; Marks, Engels kaj iliaj disĉiploj iel **diigas** la produktfortojn kaj per ili havas respondon al ĉiuj demandoj. Tro simplisme!.. La aserto, ke la homoj havas interrilatojn sendepende de sia volo estas arbitra kaj neniel kongruas kun la realo. Oni povas trovi en la historio multajn faktojn, kiuj montras, ke homoj agis, batalis, konkeris landojn, tial ke ili

volis tion, interkonsentis pri tio kaj ne estis instigataj de misteraj "produktofortoj". Kiam homoj decidis surpontigi riveron kaj konstrui boaton por fiŝkapti, tiam ili **vole** faris tion kaj neniam "socia stato" donis al ili la "konscion" pri neceso de tia farado. Popoloj vivis dum jarcentoj meze de naturaj riĉaĵoj kaj ne emis aŭ ne kapablis ekspluati ilin por sia profito. Aliaj homoj venis tien kaj utiligis la riĉaĵojn. Tiu utiligo do ne estis "sendependa de ilia volo", kiel oni devus kredi, se la Marksa vidpunkto estus ĝusta. Homo ne estas aŭtomato, kiun diigitaj "produktofortoj" movas. La volo de l'homo ŝanĝis la aspekton de nia planedo kaj kreis kondiĉojn, kiujn poste li mem ja devas atenti. Ekzemple, kiu biciklas, tiu ne povas tute sin teni kiel piediranto. Tamen la elpensinto de l'biciklo, la homo, ne estas pro tio kvazaŭ sklavo de ĝi...

Produktofortoj? Nu, ili ekzistas en la naturo. La akvo, la vento, la fajro, la elektro ktp. estas ja naturaj produktofortoj. Sed necesis, ke la homo **volu** kaj scipovu utiligi ilin. Ilia utiligado sekve rezultas de la homa **volo** kaj ne de blinda, ekstera instigo ekonomieca. Lastanalize ĉiuj aliĝoj en la socio havas kiel originon la volon de l'homo ; en ĝia cerbo naskiĝis la ideoj, kiuj iniciatis la ŝanĝojn. La **superstrukturo** pri kiu parolas Marks estas nur metaforo, nenio pli, nek malpli. La homo mem kreis la juron kaj ĝi ne estas simple ia rezulto de la ekonomio ; juro kaj ekonomio malvolviĝis paralele sed ne la lasta kreis la unuan.

Kio pruvas plej bone la eraron de Marks, tio estas la fakto, ke homoj, vivantaj en samaj ekonomiaj kondiĉoj, tamen ne havas samajn ideojn. En Hindio, ekzemple, hinduanoj kaj islamanoj jam vivis dum kelkaj jarcentoj en sama medio kaj tamen ambaŭ havas tute malsaman religion. La ekonomismo ne kapablas klarigi, kial la unuaj adoras bovinojn, dum la lastaj buĉas kaj manĝas ilin. Nei la forton de ideoj, ĉu ĝustaj aŭ malĝustaj, tio estas iel perforti la realon en la celo enigi ĉiujn sociajn fenomenojn en iu filozofia sistemo.

Ne nur Marks sed multaj aliaj teoriuloj provis starigi sistemon per kiu ĉio povus esti klarigata. Vana provo!... Filozofiaj sistemoj ankaŭ estas homaj elpenaĵoj ; sed ĝis nun neniu geniulo kapablis starigi nerefuteblan doktrinon. Sistemoj kontraŭas aliajn sistemojn kaj la kelktempa sukceso de unu el ili dependas ne de ĝia senerar-

eco, sed de specialaj ĉirkonstancoj kaj de la talento kaj konvinkopovo de la aŭtoro. Sed ni dume nur notu, ke la "Historia Materialismo" ne povas pretendi nerefuteblecon kaj plie, ke ĝia esenco mem estas senetikeca.

"Oni juĝas arbon laŭ ĝiaj fruktoj..."

Se estas eble juĝi arbon laŭ ĝiaj fruktoj, oni ankaŭ povas taksu la valoron de doktrino laŭ ĝiaj rezultoj. La marksismo, la historia materialismo atingis tre grandan disvastigon tra ĉiuj kontinentoj. Plie, ĝi estas la oficiala kaj sola doktrino, instruata en la lernejoj de 170-miliona popolo. La fakto, ke oni instruas ĝin devige, ke ĝi fariĝis en Sovetio kvazaŭ religia ortodoksaĵo, plej evidente kontraŭdiras ties spiriton ; ĝia esenco ja estas nei la forton, la efikon de ideologioj kaj atribui ĉiun aliĝon en la socioj al ekonomiaj faktoroj. Sed pri tio mi ne volas insisti kaj limigos mian rezonadon al la konstato, ke la bolŝevistoj aplikis kaj daŭre aplikas la doktrinon mem.

Kiel mi jam montris, laŭ Marks kaj Engels, la moralo povas esti nur ia **rezulto** de ekonomiaj faktoroj kaj ne la apliko de difinitaj kaj obeindaj principoj. En la rilatoj inter la klasoj kaj homoj la determinanta kaŭzo estas "proporcio de fortoj". En la vivbatalo temas esti la plej forta. Por la proletaro la tuta demando kuŝas en ĉi tio : venki la burĝaron. Tiucele politika organizo estas necesa kaj por la bolŝevista partio temas esti pli forta ol ĉiuj aliaj tiaj organizoj kaj tiel per **ĉiaj rimedoj** (Lenina diro) kapti kaj teni la politikan potencon. La bolŝevistoj tre lerte kaj ruze aplikis tiun taktikon. Ĉe la komenco de l' rusa revolucio la "malamikoj" konsistis el burĝoj, socialistoj kaj anarkistoj. Ĉiuj jam delonge estas ĉu mortpafitaj aŭ malliberigitaj. Poste en la bolŝevista partio mem estiĝis diversaj opoziciuloj ; al ili estis aplikataj la samaj rimedoj. Zinovjev, la prezidinto de "Komintern", kaj multaj aliaj malnovaj kaj famaj bolŝevistoj estas per revolverpafado elmondigitaj. Nur unu, Trocki havis la bonŝancon esti ekzilita. Nun li plenigas la mondon per kritikoj, riproĉoj kaj malbenoj al Stalin. Kvankam oni emas nature kompati al viktimoj, tamen racie pensanta homo, bone informita pri la sovetia demando, ne povas malatenti la fakton, ke la okazaĵoj menciitaj estas la logika konsekvenco de l'marksisma senetikeco.

En la tuta dramo temis ja pri "proporcio de fortoj"

(Esprimo ofte uzata de Trocki mem). Stalin estas pli forta ol liaj kontraŭuloj. En mala okazo li mem estus en ekzilo aŭ mortpafita. Estas fakto, ke Zinovjev kaj Kamenev, ekzemple, deziris, siatempe, ke Trocki estu mortkondamnita. Tia sorto ĝuste atendis ilin kelkajn jarojn poste... Sed estas ankaŭ neforgesinde, ke Trocki mem ordonis pafadon al la Kronŝtadaj maristoj, kiuj estis ribelintaj, por postuli ĝuste tion, pri kio li nun agitas, nome, la liberan funkciadon de l'sovetoj, kiuj fariĝis nuraj instrumentoj en la manoj de l'bolŝevista partio.

Kvankam mi neniam estis tre ortodoksa komunisto, tamen mi apartenis al la franca kompartio ekde ĝia fondiĝo ĝis 1929. Tiam mi havis la esperon, ke **Komintern** povus forte antaŭenpuŝi la esperantan aferon. Estis naiva iluzio... Pro mia okupiteco en la SAT-movado mi ne partoprenis aktive en la politika agado. Tamen mi havis plurfoje la okazon ĉeesti kunsidojn de la t.n. **ĉeloj** komunistaj, kiuj laŭ instrukcioj el Moskvo devas ekzisti kaj funkcii en ĉiuj laboristaj aŭ kulturaj organizoj. Tie mi povis proprasparte konstati, kiel bolŝevistoj makia-vele, jezuite agadas por akiri la gvidpostenojn en la celitaj organizoj ; mensogoj, kalumnioj, plej drastaj demagogaj rimedoj estas uzataj. La Lenina **perĉiarimedeco** estas diligente aplikata - kaj ofte kun sukceso. Kiu vidis propokule la funkciadon de komunista ĉelo, tiu facile komprenas la spiritostaton de la oligarkoj el la Kremlo, kiuj buĉas unuj la aliajn kun facila konscienco. Tiuj senprincipaj homoj agas instigite de l'pasio por regado, de senbrida potenc-avido. Ĉe ili la komandemo estas pli forta ol la riĉiĝemo kaj ilia propra konduto refutas perekszemple la marksan ekonomiiismon...

Kiam Lenin rekomendis uzi **ĉiajn** rimedojn en la politika batalo, tiam fakte li elpensis nenion novan. Tri cent okdek jarojn pli frue Ignaco de Lojola, la fondinto de l' jezuita ordeno, faris similan rekomendon, kiam li diris, ke "la celo pravigas la rimedojn". Sekve, mensogo, kalumnio, murdo ks. estas allaseblaj, se ili kondukas al la celo. La sola demando estas : ĉu bona kaj ĝusta la celo? Por katoliko, kiu firme kredas, ke la papo estas rekte inspirata de dio kaj sekve ne povas erari, rilate al dogmaj aferoj, la demando estas facile respondebla. Same facile povas trankviligi sian konsciencon la bolŝevisto, kiu parolas kaj agas en la nomo de l' "Scienca Socialismo". En nia epoko la vorto **scienco** efikas sur homojn,

ĉefe sur tiujn, kiuj ne estas mem scienculoj, kiel la vorto **dio** sur kristanon.

En la verkaro de Marks troviĝas parto, kiu povas esti konsiderata kiel "scienca", tiu, kiu priskribas la funkcion de l'moderna kapitalismo kun ĝiaj ekonomiaj krizoj, aŭ la procedon laŭ kiu kreiĝas plusvaluto. Sed kiam la fama teoriulo celas antaŭmontri la vojon, kiun nepre sekvos la homaro en sia evoluo ; kiam li atribuas al la proletaro la "historian mision" starigi senklasan socion, tiam liaj diroj perdas sciencon karakteron. Cetere, sufiĉas kompari la nunan staton de l'mondo kun la asertoj, troviĝantaj en la "Komunista Manifesto", verkita antaŭ 89 jaroj, por konvinkigi pri la grado de ilia erareco.

Nur homoj blindigitaj per partieca pasio ne povas vidi la erarojn de Marks. Ili estas tiel okulfrapaj, ke en la lastaj jaroj troviĝis marksistoj por deklari, ke nur la **esplormetodo** valoras en la doktrino. Tiuj similas al la budaistoj, kiuj asertas, ke ĉio, kio ne estas racia, tio ne povas esti la instruo de Gotama Ŝakamunio.

La historio montras, ke la jezuitoj portas la respondecon pri multaj krimoj, eĉ pri militoj inter gentoj. Sed malgraŭ ĉiuj siaj intrigoj, malgraŭ sia mirinde bona organiziteco kaj la granda intelekta kapablo de multaj el siaj gvidistoj, tamen ili ne sukcesis triumfigi la katolikismon en la tuta mondo. Simile la bolŝevistoj malsukcesis en siaj klopodoj por okazigi mondrevolucion. Komintern simple fariĝis aparato el obeemaj dungitoj, kies tasko estas servi al la interesoj de la eksterlanda, naciista politiko de Stalin, kiu finfine sukcesis regadi pli absolutisme ol la caro mem. Aliparte, ne ekzistas en Sovetio la plej eta signo, ke la nova socisistemo evoluas al senklaseco. Male, fariĝas pli kaj pli certe, ke novaj klasoj starigas. En neniuj kapitalista lando la diferencoj inter la vivkondiĉoj de diversaj kategorioj da homoj estas pli grandaj ol tiuj jam nun ekzistantaj en Sovetio. La laboristaro estas servutigita ĝis grado apenaŭ pensebla. Nur unu ekzemplon mi menciis : la **interna** pasporto, kiu ekzistis en la cara tempo, estis restarigita antaŭ kvar jaroj kaj neniuj povas sen tiu legitimilo vojaĝi el urbo en alian. Japano ne bezonas pasporton por iri el Tokio al Osaka, sed rusoj bezonas ĝin por iri el Moskvo al Leningrado.

La fruktoj de l'bolŝevista arbo estas tre amaraj kaj malmolaj ; oni do povas konkludi, ke ĝi estas malbona

kaj kreskis en netaŭga grundo. Tio pruvas, ke la "historia materialismo" ne liveras bonan fundamenton por konstrui harmoniecan socion.

La homo estas animalo, kiu kapablas koncepti.

Se mankas kredo je Dio, kiu estus doninta al la homaro kvazaŭ moralan kodon, nepre obeendan ; se, aliparte, erara estas la marksista vidpunkto, laŭ kiu la moralo estus ia rezulto de ekonomiaj faktoroj, kie do ni serĉu moralan fundamenton ? Moralaj principoj ne ekzistas konkrete (en si); pri tio mi konsentas. Sed la homo kapablas abstrakti, koncepti. Geometriaj aksiomoj ankaŭ ne ekzistas konkrete ; tamen homoj konceptis ilin kaj inĝenieroj, teknikistoj kaj metiistoj obeas al geometriaj principoj, kiam ili laboras por konstrui maŝinon aŭ ponton. Kiam oni observas kamparanon en lia laboro por prepari rizbedon, tiam estas videble, ke li penas por obei al la principo de horizonteco. Li ja scias, ke la maldika tavolo da akvo ne surkovros la tutan supraĵon, se ĝi ne estas horizonteca.

Ne necesas vadi en metafizika marĉo por eltrovi moralajn principojn. La homa cerbo jam delonge kapablis ilin koncepti, restante sur pozitiva grundo. Kaj notinde estas, ke filozofoj el diversaj skoloj renkontiĝas akorde kun la fondintoj de grandaj religisistemoj universalaj, rilate al kelkaj fundamentaj principoj de moralo. Budao kaj Kristo, Konfucio kaj Sokrato, Spinozo kaj Kanto, ĉiuj diris resume proksimume jenon : **mensogo, ŝtelo, murdo estas malbonaj faroj ; amo al la proksimulo, sincero en la koro, plenumo de promeso libere farita, altruismo, ĉio tia estas bona kaj nepre alcelinda ; tio kondiĉas kaj certigas pacon inter la homoj.** Se al tiuj sentencoj, kiujn oni povas iel konsideri aksiomecaj, estas aldonita la koncepto pri **justo**, tiam estas trovita firma fundamento por ellabori kondutregulojn.

Agi juste, ne ekspluati ; postuli justan traktadon kaj kontraŭstari al ĉia ekspluatado, tio estas logika konsekvenco el la ĉi-supre elmetitaj principoj. Kie ne regas justo, tie latente ekzistas malpaco, milito. Homoj devas plie akiri kaj teni senton pri sia propra digno kaj ĝi ne povas ekzisti inter mastroj kaj sklavo. La religioj fiaskis en sia celo starigi pacon kaj fratecon sur la tuta tero. Eble pro tio, ke ili malatentis la ekonomian flankon de l' vivo. Objektivaj kondiĉoj por paca mondo cetere ne

ekzistis, ĝis la scienco kaj tekniko liveris al la homoj la necesajn rimedojn por utiligi la naturajn riĉaĵojn el la tuta planedo. Ne sufiĉas rekomendi korpan puron al homoj, se mankas al ili sapo kaj akvo. Sed estus ankaŭ eraro kredi, ke sufiĉas liveri tiujn necesajojn, por ke ĉiuj homoj eklernu kaj observu higienajn regulojn. Higieno kaj moralo estas homaj elpensoj ; higienaj reguloj kaj moralaj principoj ne estas simpla rezulto de diigitaj produktofortoj. Kiuj sincere deziras labori por starigi pacon kaj harmonion sur la tero, tiuj celkonforme devas havi klaran komprenon pri neceso de moralo. Sen ŝato kaj obeo al moralaj principoj la homoj iel statas kiel rabaj bestoj en ĝangalo. Kaj la spektaklo, kiun liveras la marksista papo el Moskvo pensigas pri sangosoifanta tigro. Ĝenerale la homo estas nature egoista. Cetere la vivo mem postulas tion. Nur per la edukado oni povas bridi la egoismemon kaj envojigi ĝin laŭ socieca direkto. Tio estas la celo de l'moralo. Sed se oni instruas, ke la moralo estas ia rezulto ekonomieca, ke temas en la rilatoj inter la homoj nur pri "proporcio de fortoj", tiam oni restas en ĝangalo aŭ tien reiras ; tiel oni preparas grundon sur kiu ĝermos kaj elkreskos despotismo. Tion la sovetia eksperimento pravas plej evidente...

La asketismo per si mem ne estas moraleca. Asketo povas eĉ turmenti sian korpon (tion faras kelkaj monakoj kaj tia faro liveras plian pruvon pri la forto de ideoj) sen iu bona rezulto por aliaj homoj. Kiu emas vivi askete, tiu havu kompreneble la rajton tion fari. La celo al budateco ne ŝajnas al mi enteni ion esence moralan en tiu senco, ke ĝi estas pure individueca. Cetere, la celado por neniigo al ĉiuj bezonoj de l'korpo iel similas al senflugila flugemo. Penadi por ne esti sklavo de siaj deziroj, tio estas tre racie alcelinda. Sed la kontentigo al la **naturaj** bezonoj (t.e. kiuj konformas al la postuloj de la speco) estas neniel evitinda.

Mi ne prezentas al mi saĝulon per la bildo de homo kun funebra aŭ senesprima mieno. La ridemo estas io propre homa. Bestoj ne ridas. Se neniu kapablas liveri absolute certan respondon al la enigmoj, kiujn metas antaŭ nin la sfinkso de l'Vivo, ni povas almenaŭ ridi al ĝi en la vizagŝono.

Kaj kiu kapablas moke ridi pri si mem, tiu laŭ mi estas saĝa...

Tre bone mi konscias, ke ĉi tiu skribaĵo estas manko-

ĥava ; sed por konvene pritrakti la temon, necesus verki volumon - kiun eble neniu kuraĝus legi ĝis la fino. Sufiĉu do, ke la legantoj de "Tempo" eksciuj, ke mi ne predikas malgajigan moralon.

Kvankam mi kutimas agi tre serioze en la vivo, tamen mia natura emo estas prikonsideri ĝin kiel grandan tragedi-farson. Tian vivkoncepton mi verŝajne akiris per la legado de l' verkoj de **Rabelezo** (16-a jarcento), de **Volter** (18-a j.), de **Anatol Frans**, **Han Riner** (20-a j.) kaj de aliaj samspecaj aŭtoroj ; sekve ĝi ne estas ia rezulto de "produktfortoj".

- Antaŭ ol cerbumadi kaj verkadi necesis tamen, ke viaj majstroj ne malsatu, sendube pensos kelkaj legantoj.

- Jes ja, tiu **kondiĉo** estis necesa. Sed miavice mi demandu : Ĉu vi neniam vidis bone nutritajn homojn, kiuj tamen ne kapablas verki libron, inventi maŝinon aŭ elpensi esp-on? Homoj elpensis geometriajn kaj moralajn principojn. Konstruistoj, kiuj ignoras geometrion, fiaskas en sia laboro. Same fiaskas ĉiuj, kiuj celas starigon de paco sur la tero kaj ignoras moralon. Utilas aldoni, ke mi ne samigas moralon kun plenumo al ritoj, ceremonioj k.s. religiaĵoj.

*

LETERO KVARDEK-DUA

Al Parizaj Gek-doĵ

Jamaŝiro, 6-7-37.

... ..

Antaŭ kelkaj tagoj mire mi relegis en mia broŝuro : "Où en est la question de la Langue Internationale?"(1) jenan frazon : "La L.I. ne fera donc pas disparaître les langues nationales..."(2). Kaj la tuta frazo montras, ke mi bedaŭrus, se ili malaperus. Tio pravas, ke ĉe la komenco de mia esperanta kariero mi ne estis vera sennaciisto. Necesis kelkjara praktikado de nia lingvo kaj ĉefe la partopreno al SAT-Kongresoj, por ke mi povu iom post iom tute liberiĝi el pli malpli senkonscia naciecemo. Kaj tamen vi scias, ke ĝis 1914 mi estis anarkisto kaj tute sub la influo de Reklu(3), Kropotkin, Grav k.a. teoriuloj anarkistaj. Se tiam iu dirus, ke mi estas naciisto, aŭ almenaŭ naciecemulo, mi protestus. Kaj tamen nun mi **konscias**, ke fakte mi estis tia. Mi havas la konvinkon, ke ĉiuj nuntempaj anarkistoj neesperantistaj ankaŭ estas nekonsciaj naciistoj. La faktoj, kiujn mencias "Le Combat Syndicaliste"(4) pri la sinteno de hispanaj anarkistoj alportas konkretan pruvon favore al mia aserto. Vi eble rebatos, ke Benar(5) kritikis la sintenon(6) de la hispanaj K-doĵ. Nu, mi estas forte konvinkita, ke li mem k.a. francaj anarkistoj agus tute same en samaj cirkonstancoj. Iliaj kritikoj ne enhavas eĉ la plej etan aludon al la neeblo starigi senŝtatan socion en Katalunio nur. Tamen, estas al mi klare, ke nek Italio, nek Germanio, nek Britio, nek eĉ la popolfrota Francio Bluma(7) tolerus tion. Vole

(1) Kiel statas la demando pri Internacia Lingvo? - 1919.(Kompil.)

(2) Sekve la I.L. ne malaperigos la naciajn lingvojn. (Kompil.)

(3) Elisée Reclus, aŭtoro de **Universala Geografio, La Homo kaj la Tero** k.a. sciencaj verkoj alte ŝatataj, sen menciis liajn verkojn en kiuj li prezentis kaj subtenis la anarkismon.

(4) **La Sindikatista Batalo**, semajna gazeto, aperanta en Francio.(Kompil.)

(5) Besnard, la gvidanto de l'menciita organo. (Kompil.)

(6) Kelkaj anoj de Iberia Federacio Anarkista, kiuj konsentis partopreni en la registaro. (Kompil.)

(7) Moka aludo al Leono Blum, la tiama ĉefministro kaj longdaŭra gvidanto de l'Socialista Partio. (Kompil.)

nevole ĉiuj partoj de nia planedo pli kaj pli fariĝas dependaj unu de la aliaj. Taŭga solvo al la nuntempaj problemoj sociaj ne estas trovebla ekster la organizado de mondmastrumado, de mondregno. Kaj nur esperantistoj kapablas prezenti al si tian organizadon, tial ke ili povas ignori la lingvajn limojn, la naciecan instruadon kaj ĉion similan. Por esti sennaciisto t.e. koncepti sennaciecan organiz-manieron kaj sennaciecan soci-arangon, necesas nepre esti unue esperantisto. El tio mi konkludas, ke la neesperantistaj anarkistoj, kiuj permesas al si malrespekte paroli pri sia respektiva nacio estas tute nekonsekvencaj. Ili fakte estas, kiel mi antaŭ dudek jaroj nur internaciistoj, t.e. nekonsciaj naciistoj.

La sinteno de l'P.K. de S.A.T. rilate al la hispania tragedio - aŭ frenezaĵo - ŝajnas al mi ĝusta. Nia eksterpartia, ekstertendenca Asocio ne devas favori ĉu la tendencon el Valencio (Popola Fronto) ĉu tiun el Barcelono (Informa Bulteno). Mi ja havas tre klaran kaj firman opinion pri la konduto, kiun devus havi esperantistoj, almenaŭ ĉiu ajn sennaciisto, rilate al la hispania milito ; sed mi ne konsentus doni konsilon : ĉiu decidu mem pri siaj farotaĵoj...

Kompreneble, kiu kredas, ke en Sovetio konstruiĝas socialismo, tiu povas argumenti, ke en Hispanio oni ankaŭ povas fari la samon. Bedaŭrinde, la Stalina diktatoreco, kiun jam delonge mi nomas ruĝa faŝismo, havas absolute nenion komunan kun socialismo. Se mi tiom ofte kaj forte insistas pri tio, estas tial ke samigi la nunan soci-arangon sovetian kun socialismo, tio estas fakte kompromiti kaj malutili al la vera socialismo. La kapitalistoj, kiuj ĝenerale estas pli bone informitaj pri la reala situacio en Stalino ol la laboristoj, tute ne timas tian "socialismon". Tial kapitalistaj landoj nun rilatas amike kun la kremlaj oligarkoj ; tial Litvinov povas en Genevo kaj alie ludi sian naciece-diplomatian rolon.

La liberalisma kapitalismo pli kaj pli montras signojn de kolapso kaj Sovetio kun sia nova klaso el teknokratoj k.a. plusvalutelsuĉantoj fariĝas imitinda modelo por la samspeculoj el kapitalistaj landoj. Tio klarigas bone, kial nun parto el la burĝaj gazetoj raportas favore pri Stalino...

Tre interesis min la opinioj pri la ironia artikolo ;

(1) ili estas al mi tre instruaj. Necesas ja scii, kia estas tra la mondo la grado da komprenpovo pri tia verkmaniero. K-do B. el Nederlando skribis, ke li aŭdis legintojn de tiu artikolo diri, ke oni ja devas reveni al la neŭtralismo kaj gratulis la aŭtoron pro lia artikolo. Unuvorte, li komprenis ĝuste la malon de tio, kion mi pensas kaj provis komprenigi. Sed aliaj legintoj tute ĝuste komprenis kaj la demando estas : kioma estas la proporcio da nekomprenintoj ?

Perfekta interkompreniĝo inter ĉiulandaj esperantistoj povos okazi nur kiam ekzistos diversstilaj verkoj **klasikaj**. Sendube KANDID ne fariĝis tia. Sed estas evidente, ke la nekomprenintaj legintoj de mia artikolo ankaŭ ne komprenus la ironion de Volter...

(1) Temas pri : **Vivu la Neŭtralismo!** kiu aperis en la maja (1937) n-ro de "Sennaciulo" kun la subskribo : Arigato Gozaimasu. (Kompil.)

LETERO KVARDEK-TRIA

Al A.v.d.H., Germ.

Jamaŝiro, 12-8-37.

Estas ĉi tie varmege kaj ŝvitige ; plie diversaj, pikemaj insektoj preskaŭ senĉese persekutas min. Mi sopiras al poluso! Tamen mi ne volas prokrasti respondon al via letero. Cetere, skribi leterojn estas preskaŭ mia ĉefa okupo. Mia familio estas disa tra la mondo kaj nur per la plumo kaj poŝto mi povas interrilati kun miaj familianoj. Ĉi tie ankaŭ mi certe havas parencojn, sed ial mi ne povas havi rilatojn kun ili. Tio estas al mi ĉagrena, mi certigas al vi. Aliparte estas tro da aferoj, kiujn mi ne sukcesas kompreni. Mi rakontu al vi unu : lastatempe mi faris 12-tagan rondvojaĝon por viziti la klasikajn lokojn el la lando. Okaze de tiu vojaĝo mi haltis tri tagojn en Tokio, kie mi antaŭe loĝis kaj havis okazon konatiĝi hazarde kun artisto, kiu restis dum kelka tempo en Francio kaj parolaĉas la francan lingvon. Nu, li estis kontenta revidi min kaj proponis, ke mi tranoktu en lia hejmo. Al tio mi konsentis. Nu, post mia foriro lin vizitis trifoje policistoj kaj plie li devis iri mem al la ĉefpolicejo por doni precizigojn. Kaj tie li eksciis, ke mia nuna gastiganto, kiu akompanis min dum la vojaĝo (ĉiujn elspezojn por li mi pagis) informis la policon pri mia ĉeesto ĉe la artisto kaj plie parolis al li malsimpatie, iel suspektige. Jam mi estis ĉe la komenco mirigita, ke, kiam venas al la hejmo de mia gastiganto policistoj, ili restas dum horoj, trinkas teon kaj babiladas kaj kion plian, mi ne scias. Tiel ke nun mi emas pensi, ke la tuta afero pri mia gastigado ĉi tie en malgranda urbo estas aranĝita de la polico mem. S-ro T. estas policano, - almenaŭ amatora. Mi jam diris sufiĉe por ke vi eksci, ke miaj nunaj rilatoj kun la "liberpensa" budaisto ne povas esti... tiel varmaj kiel la nuna vetero. Se ne estus la fakto, ke mi pagas ĉi tie trione malpli ol en urbo, mi jam estus foririnta... Sed kien ? Tial ke mi jam pasigis 5 monatojn en la ĉefurbo, mi ŝatus loĝi dum kelka tempo en alia urbo. Nu, dum mia vojaĝo, en Kioto mi aranĝis, ke tien mi venos, kiam mi forlasos Jamaŝiron. La tieaj esperantistoj konsentis al tio kaj promesis trovi por mi ne tro karan ĉambron (la valor-reduktaĵo de l'franko jam forprenis la duonon de mia pensio). Sed, intertempe, mi

ricevis leteron de la sekretario de l'grupo, kiu petas, ke mi rezignu mian intencon iri al Kioto. Evidente la polico ne volas, ke mi rilatu kun esperantistoj. Se mi diros, ke japano povas esti arestita kaj malliberigita dum 29 tagoj, ne ricevante de l'polico iun ajn klarigon pri la kialo, vi komprenos facile, ke tiu minaco povas ŝanceli la deziron de esperantistoj interrili kun mi. Kaj tamen mi ne estas spiono, nek Stalinano, nek Trockiano, nek alispeca tiaulo...

Mi legis la tutan ampleksan libron anglalingvan el kiu estas publikigita de S-ro T. unu ĉapitro en esperanto. Pri multaj, - ne ĉiuj, - punktoj mi povas konsenti kun la aŭtoro. Sed de la teorio al la praktiko estas abismo. La budaismo devas esti prijuĝata laŭ ĝia historia signifo. Kaj tiurilate oni povas noti, ke Gotama Ŝakamunio, same kiel Kristo kaj ankaŭ Sokrato **skribis nenion**. Kaj la tiamaj disĉiploj ne interkonsentis pri la "veraj paroloj" de l' Majstro. Sekve, ne eblas akiri certon pri ili kaj oni do povas prijuĝi la doktrinon nur laŭ ĝia apliko fare de diversaj sektoj kaj sektanoj. Kaj ne estas dubeble, ke sur tiu kampo regas superstiĉoj kaj ĉio cetera, trov- ebla ĉe aliaj religioj.

Kion vi diras pri via amiko el A., tio ja interesas min. La vivmaniero ne estas normala kaj mi mem, kiu estas tre "sovaĝa", apartiĝema, tamen deziras rilati de tempo al tempo kun homoj... el ambaŭ seksoj! Sed mi povas certigi al vi, ke mi tute ne sopiras al Francio. Tie mi sentis min **fremda**. Se ne estus la lingva baro kun kiu mi kolizias ĉiupaŝe, mi ne sentus min fremda en Japanio, almenaŭ ne pli ol en Francio. Sed la fakto, ke mi eĉ ne povas daŭre interrili kun esperantistoj estas al mi la plej malagraba afero. Tamen mi ankoraŭ ne decidis foriri el ĉi tiu lando, kvankam mi nun ne scias kien mi iros fine de ĉi tiu monato.

Kun intereso mi notas vian diron pri N...-anoj. Mi havis la okazon interrili kun du el ili kaj mi alvenis al la sama konkludo kiel vi. Mi eĉ konstatis, ke la legado de la N-a verkaro havis ĉe ili ĉefe kiel rezulton nutri vere ridindan pretendemon. Nu, ne gravas, ĉar ni almenaŭ havas ankoraŭ la rajton ridi en la vizaĝon de l'pedantoj! Cetere, se mi ne eraras, la doktrino de N.... bazas sur **absolutaj** principoj kaj tio ne eĉ akordiĝas kun la nuna stato de l'scienco. Absolutaj principoj povas esti nur ide-

alo, al kiu oni celu ; sed idealo restas ĉiam malproksima de l'realo. Radofaristo devas celi fari radojn absolute rondaj ; sed tiaj neniam estis faritaj kaj verŝajne neniam estos farataj.

Ĉu vi ricevis la gazeteton "Tempo", kiun mi sendis al vi? En venontaj n-roj aperos longa artikolo de mi pri "historia materialismo", kiun mi severe kritikis. Mi volonte sendos al vi ekz-on, se vi deziras. Sed? Nu, nur diru...

Kun ĝojo mi ekscios pri la amikoj ; bonvolu okaze diri al ili, ke mi ne forgesis ilin.

Miaj okuloj nun funkcias normale, per la helpo de vitroj. Kiam ili malsaniĝetis, tiam estis pro troa laborado por la afero. Mi ne bedaŭras tiun laboradon ; tiam mia vivo havis celon ; nun kelkfoje mi demandas min : "Kial ci deziras ankoraŭ vivi?". Kaj la nura respondo, kiun mi trovas estas : "Por scii, kio okazos morgaŭ...". Finanalize eble tio estas la plej forta, se ne la sola vivinstigo ĉe multaj homoj...

Mi babilas senplane kaj lasas kuri la plumon ; indulgu al la formo kaj atentu nur la bonan intencon.

*

LETERO KVARDEK-KVARA

Al K-do Julius Ege, Los-Angeles

Jamaŝiro-maĉi, 20-8-1937.

Dankon pro viaj letero kaj ĵurnaloj. Mi ŝatus ekscii kiom da rubloj enspezis s-ro Doson por sia lakea incensado al la Stalina reĝimo. Apton Sinkler konfesas, ke li ne vizitis Sovetion kaj - sekve estas evidente, ke li parolas pri tio, kion li ne konas. Oni ankaŭ povus laŭdegi la Japanan registaron pro la sukcesa flugado el Tokio al Londono - kaj reveno sen la plej eta akcidento, kaj precipe pro la grandegaj atingoj sur la teknika flanko. Sed mi ne insistu pri tio ; nur mi notu, ke jam de kelka tempo mi legis en lab. gazetoj la esprimon : "ruĝa faŝismo", **kiun mi mem uzis antaŭ preskaŭ tri jaroj.** Iom post iom la vero aperos kaj eble la laboristaro ekkompreneos, ke la plej danĝera faŝismo estas la Moskva, tial ke ĝi celas fariĝi tutmonda, se oni juĝas laŭ tio, kio okazis lastatempe en Hispanio.

Mi ja ne sciis pri apero de "Ruĝa faŝismo" en Novjorka

gazeto (1).

Pro la valorreduktiĝo de l'fr. franko mia pensio duoniĝis kaj nun kredeble mi ne povus konvene vivi en Usono; sed ĉi tie mi povas ankoraŭ vivi tre komforte. Kio estas al mi tre malagraba, tio estas, ke mi ne povas partopreni la esp-an vivon, kaj plie, ke multaj esp-istoj forkuras de mi tuj post la sperto, ke simpla renkontiĝo kun mi havas kiel sekvon la viziton de policistoj. Kaj kiam mi estos dirinta, ke japano povas esti arestita kaj malliberigita dum 29 tagoj sen ia klarigo de l'polico pri la motivo, vi certe komprenos facile, ke la timo rilati kun mi estas granda.

... ..

Rilate al la protestoj de personoj, kiuj opinias kalumniaj miajn informojn pri Sovetio, ili estas normalaj. La vera vero bezonas plurajn jarojn por esti akceptita de relative granda nombro da homoj; sed finfine la vero venkos blufon. Mi, kiu estas dubema, tamen tute ne dubas, ke post pli malpli longa tempo la laboristoj ekkomprenos, ke la plej abomeninda ekspluatsistemo estas tiu nun organizata en Sovetio de senkoraj teknokratoj, nova klaso sur kiun sin apogas Stalin k.a. kremlaj oligarkoj.

*

LETERO KVARDEK-KVINA

Al Parizaj Gek-doj

Osaka, 20-9-1937.

Jam de kvar tagoj mi tre suferas pro absceso ĉe la maldekstra mano; ĝi estas tute ŝvelinta kaj la doloro radias ĝis la kubuto. De almenaŭ dek tagoj mi ne vidis esperantiston; pro doloro kaj sendormemo mia soleco estas pli facile elportebla. Eble estus saĝe, ke mi imitu K-inon M. **Aspes** (2). En unu el miaj leteroj mi jam diris, ke ŝi skribis al mi pri sia decido sin mortigi. Mi tuj respondis ŝian leteron kaj provis konvinki ŝin pri neceso forlasi ŝian ideon, tial ke nia movado bezonas ŝian helpon ktp. ktp. Sed tiu letero atingis Francion tro malfrue;

(1) Artikolo el la revueto "Herezulo", kiun eldonis Lanti, kiam li estis forlasinta la gvidadon de S.A.T. - (Kompil.)

(2) Pri tiu SAT-anino aperis nekrologia noto en la aŭgusta (1937)n-ro de "S-ulo". - (Kompil.)

cetere, ne estas certe, ĉu ĝi efikus.

Tute precize mi ne konas la ĉefan motivon, kiu instigis tiun K-inon al sinmortigo. Tamen mi kredas, ke ŝi estas viktimo de la **Armanda** teoriumado en "**L'En dehors**" (1). Foje ŝi konfesis al mi sian naŭzon pri faritaĵoj laŭ la "principoj" de **Armand**. Ĉiam mi sentis malsimpatian por tiu ulo, por tiu majstra sofisto. En libro, kies titolon mi nun ne tute precize memoras ("**Prenez-moi tous**" (2), mi kredas) **Han Riner** aludis al **Armand** kaj komprenigis, ke li ĉefe celas provizi al si virinojn en diversaj lokoj, por ne esti tie devigata viziti bordelojn, kiam li iras en la koncernajn urbojn por paroladi. Verdire mi ne tre ŝatis tiun libron de **H. Riner**; mi eĉ ne skribis al li por danki pro ĝia sendo donaca. Kredeble li verkis ĝin kvazaŭ ŝercon por sin distri...

Mi pensas, ke la idealo rilate la seksan vivon estus monogamio; sed necesus, ke la paroj harmoniu kore, intelekte kaj sekse. Tiaj postuloj estas malfacile plenumblaj. Almenaŭ mi estas konvinkita, ke ĝenerale la virino estas pli ama al unika amo ol la viro. Fiziologie viro povas en unu jaro gravedigi centojn da virinoj, dum virino povas naski en la sama tempo nur unu infanon. Vi povus rebati, ke prostituinoj povas en iu difinita tempo kontentigi la seksajn dezirojn de pluraj viroj, dum ĉi tiuj lastaj ne kapablas en la sama tempo kontentigi la saman nombron da virinoj. Jes, sed prostituon ni deziras nenigi, ĉu ne?

La vera naturo de l'virino estas naski infanojn kaj mi kredas, ke ŝi pli ol viro bezonas hejmon kaj amon. Kredeble K-ino **Aspes** komprenis tion tro malfrue kaj la vivo tiam naŭzis al ŝi. **Armand** portas ian respondecon en ŝia sinmortigo, simile al tio, kio okazas, kiam pastro atingis per sia influo, ke junino monakiniĝu.

Legante la tezon de **Armand**, oni ne povas nei, ke ĝi estas logike kaj bone argumentita; sed unu afero ŝajnas al mi naŭza: la penso, ke li konsentas akcepti karesojn de virino kvazaŭ almozon. Kredeble mi estas tro fiero, sed nenial mi konsentus tiurilate almozi. Kaj mi estas tre scivola ekscii, kiel kondukis la teoriulo, se maljuna,

(1) Franclingva gazeto, individuista, kies ĉefa enhavo rilatas al seksaj aferoj. **Armand**, la eldonanto, starigis asocion laŭ kies reguloj, la ganoj devas pravi sian "veran kamaradecon" per konsento de sekstrilatoj kun ĉiu ajn ano de la organizo. - (Kompil.)

(2) "Prenu min ĉiuj". - (Kompil.)

malbela K-ino almozpetus al li por si mem...

Jes ja, nun mi tre suferas kaj se mi ne tuj imitas **Aspes-n**, estas pro tio, ke mi eble povas esti ankoraŭ iomete utila al la esperanta afero. Kun ĝojo mi legis pri la bonsukcesa kongreso en Roterdamo (1). En normala tempo, kaj se ne fuŝus diversspecaj skismigantoj, nia movado jam estus atinginta grandiozan rezulton. Almenaŭ pli ol iam ajn mi havas la konvinkon, ke ne ekzistas pli taŭga vojo ol tiu, kiun ni elektis. Nur partie blindigitaj fanatikuloj povas ne kompreni, ke la partioj - kiaj ajn! - atentos la esperantan aferon, nur kiam ĝi estos reale forta. Kaj ĝi montros sian forton per imponaj kongresoj kiel la lasta, per ampleksa, ofte aperanta gazetaro, per valora kaj abunda literaturo kaj per la praktikaj servoj, kiujn povas fari nur mondorganizo kiel SAT...

23-9-1937. Tial ke mia mano kaj eĉ brako pli kaj pli doloris, estis necese, ke mi iru al kuracisto. Mi do sciigis iun esperantiston pri mia sanstato kaj mi povas ĝoje raporti al vi, ke tuj li venis al mia ĉambro kaj akompanis min al kuracisto. Ĉi tiu lasta opiniis, ke operacio necesas, ke temas pri flegmono. Nu, mi ne longe ŝanceliĝis kaj baldaŭ sterniĝis sur la operaci-tablo. Mi ne bezonas klarigi al vi, ke dum kelkaj minutoj - longaj kiel horoj, kio pruvis al mi la relativon de l'tempo pli bone ol la klarigoj de Ejnŝtejn(2) - mi estis turmentata per la tranĉoj kaj premoj por eligi la puson. Espereble la resaniĝo okazos normale ; almenaŭ nun mi povas pli malpli bone dormi kaj tio estas tre ĝuinda. Mia malsano havis kiel kompenso, ke, eksciinte pri ĝi, kvar geesperantistoj vizitis min kaj montris unufojon pli, ke esperanto estas interfratigilo. Oni ne povas postuli, ke ĉiuj homoj estu herooj. Kaj mi kredas, ke en Tokio, se mi estus malsana, la tieaj esperantistoj, kiuj tiam forkuris de mi, ankaŭ helpus min en tia okazo. Mi ne preterlasu ankaŭ diri al vi, ke ĉe la kuracisto (ne-esperantisto) mi havis la impreson esti ĉe amika hejmo. Li proponis teon por trinki kaj sidis ĉe sama tablo kiel mi, mia akompananto k.a. pacientoj, kiuj ankaŭ atendis. Tia estas malnova kutimo, kiu tendencas malaperi...

(1) La dekseca Kongreso de SAT. - (Kompil.)

(2) Einstein. - (Kompil.)

LETERO KVARDEK-SESA

Al K-do L.B., Parizo

Osaka, 29-9-1937.

Ĝus alvenis via sendaĵo el la 5-a de aŭgusto kun slipo, aldonita de la cenzuro, kiu informas, ke la "Manifeste des Anationalistes"(1) estas konfiskita. Sed samtempe mi ricevis vian pli postan sendaĵon en kiu troviĝis ekzemplero de l'sama verketo en angla traduko!!?...

... Por ke vi sciuj ĝuste pri la grado de devastiĝo de la angla lingvo ĉi tie, mi devas korekti mian antaŭan informon. Fakte aperas kvar ĉiutagaj ĵurnaloj kaj ne nur tri kiel mi diris. Antaŭ kelkaj tagoj mi povis aĉeti : "The Japan Chronicle", kiu aperas en Kobe. Plie mi trovis en librejo : "The Manchuria Daily News", kiu aperas en Dairen. Kiel diras la titolo, ĝi ankaŭ estas ĉiutaga. En ĉi tiu lasta ĵurnalo mi legis tre interesajn informojn kaj povis konstati, unu fojon pli, ke ĝenerale la eŭropa publiko estas misinformita pri orientaj aferoj. Silento pri faktoj egalas al misinformo.

... Neniel mi emas riproĉi al vi pro publikigo de l' patriota parolado de la ĉina eksministro Ĉen-mig-ĉu (n-ro 54/55, "S.R."). Tamen la legantoj ricevis per tio tro unuflankan bildon pri la situacio en Ĉinio. Tial mi kredas, ke estas utile konigi ankaŭ la vidpunkton de alia ĉina patrioto, nome Ĉi-Ksje-Juan, generalo kaj prezidanto de la asocio **Grand-Azia Societo**. Tiu eminentulo parolis per radio la 24-an de sept. 37 kaj la ĵus menciita ĵurnalo raportis pri tiu parolado. La temo estis : **Azio al la Azianoj** kaj la argumentado celis pruvi : 1) ke la Nankina registaro estas sub la influo de fremduloj, precipe de rusoj ; 2) ke ĝi estas plene respondeca pri la nuna milito ; 3) ke Japanio ne havas teritorian anekselon kaj deziras nur pace kaj libere komercadi kaj rilati kun Ĉinio ; 4) ke Japanio kaj Ĉinio devas alianciĝi por fordetru la influon de fremduloj en Azio kaj atingi, ke tiu kontinento estu plene libera kaj suverena.

Se iu dirus, ke tiu generalo estas subaĉetita de Tokio; se aliu rebatus, ke Ĉang-Kaj-ŝek estas subaĉetita de Londono kaj Moskvo, mi ne sciuz, kion respondi. Ne eblas

(1) Franclingva eldono de "Manifesto de la Sennaciistoj". - (Kompil.)

kontroli tiajn asertojn. Sed pri kio mi ne dubas, tio estas, ke la ĉinaj kulioj kaj kamparanoj havas absolute nenian intereson aliĝi al la vidpunkto de iu ajn el tiuj generaloj.

Mi legis raporton, laŭ kiu la vivnivelo de l'proletaro en Manĉukuo iom plialtiĝis, de kiam japanoj regas tie. Ne eblas nun al mi kontroli la fakton. Almenaŭ estas tute certe, ke la sorto de l'ĉina popolo ne povas esti pli mizera ol ĝi estas sub la regado de l'generaloj el Nankin kaj Kanton. Pri tio atestas ĉina esp-isto mem, Cicio Mar, en sia antaŭ nelonge aperinta libro : "Forgesitaj homoj". Kredeble tiu aŭtoro tamen estas naciisto kaj volas la sendependecon de sia lando. Ĉinaj intelektuloj, studentoj k.s. kiuj konsistigas la regantan klason en Ĉinio, aŭ aspiras al tio, kompreneble havas ian intereson regi kaj ekspluati mem anstataŭ fremduloj, ĉu japanaj aŭ aliaj. Sed tiu kategorio da homoj reprezentas tre malgrandan pocenton kaj mi pensas pri la tuta popolo, kiu en sia grandega plimulto ne havas atomon da intereso oferi sian vivon por la gloro kaj ambicio de iuj ajn regemuloj.

Kiam mi estis en Jamaŝiro, tiam Cicio Mar mem sendis al mi el Tokio sian libron. Kun li mi interŝanĝis kelkajn leterojn. Almenaŭ estas notinde, ke proksimume 10 000 ĉinaj studentoj troviĝas en Japanio kaj entute proksimume 100 000 ĉinoj. Kion japanoj lernis en Eŭropo, tion ili nuntempe instruas al ĉinoj. Ne necesas esti profeto por antaŭvidi, ke la rolo de Eŭropo pli kaj pli malgravigos sur la industria, komerca, diplomatia kaj kultura kampoj. Kiam oni rigardas al Eŭropo el 20 000 kma distanco, mi certigas al vi, ke tiam oni nepre ricevas la fortan impreson, ke la tuta agitado kaj klopodado por teni sendependaj kaj suverenaj la tieajn naciojn estas vere infaneca, ridinda.

La vivo ĉi tie estas preskaŭ tute normala. Tamen mankas... flagoj kaj standardoj! Jes, tion mi legis en ĵurnalo. Fakte mi ne estas mirigita pro tia sciigo. La konsumado de tiuj objektoj estas vere grandega. Eĉ surstrata ŝupurigisto ornamas sian laborlokon per flago ; ne malofte mi vidis flage-ton en la mano de suĉinfano, ligite portata sur la dorso de sia patrino aŭ vartantino. Sur la kamparo, en ĉiu vilaĝo vidiĝas longa bambua stango, vertikale ligita ĉe supra branĉo de l'plej alta arbo kaj super ĉio flirtas tuketo kun ruĝa disko. Neniu pordo, neniu fenestro estas sen flago ; ĉie pendas, flirtas banderoloj, tukoj kaj simil-

aĵoj, per kiuj estas elmontrita la nacia sento. Estas ia frenezo, ia ebriiĝo... Kredeble venos la senebriiĝo kun la kapdoloroj. Sed pasos pluraj monatoj, eble jaroj. Similan frenezon mi vidis en Parizo dum la jaro 1914. Kelkriate la parizanoj estis eĉ pli malsaĝaj ol la japanoj. Mi ne povas forgesi, ke ĉe la militdeklaro bandoj da furioziĝ-intaj homoj detruis la butikojn, kies ŝildo surhavis nomon kun germana aspekto. Mi jam diris, ke en Japanio estas multaj ĉinoj. En mia kvartalo estas pluraj ĉinaj restoracioj kaj preskaŭ ĉiutage mi preterpasas ilin. Neniam kaj nenie mi konstatis elmontron de malamo al ĉinoj.

Kelkaj el miaj korespondantoj eldiris sian miron, ke mi havas simpatian por la japana popolo, kiu estas "freneze militema". Estas fakto, ke ĉiuj japanoj, viroj, virinoj kaj infanoj, estas nuntempe dresataj por la milito. Sed mi ŝatas seriozajn homojn. Ĉar la nacioj el la tuta mondo faras militpreparojn, neniu el ili povas prave riproĉi al alia pri tio. Se oni akceptas la principon pri neceso de milit-preparado, tiam estas nelogike riproĉi al iu ajn nacio, ke ĝi **serioze** plenumas tiun preparadon. La sinteno de l'labor-partioj el Britio, Francio ktp. ŝajnas al mi tre ridinda. Dum multaj jaroj ili agitis kontraŭ la militismon, rifuzis voĉdoni la militbuĝetojn ktp. ; sed kiam Musolini invadas Etiopion, tiam ili akre riproĉas al la registaroj, kiuj toleras tiun invadon. Kaj finfine ili aprobas ĉian militpreparadon...

La internaciistoj ĉiaspecaj baraktas en kontraŭdiroj, tial ke neniu konsentas al tio, ke lia nacio povus malaperi kiel suverena unuo. La malapero de l'franca suvereneco lasus min tute indiferenta. Kaj al la patriotoj, kiuj argumentas, ke la pereado de l'franca kulturo estus katastrofo por la tuta homaro, al tiuj mi rememorigos, ke Romio armile konkeris Grekion, sed estis mem konkerita **kulture** de siaj venkitoj. Se Francio reale posedas ian kulturan superecon, (pri tio mi ne havas sufiĉan kompetenton por aserti aŭ nei...) ĝi sin trudus al la konkerintoj. Kaj se inter ili estus esperantistoj, mi estas konvinkita, ke tiuj samlingvanoj ne traktus min kiel fremdulon.

Jes, mi ŝatas seriozajn homojn kaj malestimas la pulĉnelojn el la speco de Blum, Dorjo, Torez, Kaŝen, k.s. Ĉi tiu lasta eble tenas la rekordon, rilate al politikaj akrobataĵoj. Ĉe la lasta kongreso de l'franca Kompartio, lia argumentado por kredigi, ke socialismo konstruiĝas

en Sovetio estas vere memorinda. Por apogi sian tezon, li ne trovis pli bonan "pruvon" ol tiun, ke sovetiaj aeroplanoj transflugis la poluson. Laŭ tiu vere sprita rezonmaniero oni povas ankaŭ aserti, ke en Italio prosperas socialismo, ĉar italaj aviadistoj venkis en la lastaj konkuroj!...

Ie mi legis, ke en Italio ekzistas la 40-hora laborsemajno kaj ke la vivnivelo de la laboristoj iom plialtiĝis. Mi ne scias, kion pensi pri tio. Estas bedaŭrinde, ke la kunlaborantoj al la SAT-gazetoj preferas raporti pri interpartiaj disputoj ol pri realaj, laŭfaktaj vivkondiĉoj en iu difinita regiono. Sed mi tre facile kredas ke Hitler, Musolini, Stalin k.a. despotoj volonte konsentus al plibonigo de l'laborista vivo, se per tio ilia aŭtokrateco plifirmiĝus. La pasio por regado estas ĉe multaj homoj pli forta ol la monavido. Tial la akiro aŭ konservo de regposteno estas ĉe ili la ĉefa instigilo kaj decidilo kaj ne la bonstato de siaj regatoj. Ĉe tia konstato mi foje emas kredi, ke la kulto de l'japana popolo por sia "tenno" (hom-dio) ne estas tiel stulta, kiel ĝi ŝajnas unuapense. La situacio de tia regnestro ebligas, ke li pripensu kaj decidu pri ĉio ajn sen ia konsidero pri perdo aŭ konservo de sia posteno.
... ..

*

LETERO KVARDEK-SEPA

Al K-do v.d.H., Germ....

Osaka, 4-10-37.

Kvankam mi forlasis Jamaŝiro-n jam de unu monato, tamen via letero atingis min al mia nova adreso.

Ĉar mia kritiko al la H.M.(1) interesas vin, mi sendis al vi antaŭ kelkaj tagoj po unu ekz-ro de du n-roj de "Tempo", en kiuj vi denove povas legi pri tiu temo. Kompreneble mi ne elĉerpis la tutan argumenteblaĵon; restas multo dirinda, direnda, sed eble ne dirota. Tial ke vi estas el tiuj, kiuj kapablas observi kaj memori la observaĵon, mi ŝatus ekscii vian severan prijuĝon super mia skribaĵo el "Tempo". Viaj kritikoj povus utili al mi, tial ke verŝajne mi denove havos la okazon pritrakti la saman demandon. Necesas ne tro fidi al si mem kaj esti ĉiam

(1) Historia Materialismo. Alude al intervjuo el "Tempo". (Kompil.)

preta revizi sian propran vidpunkton, se faktoj aŭ bonaj argumentoj montras ties erarecon. Mi konscias, ke miaflanke estas eble troa pretendo kritiki famulojn kiel Marks, Lenin k.s. Sed la plej aŭtoritata teorio devas akordi kun faktoj ; aliel ĝi estas nur pli malpli lerta ĵonglado per frazoj. Kaj faktoj pruvas la erarecon de la H.M.

Mi notas el via letero, ke laŭ viaj propraj spertoj vi alvenis al la konkludo, ke eĉ la teorio pri klasbatalo estas kelkrilate revizenda. Tion mi volonte konsentas. La sovetia eksperimento plej klare montras, ke ne sufiĉas detru la regantan klason por atingi senklasecon en la nova socio. En Sovetio kreiĝas kaj firmiĝas nova klaso, kies reprezentantoj estas, plejparte, pli senkoraj kaj komandemaj ol aristokratoj kaj burĝoj. El tio tamen mi ne konkludas, ke la klasbatalo estas nenecesa, sencela. Male! Eĉ se oni pruvus, ke ĉiam ekzistos klasoj, ke tio estas neevitebla, tamen mi opinias, ke la margeno ekzistanta inter ekspluatantoj kaj ekspluatatoj povas esti pli aŭ malpli larĝa laŭ tio, ĉu la ekspluatatoj estas cedemaj, rezignemaj aŭ male postulemaj. Kontraŭbatali la egoismon, kiel vi proponas, tio certe estas alcelinda. Sed la sperto montras, ke ne ĉiuj homoj estas influeblaj per morala predikado. Ĝi efikas ĉefe al la malplej egoistaj kaj lasas indiferentaj la aliajn. Mildto de ŝafo ne povas detru la kruelon de lupo. Kontraŭ ĉi tiun lastan bastono aŭ pafilo estas pli taŭga. En kelkaj okazoj la cedemo de neegoistaj homoj povas havi kiel rezulton plipotenci la egoismon de aliaj. Komprenu, ke mi ne kontraŭas al la moralinstruo ; tute male, kiel vi povos mem konstati per mia letero en "Tempo", sed mi celas al tio, ke homoj ne nur estu neekspluatemaj, sed ke ili plie ne konsentu esti ekspluatataj. Ĉi tiu lasta postulo entenas ĝerme klasbatalon.

Laŭ la H.M. moralinstruo estas senefika, sekve senutila, ĉar moralo estas **ia rezulto** de ekonomiaj faktoroj. Tia vidpunkto ja ŝajnas al mi ne nur erara, sed malbonefika. Ĝi almenaŭ klarigas la fakton, ke multaj proletoj mense ne diferencas de burĝoj ; tiuj kontraŭas la ekspluatadon nur pro tio, ke ili mem ne ekspluatas.

Vi diras, ke homoj povas agi jen bone, jen malbone. Konsentite! Kaj ĝuste pro tio necesas doni al ili idealon pri bono. Bonsana homo povas malsaniĝi, se li tute mal-

atentas higienon. Kiu havas idealon pri morala vivo, tiu devas scii, ke necesas esti ĉiam atenta kaj zorga en sia konduto por ne makuli, perfidi sian idealon. La sperto montras, ke per edukado homoj povas akiri tiel fortan kaj akran senton pri devo, ke kelkaj preferas sin mortigi ol transvivi ties malplenumon. En la historio de Japanio oni trovas multajn ekzemplojn pri tio. La H.M. ne liveras taŭgan fundamenton por eduki tiajn homojn.

La sperto montris, ke la lab. soc. movado fiaskis en siaj klopodoj por emancipi la proletaron kaj pacigi la homaron. Unu el la kaŭzoj de tiu fiasko estas, ke preskaŭ la tuta agado de l'gvidantoj estis agiteca, tre ofte demagogia kaj neniel eduka, moralbaza. Homoj, kiuj estas fide organizitaj sub la gvidado de regemuloj, kies nura celo estas konkuri la politikan povon, tiuj neniam atingos realan emancipiĝon.

La naciismo, la patriotismo estas iu moralo ; ĝi postulas la oferon de l'vivo kaj sekve kontraŭas al la egoismo. Estas fakto, ke aristokratoj, burĝoj, privilegiitoj oferas sian vivon dum militoj. La aserto, ke kapitalistoj okazigas militojn por pliriĉiĝi estas kelkrilate demagogia. Pri tio mi jam argumentis en la artikolo : "**Mi ĝojas esti esperantisto**". En mia kompreno pri moralo, la sento pri **homeco**, pri homa digno anstataŭas la naciecan senton, fieron kaj ceteron. Homoj devus esti pretaj oferi sian vivon por defendi sian homecon, kiel patrioto faras por defendi sian patrion. Sed por doni al la homoj tian senton, necesas unue, ke ili povu interkompreniĝi ; necesas, ke ili parolu la saman lingvon kaj amu ĝin. La simpla konstato, ke la lab. gvidantoj ĉiam ignoris nian movadon sufiĉas al mi por esti plene konvinkita, ke tiaj homoj ne havas klaran komprenon pri organizado de tutmonda movado. Sed...

Ŝajne vi legas la... ŝatatajn gazetojn, ĉar vi eksciis pri la japanlingva eldono de "Kandid". Ĉu mi eraras en mia supozo ? Se ne, vi estas pli feliĉa ol multaj sopirantoj el la "lando kie konstruiĝas..." ktp. Tia eldono estas nura koincido kaj ne rezultas de miaj klopodoj. Sed estas fakto, ke la esperanta eldono instigis kaj helpis la tradukinton. Tion li cetere diras en la antaŭparolo.

Estas memkompreneble, ke kristanoj kredas, ke ilia religio iam venkos la budaismon. Ankaŭ budaistoj opinias, ke la instruo de Gotama Ŝakamunio penetros kaj enplantiĝos en Eŭropo. Fakte en Britio troviĝas budaistoj kaj tie

aperas budaista revuo. Jam multan tempon mi dediĉis al legado kaj studado super budaista literaturo. Ne eblas ekscii, kie troviĝas la vera instruo de Budao. Ĉiuj sektoj pretendas pli bone unuj ol la aliaj prezenti ĝustan komprenon pri la "sanktaj skribaĵoj". Se mi juĝas la budaismon laŭ ĝia praktikado fare de kreduloj, mi konstatas similajn superstiĉojn kiel en la kristanaj eklezioj. Pri mia nuna opinio pri budaismo vi povos legi en la artikolo, kiun mi subskribis "Arigato Gozaimasu", kaj kiu havas jenan titolon : "...**Tial mi konvertiĝis al la budaismo**". Sed ne forgesu, ke mi ironias. Dum kvar monatoj mi vivis kun budaisto (laŭdire liberpensa) kaj povis konstati, ke lia asketa vivo ne efikas mildige, bonige al lia karaktero. Male!...

*

LETERO KVARDEK-OKA

Al K-do L.R., Parizo.

Osaka, 20-11-1937.

... ..
 Nu, ci malsprite ŝercas per ciaj maldiskretaj demandoj pri japanaj virinoj. Por fari "seriozan" (!!) esploron sur tia kampo, necesus ne esti blankbarba kaj precipe esti kapabla pli malpli bone uzi la japanan lingvon. Tamen mi mensogus, se mi dirus, ke post unu jaro mi ne ankoraŭ sukcesis akiri almenaŭ malprecizan opinionon pri japaninoj ĝenerale.

Kiel en ĉiuj mondpartoj, la plimulto da virinoj ĉi tie estas, se ne tute mal- almenaŭ nebelaj. Sed preskaŭ ĉiuj estas ĉarmaj kaj amindaj. Eble oni devas fari escepton pri la "mogas" t.e. la modernulinoj, kiuj sin vestas eŭropstile kaj provas imiti la manierojn de usonanoj, viditaj sur kineja ekrano. Estas strange, ne nur la eŭropaj vestoj ne bele sidas sur la korpo de japaninoj, krom tre malmultaj esceptoj, sed ŝajnas, ke kun la forlaso de sia tradicia kostumo ili ankaŭ demetis sian plaĉan aspekton, sian nepriskribeble logan rideton. Tio estas por mi demando pri kiu mi nun rezignas serĉi respondon. Oni kompreneble povas fari hipotezojn. La fakto, ke virino decidis rompi la tradicion, montras, ke en ŝia menso okazis aliĝo kaj sekve la vestoj per si mem eble ne kaŭzas la aliĝon de l'vizaĝesprimo. Sed ci kredeble ne emas cerb-

umadi pri tia demando. Prefereci volas ekscii, kiel japaninoj rilatas kun viroj. Mi menciis do kelkajn observojn kaj spertojn.

Antaŭnelonge mi trame veturis ĉi tie, en Osaka, akompanate de esperantisto. Apud mi sidis virino, vestita per ceremonia kostumo japanstila ; fronte al mi sidis viro, ankaŭ ceremonie vestita, sed eŭropstila. Post kelka tempo mia akompananto demandis :

- Ĉu vi rimarkis la novajn geedzojn ?
- Ne, mi respondis. Kie ili estas ?
- Nu, la ino sidas apud vi kaj la edzo antaŭ...

Pli malpli diskrete mi observis la disigitan paron dum kelkaj minutoj kaj fine diris demande :

- Sed ili ŝajnas tute fremdaj unu al la alia ?
- Tia sinteno kongruas al la malnova moro...

Forpasis ankoraŭ kelkaj minutoj kaj la novedzo ekstaris kaj pretiĝis por eltramiĝi. La edzino faris same ; kiam ambaŭ estis sur la apuda trotuaro, la ino sekvis je kelkpaŝa distanco la viron kaj se mi jam ne sciis, ke ili estas novaj geedzoj, neniel mi povus eĉ supozeti tion.

Ekster la hejmo, japanaj geedzoj, kiuj ankoraŭ observas la tradicion, kondutas kvazaŭ ili ne konus unu la alian. Oni do ne renkontas ĉi tie parojn, kiuj kuniras brak-enbrake. Nenie estas videbla interkizado. Eĉ patrino ne kisas sian suĉinfanon, - sed tute senĝene vidigas siajn mamojn. La malkaŝa interkizado estas por japanoj io tre vulgara. La manpremado estas tute escepta kaj faro importita. La japanoj salutas sin reciproke per rektangula riverenco, se ili estas eksterdome ; endome, ili genuas sur maton kaj tiam la kapo preskaŭ tuŝas la plankon.

Ankoraŭ nuntempe, la granda plimulto da geedziĝoj okazas per la nura antaŭarango de gepatroj kaj svatanto. La procedo estas proksimume jena : Ni supozu, ke familio A havas filon kaj familio B filinon ; geedzoj de familio C konas la familianojn A kaj B. - S-ro C iun tagon vizitas S-ron A kaj demandas lin "Ĉu al vi plaĉus fraŭlino B kiel edzino por via filo?". Se S-ro A jesas al tiu demando, tiam S-ro C vizitas S-ron B kaj faras saman demandon koncerne la filon de S-ro A. Se li ankaŭ ricevas jesan respondon, tiam, en konvenaj tempoj kaj loko, oni intervidigas la gejunulojn en ĉeesto de familianoj. Se la gejunuloj plaĉas al si reciproke, tiam ambaŭ fameliestroj formale decidas pri la geedziĝo.

Edzo estas ia reĝo en la familio. Lia morala situacio iom similas tiun de l'mikado, rilate al la tuta japana popolo. Pri la reciproka situacio de viro kaj virino en la familio mi havas skriban klarigon de japanino, fraŭlino, kun kiu mi korespondis antaŭ interkonatiĝo. Mi ne povas kopii ŝian tutan skribaĵon, sed mi volas almenaŭ citi kelkajn karakterizajn dirojn. Mi estis, interalie, demandinta al ŝi, ĉu ordinare japanaj edzoj estas fidelaj al sia edzino. Tia demando estis tute netrafa en la okuloj de ortodoksa japanino. Jen, ci prijuĝu mem laŭ ŝia respondo:

"... La vorto "fidela" ne havas sencon en tia kazo.

En japana familio la edzo estas ia superulo kaj la edzino ia subulino. Vi certe ne demandus, ĉu mastro estas "fidela" al sia servisto. Kvankam ĉiu edzino deziras, ke la edzo ne havu seksrilatojn kun aliaj virinoj, tamen ŝi ne demandas lin pri tio ; kaj se ŝi ekscias pri ekzisto de tiaj rilatoj ekster la hejmo, ŝi kondutas al la edzo tute kiel ŝi sciis nenion. Japano pensas, ke edzino estas kva-zaŭ ĉiutaga manĝaĵo kaj eksterhejmaj virinoj frandaĵo..."

"... Mi tute ne kontraŭstaras al la stato de superul-subulineco en la geedza vivo, ĉar mi estas japanino. Mia avino kaj mia patrino same akceptis tian staton sen plendo. Al mi ankaŭ ĝi ŝajnas tute normala..."

Kiam oni scias pri la ekzisto de tia spiritostato ĉe gejapanoj, tiam estas pli facile kompreni, kial la ejoj, kie virinoj profesie celas distri, amuzi la virojn, estas tiom multnombraj. En la unuaj tagoj de mia ĉeesto en Tokio, dum promenado mi ekvidis sur elpendaĵo la vortojn "Coffee Bar". Mi eniris kun la intenco trinki kafon. La ejo estis malgranda ; tamen tri servistinoj ĉeestis kaj bonvenigis al mi ; per gesto unu montris kanapon kaj invitis miĝ eksidi. Mi tiam estis la sola kliento. Surprizite mi vidis, ke du virinoj eksidis ambaŭflanke de mi kaj la tria antaŭ ĉe la sama tablo. Ĉiuj ridetis, dolĉvoĉe parolis vortojn, kiujn mi ne komprenis. Post momento unu el la virinoj palpis per siaj manoj la miajn, por ekscii, ĉu ili ne estas malvarmaj. Opiniante, ke jes, ŝi iris serĉi ujon, en kiu sur cindro bruletis kelkaj pecetoj da lignokarbo, kaj metis ĝin sur la kanapon, tiele, ke ĝi staris inter mi kaj ŝi. Silente mi observis ĉion. En apuda ĉambreto estis maljunulino, sidanta ĉe kasa tablo. Mi sukcesis komprenigi, ke mi deziras trinki kafon. Unu el la servistinoj iris por prepari la trinkaĵon kaj post kelkaj

minutoj alportis ĝin. La kafo estis malbona, la "hibaĉi"(1) ne sufiĉe varmigis la ejon ; mi sentis min nekomforte, iom ĝenite kaj foriris post eble dek minutoj. Vespere mi rakontis la okazintaĵon al iu esperantisto, aldonante, ke mi kredeble eniris bordelon. Li klarigis, ke tiaj ejoj ne estas bordeloj, ke mi renkontos multajn tra la urbo, en ĉiuj kvartaloj.

Efektive tie estas. Tiaspecaj "kafejoj" ekzistas ĉie en grandaj urboj ; eĉ en urbetoj oni ankaŭ trovas kelkajn ; tion mi povis konstati poste en Jamaŝiro, kie mi restis dum kvar monatoj.

Post kelka tempo mi scipovis per la ekstera aspekto ekkoni tiajn "kafejojn", eĉ sen la helpo de angla skribaĵo. Tial ke mi estas scivola kaj sentas min logata de ĉio, kion mi ne konas aŭ ne komprenas, plurfoje mi eniris iujn el tiuj amuzejoj. Estus eraro kredi, ke tie oni povas havi seksrilatojn kun la tieaj virinoj. Ilia sola tasko estas paroli, ŝerci, kanteti kaj ĉefe instigi la virojn al konsumado. Kutime la klientoj regalas unu aŭ kelkajn el la apudsidantaj virinoj per trinkaĵoj kaj malpezaj mangaĵoj. Kiam proksimiĝas noktomezo, tiam nemalofte oni povas tie vidi ebrulojn. Okazas, ke ankaŭ servistinoj estas duonebria kaj tiam permesas al la regalantoj kelkajn... familiaĵojn.

Oni rakontis al mi, ke klientoj petas al la mastro la permeson forkonduki servistinon ; se li pagas por tio sufiĉe kaj se la mastro ne timas kontrolon de l'polico, tiam okazas, ke li permesas. Ne farinte mem tian sperton, mi ne povas atesti pri la afero. Sed tiuj virinoj estas liberaj dum kelkaj horoj ĉiusemajne. Eblas do rendezuo kun ili ekster la "kafejo". Ĉi streĉu la atenton kaj atendu momenton antaŭ ol ridi kaj moki min. En iu el tiuj amuzejoj foje mi renkontis servistinon, kiu scipovis balbuti kelkajn anglajn vortojn. La okazo amuzis min kaj mi regalis la junulinon per sakeo(2) kaj suŝio(3). Ŝi havis kun si japan-anglan vortareton kaj sukcesis sciigi al mi pri siaj aĝo, naskiĝloko kaj similaj banalaĵoj. Kiam mi pretiĝis por foriri, tiam ŝi retenis min per la maniko de mia jako kaj diligente serĉis en sia vortaro. Fine ŝi sukcesis sciigi diri, ke ŝi volas esti mia amikino kaj lerni de

(1) Tiel oni nomas la menciitan pli supre ujon.

(2) Rizvino.

(3) Tranĉaĵeto el kruda fiŝo kun rizo.

mi la anglan lingvon. Mi ridis, aŭdante tion, tial ke tiu-tempe mi mem lernis tiun lingvon kaj tute ne kapablus ĝin instrui. Tamen ŝerce mi donis mian adreson kaj ni interkonsentis pri dato kaj horo de ŝia vizito. Forpasis preskaŭ unu semajno kaj mi tute ne plu pensis pri la aventuro, kiam je la difinita tago kaj horo tre akurate la anglalingva lernantino milde frapis ĉe la pordo de mia ĉambro. Mi estis surprizita, sed kompreneble akceptis la vizitantinon... De la 10-a ĝis la 17-a ni... kunlernis la anglan lingvon...

*

Ne nur trinkejoj kun servemulinoj estas ĉie renkonteblaj en Japanio, sed en ĉiu urbo bordeloj konsistigas unu aŭ kelkajn kvartalojn. Estas nekredeble!... Kaj ŝajnas, ke tiu prostitua entrepreno prosperas, se oni juĝas laŭ la ekstera aspekto de l'tieaj domoj. Ili estas pli belaj, pli bone prizorgitaj ol ĝenerale la aliaj en la urbo. La tuta aranĝo aspektas komforte, bonorde, dece (!). Kie estas nur bordeloj, tie en la stratoj ne veturas tramoj, ne ruliĝas busoj kaj ne kuras aŭtoj. Estas trankvila loko vere tre loĝinda. Tial sendube dum la tago aroj da ĝenaboj venas tien por ludadi sekure.

Vespere kaj nokte antaŭ ĉiu domo sidas aŭ staras viro aŭ virino, kiu vokas la preterpasantojn. Se oni alproksimiĝas al la pordego, tiam la vokisto signas al iu vestiblo, kie ĉe la muro pendas grandaj portretoj de la lueblaj virinoj. La prezo por "mallonga tempo", por "tuta nokto" estas ankaŭ afiŝita. Oni klarigis al mi, ke "mallonga tempo" signifas tri horojn. Kiel estas bone konate, la japanoj estas tre ceremoniaj kaj sendube tial ili ne rapidas, kultante al la dio Amoro...

Joŝiuara en Tokio estas mondfama. Pri ĝi ekzistas eĉ filmo (Ĉu ci vidis ĝin?). Sed tiu bordela kvartalo, - oni eĉ povu diri : urbeto, - estas iom aristokrata, almenaŭ burĝa. Ties klientoj ne estas proletoj. Tiuj iras al **Tamanoi**. Kelkrilate tiu loko estas tre interesa kaj pli vizitinda ol ĉiuj aliaj bordelaroj, kiujn mi jam vidis en la "Imperio de la Leviĝanta Suno". En Tamanoi ĉiu bordelo konsistas nur el ligna dometo, kie loĝas du prostituinoj kaj mastrino. La stratoj estas tiel mallarĝaj, ke du homoj apenaŭ povas laŭiri en malsama direkto sen ĝeno ĉe la renkontiĝo. Kaj ambaŭflanke ĉe ĉiu pordo aperas vizaĝo de virino tra fenestreto, tiucele destinita.

Se ĉi tiu loko estas neniu vizaĝo aŭ estas videbla nur tiu de la ordinare maljuna mastrino, tio signifas, ke ambaŭ dungitinoj... oficas. Mi vizitis tiun prostituejon inter la 21-a kaj 22-a horoj. Tiam svarmis la viroj kaj senĉese aŭdiĝis la vorto : **ĉotto! ĉotto!** (signifas proksimume : iom, momenton) el la fenestretoj, kie aperis la vizaĝoj de l'kompatindulinoj. Verdire, tiu vizito forte impresis min, kaj se antaŭe mi arduis per fajro de voluptemo, ĝi baldaŭ estingiĝus...

Oni kutime asertas, ke en Japanio la "libera" prostituo ne ekzistas. Eble. Tamen, antaŭ nelonge, iu virino diskrete proksimiĝis al mi surstrate kaj flustris : "short time"(1). Per tiuj du anglaj vortoj ŝi certe celis... varbi min. Sed neniam en Tokio mi spertis tian okazon kaj en Osaka ĝi estas la sola. Ne estas videblaj ĉi tie similaj scenoj al tiuj, kiuj okazas ĉiunokte en kelkaj stratoj el Parizo, Marsejo, Konstantinoplo aŭ aliaj eŭropaj grandurboj. La japanaj prostituinoj ne havas ordinare la vulgaran, malvirtan aspekton de siaj kolegiinoj eŭropaj. Plie, ili estas piaj. Proksime de ĉiu bordelaro estas almenaŭ unu sanktejo, en kiu plejofte najbaras budaismaj kaj ŝintoismaj konstruoj. En Osaka mi eĉ vidis lokon, kie trinkejoj, bordeloj kaj sanktejo preskaŭ intermiksiĝas. Kiam la pastrinoj de Afrodito (2) ne estas okupataj en sia specialaĵo, tiam ili bezonas marŝi nur kelkajn paŝojn por atingi la sanktejon kaj tie riverenci kaj preĝi antaŭ ties altaro.

Ordinare en tia loko troviĝas statueto de Budao. Apud ĝi estas akvujo kaj ĉerpiloj kun longa tenilo. Kun granda intereso plurfoje mi vidis piulinojn, kiuj riverencis antaŭ Budao, poste murmuris mallongan preĝon kaj fine surverŝis la statueton per akvo. Sendube, ilia kredo estas profunda kaj ilia fervoro sincera. Post tiu mallonga ceremonio ili kredeble reiras al sia ofico kun pura koro, kun trankvila animo kaj sento de senpekeco.

Cetere, japanaj junulinoj ne decidas mem, ĉu ili fariĝu prostituinoj aŭ edzinoj, sed ilia patro. Pri tio mi eksciis per atesto de S-ro Hozen Tanaka, gvidanto de "Rimpokan", iu organizo de patriotaj virinoj. En "The Japan Advertiser"(3), aperanta en Tokio, li interalie konfesis ĉi tion :

"Kiam kamparano el malriĉa teritorio vendas

(1) Mallonga tempo. (2) Kredeble ekzistas en la japana mitologio amaraĵoj, sed mi mem ne konas ilian nomon. (3) La Japana ĵurnalo.

sian filinon, tiam li ne konscias, ke li agas malbone... En la prefektejo Aomori pli ol sep mil junulinoj forlasis la hejmon de siaj gepatroj. Du mil fariĝis "geiŝoj" ; du aŭ tri mil eniris bordelojn... Iajoje kamparano estas konsiderata kiel bonŝanculo, kiam lia edzino naskis filinon, ĉar en tiu prefektejo la naskiĝo de filino iel samsignifas kiel profitdona negoco, - ... La daŭro de kontrakto pri dungigo en bordelo varias de tri al kvin jaroj. La mastro volonte pagas kvin cent jenojn por belaspekta junulino, sed la gepatroj ricevas nur la duonon de tiu sumo ; la cetero iras en la kason de agentejo, kiu kare pagas al siaj serĉistoj."

Supozeble ci divenos, ke S-ro Hozen Tanaka bedaŭras tian ŝtaton kaj kritike klarigas, ke ĝi estas restaĵo de la feŭda tempo el antaŭ la t.n. Meĵi-epoko(1). Sed tio estas alia afero, pri kiu verŝajne ci ne havas intereson. Mi ja ne forgesis, ke ci demandis min nur pri la virinoj. Ci ne vidu riproĉon en mia diro, sed, male, komplimenton!... Mi do iom parolu pri tre interesa tipo de japana virino, unika en sia speco: la **geiŝo**.

*

Japane, la signifo de **gei** estas arto kaj tiu de **ŝa** persono. "Geiŝa" estas do persono, kiu okupiĝas pri arto. Tamen, se oni simple nomus ŝin artistino, povus okazi miskompreno. La arto de **geiŝo**(2) konsistas ĉefe el tio, ke ĝi celas distri, amuzi virojn. Tiun arton la **geiŝoj** akiras per kelkjara lernado en speciala lernejo. Tie oni instruas ilin ne nur pri danco, kanto, muziko, florarango (3), teceremonio (4), sed ankaŭ pri historio, geografio,

(1) La mikado Meĵi surtroniĝis en 1867 kaj regis ĝis sia morto en 1912.

(2) Kvankam la formo **geiŝo** estas etimologie erara, tamen mi preferas ĝin ol "geiŝao"-n, kiu estas tro peza kaj nebonsona. Sufiĉas, ke per la vorto "geiŝo" ĉiu leganto komprenu pri kiu tipo de japana virino temas.

(3) Ekzistas specialaj profesoroj, kiuj instruas la aranĝon de floroj. Oni certigis al mi, ke tiuj artistoj konas almenaŭ cent okdek manierojn por aranĝi florojn en vaso.

(4) Tiu ceremonio ankaŭ havas multajn kaj komplikajn regulojn, kies scio postulas longan lernadon.

literaturo ktp... Kvankam la konversacio de geiŝo estas plej ofte sprite amuza, tamen ĝi ankaŭ devas okaze esti serioza, se la humoro de klientoj postulas tion.

Kiam japanoj, sufiĉe bonhavaj, deziras pasigi kelkajn agrablajn horojn, tiam ili ofte "mendas" unu aŭ kelkajn geiŝojn. Oni eĉ telefone povas fari mendon ; en ĉiu urbo ja troviĝas tiucela agentejo, al kiu oni ordinare sin turnas. Ekzistas eĉ ĝenerala tarifo, kiu tamen varias laŭ la lokoj kaj eĉ laŭ la klaso de la "artistinoj". Kelkaj ja pli malpli famiĝis pro sia talento kaj sekve se oni **nome** mendas ilin, tiam la prezo estas pli alta.

Ordinare la geiŝoj loĝas en iu speciala kvartalo ; ili estas dungitinoj de mastrinoj, plej ofte maljunaj eksgeiŝoj, kiuj kvazaŭ aĉetis ilin kaj pagis por ilia instruado kaj edukado. Ĝis tiuj elspezoj ne estos repagitaj, ĝis tiam la dungitinoj devas resti en la servo de sia aparta mastrino.

En Tokio, Ŝimbaŝi estas la plej distinginda geiŝo-kvartalo. Kiam oni promenas tie, tiam ofte oni renkontas surstrate rikiŝojn, en kiuj sidas po unu geiŝo : iuj iras al la... laboro ; aliaj revenas de ĝi. Tie ankaŭ troviĝas geiŝo-lernejo kaj agentejo. Ĉi tiu lasta estas sepetaĝa konstruo, kies aspekto estas usoneca. Sed la dometoj, kie loĝas la geiŝoj, estas purstile japanecaj.

Nur dufoje mi havis la okazon esti en kuneco de tiuj ĉarmaj virinoj. La unuan fojon, en Ito, banurbo kun varmaj fontoj, kie mi restis dum kelkaj tagoj ; kaj la duan fojon en Osaka. Bedaŭrinde, pro nescio de l'japana lingvo, mi ne povis sperti mem, ĉu vere estas interese konversacii kun geiŝo. Kaj ambaŭokaze, tiel ke mi estis la sola fremdulo inter la gastoj, plej ofte mi estis la objekto mem de la interparoloj. Pro la nekutimiĝo al la samisen-sonoj(1), pro la nekompreno de l'kantoj, miaj oreloj ne multe ĝuis ; sed okule mi admiris la diverskoloran kostumon, la komplikan hararanĝon, kiu eligas kamelian odoron, la dancojn kaj precipe la ĝeneralan sintenon de tiuj delikate logaj estuloj.

Ordinare amuzaj kunvenoj kun ĉeesto de geiŝoj okazas en iu gastejo. Tie manĝaĵoj kaj trinkaĵoj kompreneble estas riceveblaj. En Japanio, la plej ofta trinkaĵo estas la sakeo. Oni trinkas ĝin en tute malgrandaj pokaloj, kiujn oni povas malplenigi per unu gluto. Unu el la taskoj de

(1) Muzikilo iel parenca al gitaro.

la geiŝoj estas verŝi sakeon kaj prezenti pokaleton al la prizorgenda gasto. Sed ŝi ankaŭ trinkas kaj post kelkfoja malplenigo de sia pokaletto, se la verŝistino sentas simpation por iu gasto, tiam ŝi interŝanĝas la pokaletojn t.e. ke ŝi donas por trinki al la gasto en sia propra pokaletto kaj trinkas mem el tiu de l'gasto.

Tia interŝanĝo de pokaletoj cetere okazas ankaŭ inter viroj. Kaj kiam ĉiuj kungastoj estas amikemaj inter si, tiam la pokaletoj vizitas ĉies lipojn. Laŭ higiena vidpunkto, tiu kutimo estas neniel pravigebla ; sed estas interese noti, ke ĝi ekzistas ĉe popolo, kies sento estas, ke reciproka manpremado kaj publika interkizado estas vulgaraj faroj.

Nenie la homoj agas tute konsekvence. Verŝajne kutimo rezultas de hazardo, de kaprico de potenculo aŭ eminentulo, kiu iniciatis la aferon. Sendube ci pensos riproĉe, ke mi deflankiĝas. Kredeble ci havas nenian intereson ekscii, kiel estiĝis ĉe japanoj la kutimo trinki el sama pokaletto por montri reciprokan simpation. Eble eĉ ci atendas kun malpacienco, ke mi respondu al cia demando : **ĉu la geiŝoj estas aŭ ne prostituinoj ?**

Laŭ tio, kion mi aŭdis, ne eblas fari tre netan respondon. Iuj diras : jes ; alij : ne. Mi emas kredi, ke la kontraŭdiro estas nur ŝajna. Principe, geiŝo ne estas prostituino ; praktike, jes, ŝi estas tia. Kiam kliento proponas sufiĉe da mono, tiam plej ofte li atingas, kion li deziras. Sed geiŝo ne estas devigata, kiel la inoj en bordelo, akcepti ĉiun ajn klienton. Almenaŭ estas tute certe, ke la geiŝoj ĝenerale ĝuas en la socia vivo situacion, kelkriate enviindan. Ili estas konsiderataj kiel artistinoj, kiuj konscias mem pri la valoro kaj ŝatindo de sia rolo en la socio.

Antaŭ kelkaj monatoj mi legis en ĵurnaloj, ke en Osaka 74 geiŝoj el la Nanĉi kvartalo strikis. Pri la motivo de la striko mi ne scias tute precize ; sed ties rezulto estis la fondiĝo de ia kooperativo, mastrumata de la strikintinoj mem. Tre notinde ankaŭ estas, ke dum la striko, kiu daŭris dekon da tagoj, la strikantinoj rifuĝis en tri budaistajn templojn, kiuj situas sur la monto (Ŝinki) ^{Ŝigi}, proksimume 30 km. for de Osaka. Bonzoj servis kiel perantoj inter la geiŝoj kaj la polico. Unu el tiuj bonzoj, kiun intervjuis ĵurnalisti diris interalie : "...tial ke ni estas budaistoj, ni ne povas toleri la penson, ke la fraŭlinoj malvenku en sia lukto." En la sama raporto mi legis, ke la amuzistinoj kondutis en la temploj tre pie kaj dece...

En Tokio estas pli ol 11 000 geiŝoj ; en Jamaŝiro, urbeto kun 3 987 loĝantoj, estas pli ol 40. Sed necesas menciigi, ke tie estas varmfontoj. Relative multaj gastoj pro tio venas en la 18 hotelojn, kiuj havas banejon kun tiu nature varma akvo. En tiaj provincaj urbetoj la geiŝoj ne estas tre altklasaj. Oni asertis al mi, ke ili estas submetataj al kuracista kontrolo ; kio signifas, ke ilia situacio tre parencas al tiu de prostituinoj. Plie, mi aŭdis, ke en la gubernio Iŝikaŭa, al kiu apartenas Jamaŝiro, eĉ la servistinoj de hoteloj devas submetiĝi al tiu kontrolo. Leĝo pri tio, aplikenda al la tuta lando, ne ekzistas. Sekve, la reguloj varias laŭ la distriktoj aŭ gubernioj. La polico decidas. Kaj necesas scii, ke en Japanio la rolo de policistoj neniel estas komparinda kun tiu de iliaj eŭropaj kolegoj. Japanaj policistoj enmiksiĝas en aferoj, por kiuj en Eŭropo necesas ordono de juĝisto. Sed ankaŭ pri tio verŝajne ci ne havas intereson. Prefere do eksciu, ke kiam mi estis en Jamaŝiro, kelkfoje mi vizitis apudan banurbeton, Jamanaka, kie la hoteloj estas iom pli altklasaj kaj sekve ties gastoj ordinare pli riĉaj. La du urbetoj situas proksimume kvar km. unu de la alia. Dum miaj promenadoj mi ne iris laŭ la ŝoseo, sed laŭ vojetoj tra arbaro. En kelkaj lokoj la pejzaĝo estas tre bela ; rivereto zigzage, serpentume fluas inter rokoj kaj arboj. Nu, tie mi nemalofte havis la okazon renkonti iun japanon, kiun akompanis unu, du, foje eĉ tri geiŝoj. Oni do povas mendi ilin ne nur al sia ĉambro, sed ili konsentas montri sian arton ie ajn, laŭ la deziro de l'kliento. Oni rakontis al mi, ke riĉulo el Tokio foje iris al banloko, akompanate de 24 geiŝoj el Ŝimbaŝi, unu el la lokoj, kie ili estas altklasaj.

Per edukado kaj longa tradicio la japanoj sukcesis krei tipon de virino, kiu ne havas paralelon en Eŭropo. La francaj "demi-mondaines" (duonmondulinoj) estas vulgaretoj, kompare al la geiŝoj. Kaj estas ĉiesa konsento, ke la japanaj virinoj estas perfektaj mastrumantinoj kaj edzinoj. Kiam oni konstatas unufanke, ke ĉi tie la prostituo estas grandskala, plurfaka kaj aliflanke, ke la familioj estas bonordaj kaj multinfanaj, oni malfacile klarigas al si tian staton, se oni prijuĝas ĝin laŭ la eŭropa vidpunkto t.e. per menso pli malpli saturita de kristana ideologio.

Estas okulfrape, ke japanaj infanoj estas amataj kaj bone prizorgataj. Kaj tamen dum tri jarcentoj, ĝis la

Meĵi-epoko, la infanmortigado estis grandskale kaj eĉ laŭleĝe aplikata. La tiamaj "ŝogunoj" (registroj) ne volis, ke la loĝantaro en la japanaj insuloj superu la nombron da 25 milionoj. La japanaj vortoj por infanmortigado estas "higaeri" kaj "mabiku", kies signifo estas **liberigi, maldikigi**. Oni tiam mortigis novnaskiton, same kiel senutila, superflua planto estas elradikigita.

Sed kiam la modernaj registroj decidis industriigi la landon kaj konkuri sur la mondmerkato, tiam la infanmortigado estis malpermesata. Kaj nun sur la sama areo loĝas 72 milionoj da homoj anstataŭ 25 ; plie, la loĝantaro kreskas po unu miliono jare. Signoj de dekadenco ne estas videblaj en la popolo. Kaj tamen en neniu alia lando la prostituinoj kaj diversspecaj amuzistinoj estas tiom multnombraj!... Tia konstato starigas demandojn, al kiuj mi ne kapablas respondi.

Kredeble ci konas la diron de Prudon pri la virinoj. La fama pensulo opiniis, ke ili povas esti nur mastrumantinoj aŭ prostituinoj. Ŝajnas do, ke longe antaŭe japanoj havis tian opinion kaj efektivigis ĝin en la praktiko. Verŝajne Prudon ne sciis tion kaj eble kredis eldiri vere originalan penson... Ci bonvolu ne supozi, ke tiurilate mi samopiniis kiel Prudon. Verdire mi ne havas opinion pri tia demando. Mi nur pensas, ke estas dezirinde, ke ĉiu homo estu libera, ke neniu estu devigata vendi aŭ lui sian korpon. Jes, dezirinde! Sed niaj deziroj?!?!

Mi volas nepre meti finon al tiu jam tro longa letero, kvankam restas multo dirinda pri la temo. Almenaŭ ci bonvolu atenti kaj ne forgesi, ke tiuj ĉi miaj diroj baziĝas sur impresoj. Mi ne havas tute definitivajn opinion pri Japanio ĝenerale kaj japaninoj aparte. Unujara restado en lando, kies lingvon oni ne konas, tute ne sufiĉas por akiri vere kompetentan, valoran opinion. Tamen mi povas senhezite certigi, ke se ci bonŝance gajnus unu milionon ĉe la loterio, ci povas veni ĉi tien kun la certo trovi ĉion dezirindan, el tio, kio estas aĉetebla. Ci eĉ eble renkontos la sopiratan "perlon" en la persono de iu "hangjokuo" (geiŝo-lernantino virga). Sed, - ne koleru - ĉu ci, ano de la Epikura grego, meritas tian akiroteblaĵon?...

Baldaŭ mi forlasos ĉi tiun landon. Sed mi kredas, ke longe restos en mia memoro kelkaj el la vivaj bildoj, kiujn ĉiutage mi povas observi : jen surstrate paŝetas aro da junulinoj, vestitaj per multkoloraj kimonoj ; ili aspektas kvazaŭ floroj formarsantaj el ĝardeno ; ilia

mieno estas milda, gajeta, senzorgeca ; ilia korpo iomete kliniĝas antaŭen ; iliaj getaĵoj(1) ŝoviĝas sur la trotuaro kaj la pozicio de l'piedoj formas akutan angulon, kies vertico estas antaŭe. Tio kontrastas al la eŭropa paŝmaniero kun la piedoj pli malpli paralelaj ; aŭ, se ili formas angulon, tiam ties vertico troviĝas malantaŭe. Jen patrino, kiu ligite portas surdorse infaneton ; per la maldekstra mano ŝi tenas la maneton de dua infano, kiu marŝas apude kaj per la dekstra ŝi premas al sia brusto pakajon ; tria infano memstare marŝas flanke aŭ malantaŭe de l'patrino. Jen restoracio, kie la kelnerinoj estas preskaŭ trifoje plimultnombraj ol en samklasa ejo eŭropa. Jen biertrinkejo, kie la servistinoj donas al mi la impreson de knabinoj, kiuj diligente ludas je servado de gastoj. Jen en granda magazeno junulino, kiu ĉe la malsupro de moviĝanta ŝtuparo dankas pro mi ne scias kion, kaj ĉe la supro alia deĵorantino ankaŭ dankas eble pro tio, ke senakcidente mi supreniris. En buso jen oficistino, kiu dankas pro mia enveno, kiu dankas pro akcepto de bileto, kiu baldaŭ dankos, kiam mi eliros. Preskaŭ senĉese aŭdiĝas la vortoj : "Arigato Gozaimasu" (Estu dankata). Neniu popolo estas pli ĝentila ol la japana.

En Eŭropo kaj Usono oni sendube renkontas pli da belkorpaj virinoj ol en Japanio. Sed ili ĝenerale ne havas tiun nepriskribeblan ĉarmon, kiun oni trovas ĉe preskaŭ ĉiuj japaninoj. Imite al cia kutima parolmaniero Rabeleza mi diru konklude kaj resume : la unuaj precipe estas... ŝveligaj kaj la lastaj korvarmigaj...

*

LETERO KVARDEK-NAŬA

Al K-ino Haber, Maroko

Osaka, 18-10-37.

Efektive mi estis informita pri la morto de Johano. Surprizita mi ne estis : ĉe la ricevo de lia lasta letero, en kiu mi legis, ke jam de du semajnoj li fastadas kaj ke post dusemajna plua fastado li estos refariĝinta "kvazaŭ junulo", stranga intuicio trudis al mi la penson, ke tia optimismo estas senbaza, ke eble tiu nova eksperimento pri resanigrimedo estos fatala... Kaj la sperto bedaŭrinde montris, ke mia intuicio pravis.

Eksciinte la malĝojigan novaĵon, mi sentis egan ĉagren(1) Plandoj, ordinare el ligno, kiujn la piedoj tenas per du ligiloj, kuniĝintaj ĉe unu parto, kiu sidas inter la dikfingro kaj la apuda.

non ; tamen miaj okuloj restis senlarmaj. Sed legante vian leteron mi ne povis deteni min plu. Kaj nun, kiam mi skribas, mi devas viŝi miajn okulojn. Kore mi dankas al vi pro tio, ke vi bonvolis longe rakonti al mi pri la lastaj tagoj de nia amiko. Vi ne bezonis peti senkulpigon pri tio, ke vian ĉagrenon, vian korsuferon vi priskribis. Haber amis vin ; mi ne dubas, ke vi indas lian amon ; li estis mia amiko kaj sekve mi konsentas estonte rilati kun vi amikece. Kiam vi estos malgaja kaj sentos tro peza la ŝarĝon sur la koro, tiam ne timu malpezigi ĝin per skribado ; ĉiam vi trovos ĉe mi kompatemon...

Kredeble la kara malaperinto diris al vi, ke dum la lastaj jaroj mi elsuferis disreviĝojn kaj falis en nigran pesimismen kaj malesperis pri la estonto de l'homaro. Tamen, la penso, ke tra la mondo ekzistas kelkaj **homoj**, veraj homoj kaj ne kruelaj dupieduloj kun homa ekstera aspekto, ĉiam malebligis, ke mi absolute malesperu. Kelkfoje mi diris al mi - eĉ skribis tion al Banje, mi kredas - ke eĉ se ekzistus nur unu Haber sur nia planedo, oni pro tio ne rajtus tute malesperi pri la sorto de l'homa speco. Kaj mi konvinkiĝis, ke la socialismo povos reale esti konstruata nur, kiam ekzistos en la mondo sufiĉe da Haber-oj.

Estu gratulata pro tio, ke vi kuraĝas kontraŭstari hipokritan tradicion kaj funebras nur interne per la koro kaj ne ekstere per elmonro de nigraj koloroj. Per tia sinteno vi plej bone honoras la memoron pri la malaperinto. Kaj se vi penos fariĝi lerta, fervora esperantistino, per tio vi akiros respekton kaj ŝaton en Esperantio, la ideala lando, kies lojala civitano estis via kunulo.

Mi deziras, ke vi povu efektiviĝi vian planon pri vizito al Italio kaj aparte al K-ino Zaneta. Se tiel okazos, bonvolu transdoni al ŝi mian koran saluton kaj samokaze klarigi, ke mia tiama admono(1) estis nur esprimo de simpatio, tial ke mi kutimas esti pli severa al miaj amikoj ol al indiferentuloj. Por mi, same kiel por Haber, esperanto ne estas bagatelo, akcesoraĵo, kiu povas esti traktata dilutante. Mi opinias - kaj ĉiutage plifortiĝas mia opinio

(1) En 1924 Lanti vizitis Italion kaj konatiĝis kun K-ino Z. - Reveninte Parizon, foje li ricevis de ŝi leteron... franclingve skribitan! Tiam K-ino Z. ne estis tre lerta esperantistino kaj fieris, ke ŝi ankaŭ konas iomete la francan lingvon. Responde Lanti tiel forte vipis ŝin, ke ŝi ne forgesis la tondran admonon, ĉar 13 jarojn poste ŝi ankoraŭ aludis pri ĝi al K-ino Haber. (Kompil.)

- ke la mondlingva afero estas tre grava ; ĝi estas la unua ŝtupo, kiun devas suriri la homoj, kiuj serioze kaj celkonscie volas pacigi la mondon. Kiuj pretendas klopodi por forigi la landlimojn kaj ne kapablas eĉ faligi la lingvajn barojn, tiuj estas ĉu ne tute konsciaj pri la celo aŭ malseriozaj ambiciuloj, kiuj ĉefe deziras per facilaj rimedoj akiri popularon, regadon ks. Kiu ne kapablas surporti 50-kilograman ŝarĝon, tiu ankaŭ ne povas elteni sub 100-kilograma. La fakto, ke la internaciistoj ignoris esperanton, malatentis la mondlingvan aferon, sufiĉas por klarigi, kial fiaskis ĉiuj klopodoj de la t.n. revoluciaj organizoj por starigi la socialismon en la mondo.

Rilate al via aludo pri mia "ami japonais", mi devus skribi multajn paĝojn por ke vi komprenu ĝuste lian menson ; plie mi kredas, ke necesus apliki la esplormetodon de Freud por klarigi la konduton de tiu asketo. Mi nur diru, ke tiu ulo estas nur esperantano, kiel estis K-ino Zaneta kaj tro multe da aliaj, ne esperantisto ; li fakte apenaŭ uzis nian lingvon por interrilati kun eksterlandanoj ; li propagandas esperanton ĉefe pro naciisma kialo, por ke lia lando estu plene liberigita de la angla influo. Sed evidente, mia sennaciismo malagrable tiklis al li kaj finfine lia naciismo naŭzis min.

... ..
Ankaŭ mi ne malofte rediris la versojn de Alfredo de Vinji(1). Sed mi konfesas, ke lia konsilo signifas nur, ke oni metas maskon sur sian vizaĝon. Esti kapabla bridi sian ploremon, tio ne estas tute certa pruvo pri kuraĝo ; kaj la nekapablo kaŝi ploradon ne signas malkuraĝon. Mi kredas, ke homo povas en iaj cirkonstancoj agi eĉ heroe kun larmoplenaj okuloj. Sed estas nediskutebla fakto, ke nur per la laborado oni povas retrovi anim- kaj kortrankvilon. Mi persone spertas tion ĉiutage, de kiam mi fariĝis sencela vagulo. Mi esperis povi esti utila al nia esperanta afero en Japanio. La sperto montras, ke tio ne eblas ; eble eĉ mia nura ĉeesto malutilas. Restis al mi do simple kontentigi mian scivolemon, mian aventuremon. Tio ne sufiĉas por plenigi vivon. Fakte mi estis pli feliĉa, kiam mi estis superŝutata per la SAT-laboro. Sed la instrua laboro tre malplaĉis al mi. Nur dum la du unuaj jaroj mi interesigis en la instruado ; verŝajne tial ke mi

(1) France : **Vigny**. Temas pri versoj el **La Morto de l'Lupo**. Traduko el la originalo aperis en **Sennacieca Revuo**.

tiam devis lerni la pedagogian arton. Almenaŭ nun mi estas tre kontenta esti liberigita el mia ofico. Sekve la laborado estas bonefika, nur se oni ŝatas la taskon, kiun oni plenumas. Sed mi diras banalaĵojn...

*

LETERO KVINDEKA

Al K-do L.B., Parizo

Surŝipe, 6-12-1937.

Fine mi estas survoje al Aŭstralio. La foriro de l'ŝipo okazis kun tritaga prokrasto. Kaj ial oni ne emis akcepti min kiel pasaĝeron. Sed mi havis en la poŝo bileton, aĉetitan antaŭ unu monato!... Tiam la Polico ne sciis pri mia intenco forlasi la landon. Unue la K-io sciigis min, ke sur "Melbourne" mi povos ricevi nur japanan manĝaĵon. Mi respondis, ke tiam mi preferas, ke jam delonge mi lernis uzi la "o-haŝi"-n (manĝbastonetoj), ke la "ŝuŝi" (tranĉaĵoj el kruda fiŝo kun amaseto da rizo) fariĝis por mi delikataĵo ktp. - Poste oni insistis, ke la vojaĝo daŭros pli longe ol kutime. - Tio estas al mi indiferenta, mi klarigis... Dum kvar tagoj mi ne sukcesis akiri la certon, ĉu jes aŭ ne mi povos veturi per la menciita ŝipo; nur la lastan tagon mi estis informita pri akcepto.

Se vi demandus : kial okazis prokrasto ? kial oni ne emis akcepti min ? respondon mi ne povus doni. Multaj aferoj restas al mi misteraj kaj mi konscias, ke necesus resti plurajn jarojn en Japanio por havi nur eklumetojn pri ili. Sed amuzis min la konstato, ke alveninte preskaŭ ŝtele, oni tiam klopodis, por ke mi restu pli longe ol intencite.

Kiam mi estis enŝipiĝinta, tiam policistoj venis sur la ŝipon kaj faris al mi diversajn demandojn. Kio vere malagrabiligas la vivon en Japanio, tio estas la kuloj, policistoj k.s. malicaj bestoj, ne nur malicaj, sed ankaŭ sufiĉe stultaj. Pripensu : la ŝipo foriris el Kobe kaj la postan tagon haltis en Moĵi. Tie ankaŭ venis sur la ŝipon aro da policistoj, kiuj denove demandadis min, esploris miajn pakaĵojn kaj kontrolis ĉion pli severe ol en Kobe mem. Kaj notu, ke mi estas la sola pasaĝero...

Sed kompanse al la malagrablaĵoj, mi kontente notas, ke en Osaka kelkaj esperantistoj estis al mi tre helpemaj, tre afablaj kaj mi restas al ili tre danka. Fakte

nun mi bedaŭras Japanion. Tamen mi troviĝas ankoraŭ inter japanoj kaj sekve mi povas diri, ke mia restado sub la ombro de l'standardo kun la suna disko daŭris dum dektri monatoj.

Kiam mi adiaŭis la samideanojn el Osaka kaj Kioto, tiam ŝerce mi diris al ili : "Dum unu jaro mi restos en Aŭstralio, unu jaron mi pasigos en Ameriko, unu jaron en Eŭropo, unu jaron en Sovetio (se tie ne plu regos ruĝa faŝismo) kaj en 1942 mi povos trans Vladivostokon reveni al Japanio...". Kaj unu samideano sprite aldonis : "Tiam nia lando estos por vi... Finlando". Mi konsentis ; tamen kvazaŭ proteste mi klarigis, ke post tia dua mondvojaĝo mi estos nur 62-jara - do juna! Ĉar Volter havis 65 jarojn, kiam li verkis **Kandido**-n, kiu estis de recenzistoj konsiderata kiel junula verkaĵo!...

Verdire, mi ne sentas min maljuna kaj ĉe ekskursoj kaj marŝado mi pli bone eltenas ol kelkaj junuloj. Nu, kompreneble, mi emas luli min per revoj kaj agrablaj iluzioj. Tion vi sendube pensos kaj mokos min. Ne ĝenu vin pri mokado ; mi ja estas tre mokinda kaj mem ne indulgas min tiurilate...

*

LETERO KVINDEK-UNUA

Al K-do J.L., Nederlando

Sidnejo, 7-1-1938.

Ĉu vi kredas embarasi min per via demando pri la "juda problemo"? Se jes, vi eraras. Ĝi estas implice pri-traktita en miaj verkaĵoj pri naciismo. La judismo estas iu speciala naciismo, por kiu mi sentas nenian simpatian. La judoj, kiuj ĉie en la mondo penas por konservo, eternigo al siaj naci-religiaj kredoj, tradicioj, moroj ktp. estas do ĝismedolaj naciistoj kaj, kiel tiaj, havas mian tutan malaprobbon. Mi estas konvinkita, ke se tiaj homoj fariĝus la plej fortaj en iu parto de l'tero, ili el persekutatoj baldaŭ aliĝus en persekutantojn.

Cetere, pri tio atestas la Biblio mem. Por mem konvinkiĝi pri la pravo de mia aserto bonvolu legi en la **Malnova Testamento** la ĉapitron pri **Ester**. Tie estas rakontite, ke tiu fama belino akiris grandan influon super la reĝo Aŝaŝveroŝ kaj eĉ fariĝis reĝino. Tiam judoj estis persekutataj en la tuta imperio, kiu konsistis el cent

dudek sep landoj kaj etendiĝis de Hindio ĝis Etiopio. Sed laŭ peto de Ester, la ordonoj pri persekutado al judoj estis nuligitaj ; plie, unu parenco de la reĝino, Mordeĥaj, fariĝis gravulo ĉe la kortego. La rezulto de tio estis : "... ke multaj homoj el la popoloj de la lando fariĝis Judoj, ĉar falis sur ilin timo antaŭ la Judoj..." "...Kaj la Judoj batis ĉiujn siajn malamikojn, frapante per glavo, mortigante kaj ekstermante, kaj ili faris al siaj malamikoj, kion ili volis. En la kastelurbo Ŝuŝan la Judoj mortigis kaj pereigis kvincent homojn...". (Pĝ. 430-431 de l' **Malnova Testamento**, tradukita de Zamenhof).

En la sama libro oni povas legi, ke **Haman**, kiu estis antaŭe ordoninta persekuton al la Judoj, estis pendigita. La reĝo, raportante al Ester pri la okazintaĵoj, demandis ŝin, kio estu farota al la dek filoj de Haman. "Ester respondis : Se al la reĝo plaĉas, estu permesite al la Judoj en Ŝuŝan ankaŭ morgaŭ fari tion saman, kion hodiaŭ, kaj la dek filojn de Haman oni pendigu". (M.T. pĝ. 431).

Sed, se oni konsideras la problemon laŭ rasa vidpunkto, estas evidente, ke por sennaciisto, hebreo estas homo samrajta kiel japano, ĉino, etiopo aŭ franco. La Hitlera rasismo, kiu eĉ malpermesas geedziĝon inter germanoj kaj judoj estas monstraĵo. Mia malaprobo al la judismo, al ĉia naciismo senescepte, havas absolute nenion komunan kun Hitlerismo.

Mia kompreno pri sennaciismo konsistas precipe el tio, ke oni devas persiste celadi, por ke en la menso de homoj la homeco superregu la rasecon, por ke estu ekstermata ĉia nacieco...

Espereble vi nun komprenas ĝuste mian sintenon antaŭ la juda problemo. Sed mi senhezite konfesas al vi, ke estus tro unuflanka prikonsidero super la demando, se oni malatentus la fakton, ke la judismo, aŭ juda naciismo, per sia tendenco eterniĝi malgraŭ ĉio, estas ne malatentinda faktoro en la kaŭzoj de persekutado al judoj. La naciismo, ĉia naciismo, estas esence maltolerema kaj sekve ĉiam ekzistas latente kaŭzoj de malamo, de militemo inter la diversaj naciistoj.

Komprenoble oni havas naturan emon simpatii al la persekutatoj, sed la racio instruas, ke iaj viktimoj povus ankaŭ esti ekzekutistoj...

*

LETERO KVINDEK-DUA

Al Parizaj Gek-doj

Sidnejo, 5-1-1938.

... ..
Kiam mi nun legas la francajn gazetojn, kiujn vi sendas, tiam pli bone ol iam ajn antaŭ mia elfranciigo mi komprenas, ke iliaj legantoj povas esti nur naciistoj. La registroj kaj regaspirantoj, kies vidpunkto esprimiĝas en la naciaj ĵurnaloj kaj revuoj, eĉ la plej maldekstraj, devas prikonsideri la **apartajn, momentajn** interesojn de l' regatoj. Kaj nemalofte tiaj interesoj kolizias kun tiuj de alinacianoj. Tial, eĉ en la plej "revoluciecaj" frazoj kuŝas pli malpli latentaj naciismo. Konkretan ekzemplon mi menciuj : kiam iu registaro reduktas la valoron de la enlanda mono, tiam ĝi faras tion ne nur kun la celo malgrandigi la ŝtatan ŝuldon, sed ankaŭ por favori la eksporton de varoj kaj tiel stimuli la enlandan produktadon ; kio rezultigos malpliigon de senlaboreco. Sed la konsekvenco de tiaj aranĝoj efikas senlaborige en aliaj landoj. Kiom da senlaboruloj en la koncerna lando retrovos okupon, tiom da laboristoj perdos ĝin en aliaj landoj.

Ĉiuj politikuloj klopodas unue kaj ĉefe por favori la interesojn de siaj samlandanoj ; tial, vole-nevole, ili agas naciiste. Kaj tamen nia planado pli kaj pli malgrandiĝas per la senĉese kreskanta rapideco de l'trafikiloj. Tial la homoj, kiuj ne kapablas mense transiri la limojn de sia nacio, baraktas en kontraŭecoj. Eble ĉiuj volas la pacon, tamen ili agas laŭ maniero, kiu nepre kontribuas al la preparado de l'militoj.

Pli kaj pli forte ni **devos** konvinkiĝi, ke racia solvo al la sociaj problemoj estas trovebla nur, se oni prikonsideras ilin laŭ **planeda** vidpunkto. Kaj tion povas fari nur sennaciistoj, esperantistoj t.e. homoj, kiuj posedas la ilon por akiri menson de mondĉivitanoj. Por doni al la homaro sennaciecan menson, necesas la ekzisto de sennaciisma literaturo kaj tia ne eblas sen esperanto. Konsekvence, la plej urĝa tasko estas disvastigi kaj utiligi nian lingvon.

Kaj kiam oni estas tion kompreninta, tiam aperas klare, ke SAT estas **ia embrio** de socio, normale akordiĝanta kun la grado de malvolviĝo de la nuntempa tekniko kaj produktokapablo de l'Homaro. Per sia modesta eldonpovo, per siaj ĉiujaraj kongresoj, nia Asocio nutras kaj

kreskigas tiun embrion. Vi do ne havu ian ajn dubon pri tio, ke via laboro estas pli utila kaj pozitiva ol la brua agitado de politikaj partioj.

*

Kyankam "Nouvel Age"(1) havas gvidanton(2), kies antaŭa kariero nepre estigas malfidemon al li, tamen mi konsentas, ke tiu ĵurnalo estas nuntempe unu el la plej verdiraj. Sed mi notis, ke la vidkapablo de ties kunlaborantoj ne ankoraŭ transiris la limojn de Eŭropo. Ili estas do duonblindaj. La rolo de Eŭropo en la mondpolitiko tendencas malgrandiĝi kun la forpaso de l'jaroj. La fakto, ke Japanio estas nun ligita kun Germanio kaj Italio atestas pri tio kaj pruvas la tutmondan interplektiĝon de la interesoj. Vole-nevole, iel aŭ aliel, Ĉinio sekvos la ekzemplon de Japanio kaj venos la tago, kiam la eŭropanoj devos moderi kaj eĉ tute rezigni siajn pretendojn.

Vi certe komprenas, ke la japanaj polico kaj militismo ne povis efiki sur min favore dum mia restado en la Imperio de la Leviganta Suno. Tamen, malgraŭ ĉio, kiam mi pensas, ke en Aŭstralio loĝas apenaŭ 7 milionoj da homoj, dum 100 milionoj povus tie vivi, mi nepre alvenas al la konkludo, ke tia stato estas tute malracia, nenormala. Tiom pli, ke 72 milionoj da japanoj premiĝas en siaj insuloj kaj ke tie la loĝantaro kreskas je unu miliono ĉiujare. Tial, se japanaj soldatoj iun belan tagon venus per bomboj frapi ĉe la aŭstralia pordo, kiu estas fermita al la enmigado de flavhaŭtuloj, tio estus laŭ la ĝisnuna normo de rilatoj inter la popoloj. La aŭstraloj mem estas invadintoj kaj apenaŭ 50 000 indiĝenoj vivas ankoraŭ sur ĉi tiu kontinento. Dum longa tempo la britoj sisteme ekstermis ilin. Mi kredas, ke se japanoj siavice invadus Aŭstralion, ili ne kondukus tiel barbare al la blankhaŭtuloj, kiel ĉi tiuj lastaj al la negroj.

Post dusemajna restado en Sidnejo mi kompreneble akiris nur tre supraĵajn impresojn. Almenaŭ mi jam povas konfesi al vi, ke mi bedaŭras Japanion...

... ..

(1) Nova Epoko. - (Kompil.)

(2) Georgo Valua (Valois) ; dum multaj jaroj li estis redaktoro de unu el la plej reakciaj ĵurnaloj el Francio kaj antaŭ sep aŭ ok jaroj li provis starigi faŝistan partion. - (Kompil.)

LETERO KVINDEK-TRIA

Al K-do M.R., Portugalio

Sidnejo, januare, 1938.

Jam de unu monato mi estas ĉi tie. Mi estis tre mirigita ĉe la konstato, ke la vivkostoj estas en Aŭstralio relative malaltaj, malgraŭ tio, ke la laboristoj ricevas altan salajron, subvencion, kiam ili estas senlaboraj kaj pension, kiam ili estas maljunaj aŭ ne laborkapablaj. Fakte mi ne pagas multe pli ol en Osaka. Estas vere, ke en Japanio la vivkostoj tendencis al plialtiĝo. Mi do povos resti ĉi tie tiom longe, kiom mi deziros. La polico tute ne atentis pri mi kaj, se mi ne vidus tra la stratoj gigantaj policistojn, mi emus kredi, ke polico tute ne ekzistas. Kia kontrasto kun Japanio! Kiam mi enŝipiĝis en Kobe, sur japanan ŝipon, policistoj venis kaj esploris, demandadis ktp.; sed en Moĝi, japana urbo, kie la ŝipo haltis la postan tagon, denove venis aro da policistoj, kiuj faris la samajn demandojn, samajn esplorojn ktp. Kaj mi estis la sola pasaĝero sur la ŝipo. Mi ja veturis per var-ŝipo, tial ke estas nur unu klaso kaj mi povis havi grandan kajuton por mi sola. La vojaĝo daŭris 20 tagojn. Mi transiris la tropikojn kaj la ekvatoron; kompreneble estis tre varme; la maro ne ĉiam estis kvietaj kaj tamen mi tute ne malsaniĝis.

Ĉi tie estas somere; la klimato estas preskaŭ la sama kiel en Portugalio. Sed, strange! malgraŭ ĉio mi bedaŭras Japanion. En normalaj cirkonstancoj, mi certe estus restinta en tiu lando dum longa tempo, eble eĉ ĝis la morto. Estus tro longe por klarigi ties kialon.

Tre interesis min ekscii, ke la artikolo: "Vivu la Neŭtralismo!" ŝajnis al vi ankaŭ konfuza. Sed notu, ke la redaktoroj de "Popola Fronto" el Valencio tre ĝuste komprenis ĝian signifon kaj provis rebati ĝin per simila artikolo ironia.

Kio okazas en Hispanio, tio pravigas tute mian intuicion. La ruĝa faŝismo, importita el Moskvo, jam montris sian vizaĝon en Barcelono kaj alie. Pli kaj pli mi konvinkigias, ke la bolŝevismo aŭ ruĝa jezuitismo, estas pli danĝera por la laboristaro ol la bruna kaj nigra faŝismoj.

... ..

*

Al Parizaj Gek-doj

Sidnejo, 1-2-1938.

... ..
 Mia ŝato al la aŭtralia vivmaniero ne kreskis kun la tempo. Sed mi vere miras, ke en lando, kie la laboristoj ricevas relative altan salajron, tamen la vivnecesaĵoj ne estas tre multkostaj. Mi havas ĉambron ĉe privatulo kaj ne pagas por ĝi pli kare ol en Osaka ĉe hotelo. En Sidnejo kvalifikita laboristo fraŭla - kaj sobra - povas ŝpari el sia semajna enspezo 4 funtojn. Se la franca mono ne estus perdinta pli ol la duonon de sia valoro, mi ĉi tie povus vivi tute senzorge, rilate elspezojn.

Sed tio ne signifas, ke mi havus komfortan, agrablan, ŝatindan vivon. Ŝajne aŭstraloj ne havas senton pri vera komforto, pri delikato kaj arto. En restoracioj la benkoj aŭ seĝoj estas tiel angulecaj kaj nekonformaj al sia destino, ke mi ĉiam havas la impreson pri io provizora, piknikeca. Kaj ĉe malgrandaj tabloj sidas duoble pli da gastoj ol konvenas. Plie, la spiritostato de la gekelneroj ŝajnas esti tia, ke la klientoj devas komplezi al la servistoj - kaj ne inverse. Ne ĉiam oni dankas al vi ĉe pago de l'konto ; kaj se tamen aŭdiĝas danka vorto, tiam la mieno de l'dankant(in)o kaj lia aŭ ŝia voĉtono impresas kvazaŭ oni aŭdus : **forkuru! cin mi sufiĉe vidis...** Kia kontrasto kun la ĝentilo de l'japanaj geservistoj!

Sed kio estas preskaŭ nauza, tio estas la spektaklo, kiun oni povas observi en la biertrinkejoj. Tie la klientoj ne sidas, sed staras antaŭ alta U-literforma vendotablo, kies aspekto donas la impreson de barikado, malantaŭ kiu ŝirmas sin gekelneroj. Kaj ĉi tiuj lastaj klopodegas pleniĝi glasojn, kiujn ili kvazaŭ ĵetas al atakantoj. Tamen necesas, ke la soifantoj metu moneron sur la tablon, antaŭ ol ricevi la menditan glason...

La virinoj tamen ne staras. Ili ĝenerale sidas en ia "ripozejo", kiu komunikas kun la vendotablo per aperturo, kie la soifantinoj povas mendi kaj ricevi glasojn, kiujn ili mem kunportas al tablo. Verdire la spektaklo videbla en tiuj virintrinkejoj ne estas pli ŝatinda ol tiu en la ejoj por viroj.

Ĝenerale la metiistoj finas la laboron je la 17-a. Kaj laŭleĝe tiaj trinkejoj restas malfermaj nur ĝis la 18-a. Dum unu horo oni tiam povas vidi ĉirkaŭ la vendotablo

plurvican amason da drinkuloj, kiuj englutas glason post glaso. Tia spektaklo donas al mi la impreson de grego ĉirkaŭ grandega trogo. Post la ŝloto de l'pordoj, tiam sur la trotuaro vidiĝas geebriuloj, kiuj zigzage kaj ŝanceliĝe paŝadas ; dum aliaj simple eksidis sur la sojlaj ŝtupoj de l'drinkejoj. Sed estas rimarkinde, ke ĝenerale la ĉitiejaj gedrinkuloj ne estas bruemaj, insultemaj aŭ kverel-emaj. Ili ridetas stulte kaj aspektas kontente.

En Sidnejo la klimato estas proksimume la sama kiel en Lisbono. Malgraŭ tio, la pordoj de l'birtrinkejoj estas nur iom malfermaj ; rimeno, haltige al ferma risorto, tenas ilin en tia stato. Aŭstraloj ŝajne ne trinkas, sed konscie drinkas kaj tiucele sin kaŝas. Nenie estas trov-eblo loko, kie en plenaero oni side povus komforte kaj malrapide gustumi glaseton, legante ĵurnalon aŭ observante la gepreterirantojn...

- Estas same kiel en London, iu povus rimarkigi.

- Fulmotondro! jes ja, tia stulta vivarangō estas importita el Britio, sed tie la klimato povas iel pravigi tian enferm-igemon, neniel ĉi tie...

Ne nur ĉio estas senkomforta kaj malbela en resto- racioj kaj kafejoj, sed la manĝaĵoj estas nebongustaj, mal- bone preparitaj. Kun la manĝaĵoj oni ĝenerale trinkas teon, kelkfoje kafon. Ordinare sur la tablo staras ujo, en kiu troviĝas pulvorigita sukero. Sed mankas kulero en la sukerujo ; ĉiu prenas per sia aparta kulero malseka, tiel ke formiĝas en la ujo flavaj buletoj, kiuj nepre pensigas pri... Nemalofte mi sentas naŭzon en Sidnejaj manĝejoj.

La ĉi tiea popolo ne havas la palaton edukita ; sed ĝia intelekto ankaŭ restas senkultura. Sufiĉas trarigardi ĵurnalon por konvinkiĝi pri tio. Ili estas grandformataj, ilustritaj kaj multpaĝaj, sed ilia enhavo konsistas ĉefe el infancaj malgravaĵoj, el raportoj pri sporto, vetkuradoj, loterio kaj el reklamoj. En 24-folia ĵurnalo troviĝas apenaŭ unu paĝo leginda.

Kio vere karakterizas la menson de aŭstraloj, tio estas ilia ludpasio. La ŝtato mem organizas loteriojn kaj ĉiu- semajne okazas du aŭ tri lotumoj. Kaj ĉiutage oni povas vetludi pri ĉeval- aŭ hundokuradoj. Ĉiu ĵurnalo (ankaŭ la t.n. laborista "The Labor Daily") havas suplementon, kiu estas tute dediĉita al vetkuradoj. Tian suplementon oni vidas preskaŭ en ĉies manoj kaj ĝi certe estas la plej ŝatata legaĵo de la aŭstraloj ĝenerale.

Sabate posttagmeze kaj dimanĉe dum la tuta tago la

poŝto ne funkcias. Dimanĉe la drinkejoj, teatroj kaj kin-
ejoj estas fermaj. Tiam la urbo aspektus preskaŭ dezert-
ite, se muzikistaroj de la Savarmeo ne aŭdigus sin tra la
stratoj. Tiu institucio tre prosperas ĉi tie. Cetere ĝi
estas tutmonda organizo ; en Japanio ankaŭ mi vidis
ĝiajn konstruojn kaj propagandon... Pli kaj pli mi emas
kredi, ke ju pli stultaj estas la ideoj propagandataj, ju
pli krudaj kaj bruaj estas la agitrimedoj aplikataj, des pli
da ŝancoj ekzistas por la sukceso de la entrepreno.

En la mezo de la urbo staras kelkaj 10-12-etaĝaj
domoj, luksaj bankoj kaj grandaj magazenoj. Tie ĉio as-
pektas malbelstile sed brile kaj pure. En la antaŭurboj la
domoj estas nur unuetaĝaj, unuformaj ; la stratoj tie
estas malpuraj kaj mi certigas, ke ĉio en la tuta urbo
konkuras por malbeligi la vere belegan situon naturan,
kiun konsistigas la multaj montetoj kaj la profunda fanta-
ziforma golfo. Super ĝi estas konstruita grandega ponto
pri kiu fieras la Sidnejanoj. Estas ja vere impona kons-
truo, kiu atestas pri la mirindaj akiraĵoj de l'tekniko ;
sed ĝi ne povas vekti artan emocion, kiel, ekzemple, faras
kelkaj gotikaj katedraloj el la dektri aŭ dekkvara jarcento.

Kvankam la klimato en Sidnejo estas agrabla; kvankam
la vivkostoj ne superas mian elspez-povon, tamen mi ne
kredas, ke mia kadavro putros ĉi tie - krom se mi baldaŭ
furze aŭdigus la lastan, naŭze ridigan bruon...

... ..

*

LETERO KVINDEK-KVINA

Al Parizaj Gek-doj

Sidnejo, 4-3-1938.

... ..

En la lastaj n-roj de "SENNACIECA REVUO" aperis
artikoloj pri moralo. Ĉu nura hazardo aŭ signo de mal-
trankviligo en la spirito de kelkaj kunlaborantoj? Malfacile
respondebla demando! Tamen mi emas supozi, ke tiuj
artikoloj iel reeŝas al la mia en la japana gazeto el Kioto.
Mi kredas, ke en pli malpli proksima tempo la senetikeca
marksismo ne plu havos multe da aprobantoj inter la
memstare pensantaj homoj. Tial ke ĉie fiaskis la movadoj,
kies gvidantoj estis aprobantoj de la t.n. historia materi-
alismo, tio certe instigos pensulojn al esploro super ties
kaŭzoj de fiasko. Mi estas konvinkita, ke ne malmultaj

alvenos al la konkludo, ke la marksa ideologio (jes ja, la marksismo estas nur ideologio kun scienca masko) portas grandan parton da respondeco en la malvenkoj de l'proletaro. Kaj la plej granda kaj signifa el ĝiaj malvenkoj estas certe tiu, kiu okazis en la antifraze nomita Sovetio (ja ne plu ekzistas sovetoj tie), kie la laboristaro estas servutigita ĝis grado apenaŭ pensebla. Marksista majstro estas Stalin, kiu ignoras abstraktajn moralajn principojn kaj malvarmsange aplikas teorion, laŭ kiu sufiĉas esti la plej forta por pruvi sian pravon.

La legado de la artikoloj, aperintaj en "Sennacieca Revuo", donis al mi la impreson, ke ties verkintoj sentas sin iom katenitaj per la opinio de famaj filozofoj aŭ sociopolitikuloj. Neniel mi volus aserti, ke la eldiroj de Kant, de Spencer, de Marks k.a. famuloj estas malatentindaj. Tamen, mi konfesos al vi, ke por findecidi pri morala demando mi pli fidus al la simpla saĝo de sana, normala homo, kiu neniam legis filozofian traktaton, ol al la rezonado de teoriuloj. Ĝenerale ili havas la emon enigi ĉiujn fenomenojn en iu sistemo aŭ doktrino kaj tiucele ili nemalofte kaj eble senkonscie rezonadas sofisme.

Per mia letero al "Tempo" vi povis iom ekscii pri mia starpunkto, rilate moralon. Sed, kompreneble, en tiu skribaĵo mi nur elmetis la demandon. Same en ĉi tiu letero mi ne pretendas eldiri tute kontentigan respondon. Almenaŭ mi akcentu, ke mi ne identigas moralon kun religio. Multaj personoj emas al tiu identigo, tial ke dum jarcentoj la moralaj principoj estis bazitaj sur religiaj dogmoj kaj lernigataj de pastroj.

Mi konfesos, ke, se estus nekontraŭdireble pruvita, ke Dio ekzistas, tiam oni havus tre oportunan kaj firman bazon por starigi moralon. Tiom pli facile estus la afero, se per revelacio aŭ alie Dio estus tute precize eldirinta klarigojn pri bono kaj malbono. Bedaŭrinde tiel ne estas kaj sekve la religioj ne alportas kontentigan solvon al la primorala problemo.

Jam de multaj jarcentoj ekzistas bone prilaboritaj tezoj, favoraj ĉu al la deismo, ĉu al la ateismo. Ĝis mia tridekkvina jaro mi dediĉis multe da tempo en legado de tia literaturo kaj fine konvinkigis, ke ĝi estas vana metafizikaĵo, ĵonglado per vortoj. Almenaŭ la dikreduloj devus konfesi, ke ilia dio agas vere strange, eĉ riproĉinde, ne liverante klaran pruvon pri sia ekzisto al la homoj, kiuj **sincere kaj honeste serĉas la veron.**

La reala ekzisto de Dio estas ja pridubebla, sed ne la religioj, kiuj estas konkretaĵoj, palpeblaj per la sentoj. Ne eblas dubi, ke dio ekzistas en la imago de kelkaj cent milionoj da homoj. Universalaj religioj kiel, ekzemple, la budaismo kaj la kristanismo ludas grandan rolon en la socia vivo. Kaj estas tre notinde, ke en ambaŭ religioj oni trovas ĉe la bazo samajn moralajn principojn, kiuj povus garantii pacan kaj harmonian vivon inter la homoj, se ili estus aplikataj. Bedaŭrinde bonzoj kaj pastroj kvazaŭ dronigis tiujn bonajn kaj ĝustajn principojn en iun maron da ritoj pli malpli ridindaj, tiel ke tre ofte supernaĝas nur parazita elkreskaĵo. Kaj ne malofte tiuj samaj preĝistoj estis la unuaj, kiuj ne obeis al la principoj de ili instruataj. Tio tamen ne pruvas, ke la principoj estas malĝustaj kaj neniel obeindaj ; estas nur pruvo, ke ili ne trovis ĉe la amaso sufiĉan komprenon kaj ŝaton, ĉar bonzoj kaj pastroj povas tre ofte konservi sian aŭtoritaton malgraŭ tio, ke ili ne agas kiel predikite.

Sama politikistoj kaj laboristaj gvidistoj ofte sukcesas konservi sian mandaton aŭ postenon, malgraŭ tio, ke ili ne agas konforme al tio, kion ili promesis aŭ propagandis. La sperto instruas, ke preĝistoj, politikistoj kaj ĉiaj gvidistoj havas en la socio malbonefikan influon. Preĝi, propagandi, gvidi ne devas esti profesio. Pro tiu konsidero la sesa gvidprincipo de "Herezulo"(1) tekstis jene : "**Herezulo** luktas kontraŭ ĉian gvidistecon - kio ne signifas malakcepton de ĉia gvidado."

Kiu pagite gvidis asocion dum kelkaj jaroj, tiu devus forlasi la postenon kaj reiri al la okupo, kiun li havis antaŭe en fabriko, metiejo aŭ kontoro. Tio devus esti nepre obeenda principo.

En kelkaj protestantaj sektoj fakte ne ekzistas pastroj. Kiam okazas kunveno, iu ajn el la anoj legas el la Biblio kelkan parton kaj komentas laŭ sia kompreno. Mi emas kredi, ke tiu fakto ne estis seninflua, rilate al la kreiĝo de liberema spirito ĉe la britoj ĝenerale.

Ĉar ne eblas fundamentigi moralon, akcepteblan de ĉiuj homoj, sur dia kredo aŭ religiaj dogmoj, necesas do serĉi alian bazon. Tiucele oni ne bezonas ŝvebi en metafizika nebulo por ek trovi nepre obeendajn principojn moralajn. La simpla saĝo sufiĉas. La vivsperto ja ĉiutage

(1) Revueto, kiun eldonis Lanti en la jaroj 1935-36, kun sia sola respondeco. - (Kompil.)

instruas, ke neniu homgrupiĝo povas glate kaj normale funkcii sen obeo al reguloj aŭ principoj. Ĉar la homoj havas rilatojn inter si, necesas, ke ili agu laŭ maniero, ebliganta glatan, pacan interrilatadon. Aliel la stato inter ili similas al tiu reganta en ĝangalo. Kiu mensogas, trompas, kalumnias, tiu estas senmoralulo. Kiu ŝtelas kaj murdas enkondukas en la socio la ĝanganan leĝon. Kiu interkonsentis pri rendezvuo kaj ne venas je difinita tempo, tiu estas nefidindulo. Harmoniaj rilatoj inter la homoj postulas do nepre, ke ili ne mensogu, ne trompu, ne kalumniu, ne ŝtelu nek murdu ; kaj plie, ke ili plenumu promeson **libere** faritan.

Vi rimarku, ke mi substrekis la vorton "libere". Estas klare, ke promeso akirita per minaco aŭ per trudaj cirkonstancoj ne havas moralan valoron kaj ne indas esti plenumata. En la kapitalista ekspluatsistemo, ekzemple, laboristo povas ne senti sin morale ligita per promeso, kiun li faras al mastro por esti dungata kaj tiel eviti malsaton. Sed se tiu sama proleto libere aliĝas al iu asocio kaj ne obeas ties statuton, tiam li agas malmorale.

La Historio instruas, ke ĉiu ajn societo, ĉu religia aŭ laika, kies influo estis granda sur la socian vivon, konsistis el anoj, kiuj severe obeis al la principoj, laŭ kiuj la organizo estis fondita. La "buŝido" aŭ morala kodo de l' japanaj samurajoj, povas pri tio esti menciata kiel tre bona ekzemplo. En la historio pri Japanio troviĝas fama epizodo pri 47 el tiuj buŝido-obeantoj, kiuj faris kune "harakiri" por resti fidelaj al sia promeso. Iliajn tombojn mi vizitis en Tokio.

Sed en la politikaj kaj sindikataj organizoj la promesoj faritaj de la gvidistoj, la obeo al la statutoj kaj la respekto al la organizo, ĉio tio estas nur sensignifaj aferoj ; la proklamoj kaj kongresaj rezolucioj, ĉio tio estas nur vantaj vortoj. Tial, ekzemple, en 1914, oni povis vidi homojn, kiuj interfratiĝis parole dum pluraj internaciaj kongresoj, mortigi sin reciproke sur batalkampoj aŭ aprobitan mortigadon. Kaj tiuj samaj homoj tiele obeis al la ordono de registoj, kies politikon ili antaŭe malaprobis kaj kontraŭbatalis. Naŭze !...

Pli naŭze eble estas la sinteno de la gvidistoj de diversaj partioj, laŭdire samcelaj, sed inter si konkurantaj, kiuj insultas sin reciproke dum jaroj kaj poste, iun belan tagon, ĉesigas la insultadon por kunagi unuece. Tion vi

nuntempe povas observi en Francio malantaŭ la anonc-ŝildo de **Popol-fronto**. Kaj tre notinde estas, ke la gvidistoj ne agas pli sincere dum la malamikiĝa tempo ol dum la amikiĝa. La hieraŭaj malamikoj momente rilatas amike nur pro timo antaŭ komuna malamiko. La honor-sento estas ĵo nekonata de tiaj gvidistoj. Por ili temas nur kapti aŭ teni la gvidadon kaj tiucele **Ĉiaj rimedoj** (Lenina diro) estas aplikeblaj. Makiavelo kaj Ignaco de Lojola estas iliaj majstroj.

Cetere ni mem povis en S.A.T. proprasparte observi la bolŝevistan senetikecon kaj ĝiajn konsekvencojn. Ne baldaŭ mi forĝos la scenojn el la Amsterdama Kongreso. Ankoraŭ nun sonas ĉe miaj oreloj la vortoj : renegato, fripono, kanajlo, perfidulo k.a.s. kvalifoj, kiuj estis al mi direktitaj. Ne sukcesinte meti nian organizon sub la kontrolon de Moskvo, la bolŝevistoj faris skismon kaj provis de ekstere detruiri la organizon, kies gvidadon ili ne sukcesis kapti. Kaj tiel ke ankaŭ tiurilate ili fiaskis, jam de kelka tempo ili bombaste predikas por la unueco, kiun ili mem detruis.

Kaj la historio pri la socialisma movado estas plena je tiaj okazintaĵoj. Kiam oni ĉagrene konstatas, ke la faŝismo pli kaj pli etendiĝas tra la mondo, necesas malfermi la okulojn kaj esplori pri la kaŭzoj de tiu neantaŭvidita fenomeno. Marks instruis, ke la proletaro havas la "historian mision" ordigi la mondon per starigo de socialismo. Ĝis nun ni povas bedaŭrinde noti nur fiaskon en la plenumado de tia misio. Mi estas konvinkita, ke inter la aferoj, kiuj kaŭzis la malvenkon de la laborista movado, la ignoro al moralaj principoj fare de gvidistoj estas unu el la plej gravaj. Oni ne povas konstrui fortan kaj tempomaltimantan movadon, malatentante tion, kio kvazaŭ cementas ĝin. Same kiel inĝeniero obeas al geometriaj principoj por konstrui ponton aŭ maŝinon, same la konstruantoj de nova mondo paca kaj harmonia devas nepre obeadi rigorajn moralajn principojn. Ne per blufado, mensogo kaj kalumnio oni povas fari pozitivan socian laboron.

Mi ne konsentas kun la vidpunkto de Johano-Jakobo Ruso (Jean-Jacques Rousseau) kaj de la anarkistoj ĝenerale, laŭ kiu la homo naskiĝas bona, sed morale difektigita per vivado en malbona socio. Se fakte la homoj naskiĝas bonaj, estus vere strange, ke ili konsistigas mal-

bonan socion. Pli verŝajne ekzistas bonaj kaj malbonaj homoj, same kiel sanaj kaj malsanaj, belaj kaj malbelaj. Fizike kaj morale povas ekzisti kripluloj, eĉ monstroj. Sed skulptisto, kiu celas reprezenti ideale belan korpon homan, ne prenos, ekzemple, ĝibulon kiel modelon. La estetiko havas siajn principojn. Same la etiko devas havi siajn. Kaj same kiel oni instruas geometriajn kaj estetikajn principojn, same devas esti encerbigataj la moralaj principoj, kiuj kondiĉas glatan funkciadon de homaj socioj.

La cerbo de geknaboj estas influebla per la edukado kaj ĝenerale la ricevita influo daŭras dum la tuta vivo. El ĉiu ajn infano oni povas fari ĉu kristanon, aŭ budan, islamon ktp., ĉu francan, germanan aŭ japanan patrioton ktp. Sekve eblas eduki la homojn laŭ principoj universale akceptindaj kaj aplikeblaj. Kaj nepre necesas, ke tia edukado estu farata, ke ĝi trasaturu la mensojn de ĉiuj homoj, por ke paco kaj harmonio povu ekzisti sur la tero.

Kiu pretendas labori por starigi socialismon t.e. liberan kaj senekspluatecan staton inter la homoj, kaj kiuj tamen ignoras la moralon, tiuj povas esti, en la plej bona okazo, nur unuflankecaj teoriuloj aŭ tute simple demagogoj, celantaj kapti la regadpostenojn por siavice komandi kaj ekspluati.

Kiel la vido de ĝibulo ofendas la estetikan senton, tiel same ĉiu malmorala homo devus vekti indignon kaj malaprobos ĉe ĉiu etika normala homo. Por teni sian korpon sana, necesas ne tro draste malobei higienajn regulojn. Simile, por ke la socio estu sana, ĉiu homo devas obei al moralaj principoj kaj akiri senton pri sia digno. Mi esperas, ke ĉiam S.A.T. estos gvidata de homoj, kiuj abomenas mensogon, kalumnion kaj ĉion similan, kio karakterizas la senetikecan bolŝevisman...

*

LETERO KVINDEK-SESA

Al K-do L.B., Parizo

Sidnejo, 31-3-1938.

... ..
Per alia letereto mi sciigis vin, ke mi estas en hospitalo. Tie nur dank'al la engluto de drogoj kaj al subhaultaj injekcioj mi sukcesis elteni la teruran suferadon, kaŭzatan de la diabla karbunklo, kiu naskiĝis kaj maturiĝis en mia maldekstra sidvango. Kaj kiam mi komencis trovi pli malpli normalan staton, tiam aperis alia turmentilo ĉe mia mentono. Oni devis fortranĉi mian barbon!... Malgraŭ la turmentado mi tiam ne povis deteni min ĝeme rikani ĉe la penso, ke mi devis veni en Aŭstralion por perdi mian... barban virgon. Antaŭe ja neniam razilo skrapis mian vizaĝon.

Oni diras, ke la fortranĉo de mia barbo reunigis min je 10 jaroj. Malsprita ŝerĉo! Mi ja nun sentas min 10 jarojn pli maljuna ol antaŭe. Aliel ne povas esti post kvarsemajna suferegado. Sed en ĉi tiu okazo kiel kutime homoj prijuĝas laŭ la ekstero, laŭ ŝajno. Sed povas esti ankaŭ, ke kompatemuloj diris tion nur kun la celo kuraĝigi min kaj tiel helpi al mia kompleta resaniĝo. Bedaŭrinde mia nekuracebla skeptikemo malebligas, ke la kuracmetodo de Kue(1) povu efiki sur min. Tamen mi volonte konsentas, ke la psiko efikas sur la korpon - kaj inverse. Aliel ne eblas racie klarigi la "miraklojn", kiuj estis konstatitaj en ĉiuj religioj.

La Kuea sinsugesto iel parenkas al la budaisma celado al nirvano... - Dume mi estas senbarba kaj certe vi ne rekonus min nun...

*

LETERO KVINDEK-SEPA

Al L.B., Parizo

Sidnejo, 16 aprilo 1938.

La legado de la artikoleto kun la titolo : "Han Riner esperantisto kaj sennaciisto", kiu aperis en la n-ro 462 de "S-ulo", iomete tiklis min neagrable. Kredu, ke mi havas admiron pri la verkaro de l'Mortinto kaj konsentas

(1) France : **Coué**, sufiĉe fama profesoro ĉe la universitato de Nanci (Nancy). Lia kuracmetodo konsistas en la simpla ripetado de l'frazo : "**Ĉiutage kaj ĉiurilate mi pli bone fartas**". (Kompil.)

preskaŭ kun ĉio, kion diras K-do R.L., la verkinto de l' nekrologo. Tamen mi ne povas konsenti, ke Riner estis "esperantisto kaj sennaciisto". Tial ke li verkis en franca lingvo kaj ne en sennacieca t.e. en esperanto, li ne povis esti sennaciisto, kaj tial ke li nur scipovis legi nian lingvon, kaj ne verki per ĝi, li ankaŭ ne povis esti esperantisto. La ĝusta kvalifiko pri la ŝatinda filozofo-saĝulo estus : **esperantano kaj sennaciemulo**.

Mi bone scias, ke li eklernis esperanton, kiam li estis tro maljuna kaj tro okupata por akiri verkokapablon en nia lingvo. Sekve, mia rimarkigo ne entenas riproĉon. Oni komprenu nur, ke por mi la sennaciismo ne estas ia diletantismo kaj ke plie mi ŝatas klaron en la konceptoj.

Kiu aliĝas al iu ajn ismo, tiu havas devon kondukti laŭ ties principoj. Kaj rilate al la sennaciismo, la unua kaj fundamenta principo estas la mondlingveco, kiu ebligas sennaciecan organizmanieron. Paroli pri monduueco kaj ne esti esperantisto, tio aspektas al mi, kvazaŭ ebriulo, kiu agitus kontraŭ drinkadon. Sed, aliflanke, **esperantisto**, kiu ne interesiĝas pri sennaciismo kaj ĝin ne komprenas, donas al mi la impreson de kamparano, kiu surmetus siajn festajn purajn vestojn por labori en koto, ŝlimo, marĉo aŭ fekaĵo.

Estas ja tre bedaŭrinde, ke homo kia H. Riner ne verkis en esperanto. Mankas en nia movado profundpensaj talentuloj. Mia espero estas, ke inter la knaboj, kiuj nun lernas nian lingvon, troviĝas geniulo kiu, post kelkaj dekoj da jaroj, produktos ĉefverkon, kiun volos legi en la originalo eĉ kontraŭuloj de artefarita lingvo.

Jes ja, mi esperas en la apero de tiaj homoj en nia movado kaj ne en la "produkto-fortoj" por sukcesigi ĝin. La invent-, plan- kaj organizkapablo de l'homo, alivorte ĝiaj penso kaj volo troviĝas ĉe la deirpunkto de ĉiu socia progreso, kaj ankaŭ de ĉia malprogreso : Hitler, Musolini, Stalin k.a. sklavigantoj kaj murdistoj atestas pri tio.

Ankoraŭ unu vorton pri H. Riner. - K-do R.L. tute trafe kaj prave raportis diron de l'mortinto, nome "ke la plej grandajn saĝulojn perfidis (ofte bonintence kaj tute sincere) iliaj intimaj disĉiploj". Mi ne scias tute precize, ĉu H.R. aprobis aŭ ne la tradicion, religiecan kutimon postsekvi kadavrojn ĝis la tombo. Almenaŭ mi estas forte konvinkita, ke tia kulto al putranta karno havas absolute nenion komunan kun la racio kaj saĝo. Tamen unu el la amikoj kaj admirantoj de l'saĝulo, Petro Benar (Besnard)

indigne raportis en "La Sindikatista Batalo" (Le Combat Syndicaliste), ke apenaŭ 200 personoj postsekvis la mortveturilon. Kaj interalie li riproĉas : "...pluraj el la amikoj de H.R. neniam sukcesos senkulpigi sin pro tiu foresto...". - P. Benar estas labor. gvidanto el la plej maldekstra alo. Li verkis libron pri la organizado de l'socio laŭ sindikatistaj principoj kun jena titolo : "La Nova Mondo". Sed lia menso restas saturita per plej malsaĝaj antaŭjuĝoj. Kaj ĝenerale ĉiuj rrevoluciuloj estas tiaj. Ili bombaste povas dum horoj paroladi pri revolucio, pri nova mondo, sed ne kapablas fari revolucion en sia propra cerbo kaj restas ligitaj al la malnova mondo per mil ligiloj, pri kiuj ili eĉ ne konscias. Kompreneble ili ne atentat as au mokas esperanton!...

Veraj disĉiploj de H.R. ne sekvus lian kadavron, sed kunvenus en iun oportunan lokon por tie legi, pridiskuti, kaj pripensadi kelkajn el la plej bonaj pecoj el lia verkaro.

La kulto al kadavroj grandparte kaŭzis la pereon de la egipta civilizo. Estas tre notinda fakto, ke la antikva Tebeo (hodiaŭa Luksor) konsistis ĉefe el funebraj monumentoj, kies nombro, dimensio kaj lukso estas apenaŭ penseblaj. Kaj ĉirkaŭ la grandioza civito el mumioj vivaĉis la popolo en mizeraj kabanjoj. Por ricevi ideon pri la dimensio de kelkaj el la funebraj monumentoj egiptaj, oni prezentu al si, ke la templo de Amono en Karnak ampleksis 30 hektarojn kaj ke en unu el ĝiaj ĉambregoj la katedralo **Nia Sinjorino** el Parizo povus esti entenata!

Homoj, kiuj ne liberigis sin el la kulto por kadavroj ; homoj, kiuj ne kuraĝas malobei al malsaĝa tradicio, tiaj ne estas veraj revoluciuloj. Kiam oni mumiigis la kadavron de Lenin kaj konstruis por ĝi monumenton sur la Ruĝa Placo en Moskvo, tiam mi ne povis deteni min pensi, ke tio signifas la entombigon de l'rusa revolucio. Hodiaŭ mi ĉagrene konstatas, ke mia tiama penso intuicia ne estis erara...

Kio ĉefe karakterizas esperanton, tio estas ĝia logikeco, ĝia racieco. La esperantistoj malracie starigis monumenton sur la kadavro de Zamenhof. Espereble tio ne signifas la fiaskon de nia afero. Almenaŭ mi kredas, ke ne multaj SAT-anoj partoprenis en tiu forlasinda honormaniero. Pli inde ni honoras nian Majstron per la ĉiutaga praktikado kaj fervora diskonigado de esperanto.

Rilate al H.R., mi scias, ke R.L. jam esperantigis unu el liaj verkoj : "**La Kvina Evangelio**". Esperantistoj plej bone honorus la "esperantano"n, se ili ebligus la eldoniĝon de tiu traduko.

*

LETERO KVINDEK-OKA

Publika letero al la adeptoj kaj simpatiantoj de l'Sennaciismo (1)

Karaj Gekamaradoj !

Akceptinte preni sur min la gvidadon super la **Sennacista Frakcio**, mi volas komenci ĉi tiun laboron per rapida ekzameno super la mallonga historio de nia ismo. Poste mi montros per kelkaj ekzemploj la strangajn kaj reakciecajn konsekvencojn de l'fama principo pri l'rajto por ĉiuj popoloj al memdispono, kaj fine respondos al la demando : Ĉu estas racie esperi, ke en la estonto la sennaciismo fariĝos **ideoforto**, ludanta similan rolon, kiel tiu de l'nuntempa naciismo ?

Por eviti en tia historia kaj anticipa ekzameno ĉian pedantecon, mi elektis la formon de letero, kaj penos paroli familiare, kiel dubema verserĉanto, sin turnanta al aliajserĉemaj homoj. Kiuj opinias jam esti trovintaj la veron, tiuj ne legu ĉi tiun skribaĵon. Dogmemuloj ĉiaspecaj iru for! Aŭ ili ŝtopu al si la orelojn por ne aŭdi herezaĵojn...

*

La termino **sennaciismo** aperis antaŭ 13 jaroj. Ĝi do prezentas sin ankoraŭ nun kvazaŭ juna, petolema bubo. En sia sepa jaraĝo ĝi jam estis en Lajpzigo, okaze de la 9-a SAT-Kongreso, mortkondamnita de Stalinaj lakeoj. Sed ili ne estis sufiĉe fortaj, por ke la ekzekuto povu esti plenumita. Male, tiu kondamno plivigligis kaj hardis la bubon, kiu tiam prepariĝis por la vivbatalo.

Estas interese noti, ke la vorto **sennaciismo** sonis unua foje en Moskvo mem, kiel atestas artikolo, aperinta en la 3-a numero de **La Nova Epoko**, revuo tiutempe eldonita de grupo da K-doj, simpatiantaj al S.A.T. En Aŭgusto 1922, okaze de mia trisemajna ĉeesto en Sovetio, ili ja petis, ke mi verku artikolon por ilia organo. Konsentinte, mi do liveris al la "Novepokanoj" skribaĵon kun la titolo : **Sennaciismo**. Tiam ne ankoraŭ ekzistis ortodoksa eklezio marksisma. Poste, de tempo al tempo, aperis en la S.A.T. organoj artikoloj kun pure sennacisma karaktero.

(1) Ĉi tiu letero kaj la sekvantaj aperis en **Herezulo**, revueto, kiun eldonis Lanti, post sia ekziĝo el la Plenum-Komitato de SAT. (Kompil.)

Neniu tiam riproĉis. Male, multaj K-doj el Sovetio mem kun entuziasmo skribis al mi aprobe kaj gratule. Ĉefe en tiu mondparto la sennaciismo trovis varmajn adeptojn. En 1924, eĉ aperis ĉe S.A.T. **A.B.C. de Sennaciismo**, verkita de Elsudo, pseŭdonimo de la sovetia K-do V. Kolŝinski. Verdire, malgraŭ la titolo, la verketo ne estas pure sennaciisma. Almenaŭ ĝi montras malprecizan emon forlasi la trabatitan vojon de la internaciismo.

Sed venis la tempo, kiam en Sovetio absolutisma spirito faris el la verkoj de Marks kaj Lenin rigidan dogmon, kiun ĉiu devas agnoski, se li ne deziras esti konsiderata kiel "kontraŭrevoluciulo" kaj sekve malliberigita kaj diversmaniere silentigita.

Kiam la nova ismo estis solene kondamnita kiel "kontraŭrevolucia", "porimperialisma" dekliniĝo, tiam kelkaj sovetiaj K-doj bonintence provis pruvi, ke ĝi ne kontraŭas la instruojn de Marks kaj Lenin. Tio ne helpis kaj finfine ili pente devis frapi al si la bruston, konfesi sian eraron aŭ tute silenti.

Verdire, mi persone neniam atentis, ĉu la sennaciismo akordiĝas aŭ ne kun la diroj de famaj kaj aŭtoritataj teoriuloj. Ĉe la konstato, ke mia vidpunkto estas iel hereza, mi ne miris pro tio. Marks, Lenin, Kropotkin k.a. ne estis esperantistoj. La lingvan problemon ili ne konsideris. Sed mi estas mondlingvano, esperantisto kaj sekve ne povas malatenti faktoron, kiun mi opinias grava, en priksidero super soci-politikaj demandoj. Neniam mi havis la opinion, ke la esperantista movado estas io akcesora kaj ne inda por atenti de l'laboristaj gvidantoj.

Por diskonigi la novan ismon kaj montri ĝian apartan karakteron, ĝian originalecon, ni eldonis 3000-ekzemplere la **Manifesto-n de la Sennaciistoj**, kiun espereble vi ĉiuj legis atente, kompreneme, se ne ĉiarilate aprobe. Por defendi la ekzistorajton de nia tendenco en la kadro de S.A.T., stariĝis la "Sennaciista Frakcio", kies sidejo migris de Nov-Jorko al Ŝtutgarto, de tie al Plzen, de ĉi tiu lasta urbo en Parizon (2).

La malnovaj frakcianoj scias, ke aperis dek-naŭ numeroj de **Sennaciista Bulteno**. La dek-kvar unuajn prizorgis K-do T. Veder, la du sekvantajn K-do H. Vagner, kaj la tri lastajn K-do J. Ŝtadler. Ĉiuj tiuj numeroj konsistis

(2) Nun (1940) en Manĉestro. (Kompil.)

el multobligitaj ekzempleroj. Proksimume centoj da Gek-doj ricevis la organon de l'Frakcio. De nun la sennaciismo trovas pli konvenan, pli komfortan hejmon sur la paĝoj de **Herezulo...**

*

Paroli pri sennaciismo en nia epoko, tio sonas preskaŭ ironie. Ni ĉiuj ja scias, ke ĉie en la mondo pli kaj pli bolas, furiozas la naciismo. Nekontraŭdireble ĉi tiu lasta doktrino konsistigas jam de preskaŭ unu jarcento la plej potencan, dinamikan **ideo-forton**. Tre karakteriza ŝajnas al mi, ke en la Ĝenerala Konsilantaro de la I-a Internacio sidis Jozefo Mazini, unu el la unuaj plej eminentaj teoriuloj kaj agitistoj por naciismo, por rajtoj de ĉiuj popoloj al memdispono. Ne malpli signifa estas la fakto, ke en la tagordo de la unua kongreso de la Unua Internacio troviĝis punkto pri la restarigo de Polio kiel memstara, sendependa lando. Kaj sendube estas superflue diri, ke tiu propono ricevis la aprobon de l' kongresanoj.

Ĉiu el vi, Gek-doj, certe scias pli malpli precize, ke la Dua Internacio same defendis tuj ĉe sia fondiĝo tiun principon pri nacia sendependeco. Cetere, en ĝia kadro troviĝis reprezentantoj de naciecaj grupoj polaj, finnaj, judaj kaj de diversaj naciecoj el la Austri-Hungaria Imperio. Mi nur memorigu al vi, ke en 1907, ĉe la Ŝtutgarta Kongreso, Vanderveld akceptigis, ke "la nacioj same kiel la individuoj havas la tute pravan rajton defendi sin en okazo de atako aŭ de minaco al ilia sendependeco".

Sendube ne estas necese memori vin, ke Lenin estis ĉampiono en tiu ideologia batalo pornacia. Kaj en la programo de l'Tria Internacio (1928) troviĝas jeno: "a) Agnosko al la rajto por ĉiuj nacioj, sendepende de ilia rasa aparteno, pri plena memdispono, t.e. ĝis ŝtata apartiĝo."

Mi memorigas tiujn faktojn por ke ĉiu el vi estu tute konvinkita, ke la naciismo neniam renkontis principan kontraŭstaron en revoluciaj orgnaizoj. Tia sinteno cetere estas logika konsekvenco de tio, ke neniam la lingva problemo estis prikonsiderata kaj solvita, kiel povas tion fari esperantistoj. Estas do tute vere, ke nia sennaciismo konsistigas novan tendencon en la laborista movado kaj staras ĉe tute aparta vidpunkto en la batalo

por la liberiĝo de la ekspluatatoj el la tuta mondo. Kiuj diras, ke la sennaciismo estas nur internaciismo plus esperanto, tiuj trompas sin mem aŭ celas trompi aliujn.

En la nomo de l'naciismo batalis la soldatoj de l'lastdata mondmilito. La rajto de l'popoloj al memdispono estis unu el la 14 punktoj en la programo de Vilson per kiu li atingis, ke Usono partoprenu la militon. Kaj en libro premiita de l'Franca Akademio : **La principo de l'naciecoj**, Renato Johane povis diri, ke **la unuan fojon en la historio de l'mondo oni provis apliki tiun principon en la Versaja Kontrakto**. Mi tuj diru, ke la aŭtoro devis konfesi, ke la apliko de tiu bela principo fiaskis en la praktiko...

Ĉiu ja ne povas ne rimarki, ke la starigo de Ĉeĥoslovakio, ekzemple, kiel sendependa ŝtato, montras okulfrape, ke tie la nacieco tute ne koincidas kun la limoj difinitaj de la packontrakto. La ĉeĥoj kaj slovakoj reprezentas apenaŭ la du trionojn de l'regatoj kaj la alian trionon konsistigas germanoj, magiaroj kaj judoj.

Sed la plej tipa ekzemplo estas sendube Jugoslavio en kies limoj ĉirkaŭ serboj baraktas kroatoj, slovenoj, slavonoj, dalmatoj, macedonoj, montenegroj, bosnoj k.c.

En Polio, kies sendependeco estas nove restarigita, la situacio tiurilate ankaŭ tre similas tiun de Ĉeĥoslovakio kaj Jugoslavio. Cetere, nenie en la mondo estus eble organizi la socian vivon per severa apliko de l'nacieca principo ; nenie en la mondo ekzistas la eblo atingi absolutan koincidon inter ŝtato kaj nacieco. Eĉ Svedion oni povus nomi imperialisma ŝtato, ĉar tie la laponoj ne ĝuas nacian sendependecon kaj ne havas sian reprezentanton en la Ligo de Nacioj!...

Aliparte, oni ne devas forgesi, ke eĉ la plej bone unueciĝintaj nacioj nuntempaj reprezentas tamen ion artefaritan de la Historio. Estis necesa la veno de Musolini sur la historian scenejon, por ke realiĝu la idealo de Mazini, t.e. ke la itala nacieco fariĝu io reala kaj firma ; necesis la venko de Hitler, por ke Germanio atingu la lastan stadion de sia unueciĝo. Antaŭe ja ekzistis interne de l'Regno landoj, havantaj kelkrilate sendependecon.

Ĉar la naciojn ne konsistigas io esence pura kaj unuelementa, estas do tute logike, ke la naciismo havu neantaŭviditajn rezultojn.

Oni ĝenerale konsideras Francion, kiel unu el la landoj,

en kiu plej bone kunfandiĝis la provincoj en nacian tuton. Nu, de kiam estas farata ĉie en la mondo vasta kaj vigla agitado favore al la rajto de l'popoloj por memdispono ; de kiam Vilson kaj Lenin fariĝis la ĉefroluloj de tiu principo, de tiam oni povas konstati en la "plej malnova nacio" la naskiĝon kaj kreskon de diversaj movadoj por revivigi aŭ pluiĝi malnovajn lingvojn kaj kulturojn. Kion ne ankoraŭ sukcesis tute kunfandi kaj luti la Historio, tio nun servas kiel preteksta fundamento por la apliko de l'fama principo.

La plej forta kaj atentinda el tiuj movadoj kompreneble estas la Alzaca. La procezo de franca asimiliĝo ne povis okazi, ĉar dum 47 jaroj tiu provinco apartenis al Germanio. Sed ankaŭ la alzacanoj ŝajne ne volis esti germanoj : "Esti franco mi ne povas, pruso mi ne volas, alzacano mi estas." Tiel povas resumiĝi la spiritostato de tiuj naciistoj, kiuj disponas por sia agitado dekon da gravaj gazetoj, inter kiuj mi menciuj la ĉiutagan katolikan **Lotaringia Popolgazeto** (Lothringer Volkszeitung) kaj la komunistan, ankaŭ ĉiutagan, **La Homaro** (L'Humanité). Ambaŭ aperas en Mes (Metz).

Pli tipa kaj apoga al mia tezo ol la alzaca ekzemplo estas la bretona, baska, kataluna (parto de Katalunio troviĝas en Francio), gaskona kaj provenca. En tiuj regionoj la franca lingvo estas de ĉiuj konata kaj parolata, sed la indiĝenoj krome ankaŭ pli malpli parolas inter si lokan idiomon, kiun la tieaj naciistoj volas levi al la rango de nacia, kultura lingvo.

La bretona movado eldonas sep gazetojn en sia idiomato. Ekzistas "Nacia Partio Bretona". Bretonio estas unu el la plej reakciaj provincoj el Francio kaj la movadon por sendependiĝo subtenas ĉefe katolikaj pastroj kaj... komunistoj el la Stalina konfesio(1).

La aliaj movadoj por nacieca apartiĝo estas pli malpli sensignifaj, kvankam en provenca lingvo produktiĝis kelkaj literaturaj valoraĵoj. Inter ili mi citu : "Mirèio" de Mistral ; ĝi estas konsiderata kiel ĉefverko. Sed la aŭtoro perfekte konis la francan lingvon kaj li eĉ eldonis sian poemon kun franca traduko apud la originalo.

Sed la plej tipa ekzemplo pri logikaj konsekvencoj de l'nacieca ideologio estas sendube la irlandia. Ĉiuj el vi

(1) Utilas mencii, ke post kiam Sovetio kaj Francio "amikiĝis", de tiam la gvidlinio de l'Franca Kompartio tute aliĝis tiurilate. Sed tio neniel signifas, ke tiu partio alprenis sennaciisman vidpunkton ; male, ĝi fariĝis eĉ ŝovinista...

certe pli malpli scias pri la sangaj bataloj, kiuj okazis en Irlando kun la celo akiri nacian sendependecon. Sekve de tio, fine stariĝis la "Libera Ŝtato de Irlando". Ĝi tamen reprezentas nur parton de la tuta insulo, ĉar la norda parto, Ulster, ne konsentis al tia politiko kaj nun ankoraŭ apartenas al "Unuiĝinta Reĝlando de Grand-Britio".

Nu, ĉu tiu nacia liberiĝo havis kiel rezulton plibonigi la vivkondiĉojn de la irlandaj proletoj? Tute ne! Ili estas nun eĉ pli mizeraj ol antaŭe. Nur iu kategorio da politikuloj kaj funkciuloj profitis de la ŝtata apartiĝo. Stariĝo de novaj kancelarioj, de novaj postenoj diplomaciaj aŭ similaj donas kontentigon al sufiĉe multaj homoj, kiuj antaŭe ne havis tiel bonan situacion. Tiuj novaj parazitoj povas iom prave prikanti la bonon de l'nacia memstareco...

La ĉefroluloj de tiuj naciecaj movadoj nemalofte riproĉas, ke la imperialistaj ŝtatoj, en la celo asimili la popolojn, devige lernigas al la infanoj lingvon, kiu ne estas ilia gepatra, kaj ke tio havas malbonan efikon rilate al kleriĝo. Volonte mi konsentas pri tio, kvankam tiu malbono povas esti nur duma, unu-dugeneracia. Sed - mirige! - tion saman faras la irlandaj naciistoj. La grandega plimulto de la irlanda popolo ja tute forgesis la gaelan idiomon kaj praktikis nur la anglan lingvon. Apenaŭ proksimume duonmiliono el la 4 229 000 loĝantoj ankoraŭ konas la prapatran idiomon. Cetere la plimulto de tiu duonmiliono ankaŭ konas la anglan lingvon. Tamen, de kiam la naciistaj herooj regas en Irlando, ili severe kaj persiste klopodas por redoni la unuan lokon al preskaŭ mortinta lingvo. Ekde 1922 ili tiucele varbas kaj preparas instruistojn. Kaj ĝis nun, malgraŭ streĉa penado, nur unu triono el la 14 000 kapablas instrui per la irlanda, oficiala lingvo. Sed la ŝtata trudado ne ĉesas kaj pli kaj pli da instruistoj fariĝas centpocentaj irlandanoj. Jam ekzistas pluraj lernejoj, en kiuj la angla lingvo estas traktata kiel fremda, tute samkondiĉe kiel la franca aŭ la germana. La edukaj aŭtoritatoj gratulas al si pro tio. Estas tamen dubinde, ĉu irlanddevena verkisto kiel Bernardo Ŝo (Shaw) iam konsentos forlasi la anglan lingvon kaj aperigos siajn literaturaĵojn en la prapatra idiomoo...

Kiel vi vidas, Gek-doj, la apliko de l'bela principo pri la rajto por la popoloj al nacia sendependeco donas vere mirigajn rezultojn. En landoj kiel Ĉeĥoslovakio, Polio,

Latvio k.a. nacie sendependiĝintaj landoj, se oni esploras tie pri la stato de l'proletaro, oni ankaŭ nepre konstatas, ke ĝi tute ne pliboniĝis sekve de tia "liberiĝo". Se oni ne estas blinda fanatikulo, la nura saĝa konkludo de tia konstato estas, ke la agitado kaj batalado por akiri nacian sendependecon estas **por la proletaro** - tion mi substrekas - nur trompa, vana, senprofita elspezo de tempo, energio kaj sango.

*

Por pli bone kompreni kaj ĝuste taksi la forton de l' nacieca ideologio, nun, karaj Gek-doj, ni ĵetu ekrigardon super la programon kaj agitadon de l'revoluciaj partioj kaj laboristaj organizoj. Kion ni vidas? Estas okulfrape, ke ĉiuj proponas solvojn al la ekonomia krizo per rimedoj aplikeblaj nur en **nacia** kadro. Ĉie temas pri **naciigo** al la bankoj, pri **naciigo** al la fervojoj, pri **naciigo** al la grandaj industrioj ktp. ; ĉie oni agitas por rimedoj, kiuj ŝajne donos kontentigon al la enlandanoj : temas stimuli la **nacian** industrion, protekti la **nacian** laboron, sekurigi la **naciajn** interesojn de l'tuta popolo. Plejofte tio povas havi kiel konsekvencon nur ĝeni aŭ tute malhelpi la solvon de la krizo en la aliaj landoj. Povas esti tamen, ke tiuj naciecaj planoj iam realiĝos ; ke la interesoj de ĉiuj enlandanoj fariĝos pli kaj pli solidaraj ; unuvorte, ke ĉie en la mondo stariĝos iaspeca nacia socialismo. Miaopinie, tio tute ne solvos la socian problemon ; sed la apliko de tiaj naciecaj rimedoj plifortigos la naciismon ĉe la popoloj.

Ŝajnas, ke la Nacio ĉie fariĝis la ĉefa diaĵo antaŭ kiu la homoj devas genufleksi kaj riverenci(1). Ni bone memoru, ke la patriotismo, en la senco kiel ĝi nun superregas la spiritojn, naskiĝis kun la franca revolucio el la jaroj 1789-93. Tiam la terminoj **patrioto** kaj **revoluciulo** estis samsignifaj. Ju pli la interesoj de tuta popolo fariĝas komunaj, des pli facile povas kreski la nacieca sento.

Kiam la laboristaro estis tute malklera, tiam estis malfacile eduki ĝin naciisme. Cetere, tio ne estis necesa, ĉar la armeoj el la antaŭrevolucia tempo konsistis nur el dungitaj soldatoj. Ne estis kiel nun devo por la tuta popolo partopreni militojn. Eĉ ne kaŭzis skandalon, ekzemple, la fakto, ke Volter foje diris sian ĝojon pro tio, ke malvenkis francaj armeoj. Hodiaŭ la registaroj

eĉ ne toleras indiferenton pri la patrio. En Germanio, en Italio, en Sovetio jam nun la infanoj estas naciisme edukataj ekde la lulilo. Se aliflanke oni konsideras, ke neniam produktiĝis en la mondo tiom da armiloj kaj municio, ke neniam la mortigiloj estis tiel potencaj kaj perfektaj, oni nepre venas al la konkludo, ke prepariĝas grandega katastrofo milita...

Ĉiu adoranto de l'nacia diaĵo asertas, ke tia armado estas sindefenda ; neniu parolas pri ataka milito. Sed, evidente, povas tamen okazi, ke la plej sekura maniero por sindefendo estas ataki mem en oportuna okazo... Al tia rezulto, al tia senelirejo kondukis la homaron la nacieca ideologio, kiu enplantiĝis pli kaj pli en la animo de ĉiuj popoloj jam de unu jarcento.

Mi ripetas, paroli nuntempe pri sennaciismo, tio aspektas kvazaŭ malsprita ironio. Tamen ŝajnas al mi evidente, ke la homaro sin savos, nur kondiĉe, ke malaperu el la mondo la stulta kaj pereiga naciismo.

Ideoj naskiĝas, disvastiĝas ĝis atingo de stato, kiu signas kulminon de ilia disvastiĝeblo. Tiam ili ekvelkas, kadukiĝas kaj fine mortas, lasante libera la kampon por disvastiĝo de aliaj pli laŭcelaj ideoj. Mi kredas, ke la nacieca ideologio proksimiĝas al tia stato. Se mi kutimus rezonadi laŭ la materialisma dialektiko de ortodoksaj marksistoj, mi dirus, ke la naciismo neeviteble naskas sian kontraŭecon t.e. la sennaciismon - same kiel la kapitalismo naskis la proletaron, kiu, laŭdire, estos ties entombiganto. Sed neniam tia rezonmaniero ŝajnis al mi kontentiga : Ĝi entenas dozon da fatalismo iom tro fortan. Mi preferas fidi al la elvolviĝo de l'homa racio kaj esperi, ke finfine la homoj tute simple komprenos, ke ili ĉiuj estas teranoj kaj sekve devas kondukti ne kiel nacioj, sed kiel mondĉivitanoj. Espereble eĉ la plej stultaj kaj fanatikaj devos konstati, ke nia planedo pli kaj pli malgrandiĝas, ke ĉia nacia apartigo sekve estas malracia kaj neeltenebla. Vole nevole la homoj el ĉiuj kontinentoj estos devigataj pli malpli baldaŭ serĉi rimedojn por loĝi komforte, sekure kaj pace sur la komuna, malgrandiganta planedo. Kaj tiam estos prepariĝinta favora grundo por dissemi la sennaciismon.

(1) Antaŭ 1914, oni povis travojaĝi la tutan Eŭropon sen pasporto, sen vizoj, sen iuj demandoj ; tiam ekzistis nur doganesploroj. Hodiaŭ krom la dogana esploro ekzistas ankaŭ tiu de l'polico de la lando, kiun oni forlasas kaj de tiu, kiun oni eniras.

Sed mi ne kredas je spontana generado de ideoj. Ilin devas unue naski homaj cerboj, kaj se troviĝas taŭgaj kondiĉoj, tiam tiuj ideoj disvastiĝas kaj konkretiĝas.

Fakte la sennaciismo ne estas tute nova ideo : ĝi estas nur nova termino. Kosmopolitismo ja estas preskaŭ samsignifa. Etimologie, katolikismo ankaŭ parencas kun sennaciismo : greke "katolikos" signifas **universala**. Kaj la kristanoj de l'komenca tempo celis la interfratiĝon de ĉiuj homoj sur la tero, sen distingo pri raso aŭ deveno.

Dum la paso de l'jarcentoj tiuj terminoj perdis sian originan sencon. Cetere, kiam ili naskiĝis, tiam ne ankoraŭ ekzistis la necesaj kondiĉoj por ilia enplantiĝo en la vivo de l'popoloj. Mankis fervojoj, vaporŝipoj, flugmaŝinoj k.a. rapidaj interkomunikiloj. **Mankis esperanto...** Sed baldaŭ ekzistos sur la tuta tero la objektivaj kondiĉoj por ke la sennaciismo povu disvastiĝi kaj fariĝi konkretaĵo.

Bedaurinde la homaro devos verŝajne lerni denove en **sankta** kaj sufero, ke naciecaj rimedoj tute ne taŭgas por solvi la problemon pri organizado de l'socia vivo sur la tuta tero. La naciaj herooj devas unue perdi sian popularon por finfine aspekti en la okuloj de l'popoloj kiel danĝeraj demagogoj nepre malhonorindaj.

Se mankis ĝis nun la necesaj kondiĉoj, por ke povu enplantiĝi kaj kreski la sennaciismo, tio neniel signifas, ke de nun, kiam ekzistas tiaj kondiĉoj, la nova ismo disvastiĝos per si mem. La nuna stato de l'mondo plej draste montras, male je la aserto de Marks kaj Engels en la **Komunista Manifesto**, ke superreganta ideologio en difinita epoko ne estas simple la reflektado de ĝiaj materiaj kondiĉoj. La homo ja estas animalo kun la kapablo abstrakti kaj sekve starigi teoriojn, doktrinojn, kiuj en iaj cirkonstancoj povas kvazaŭ infekti la cerbojn de tuta popolo. Germanio tre trafe pravas tion nuntempe Tial la sennaciismo venkos, nur se sufiĉe da homoj konvinkiĝis pri la neceso disvastiĝi ĝin ; se ili unue penados imuni sin kontraŭ ĉiaj naciecaj miasmoj en kies mezo ni estas devigataj vivi en nia epoko.

Laŭ la materialisma koncepto pri la Historio, la malvolviĝo de l'produktfortoj kondukos la homaron nepre al kunfandiĝo de ĉiuj nacioj. Tia fatalismo estas iel danĝera. La malvolviĝo de l'tekniko estas nur **kondiĉo**,

sed ne kaŭzo por monduniĝo ; necesas plie, ke la spirito de l'homoj aliĝu ; necesas, ke ilia menso tute liberiĝu el la naciisma ideologio. Kaj tiucele oni devas konsekven-
ce propagandi kaj agadi. Tiel ne okazis ĝis nun ; neniu revolucia organizo celkonscie edukis homojn por ke ili fariĝu taŭgaj mond-civitanoj. Neniu organizo faras tion, tial ke ĉiuj prezentas al si la aranĝon de l'homaj rilatoj laŭ internaciisma vidpunkto, t.e. kun konservo de l'naciaj kadroj, kiujn cetere postulas malsamo de lingvoj kaj kulturoj. Nur mondlingvanoj, esperantistoj, jam nun kapablas prezenti al si sennaciecan mondorganizon ; nur ili povas konsistigi la embrion de tia organizo.

Kredeble tion Zamenhof jam intuicie komprenis, kiam, okaze de la unua esperanto-kongreso, li diris en sia parolado, ke tiam kunvenas "ne francoj kun angloj, ne rusoj kun poloj, sed homoj kun homoj."

Iaj ortodoksuloj diris kritike al la sennaciismo, ke ĝi estas nur la nebula "interna ideo" de la aŭtoro de esperanto metita en formon akcepteblan de la laboristaro. Verdire tian riproĉon mi volonte akceptas. Nia sennaciismo ja agnoskas la klasbatalon kiel fakton kaj progresigan faktoron en la historia procezo. Al la proletoj ni vokas : "Neniam, nenial kaj nenie vi partoprenu konsente nacibatalon ; nur la klasbatalo estas liberiga kaj profitdona por nia klaso!" Tion ja ne diris Zamenhof kaj sekve nia sennaciismo ne povas esti identigata kun lia "interna ideo". Sed tio tamen ne signifas, ke la malpreciza ideologio Zamenhofa ne estis utila en la komenco de la esperanto-movado. Oni ne povas malatenti la fakton, ke precipe restis ligitaj al la movado kaj laboris por ĝi nur la pioniroj pli malpli konfesantaj tiun internan ideon. Ĉe tia konstato naskiĝas nepre la forta bedaŭro, ke tiu ideo ne fariĝis ideo-forto, kapabla sufoki la naciismon. Verŝajne tamen tiel okazus, se esperanto grandskale disvastiĝus kaj aplikigiĝus tra la mondo. Sed la esperanta movado restis ĝis nun tute sensignifa kaj sekve ne kapabla iel ajn influi sur la iron de la okazintaĵoj.

Sed tio ne kontraŭdiras la aserton, tute male, ke la plej fervoraj kaj sindonaj adeptoj de nia laborista esperanta movado estas tiuj, kiuj pli malpli konscie agnoskas la sennaciismon. Estas memkompreneble, ke homoj, kiuj konsideras esperanton kiel pure lingvan, flankan, akcesoran aferon ne povas senti sin forte ligitaj al nia afero, kiel

tiuj, kiuj faras el ĝi la bazoŝtonon, per kiu oni komencu la konstruadon de racia, paca socio tutmonda.

Ĉi tiu letero jam fariĝis longa kaj tamen mi ankoraŭ ne preparolis la demandon, starigitan ĉe la komenco, nome : "Ĉu estas racie esperi, ke en la estonto la sen-naciismo fariĝos **ideo-forto**, ludanta similan rolon, kiel tiu de l'nuntempa naciismo?"

Volonte mi konfesas, ke al tia demando estus eble pli saĝe tute ne respondi. Profeto ne estas mi kaj plie scias, ke plej eminentaj teoriuloj kaj popolgvidantoj grave eraris en siaj antaŭdiroj. Kiel pruvon pri mia aserto, mi citos nur kvar ekzemplojn el verkoj de homoj, kiuj ludis konsiderindan rolon en la laborista, revolucia movado. Sed estus facile menciigi multajn aliajn.

Unuavice, kiel konvenas, sidas Karlo Marks. En sia fama verketo : **La Komunista Manifesto**, oni povas interalie legi ĉi tion :

"Al Germanio direktas la komunistoj sian ĉefan atenton, tial ke tiu lando staras en antaŭvespero de burĝa revolucio ; tial ke tiun ĉi renverson ĝi plenumos entute kaj kun multe pli evoluinta proletaro ol Anglio en la 17-a jarcento kaj Francio en la 18-a ; sekve la germana burĝa revolucio povas esti nur la senpera antaŭludo de proleta revolucio".

Tio estas skribita antaŭ 88 jaroj! Estus iel kruele insisti por montri, ĝis kia grado Marks eraris en tiu sia antaŭdiro. Mi simple rimarkigu, ke ne nur la germana proletaro ne starigis en Germanio la komunismon, sed en 1914 en sia grandega plimulto ĝi partoprenis entuziasme la militon kaj staris fidele ĉe la flanko de Vilhelmo la 2-a kaj de lia stabo. Kaj kion ni vidas nun ? Hitler, proletdevena elementulo, starigas novan ideologion, kreas novan miton, novan mistikon ; per konsiderinda plimulto li sukcesas balote akiri la regadon kaj poste estradi absolutisme super la tuta germana popolo. K. Marks eraris ne nur en tio, ke li opiniis en 1847, ke la proleta revolucio estas proksima en Germanio, sed ankaŭ rilate al tio, ke la malvolviĝo de l'produktfortoj, de l'mondtrafiko ktp. naskos ĉe la proletaro klaskonscion, senigitan je naciecaj interesoj. Male de tia espero, ni ja konstatas, ke ĉie la naciismo narkotis aŭ tute sufokis la klaskonscion ĉe la grandega plimulto de l'proletoj.

13 Nekontraŭdireble, Germanio estas la lando, kie laŭ instruoj de Marks, la laborista klaso devus iniciati la starigon de l'socialismo. Tamen tio ne okazis kaj Hitler ĉe la aprobo kaj aplaŭdado de milionoj da fanatikuloj profetas, ke li nun orientas la vivon de l'germana popolo por mil jaroj! Espereble tia antaŭdiro montriĝos eĉ pli erara ol tiu de Marks antaŭ 88 jaroj...

Sed eble iuj el miaj legantoj pensos, ke por sukcesi en sia entrepreno, Hitler devis tamen alpreni ŝajnsocialisman programon. Liaj anoj ja sin nomas "naci-socialistoj". Estas vere, sed tiu fakto pruvas favore al la tezo pri forto de ideoj. La socialisma ideologio profunde penetris en la konscion de granda nombro de germanoj per multjara kaj vasta propagando de l'social-demokrata partio; la socialismo tiel fariĝis ideo-forto. Per ĝia kuniĝo kun alia ideo-forto, nome la naciismo, kiu estas ankoraŭ pli forta ol la unua, Hitler ekposedis mirinde taŭgan programon, kapablan entuziasmigi, pasiigi la amasojn. Tiel klariĝas la venko de movado, kiu fakte estas tre reakcia kaj danĝera por la homaro.

Aliflanke ni vidas, ke en lando, kie tute ne ekzistis la objektivaj kondiĉoj, postulitaj de l'marksismo, por ke povu starigi socialismo, ĝuste estas tie farata la unua provo tiucele. La cara imperio ja estis preskaŭ nur kampara lando, kie la unuaj radikoj de l'kapitalismo ne ankoraŭ profunde penetris. Sed jen burĝdevenaj homoj (Lenin, Trocki, Lunaĉarski, Litvinov, k.c., ne apartenis al la proleta klaso), kies cerbo estas saturita per la instruoj de Marks, profitante esceptajn cirkonstancojn, bonŝance sukcesas kapti la regadon en siajn manojn kaj decidas starigi tie socialismon.

- Sed ili tute ne sukcesas, flustras en mian orelon leginto de "Ĉu socialismo konstruiĝas en Sovetio?".

- Estas vere, sed nun ne temas pri tio. Mi celas montri la gravan rolon, kiun ludas la ideologio kaj substreki la fakton, ke en Germanio, kie ekzistis la objektivaj kondiĉoj por la starigo de socialismo, **proletdevena** homo, Hitler, kreas specialan ideologion, rekte kontraŭan al la marksismo, kaj sukcesas venki en sia batalo. Kontraste al tio, en la lando, kie mankas la objektivaj kondiĉoj por starigo de socialismo, **burĝdevena** homo, Lenin, kreinte la bolŝevistan partion, sukcesas per ĝi akiri la regadon, promesante al la amasoj la starigon de socialisma socio.

Sekve en Sovetio kiel en Germanio la amasoj estis kaj ankoraŭ estas movataj per ideologioj. Miaopinie, tiuj du ekzemploj plej bone montras, ke la historia materialismo ne donas kontentigan respondon al multaj demandoj kaj estas do nur hipoteza, konjekta kaj neniel povas esti konsiderata kiel scienca teorio.

Kiam Marks analizas la strukturon de l'kapitalisma socio, kiam li montras ĝian funkciadon, ĝiajn krizojn ktp., tiam li sendube faras sciencan laboron kaj ĉiuj fakuloj en ekonomiscienco konsentas pri tio. Sed liaj antaŭdiroj kaj asertoj pri la historia misio de l'proletaro povas nur ludi la rolon de mito kaj tiel krei mistikon, similan al tiu de Hitler. (Bonvolu, karaj legantoj, ne miskompreni : mi ne volas diri, ke la Marksa mito estas malutila kaj dangeŝa, kiel tiu de Hitler). Kaj sciante tion, oni ne faras el la marksismo dogmon, novan religion kun fanatikaj adeptoj.

Ni, sennaciistoj, apartenas al la proleta klaso kaj sekve estas tute nature, ke ni deziras ĝian emancipiĝon; ni do emas kredi, ke la proletaro ja havas "historian mision" por plenumi, nome la starigon de socio sen klasoj kaj landlimoj. Sed ni konscias tamen, ke tio estas nur ia "pia deziro". Ni ne povas havi la certon, ke tiel nepre okazos. Sur la ruinoj de l'kapitalisma socio ni jam vidas en kelkaj landoj la starigon de diverskoloraj faŝismoj, kiujn Marks ne antaŭvidis. Sed ni ankaŭ scias, ke la senlandlima, senklasa kaj justa socio dezirata kaj alcelata ne starigos per ia miraklo. Ĝi povos rezulti nur de nia agado, de niaj bataloj, de niaj kapabloj. Tial ni devas gardi nian intelekton kontraŭ ĉia dogmemo, por povi profiti el niaj spertoj, eĉ el niaj malsukcesoj.

Karaj Gek-doj! mi petas pardonon pro tia ŝajndeflankiĝo de l'temo kaj nun mi tuj montru duan ekzemplon pri la erarpovo de alia eminenta teoriulo. Sur mia skribo tablo kuŝas 290-paĝa volumo, verkita de Johano Grav (Grave) antaŭ 42 jaroj. Ĝi surhavas kiel titolon : **La Mortanta Socio kaj la Anarkio**. La aŭtoro ankoraŭ vivas. Antaŭnelonge li festis kun amikoj la 80-jaran datrevenon de sia naskiĝo. Grav estas disĉiplo de Elizeo Reklu kaj de Kropotkin. La anarkistaro antaŭ la milito kutimis konsideri lin kiel unu el la plej boncerbaj teoriuloj.

Kiel diras la titolo de l' verko, la tezo de la aŭtoro estas montri, ke la kapitalismo mortas kaj ke sur ĝia

kadavro baldaŭ stariĝos la anarkio. Sed la "mortanta socio" ankoraŭ vivas kaj vidiĝas neniam signoj pri baldaŭa stariĝo de senŝtata, senestrecia socio. Tute male, ni vidas preskaŭ ĉie en la mondo la plifortiĝon de la ŝtata potenco kun diktatoreca karaktero...

Ĉe Grav, kiel ĉe Marks, kiel ĉe preskaŭ ĉiuj homoj la deziro estas la patro, la naskiganto de la ideoj. Ambaŭ deziregis la morton de la abomeninda socisistemo, kiu regas jam de preskaŭ du jarcentoj kaj ilia dezirego naskis ĉe ili argumentojn, kiuj ŝajne pruvas, ke baldaŭ okazos tiu morto...

En la antaŭparolo al **Ŝtato kaj Revolucio**, verkita en 1917, Lenin diras :

"La problemo pri rilato de socialisma revolucio de l' proletaro al la ŝtato tiele ricevas ne nur praktike politikan signifon, sed ankaŭ la plej **aktualan** [La substreko estas mia. - E.L.] signifon ; ĝi ja klarigas al la amasoj, kion ili devas fari por sia liberiĝo el sub la jugo de l'kapitalismo dum la plej **proksima** [Substreko mia] estonto."

Estas klare, ke skribante tion, Lenin ne dubis pri baldaŭa mondrevolucio aŭ almenaŭ pri la sukceso de revoluciaj movadoj en la plej grandaj kapitalistaj landoj eŭropaj. Dek-ok jaroj forpasis, la leninismo fariĝis nova religio, devige instruata al tuta popolo, kaj kies ĉefpastro Stalin regas absolutisme kiel Hitler kaj Musolini, sed mondrevolucio ne okazis. Plie, la tezoj prezentitaj kaj bone argumentitaj en **Ŝtato kaj Revolucio** tute ne ricevas aplikon en Sovetio. Male, kreiĝas tie novaj klasoj el privilegiitoj, kiuj piedpremas la principojn por kiuj batalis Lenin kaj liaj kunuloj...

Sed eble estas en la verkoj de Leo Trocki, ke troviĝas plej da antaŭdiroj, kiuj tute ne efektiviĝis. Mi citos nur unu lian "profetaĵon" el la libro : **Kien iras Britio?** verkita en 1925 :

"La konkludo al kiu mi alvenas en miaj esploroj estas, ke Britio iras **rapidpaŝe al epoko de grandaj revoluciaj perturboj.**"

Tio estas dirita en la antaŭparolo de la rusa eldono ; sed en la franca (1926) Trocki denove emfazas :

"La komunistoj decide antaŭenpaŝos. La revolucia malvolviĝo en Britio faros gigantan eksalton antaŭen... Ne povas esti dubo pri tio..."

Nu, naŭ jaroj forpasis kaj anstataŭ fari "gigantan ek-

salton"; la britia kompartio, kiu tiutempe havis unu deputiton en la parlamento, eĉ perdis tiun solan reprezentanton kaj restas malgranda sekto sen agadpovo.

Multajn, tre multajn similajn ekzemplojn pri eraroj de eminentaj teoriuloj(1) mi povus mencii, sed tiuj sufiĉas miaopinie por veki vian singardemon, rilate al akcepto de teorioj, de antaŭdiroj kaj similaĵoj. Kaj tia konstato sendube pravigas mian diron, ke estus eble pli saĝe tute ne respondi al la starigita demando, ĉar tio postulas ĉe respondonto profetajn kapablojn. Tiajn mi ne havas kaj neniel pretendas esti pli klarvida ol aliaj homoj. Se mi tamen riskos anticipi kaj lasi nestreĉita la bridon al mia fantazio, estas kun la konscio, ke tio ne estas danĝera, post mia averto.

*

Ĉu la Homaro evoluas al paco kaj harmonio per mond-unuiĝo aŭ ĉu ĝi tendencas refali tute en barbarecon? Eblas kolekti faktojn kaj eldiri raciajn argumentojn, per kiuj estus jese responde al ambaŭ demandoj. Optimistoj jesas al la unua, pesimistoj la duan. Prefere mi do starigu nur unu demandon. Ĉu estas dezirinde, ke la Homaro vivu pace kaj harmonie? Al tia demando ĉiuj homoj certe respondos jese. Eĉ la plej fanatikaj naciistoj asertas, ke ili deziras pacon. Hitler, Musolini, Stalin nemalofte eldiris sian deziron por paco. Ĉiuj regnestroj ĉiaokaze deklaras al la tuta mondo, ke, se ili pligrandigas militelspezojn, pliperfektigas armilojn, rekrutas pli kaj pli da soldatoj, tion ili faras ĝuste por certigi la

(1) Stalin neniam estis konsiderata kiel teoriulo kaj pro tio mi ne citis el liaj verkoj. Sed por tiuj, kiuj opinias, ke li meritas esti nomata la "gvidanto de l'mondproletaro", kiel diras liaj fifululoj, mi simple memorigas al ili, ke ĉe la Deksesa Kongreso de l'bolŝevista partio, Stalin resume diris jenon:

La terglobo estas minita per antagonismoj, el kiuj la plej akuta estas tiu inter Usono kaj Grand-Britio. La Ligo de Nacioj putras. La kapitalista solidiĝo alvenas ĉe la fino kaj la revolucio estas baldaŭ eksplodonta. La burĝaro provas trovi eliron per milito kontraŭ Sovetion; ĉefe Francio, "la lando la plej atakema kaj militema el la mondo..."

Oni komparu tiujn asertojn, kvin jarojn post ilia eldiro, kun la nuna realaĵo: venko de Hitler; aliĝo de U.S.S.R. al la Ligo de Nacioj; alianciĝo de U.S.S.R. kun Francio!!!...

pacon. Eble tiuj homoj estas sinceraj en sia opinio, ke paco povas rezulti sole de la ekvilibro de fortoj. Temas nur montri sian forton al kontraŭuloj, por ke ĉe ili ne naskiĝu la emo ataki. **Se ci volas pacon, ci preparu militon.** Tiu devizo ĉiam estos unu el la gvidprincipoj de ĉiu ajn regnestro. Internaciistaj registoj kiel la Sovetiaj ne faras escepton. Tute male! Estas ja historia **fakto**, ke Hitler decidis restarigi en Germanio la devigan militservadon, nur **post** kiam en Moskvo per la publika raporto de Tuŝaĉevski elmontriĝis antaŭ la tuta mondo, ke la t.n. ruĝa armeo fariĝis unu el la plej potencaj kaj timindaj.

Ni do konstatas, ke rilate naci-sendependecon internaciistaj registoj agas tute same kiel la naciistaj. Ambaŭ opinias, ke la nacioj estas io konservinda, ke ĉiu reprezentas apartajn valoraĵojn, kies perdo estus damaĝo por la tuta Homaro. Tion mi demonstris en la **Manifesto de la Sennaciistoj** kaj sekve ne bezonas ĉi tie doni pruvojn denove. Kio diferencigas la internaciistojn de la naciistoj, tio estas, ke la unuaj opinias, ke iam povos regi definitiva paco inter la nacioj, dum la lastaj tion ne kredas. Sen ia ŝanceliĝo mi konfesas, ke tiurilate la vidkaj starpunkto de la naciistoj estas pli facile defendebla per bonaj argumentoj ol tiu de la internaciistoj. Se oni ja sincere kaj logike deziras konservi, pluigi, eternigi la naciajn apartaĵojn ; se oni opinias, ke la Homaro devas kvazaŭ simili al ia mozaiko el nacioj, estas evidente, ke ĉiu el ili devas senĉese kaj tre atente prizorgi kaj eĉ plifortigi siajn apartaĵojn. Sekve lingvoj, moroj, kutimoj, vestaĵoj ktp. estu tre zorge ŝirmataj kontraŭ eksteraj influoj.

Kiam oni scias, kiom forta estas kredo, religio aŭ idealo, kiu penetris profunde en la cerbon de homoj, tiam estas facile antaŭvidi, ke ĉiu nacieca ideologio iam aŭ aliam aliĝos en ŝovinismon. Ĝi konsistigas eksplodemana forton, kiu kaŝenhavas ĝermojn de milito. Pruvojn pri tio oni povas trovi multajn en Sovetio mem, kie, laŭdire, regas vera internaciismo, ĉar pli ol 100 nacioj vivas tie en paco. Mi mencias nur unu fakton, sed sufiĉe karakterizan.

Antaŭnelonge oni povis legi en **La Vero** (La Pravda) el Moskvo leteron de profesoro G.P. Stepuro el Blankrusio, per kiu li plendis, ke tieaj registoj malbontraktis lin pro

lia uzo de l'rusa lingvo. Foje li malprudente sendis al la prezidanto de l'Soveto en Bobr, noton ruslingve skribitan. Ĉe la alveno troviĝis tie du altrangaj funkciuloj, kiuj kaptis tiun noton kaj per ĝi provis atingi, ke Stĉpuro estu eksigata el sia ofico. Antaŭ esplorkomisiono li devis eldiri sian bedaŭron, koncerne tiun ruslingvan noton kaj ankaŭ aserti, ke en tio estas nenio malbona. La esplorantoj rebate respondis, ke eĉ en la hejmo li devus paroli blankruse. Komprenoble venis el Moskvo ordonoj, kun la celo moderigi tiun blankrusan ŝovinismon. Sed almenaŭ tiu fakto pruvas nerefuteble, ke la nacieca politiko de Lenin kaj Stalin donas rezultojn, kiujn verŝajne ne antaŭvidis tiuj ĉampionoj de l'naciaj kulturoj.

Aliparte, la malaprobo el Moskvo al la blankrusa naciismo klare montras, ke la nacia aŭtonomio de Blankrusio estas nur surpapera kaj rilatas ĉefe al malgravaj aferoj. Fakte, la bolŝevista regado, same kiel la cara, celas rusigi la tutan popolon sovietian. La rusa lingvo estas devige instruata en la lernejoj de la tuta Unio kaj ĝi estas la oficiala en la tutlandaj kongresoj de l'Sovetoj. Pro tio mi tute ne riproĉas al la sovetaĵoj registoj. Sed en tiu okazo, kiel en multaj aliaj similaj, necesas noti bone en la memoron, ke la oficialaj deklaroj de la krem-laj oligarkoj ne tute koincidas kun la faktoj, kun la realaĵo.

Almenaŭ estas tute certe, ke en Sovetio la agitado por revivigo aŭ pluigo de naciaj kulturoj alkondukas al rezultoj, kiuj nepre kontraŭdiras la internaciisman tezon kaj pravigas nian ĉi-supran aserton, nome, ke la flegado al naciaj apartaĵoj(1) tute ne kreas spiritostaton, kiu

(1) Ĉi tie mi devas akcente rimarkigi, ke en mia penso la malaprobo de naciaj apartaĵoj tute ne signifas, ke mi deziras la samaspektigon de l'tuta Homaro. Tute male! Se la homoj ne plu estus **naciece**, sed **personece** edukataj ; se ili kutimiĝus pensi memstare kaj akirus relativisman komprenon pri signifo kaj valoro de ideologioj kaj sistemoj, tiam ili ĉiel estus toleremaj unuaj al la aliaj kaj ne estus do timende, ke ili volus ĉiuj vesti sin sammaniere, havi samstilan meblaron, aŭdi samspecan muzikon ktp. ks. La plifortiĝo ĉe ĉiu homo de la sento esti aŭtonoma persono povas nur naski varion en la pensoj, gustoj kaj vivmanieroj. La sennaciismo sekve ne kaŭzus unuformigon, sed kontraŭe senbridan originalemon.

garantius pacon inter la nacioj.

Por mi estas klare, ke se oni ne detruas la naciecan senton en la koro de l'homoj, ĉiam ekzistos danĝero, ke en iaj cirkonstancoj grandbuŝaj demagogoj aŭ ŝajnprofetoj scipovos utiligi tiun potencon senpezan forton. La post-militaj okazintaĵoj en Germanio ankaŭ atestas pri la pravo de mia aserto. La sukceso de Hitler estus tute neebla, se internaciistaj organizoj, kiel la socialista kaj komunista partioj germanaj, estus farintaj **sennaciisman** propagandon kaj edukadon. Sed male, ili plej ofte konkuris inter si en la agitado por la nacia sendependeco de Germanio, kontraŭ la Versajlan kontrakton ktp. La germana kompartio vere distingigis en naciisma propagando. Ĉe la balotado, kiu donis la plimulton al Hitler, la komunistoj superis tiurilate la socialistojn. Sur ĉiuj komunistaj propagandiloj estis diklitere presitaj jenaj agitvortoj : **Por la nacia kaj socia liberigo!** La franca "fratpartio" iom hontis pro tia naciismo kaj publikigante la tekston de tiuj propagandiloj ĝi inversigis la ordon de l'vortoj "nacia" kaj "socia". Sed en tiu naciisma agitado Hitler montriĝis la plej lerta, la plej konsekvenca kaj verŝajne pro tio sukcesis plej bone utiligi por sia celo la naciecan senton, pli malpli fortan ĉe ĉiu germano.

Ne estas eble bremsi daŭre naturan forton, ekzistantan en la koro kaj kapo de homoj. Ĝin oni devas tute detrui, ekstermi, elradikigi kaj anstataŭigi. La amon al la patrio devas anstataŭi alia ideologio. Kaj oni ne diru, ke tio ne eblas. En la antikva tempo la patrio konsistis unue nur el la tero, kie estis entombigitaj la prauloj ; ĝi estis nur la grundo, kiun la hejma religio sanktigis(2); poste la patrio pligrandigis al civito, al provinco, al nacio. Ĝeneralmaniere la Homaro nuntempe staras ĉe tiu lasta stadio. Ĉu estus saĝe kredi, ke la historia evoluado definitive haltis ? Vole nevole, iel aŭ aliel, la nuntempaj kadroj naciaj krevos. Kiel ĉio en la mondo, la nacieca ideologio iam atingos sian apogeon kaj poste falos, dekadencos kaj pereos. Estas la tasko de l'pioniroj akceli tiun pereon, preparante la spiritojn al la nepra neceso starigi sennaciecan socion tutmondan, se oni vere kaj celkonforme volas certigi la pacon.

(1) Oni legu pri tio en la II-a ĉapitro de **Naciismo**.

Malgraŭ tio, ke tre multaj faktoj montras ĉiutage la ekonomian interdependecon de ĉiuj nacioj, tamen ŝajnas al mi evidente, ke la nacieca ideologio, kiu superregas pli malpli la cerbon de preskaŭ ĉiuj nuntempuloj, nepre okazigos novan tutmondan katastrofon militan. Se oni memoras, ke en la pasinto militoj ĝenerale rezultigis la starigon de pli kaj pli ampleksaj regnoj, oni do povas diri, ke ili estis iel progresigaj, dum la lasta milito estis regresa en tiu senco, ke ĝi starigis pliajn naciecojn, ekonomie tute nevivkapablajn. Per tio plimultiĝis la kaŭzoj de konfliktoj. Kredeble la venonta, nun prepariĝanta milito, havos alian karakteron. Ĝi ne okazos kun la celo aŭ preteksto doni nacian sendependecon al malgrandaj teritorioj. Kreiĝos nova ekvilibro de fortoj inter la popoloj, kiu verŝajne ebligos relative longan tempon de paco. Dume, la komunikiloj fariĝos pli kaj pli potencaj kaj rapidaj ; la rilatoj inter la homoj pli kaj pli oftaj kaj facilaj ; neceso de komuna lingvo pli kaj pli montriĝos ; esperanto estos akirinta konsiderinde pli grandan nombron da adeptoj ; ĝia literaturo estos fariĝinta tre atentinda faktoro de mondkulturo ; espereble aperos originale en nia lingvo kelkaj ĉefverkoj, pri kiuj raportos la ĉiulingva gazetaro. Tio certe instigos multajn homojn lerni esperanton por legi la originalon. Tiel kreiĝos la kondiĉoj necesaj por ke nia nuntempe utopia ismo povu disvastiĝi kaj fariĝi reala potenco.

Sed estas for de mi la penso, ke la evoluado al sennacieca mondstato okazos nepre, kvazaŭ iu mistera forto gvidus la tutan aferon. Necesas nia pionira agado por ke la sennaciismo enradikiĝu, kresku kaj fariĝu ideo-forto, kapabla entuziasmigi la venontajn generaciojn. La homoj devos ekkompreni, ke diferenco en la koloro de l'haŭto aŭ de la okuloj, en la formo de l'nazo aŭ en la alto de l'korpo ne estas sufiĉaj motivoj, por ke ili apartiĝu nepre laŭ nacioj kun limoj severe gardataj kontraŭ eksteraj fortoj.

La sennaciismo ne estas io kontraŭnatura, kiun neniam homoj povus alpreni. Mi havis kelkfoje okazon konstati mem, ke negraj, ĉinaj, polaj kaj francaj infanoj povas bonkamaradece kunlerni, kunludi en la sama lernejo. Sed evidente la lernado iafoje havas komikan flankon,

kiam, ekzemple, negra knabo devas el historilibro lerni kaj reciti, ke liaj prauloj, la galloj, vivis sur la teritorio kiun oni nomas nun Francio. Per tiu simpla ekzemplo oni tuj povas ekvidi, ke la naciismo rezultas de edukado. La samo povas okazi pri sennaciismo. El kiu ajn homo oni povas per edukado fari ĉu kristanon, ĉu mahometanon, ĉu naciiston, ĉu sennaciiston...

Cetere, en ĉiuj epokoj ekzistis homoj, kiuj pli malpli konscie kaj forte sopiris al tutmonda interfratiĝo. En ĉiuj grandaj religioj ne estas principe farita diferenco inter homoj el diversaj rasoj. Sed dum jarmiloj mankis al la teranoj la necesaj rimedoj, por ke ili interkonatiĝu, interrilatiĝu kaj do povu reale interfratiĝi. Nuntempe tiuj rimedoj ekzistas. Kio fakte malhelpas la tutmondan interfratiĝon, tio estas la patriotismo, la nacia aŭ rasa ideologio. Kiam oni tion komprenis, tiam fariĝas tute klare, ke, se oni deziras pacigi la mondon, necesas fari ĉion eblan por ekstermi tiun danĝeran ideologion. **La internacianoj tion ne faras.**

Homoj en la plej antikva tempo revis pri flugado, imite al la birdoj. La mitologia legendo pri Ikaro atestas pri tio. Sed dum jarmiloj la homflugado restis utopia deziro. Hodiaŭ la homoj tamen ne flugas, sed ili almenaŭ konkeris pere de maŝinoj la spacon, rezervitan antaŭe al la birdoj. Por ni, sennacianoj, esperanto devas ludi kvazaŭ similan rolon kiel tiu de aviado. Por faligi la Babel-turon ni posedas taŭgan instrumenton. Necesas, ke ni unue lertiĝu en ĝia uzado kaj tiel donu al la homoj sekvindan ekzemplon. Sennaciismo sen esperanto iel similus flugmaŝinon sen motoro. Sed multaj esperantistoj similas al aviadistoj, kiuj ne utiligus sian maŝinon aŭ sencele flugus.

Ĉar estas dezirinde, ke la Homaro vivu pace ; ĉar la sperto kaj faktoj montras, ke paco ne povas regi daŭre, tiel longe, kiel ekzistos nacioj ; ĉar ne mankas bonaj argumentoj por konvinkiĝi, ke la ĝenerala, profunda tendenco de l'homaj socioj estas pli kaj pli ampleksiĝi, sekve de l'homa inventkapablo, ŝajnas al mi ne malsaĝa la opinio ke la nun ĉie reganta naciismo iom post iom perdos sian efikon kaj ke la sennaciismo anstataŭe ludos iam la rolon de granda, entuziasmiga ideo-forto. Estas nia pionira laboro jam nun dissemi la ĝermojn, el kiuj kreskos bela

rikolto porpaca kaj fratiga. Ni devas senĉese kaj senkompatate kontraŭbatali la naciismon en ĉiuj ĝiaj aspektoj kaj precipe en ĝia plej hipokrita formo : la internaciismo.

Se la efektivigo de nia idealo ŝajnas al kelkaj Gek-doj tro malproksima, por ke ili havu la emon dediĉi siajn fortojn al ĝia propagando, al tiuj mi diras : ĉu do vi ne vidas, ke la internaciistoj daŭre trompas la laboristojn? Ĉu ne ŝajnas al vi hontinda spektaklo, ekzemple, tiu, kiun donas la II-a kaj III-a Internacioj per sia unueca fronto kun la angla imperialismo, pretekste savi la "sendependecon" de Etiopio kaj la suverenecon de la sklavposedanta Neguso, la "reĝo de l'reĝoj"?...

La sennaciismo povos efektivigi nur post la pereado de l'naciismo. Bataladi kontraŭ tiun ĉi lastan sekve ne estas morgaŭa tasko, sed hodiaŭa. Ni cetere devas ekstermi la naciecon en ni mem ; per memedukado ni devas akiri menson de mondĉivitano. Nur kiam ni estos sukcesintaj en tiu tasko, ni posedos la kapablon prijuĝi sociajn fenomenojn laŭ sennaciisma vidpunkto kaj tiel estos imunaj kontraŭ la nacieca febro, kiu tiel facile igas deliri la internaciistojn.

Karaj Gek-doj, kvankam restas multo dirinda pri la temo, tamen mi volas meti finon al ĉi tiu jam sufiĉe longa letero. Se vi ne tute konsentas kun mia tezo, mi afable petas, ke vi bonvolu komuniki viajn kritikojn. Mi estas ĉiam preta ŝanĝi mian opinion ĉe konatiĝo kun konvinkaj argumentoj. Kaj al la legantoj, kiuj tute aprobas mian vidpunkton, al tiuj mi petas, ke ili okaze informu min pri faktoj de ili konstatitaj kaj kiuj apogas nian komunan tezon.

En la espero, ke ĉiuj bonvolos iel aŭ aliel helpi, mi antaŭdankas al vi kaj sennaciece salutas.

(Parizo 1935)

*

LETERO KVINDEK-NAŬA

Nova Publika Letero pri Sennaciismo

Kredeble la legantoj konsentos, ke la letero al Kdo Karlson, aperinta en la 3-a kaj 4-a n-roj de "Herezulo", indas esti la temo por frontartikolo. Sed li tuŝis tiom da gravaj demandoj, ke por ilin respondi konvene la amplekso de dika volumo estus necesa. Estu almenaŭ montritaj la konturoj de respondo.

"Se nia ismo", diras Kdo J.K., "fariĝus amasmovado, nenio garantias, ke ĝi ne dekadencus."

Certe! Nenia garantio ekzistas tiurilate. Kaj mi eĉ aldonas, ke se en la mondo jam nun estus stariĝinta sennacieca socio, en kiu ĉiuj homoj ĝuus ekonomian bonstaton, tio tamen ne garantius inter ili pacan, harmonian vivon. Mi ja ne estas ortodoksa marksisto, kiu kredas, ke la ekonomiaj kondiĉoj determinas ĉiujn agojn de l'homoj. Ekonomia bonstato estas nur unu el la **kondiĉoj** - ne kaŭzoj - por ke regu paco inter la homoj. Kiam malsato estas forigita ĉe la homo, tiam li restas sub la influo de aliaj deziroj, de pasioj, kiuj povas esti kaŭzoj de malpaco. Eĉ en la pasinto, homoj ne ĉiam interbatalis pro pure ekonomiaj motivoj, kiel asertas adeptoj de la historia materialismo. La homo estas abstrakti-kapabla animalo, kiu sekve havas ideojn. Kiam adeptoj de iu idearo konvinkiĝis esti la solaj posedantoj de l'**vero**, tiam pli malpli latente ekzistas la danĝero, ke ili volos trudi tiun "veron" al ĉiuj. Necesas do, ke regu inter la homoj, krom ekonomia bonstato, ankaŭ relativisma kompreno pri aferoj. La naciismo, la rasismo estas absolutisma idearo, laŭ kiu ĝiaj adeptoj estas pretaj mortigi kaj morti por defendi kaj pluigi sian apartan nacion aŭ rason.

Oni do sen troa pesimismo povas prezenti al si, ke en la estonto homoj intermilitos pro ideologiaj motivoj, simile al tio, kio okazis en la pasinto inter diversaj religiaj kreduloj. Antaŭnelonge, mi estis atestanto de pugna interbatalado inter junsocialistoj. Ĝi okazis nur pro tio, ke ili malsame interpretis la marksismon!... Tiu simpla, negrava sed tre simptoma fakto avertas pri la neceso de toleremo ; - kaj ĝi povas ekzisti kaj efiki nur se forestas la opinio posedi absolutan veron. Necesas do, ke la homoj seniĝu je absolutismo kaj lernu respekti ideojn, gustojn eĉ fantaziojn, kiujn ili mem ne aprobas aŭ ne ŝatas. Plie, la homoj devas havi idealon pri **homeco** kaj al ĝi penadi

senĉese proksimiĝi. Sen tio la plej ĝusta, la plej laŭcela ismo povas ja dekadenci kaj fariĝi ridinda karikaturo kompare kun la modelo.

"Kdoj... volas **normon** por la ĉiutagaj klopodoj ; ili atendas precizan, kompletan programon... Kvankam la demando pri ebla estiĝo de sennacieca mondo povos esti aktuala nur post kelkaj generacioj, oni tamen jam nun bezonas konkretan imagon pri la afero..." Tiel demande parolas plue Kdo J.K.

Ĉu vere ni bezonas "kompletan programon", por agi cele al sennaciismo? En nia **Manifesto** estas rekomendite, ke ni ne formu sekton, apartigitan de la cetera laborista movado. Tio signifas, ke la sennaciistoj devas ĉiam esti pretaj partopreni la batalojn de l'proletaro, kiam ili ne havas naciecan karakteron. Kiam laboristoj, ekzemple, strikas por atingi pli altan salajron, malpli longan labor-tempon, malpli altan normon en la produkto-kvanto, postulata de l'mastroj, tiam entenas tia batalo ion esence sennaciecan, tial ke la venko per la striko estos des pli certigata, ju pli la novaj laborkondiĉoj aplikiĝos ĉie en la mondo. Sed kiam laboristoj estas vokataj al batalo por defendi aŭ rekonkeri la sendependecon de iu ajn lando, eĉ de tiu, en kiu la hazardo faris, ke ili naskiĝis, tiam la sennaciistoj kontraŭstaru kaj per ĉiuj rimedoj evitu elspezi eron da energio por tia batalo. Kiam internaciistoj argumentas kaj agitas por organizi la mondon per la kunlaborado de ĉiuj nacioj en iu Ligo, tiam la sennaciistoj kuraĝe kaj laŭte diru, ke tio estas iluzia, trompa afero, ke la sole taŭga maniero certigi la pacon en la mondo, estas ĉiel akceli la kunfandiĝon de l'popoloj.

La sennaciismo ne pretendas havi nun soci-politikan programon, diferencon de tiu de la organizoj, kiuj celas starigi socialismon, t.e. socion en kiu neniu homo estus ekspluatata, en kiu ĉiu laborulo ĝuus la tutan valoron de sia produktado - kaj plie liberon, sen kiu homo estas senigita je digno. Sed nia speciala tasko estas argumenti, ke tia socio ideala ne povos ekzisti, tiel longe, kiel ĉe la individuo la homeco ne superregos la naciecon.

Nunepoke nia ĉefa kaj plej pozitiva laboro povas konsisti preskaŭ nur en la propagando por esperanto, aŭ en la taskoj, kiuj enradikigas kaj vivigas tiun artefaritan lingvon. En la kvina ĉapitro de "La Laborista Esperantismo" mi jam diris, ke propagandi sennacismon al ne-

esperantistoj, tio iel similus instrui belliteraturon al anal-
fabetoj. Mia opinio ne ŝanĝiĝis tiurilate. La sennaciismo
povos enradikiĝi nur paralele kun la enplantiĝo de es-
peranto tra la tuta mondo. Se la mondlingva movado
fiaskus, tiaokaze neniam en la mondo, sennacieca socio.

Oni povas tamen prezenti al si la hipotezon, ke iu
potenca popolo konkeros la tutan mondon kaj trudos ĉie
siajn lingvon kaj civilizon. La nuntempaj nacioj konsist-
iĝis laŭ tia procedo. La grandaj kulturlingvoj naciaj iom
post iom trudanstataŭis la provincajn dialektojn kaj tiel
formiĝis pli vastaj unuoj lingvaj. Mi ne opinias, ke tia
evoluprocedo ne plu ludos rolon en la estonto...

Antaŭ tiu hipotezo ni devas do klare difini nian pozi-
cion. Kaj por eviti ĉian miskomprenon, mi elmetos kon-
kretan ekzemplon. Kiun sintenon havu la francaj sennaci-
istoj ĉe eventuala invado al Francio fare de l'germana
popolo? Nu, tute simple ili lernu la germanan lingvon,
celu kompreni la germanan civilizon kaj al ĝi provu adapt-
iĝi. Se Hitler ankoraŭ regos, tiam la germaniaj kaj fran-
ciaj sennaciistoj havos la saman sorton kaj ili kune provos
liberiĝi per komuna batalo kaj sur la sama pozicio. Neniel
ili agitu aŭ konspiru por redoni la nacian sendependecon
al Francio...

Antaŭ tia hipotezo kompreneble internaciistoj ĝemas
kaj protestas. Ilia opinio perdo, morto de iu ajn nacieco,
de iu ajn lingvo, tio estas granda bedaŭrindaĵo. Por gardi
aŭ rekonkeri tiajn valoraĵojn, estas konsentinde, ke mili-
onoj da homoj mortaĉu sur batakampoj aŭ simple pereu
pasive en urboj flugmaŝine superŝutotaj per bomboj.

Unu el la plej eminentaj internaciistoj, Anatol Frans
(France), ja diris : "La patrioj devas eniri ne mortaj sed
vivaj en la universala Federacio. La tago, kiam tio oka-
zos, trovu Francion kun ĝia nomo, kun ĝia potenco, kun
ĝia genio ; tiam ĝi staru kun la frunto zonita per krono
el olivarbaj folioj kaj vestita el justo kaj inteligento,
fiera esti bona laboristino kaj deziranta ne esti superata
de iu ajn el siaj fratinoj sur la lumplenaj supraĵoj de l'
konkordo kaj de l'paco."

Tiele ja parolas la internaciistoj ĉiuspecaj. Kaj tia
religioca spiritostato bone klarigas, kial la fama verkisto
franca en sia 70-jaraĝo volis volontuliĝi en la armeon por

"kontraŭbatali la germanan militismon"... Tamen Anatol Frans estis unu el la plej subtilaj skeptikuloj ; lia ironio moke detruis ĉiajn kredojn kaj tamen tia sendiulo diigis Francion, alegorie prezentis ĝin al si sub la formo de bela virino kaj jen patose kaj mistike deliras antaŭ sia kreaĵo, kies eternigo kompreneble en liaj okuloj indas ĉiajn oferojn.

Mankas konkreta programo, bedaŭras Kdoj. Ĉu do kontraŭbatali la patriotismon, la plej danĝeran kaj sango-soifan el ĉiuj religioj, tio ne estas konkreta kaj precize difinita tasko ? Belajn programojn oni povas starigi, lasante senbrida sian fantazion. Tia postulo pensigas min pri **La Insulo de Utopio**, la verko de l'fama Tomaso Morus, kanceliero de Britio, mortigita per la hakilo de ekzekutisto antaŭ 400 jaroj kaj de l'papo solene proklamita sanktulo, lastan jaron. Morus pentris bildon de komunisma socio, en kiu ne ekzistus mono, en kiu la oro estus uzata kiel krudmaterialo en fabrikado de noktovazoj. En tiu feliĉa insulo nur senhonorigitaj kaj stultuloj portus orajn ringojn ĉe la kolo, ĉe la fingroj aŭ ĉe la oreloj.

Tion mi ne mencias kun la intenco moki la faman aŭtoron de **konkreta programo** pri harmonia, justa socio. La samon mi povas diri pri Lenin, kiu skribis, en 1921 : "Kiam ni estos mondscale venkintaj, tiam verŝajne ni starigos urinejojn el oro sur la stratoj de l'plej grandaj urboj en la mondo..." Evidente la eminenta strategiulo de la Oktobra Revolucio memoris pri la "Insulo de Utopio", kiam li moke parolas pri la oro, simbolo de l'kapitalisma ekspluatado. La utopiisto Morus, la marksisto Lenin kaj aliaj reprezentantoj de "scienca socialismo" verkis belajn programojn. Kio rezultas de tio? Nur pli malpli legindaj elpenaĵoj.

Verdire mi ne havas emon verki utopiaĵojn. Ĉu do ne sufiĉas al la sennaciistoj havi la certon, ke ili ne spadobatas ventmuelilojn, kiam ili kontraŭbatalas la naciismon sub ĉiuj ĝiaj formoj kaj aspektoj? Kiu organizi pacan mondon per la helpo de iu ligo de nacioj aŭ per io simila, tiuj estas la realaj Don Ĥiĉotoj, kaj tiaj estas la internaciistoj.

*

Tamen, sen tro alta ŝvebado en la nuboj, oni almenaŭ

povas prezenti al si larĝtrajte kiel povos enplantiĝi kaj malvolviĝi la sennaciismo. Bedaŭrinde estas antaŭvideble, ke post pli malpli longa tempo okazos denove mondmilito, kies sekvoj verŝajne estos la stariĝo de pli grandaj ŝtatoj, ol tiuj nun ekzistantaj, kaj la malapero de kelkaj malgrandaj. Kredeble Eŭropo tutuniĝos laŭ la ĝisnuna procedo milita. La ekvilibro de fortoj inter nur kelkaj grandaj potencoj certigos relative longan pacan periodon, eble 50-60-100-jaran. Dum tiu tempo ekzistos pli malpli favoraj kondiĉoj por la disvastiĝo de esperanto, pro la senĉesa pligrandiĝanta nombro da pli kaj pli rapidaj kaj facile uzeblaj interkomunikiloj. Nia terĝlobo estos fariĝinta kampo facile kaj rapide traveturebla. Tiam do ekzistos ankaŭ pli favoraj kondiĉoj por la propagando de nia ismo. Estos eble al relative granda nombro da homoj organiziĝi sennaciece laŭ diversaj fakoj. Kreiĝos sennaciecaj lernejoj kaj universitatoj, eĉ kolonioj. Rezultos de tio tre valora mondliteraturo kaj sekve favora grundo, por ke enradikiĝu la sennaciismo, por ke en la cerbo de l' homoj naskiĝu nova spirito, nova idealo, adekvata al nova mondo.

Tio ne signifas, ke la malnova nacieca, raseca spirito estos tiel malfortiĝinta, ke oni ne bezonos atenti ĝin. Sed la sennaciistoj jam reprezentos en la mondo konsiderindan forton. Tiam ili povos almenaŭ postuli, ke la ŝtatoj traktu ilin kiel sennaciulojn, al kiuj ne estu aplikataj la leĝoj, rilataj al militpreparado ktp. Povos tiurilate okazi, kiel en kelkaj landoj jam okazis koncerne la religion. Ekzemple, en Francio, jam de 1905, ateistoj neniel estas devigataj subteni per imposto la ekleziojn. Pli precize : la ŝtato ne prizorgas diajn aferojn kaj en ĝiaj lernejoj estas eĉ malpermesate lernigi kateĥismon. Simile al tio, homoj povos deklari sian sennaciecon kaj per tio akiri la rajton esti traktataj kiel sennaciuloj en iu ajn lando. La sennaciistoj organizos sin mondscale kaj starigos al si specialan Statuton.

Al homoj, kiuj volas absolute nenion oferi por defendi iun ajn nacion, kiuj deklaras, ke estas indiferente al ili, ĉu ĉi tiu aŭ tiu lando aŭ kontinento perdos sian suverenecon, al tiaj homoj estas ja logike konsenti, ke en la organizado kaj plenumado de ĝia defendo ili ne partoprenu.

Se tia ideologio, tia sennacieca spiritostato fariĝus **ideo-forto**, mito kapabla entuziasmigi la estontajn generaciojn, tiam oni povas facile imagi, ke la mondo finfine sennaciĝos.

Sed mi ne volas pli longe ŝvebi, pro timo ricevi kapdoloron, kaj do preferas reveni sur la teron. Nuntempe la malmultaj sennaciistoj povas havi kiel konkretan taskon nur la disvastigon de esperanto kaj la starigon de aparato, kiu faciligos al ili per ĉiaj rimedoj (ruzo, artifa malsaniĝo, forkuro ktp.) eviti partoprenon en milito. Kaj mi opinias, ke estus tute malsaĝe alpropagandi patrioton, ke li ne partoprenu militon. Ŝajnas al mi preferinde instigi tiajn ulojn, ke ili buĉu unuj la aliajn : ju malpli da patriotoj sur la tero, des pli bone!... "Morti pro la patrio, tio estas la plej bela sorto", kantas francaj patriotoj. Mi ne kontraŭdiras al tio, kondiĉe ke tia pro-patria morto rilatu nur al patrioto kaj neniel al sennaciisto. Ĉi tiu lasta ĉiel evitu tian "belan sorton". Ĉu do tio ne estas tre "konkreta" ero de programo ?

"Ĉu la sennacieca socio rezultos de monddiktaturo?" ree demandas K-do J.K.

Neniu povas tute certe antaŭdiri, kiel okazos la historia procezo. La hipotezo pri monddiktaturo estas pens-ebla. Se Komintern estus sukcesinta en sia programo, eble kreigŭs mondregno, kies sekcioj fiserveme nun obeus al Stalin. Bedaŭrinde - aŭ feliĉe - en multaj landoj la kompartioj restis malgrandaj sektoj sen ia influo sur la politikon. Rusio, la sola lando, kie venkis la bolŝevista partio, estas nur granda imperio, kiu utiligas la landajn sekciojn de Komintern por siaj diplomaciaj manovroj kaj intrigoj kun la aliaj ŝtatoj. En Sovetio, kie la popolo estas per la cenzuro, per la ŝtata monopolo de la eldonrimedoj, tenata en granda nescio pri la vivkondiĉoj en aliaj landoj, naskiĝis ĉe la juna generacio ia patriotismo, kiu najbaras al freneza ŝovinismo, al senrezerva admiro por la militismo kun ruĝa masko. Kiel pruvon pri tiu aserto mi menciuj nur unu fakton, sed kiom signifoplenan! Kiam lia marŝala (!) moŝto Tuŝaĉevski, ĉe la lasta kunsido (Januare 1936) de la Centra Plenumkomitato, eldiris, ke la armeo estos tre konsiderinde pligrandigata kaj armile plifortigata, tiam la tuta ĉeestantaro (proksimume 600 personoj) ekstaris per unu sola movo kaj delire

aplaŭdadis dum kelkaj minutoj. La raporto de l'marŝalo tamen signifas, ke la milita buĝeto por 1936 estas pli-grandigita je 310 %. En neniu lando tia deklaro pri kresko de la elspezoj por la armeo naskas entuziasmajn aplaŭdojn. La plej fervoraj patriotoj el diverslandaj parlamentoj kompreneble voĉdonas la militan buĝeton, sed ili konsideras tion kiel bedaŭran, neeviteblan neceson neaplaŭndan.

La Tria Internacio tute fiaskis en siaj klopodoj por okazigi mondevolucion, kaj mi ne kredas, ke la Kvara, kiun provas starigi Trocki, pli bone sukcesos tiucele. Cetere, mi deklaras sen ia hezito, ke la perspektivo pri monddiktaturo ne devas renkonti la aprobon de sennaciistoj. Grandega kazerno, malliberejo, ne logas min pli ol la malgrandaj. Se la sennaciismo celas atingi, ke la homeco sufoku ĉe la individuo la naciecon, oni tamen ne devas forgesi, ke la homeco ne kongruas kun perdo de libero. La sennaciistoj, sekve, ne devas subteni ion ajn, kio pluigas aŭ fortigas la naciecon, sed ankaŭ ne tion, kio sufokas la homan dignon. Ili nur ĉiel eble celadu al libervola, ĉiufaka organiziĝo sennacieca. Por konkretigi mian penson, mi diru, ke oni povas prezenti al si laboristojn, kiuj mondscale organiziĝus **laŭindustrie** kaj ne laŭ la ĝisnuna internaciisma maniero. Ĉio, kio tendencas ignori kaj malfortigi la naciecan senton en la koro de l'homoj, tio devas trovi la aprobon kaj subtenon de l'sennaciistoj.

*

"Sed ĉu ni rekomendu detruiri la naciajn muzeojn, la naciajn artaĵojn" ktp., demandas plue K-do J.K.

Interesa estas la demando kaj ĝi pruvas, ke nia Kdo cerbumis pri la temo, kiun ni pritraktas. Kiam, antaŭlonge, post legado de multaj verkoj filozofiaj, mi fine kredis esti liberiĝinta el ĉia religia kredo ; kiam mi ekkomprenis tute klare, ke la kultoj kaj ceremonioj el ĉiuj eklezioj signifas nur elmontron de ridinda superstiĉo ; kiam mi pensis, ke pastroj sukcesas per tia diservado bone kaj eĉ lukse vivadi, tiam mi deziris, ke oni fordetrui la preĝejojn kaj ĉion, kio pluigas superstiĉon. Sed pli poste mi komprenis, ke tiu mia deziro signas ne tute kompletan liberiĝon el la religia kredo. La ombro de la katedraloj ja timigis min. Kiam mi povis sen ia malamo,

senpasiĉe kaj animtrankvile admiri tiajn belajn konstruojn, nur tiam mi sentis, ke la religia kredo ne plu efikas sur min, ne plu partoprenas en la konsisto de mia menso. Ne utilus detrui preĝejojn, se la spirito, kiu kaŭzis ilian starigon, ankoraŭ vivas en la cerbo de milionoj da homoj. Ili ja konstruus aliajn, novajn, kiuj eble eĉ ne estus tiel belaj, kiel estis la fordetruintaj.

La sennaciistoj ne devas ignori la historion. Kaj ĝi instruas, ke la homaro organize evoluis laŭ klanoj, fratrioj, kurioj, triboj, civitoj, nacioj. Ĉiu el tiuj homgrupaĵoj reprezentas stadion en la daŭre pligrandigontaj unuoj de regado. Ĉiu stadio indas esti studata kaj tiucele etnografiaj, naciaj muzeoj estas utilaj. Se la sennaciistoj rekomendus, ke ilin oni detruu, tio simple estus signo, ke ilia subkonscio restas nacieca, ĉar ili ne povas senpasiĉe rigardi, studi naciajn artaĵojn.

Kiam forlasito malamas la forlasintinon kaj emas mortigi ŝin, tio estas pruvo, ke li ne sukcesis liberigi sin de suferiga sento.

La sennaciistoj ja kontraŭbatalas ĉion naciecan, kiam temas organizi la estonton, sed ili komprenas la estinton kaj eĉ iarilate scipovas ŝati ĝin. La ekzisto de naciaj muzeoj ne estas baro sur la vojo al la sennaciigo de l'mondo. Sed, evidente, sennaciista verkisto devas sennaciece produkti ; li ne verkos en sia gepatra lingvo, sed en esperanto kaj pritraktos temojn, kiuj havas intereson por tutmonda publiko kaj ne nur por siaj samregnanoj aŭ samprovincanoj. **Sennacieca** ĉefverko estos tiu, kiun povas ŝati, ĝui, admiri homoj el ĉiuj mondpartoj.

La scienco estas nepre sennacieca, eĉ se scienculoj estas naciistoj. Sciencia eltrovo ĉiam rezultas de racia pensado kaj observado. Universala estas la racio. Sed male la arto rilatas plej ofte al la sento kaj pro tio ĝi povas havi pure naciecan karakteron. Sennaciece pensanta kaj sentanta homo estus tiu, en kies menso harmonie ekvilibrigas la racio kaj la sento.

Malŝate rilati al ĉio, kio ekzistas en la regno, kies civitano oni estas, tio ne signas sennaciecan menson. Ĉu brazilo devus malsāti la kafon, germano la bieron kaj franco la vinon? Ridinda demando!... Nian idealon ni devas projekcii en la estonton, sed por tion fari ni restu kun la piedoj sur la tero, kun okuloj malfermaj, kun emoj ie ajn ŝati ĉion ŝatindan, ami ĉion amindan.

Kdo J.K. deziras ankaŭ scii, kiel ni rilatu al la "pli-bonigistoj", kiuj celas fari el la propra lando "popolhejmon", kiel, ekzemple, la social-demokratoj en Svedio. Vole-nevole ni ĉiuj estas civitanoj de iu regno. Ni povas esti sennaciistoj, sed ne sennaciuloj(1). La sennaciuleco estas io ideala, estonta. Sekve, kial do ne rilati simpatie, kvankam ne aprobe, al tiuj, kiuj sincere kredas, ke oni povas realigi socialismon en unu sola lando? Pro historiaj kaj geografiaj kaŭzoj, kelkaj landoj sukcesis atingi pli altan nivelon de ĝenerala bonstato ol aliaj. Tia estas la kazo en Skandinavio. Ĉu tio signifas, ke la tieuloj devas tute indiferentiĝi pri tio, kio okazas en aliaj mondpartoj? Certe ne. La ekzisto de malgrandaj regnoj rezultas ĉefe de tio, ke la grandaj potencoj konsideras ilin kvazaŭ bufrojn. Sed ĝuste tia situacio ne garantias eternan pacon kaj bonstaton en tiuj landoj. Cetere, ekzistas ĉe ili eĉ pli malpli forta tendenco al pligrandigo de la elspezoj por la armeo (2). Nedubeble, kiam ilia sendependeco estos efektive minacata, tiam tiu tendenco pligrandiĝos, la militismo tie ankaŭ enplantiĝos kaj sekvos de tio ĉio malbona, ekzistanta en la grandaj ŝtatoj. Aliparte, estas konstateble, ke la viv- kaj laborkondiĉoj de l'proletaro ĉie tendencas egaligi. Kaj en landoj, kie ekzistas nuntempe pli bonaj vivkondiĉoj ol en aliaj, tie la laboristoj havas grandan intereson al tio, ke ankaŭ iliaj eksterlandaj kolegoj levu sian vivnivelon. Aliel la pli bonstataj daŭre staros mem sub la minaco, ke ilia propra vivnivelo malaltiĝu. La ekzemplo de Japanio, kiu tendencas superŝuti la tutmondan merkaton per siaj tre malkaraj varoj, estas sufiĉe signifa tiurilate. Neniu lando povas do sin tute apartigi de l'cetera mondo kaj sekve estas utopia la celado fari "popolhejmon" meze de potencoj, kiuj senĉese batalas inter si diversrimede : ekonomie, diplomatie, milite.

La sennaciismo estas la sola racia solvo al la demando pri organizado de l'paco kaj bonstato en la mondo. Tiel longe, kiel homoj havos la iluzion, ke ili povas vivi trankvile en iu "popolhejmo", kies sendependeco tamen devas

(1) Ekzistas fakte "sennaciuloj" : tiuj homoj, kiujn la Ligo de Nacioj provizas per la t.n. Nansen-pasporto. Sed multaj el ili tute ne estas sennaciistoj, ĉar ili sopiras rehavi patrion.

(2) Ĉi tio estas skribita antaŭ tri monatoj kaj intertempe la sveda Registaro decidis pligrandigi la milit-buĝeton.

esti armile defendata, tiel longe la pripaca demando restos nesolvita. Kompreneble, tio ankaŭ ne signifas, ke ni devas rifuzi, kondamni ĉian paliativon, kiu povas en apartaj cirkonstancoj esti provizore efika. Sed konscia sennaciisto neniam forgesos, ke temas pri **paliativo** kaj ne pri kuracilo radikale efika...

*

Kiel mi diris averte ĉe la komenco, eblas en letera formo nur konturi la ĝeneralajn trajtojn de respondo al la interesaj demandoj, elmetitaj de K-do J.K. Espereble tamen la legantoj povos almenaŭ per mia skizo ekvidi la direkton, laŭ kiu ili mem orientu sian propran cerbumadon ; ili ekkomprenos, en kia spirito necesas esplori, observi kaj konkludi. Povus do jam nun esti metata la fina punkto al ĉi tiu skribaĵo. Ŝajnas tamen preferinde diri ankoraŭ kelkajn vortojn pri la demando :

"Kion signifas agnoski la klasbatalon?"

Kiel sciante, vortoj havas ĝenerale konkretan signifon kaj ankaŭ metaforan. Kiam oni parolas pri "klasbatalo", tiam prezentas sin antaŭ la okulojn reala batalo surstrata per diversaj armiloj inter ribelanta proletaro kaj la defendistoj de l'burĝaro. Sed plej ofte tamen la klasbatalo okazas laŭ maniero, kiu aspektas pace. Pacaspekta striko estas tamen reala batalo inter du klasoj : salajruloj unuflanke, labordonantoj aliflanke. Okazis foje, ke tiaj strikoj donis venkon al la proletoj - kaj alifojes malvenkon. Strikoj kun sangaj bataloj alterne donis ankaŭ similajn rezultojn. Centpocenta striko havas grandan ŝancon sukcesi per tute pacaj rimedoj, precipe se ĝi estas ĝenerala en la tuta koncerna industrio.

La sennaciistoj ne povas ignori la ekziston de klasoj, kaj volonte mi konsentas kun Marks, ke la klasbatalo estas unu el la faktoroj de socia progreso. Kiam subpremitaj klasoj rezignas batali por atingi pli bonajn laborkondiĉojn, pli dignan situacion en la socio ; kiam homoj perdis aŭ neniam akiris senton pri justo, egalo (pli ĝuste: ekvivalento) kaj libero, tiam la klasoj eĉ aliĝas en fermitajn kastojn, kiel ekzemple en Hindio, kaj la tuta civilizo en la koncernaj landoj povas stagnadi dum multaj jarcentoj. Necesas, ke fremda elemento - ordinare per invado - penetru tian civilizon, por ke ĝi povu trovi aŭ

akiri la emon al ŝanĝiĝo, al antaŭeniĝo. Socioj laŭklase organizitaj, mondo launacie dividita, en tio kuŝas la kaŭzoj de malpaco, de milito. La sennaciistoj devas ne nur akceli la malaperon de ĉiuj nacioj, sed ankaŭ la starigon de la regno de l'justo, de la egalo, unuvorte de l'homeco. - Sed el tio ne vidiĝas klare, ĉu estas aprobinda aŭ ne la fizika perforto, sendube pensos legantoj.

- Aprobi aŭ malaprobi perforton, tio ŝajnas al mi ekster ĉia argumentado. En socio, kies bazoj konsistas el perforto, estas neeviteble, ke en iaj cirkonstancoj homoj provos liberigi sin per armiloj. Kio ŝajnas al mi nepre malrekomendinda, tio estas la militisma organizado de l'perforto. Partioj, kies principoj estas la soldateca disciplino, la spionado, la **ĉiarimedeco**, kiel ĉe la bolŝevistoj kaj la faŝistoj, tiaj organizoj neniam sukcesos starigi vere alcelindan reĝimon. Ili portas en si ĝermojn de sklaveco. Subpremitoj povas fariĝi subpremantoj ; tiranio anstataŭi alian tiranion, sed tio neniel signifas, ke por la tuta socio reala progreso okazis.

Kiu ne volas uzi perforton pro moralaj aŭ temperamentaj konsideroj ; kiu estas male preta fari tion en specialaj cirkonstancoj, tiuj, miaopinie, povas tamen kunlabori en nia Frakcio (1). Cetere ni estas tiom malmulte nombraj, ke estus tute ridinde disputi por decidi, ĉu perfortemulo kaj rezignemulo povas aŭ ne kunlabori samcele, se ne samrimede.

Ni ĉiuj konsentas, ke nia tasko restos ankoraŭ pionira dum kelkaj generacioj ; necesas, ke internaciismaj eksperimentoj estu faritaj antaŭe, por ke ilia fiasko igu la homojn malfermi la okulojn kaj ekrigardi simpatie kaj kompreneme al la sennaciismo. Ĝis tiu tempo ni povas nur dissemi grajnoj, kiuj kaŝe, silente ekĝermos. Nuntempe estas vintre por niaj semoj. Sed ankaŭ la tritikon oni semas dum la malvarma sezono. Venos printempo ; enradikiĝos, elkreskos la semoj kaj fine maturiĝos abunda rikolto.

En sia bela poeziaĵo : "La Vojo", Zamenhof eldiris al la esperantistoj : "La nepoj vin benos, se vi pacience eltenos." Tia diro de nia Majstro ankaŭ valoras por la sennaciistoj. Ili cetere estas la plej konsekvencaj kaj fidelaj disĉiploj de la aŭtoro de nia lingvo. La "interna ideo de esperanto" signifas nenion, se ĝi ne estas ia malpreciza antcipio de nia ismo.

Esperanto estas la arbo, sennaciismo estos ties frukto.

(1) Sennaciista Frakcio. (Kompil.)

LETERO SESDEKA

Paraleloj

Ĉi tiu letero estis destinita al la partoprenontoj de l' kunsido de la Sennaciista Frakcio, kiu okazis en Manĉestro dum la SAT-Kongreso.

Lisbono, fine de julio 1936.

Ĉar la sorto faris, ke SAT-kongresojn mi ne plu partoprenas, mi almenaŭ volas per ĉi tiu letero elmontri, ke malgraŭ ĉio mi restas kore kaj anime ligita al nia komuna afero. Tamen mi turnas min nur al iu malgranda parto de l'kongresanaro : la konsciaj sennaciistoj. Tiu malplimulto, mia opinie, reprezentas atentindan forton. Iarilate ĝi estas la animo de l'SAT-movado kaj eĉ de multe pli granda nombro da esperantistoj, de tiuj, kiujn mi nomas nekonsciaj sennaciistoj. Kaj nia tasko konsistas en tio : helpi al ili akiri klaran konscion pri la ismo, kiun ili portas ĝerme en siaj koro kaj cerbo.

Kio konsistigis dum multaj jaroj la aginstigilon de l'pioniroj de la esperanta movado, tio ne estis la lingvo mem, sed la sento, kiu vivis en la koro de ĝia kreinto. Mi substrekas la vorton **sento**, por ke vi komprenu per tio, ke Zamenhof estis la unua **nekonscia sennaciisto**.

Estas tre notinda fakto, ke la unua plej grava krizo, kiun suferis la esperanta movado, koincidis kun la atakoj kaj esprimoj de malŝato al tio, kion nia majstro nomis malprecize la "interna ideo de esperantismo". Ĉiu el ni devas nepre memori tiun ĉi gravan kaj tre signifoplenan fakton : sinjoro De Bofront (Beaufront), unu el la plej elstaraj personoj de l'mondlingva movado, estis tiu, kiu plej decideme kontraŭstaris al la interna ideo Zamenhofa. Por tiu filistro, tre tipa reprezentanto de l'burga klaso, esperanto estas kaj devas resti nur helpa lingvo, kiun utilcelemaĵoj homoj alprenu por plifaciligo al siaj negocoj aŭ al siaj turismaj vojaĝoj ; esperanton alprenu kleruloj el ĉiuj nacioj, por faciligi inter si la rilatojn, por eviti dum la internaciaj kongresoj la tedon de l'tradukado ktp. Sed oni lasu for ĉian konsideron, kiu povus naski en la spirito de homoj la ideon, ke universala lingvo riskas infekti ĝiajn uzantojn per utopiaj ideoj pri tutmonda interfratiĝo, pri eblo, ke tia lingvo povus iam anstataŭi la naciajn en ilia ĝisnuna kultura rolo kaj tiel detruu la naciecan senton en la koro de la estontaj generacioj. Esperanto estas ja **sennacieca** lingvo, sed oni zorgu,

ke ĝi estu kaj ĉiam restu nur helpa interkomprenilo ; ĝi ne estu uzata por poezio kaj literaturo, sed nur por praktikaj celoj... Tiel ĝi ne difektos la naciecon en la animo de ĝiaj uzantoj.

Esence kaj resumite tia estis la starpunkto de De Bofront, la kontraŭulo de Zamenhof, kaj ĝi speguliĝas en la fama t.n. Bulonja Deklaro, farita okaze de la Unua Universala Kongreso en 1905. Sendube ĉiu el vi konas pli malpli la tekston de tiu deklaro kaj mi do ne bezonas nun citi el ĝi la parton, kiu rilatas al mia tezo. Sed estas al mi tute evidente, ke la pacama kaj konsentema Zamenhof nur kontraŭvole akceptis entute tiun deklaron. Lia koro kaŝe protestis antaŭ la motivoj, diktitaj de praktikaj konsideroj. Tiu protesto estis tiel forta, ke ĝi suferigis la animon de l'Majstro. Kaj tiagrade, ke ĉe la posta kongreso en Ĝenevo (1906) li ne plu povis elteni kaj elkriis sian indignon antaŭ la oportunismaj pretendoj de la Bofrontanoj.

Ni aŭskultu tiun eltomban voĉon kaj meditu la indignoplenan parolon :

"Se ni, batalantoj por Esperanto, propravole donis al la vasta mondo plenan rajton rigardadi Esperanton nur de ĝia flanko praktika kaj uzadi ĝin nur por nia utilo, tio ĉi kompreneble al neniu donas la rajton postuli, ke ni ĉiuj vidu en Esperanto nur aferon praktikan. Bedaŭrinde en la lasta tempo inter la esperantistoj aperis tiaj voĉoj kiuj diras : ... Esperanto estas nur lingvo ; evitu ligi eĉ tute private la esperantismon kun ia ideo... Ho, kiaj vortoj! El la timo, ke ni eble ne plaĉos al tiuj personoj, kiuj mem volas uzi esperanton nur por aferoj praktikaj por ili, ni devas ĉiuj elŝiri el nia koro tiun parton de la esperantismo, kiu estas la plej grava, la plej sankta, tiun ideon, kiu estis la ĉefa celo de la afero de Esperanto, kiu estis la stelo, kiu ĉiam gvidadis ĉiujn batalantojn por Esperanto! Ho, ne, ne, neniam! Kun energia protesto ni forĵetas tiun ĉi postulon. Se nin, la unuajn batalantojn por Esperanto, oni devigos, ke ni evitu en nia agado ĉion idean, ni indigne disŝiros kaj bruligos ĉion, kion ni skribis por Esperanto, ni nenigos kun doloro la laborojn kaj oferojn de nia tuta vivo, ni forĵetos malproksimen la verdan stelon, kiu sidas sur nia brusto, kaj ni ekkrios kun abomeno : "Kun tia Esperanto, kiu devas servi ekskluzive nur al celoj de komerco kaj praktika utileco, ni volas havi nenion komunan..."(1).

Ne sen emocio ni povas relegi la vortojn, per kiuj la mildanima Zamenhof liberigis sian koron de peza ŝarĝo. Kaj ĉi-okaze mi demandas : kiu povus prave aserti, ke, se mankus al Zamenhof tiu emo indigniĝi ĉe la pretendo de utilcelemaĵoj filistroj, li tamen posedus la genian inspiron, kiu igis lin artefari lingvon ?

Kiu legis miajn verkaĵojn, tiu certe scias, kiel alte mi taksas la racion. Ni ja ĉiam devas obei al tiu kapablo de nia homa naturo. Sed estus granda eraro, estus eĉ neracie malatenti, ignori la senton. La homo ne nur havas cerbon, sed ankaŭ koron. La sento estas kvazaŭ la motoro de niaj agoj kaj la racio devas esti nur ties direktilo.

Estas bone konate, ke Zamenhof estis instigata elpensi racian lingvon per la sopiro al la interfratiĝo de l'homoj, per la deziro al tutmonda paco. En tio kuŝas la "interna ideo de esperanto". Sed li sendube taksis tro alte la rolon de lingvo. Ne sufiĉas ja fariĝi samlingvano, por ankaŭ tuj esti samopiniano, samcelano. La aŭtoro de esperanto ne sufiĉe atentis tiun teruran fakton ke la ekzisto de nacioj, de naciecaj kulturoj, de naciecaj interesoj ktp. kreas tian fortan kaj efikan ideologion, ke ĝi blindigas, surdigas la homojn kaj tiel minacas la homaron je pereco. Por efike kontraŭbatali la naciismon, esperanto estas nepre necesa rimedo, sed ĝi tamen ne estas tute sufiĉa. Oni devas alfronti kaj ataki la monstron. Tio estas nia tasko. Ni, sennaciistoj, ekkonsciis pri la grandega danĝero, kiun konsistigas la nacieca ideo logio, kaj decidis agi konsekvence, senkompromise al la detruenda naciismo. Ni do estas la naturaj posteuloj de Zamenhof ; la sennaciismo estas la klara sekvo de lia nebula koncepto pri la interna ideo de esperantismo.

*

Ni do vidis, kiel Zamenhof indigne kontraŭstaris al la pretendoj de la De Bofront-anoj, al tiuj, kiuj celis trudi al la mondo artefaritan lingvon per la nura elmontrado de ĝiaj internaj kaj praktikaj kvalitoj. La natura konsekvenco de tio estis, ke baldaŭ aŭdiĝis voĉoj, kiuj asertis, ke la kaŭzo de l'malrapida progreso de la esperanta afero kuŝas en tio, ke la lingvo ne estas sufiĉe perfekta. Perfektigantoj vikle laboris. En 1907 ido aperis kaj grava skismo skuis la tutan mondlingvan movadon. Estas preskaŭ mirakle, ke la ideo mem pri artefarita lingvo ne estis per tia krizo entombigita por unu jarcento. Alme-

naŭ la plurjaraj polemikoj kaj diversspecaj bataloj, kiuj okazis inter idistoj kaj esperantistoj tre domaĝis al la esperanta movado...

Kio karakterizas la idistan vidpunkton, tio estas la ĉefa zorgo de ĝiaj anoj atenti nur la lingvan flankon de la afero. Ili celis "perfekton" en la lingvo ; ili volis trudi logikajn, absolutajn principojn ; ili enkondukis la racian disciplinon de la matematiko sur kampon, en kiu la sento ne povas ne ludi rolon ; ili rezonis abstrakte, kiel pri nombroj kaj ekvacioj, pri temo, kiu estas esence konkreta ; ili malatentis la postulon, ke la mondlingva movado, por esti vivkapabla, devas posedi ian animon, ian sentan movilon ; unuvorte, ili tute ne komprenis, kion la Zamenhofa intuicio sentis kaj ne klarigis...

La idista movado fiaskis. En ĝi cetere baldaŭ aperis novaj disigaj ĝermoj, naskitaj de la erara opinio, ke la lingvo povas enteni absolutan perfekton, dum ĝi povas esti nur relativa. Estus, ekzemple, ja tute ridinde argumenti, ke la angla lingvo estas pli "perfekta" ol la franca aŭ inverse.

Sed ne estas nun mia celo pritrakti tiun temon ; mi nur volas atentigi vin pri la danĝero, kiu kuŝas en la malĝusta kompreno pri la rolo kaj signifo de artefarita lingvo, en la opinio, ke nia movado devas esti nur lingva ktp. ks.

Necesas rimarki, ke la idista skismo okazis antaŭmilite, en epoko, kiam ne ankoraŭ ekzistis organizita movado laborista. Mi ne bezonas memorigi vin pri la rolo, kiun ludis SAT en la postmilita periodo. Nur estu substrekata la fakto, ke nia movado kreskis kaj prosperis tiel longe, kiel la SAT-anojn gvidis kaj impulsis la malpreciza sento sennacieca ; kiam logis ilin la originaleco de la strukturo de SAT, kiu ignoras sisteme la naciojn kaj malebligas en siaj kongresoj, ke naciaj organizoj povu trudi sian apartan vidpunkton.

Sed venis kriza periodo. Akraj polemikoj estiĝis. La Plenum-Komitato de SAT estis senkompate atakata kaj kulpigata pro elpensitaj kaj tute senbazaj mankoj, pekoj kaj eĉ "krimoj". Sufiĉas relegi la protokolaron de la Lajpciga kongreso por konstati, ke mi ne raportas troige. Kaj kio estis la ĉefa kialo de tiu sovaĝa ofensivo ? Ĝi estis la eldono de "La Laborista Esperantismo", tial ke ĝi enhavas mallongan (kvin-paĝan) ĉapitron, kiu skizas larĝ-

trajte nian sennaciismon. Kredeble vi ĉiuj legis tiun broŝuron kaj sekve mi ne bezonas longe priparoli ĝian enhavon. Mi nur rimarkigu, ke en la menciita ĉapitro (la 5-a) estas klare dirite, ke SAT ne agnoskas la sennaciismon kiel sian soci-politikan programon kaj ke la sennaciistoj ne havas en la Asocio kaj ne postulas pli da rajtoj ol la anoj de aliaj tendencoj...

Ankaŭ Zamenhof ne postulis, ke la t.n. interna ideo estu konfesata de ĉiuj esperantistoj ; sed la De Bofrontanoj ne eĉ volis toleri en la esperanta movado la ekziston de tia idealismo.

Kiam oni komparas tion, kio okazis ĉe la neŭtralaj esperantistoj dum la jaroj 1907-8-9-10 kun la okazintaĵoj el la jaroj 1929-30-31-32 en la SAT-movado, baldaŭ klare montriĝas la similo de sinteno flanke de la idistoj dum la antaŭmilita periodo kaj tiu flanke de la IPE-anoj dum la krizaj jaroj de nia movado. Ambaŭ ne volis toleri, ke oni ligu al esperanto ian ajn soci-politikan idearon. Por la De Bofrontanoj, same kiel por la gvidantoj de IPE, esperanto estas nur helpa lingvo, dume utila sole por praktikaj celoj. Moskvaj teoriemuloj, IPE-anoj, eĉ neas, ke esperanto povas influi la evoluon de naciaj lingvoj(1), kiu laŭdire devas konduki al kunfandiĝo de naciaj lingvoj, en unu komunan, "kiu kompreneble estos nek la grand-rusa, nek la germana, sed io alia". (Stalin ĉe la XVI-a kongreso de l'bolŝevista partio).

La logika konsekvenco de tiu vere reakcia teorio estas, ke laboristo ne devas elspezi la plej etan iomon da tempo kaj energio por propagandi kaj instrui esperanton. Kaj do ne estas mirige, ke eĉ en SAT-rondoj troviĝis sinceraj K-doj por deklari, ke nur la **praktika aplikado** de esperanto por klasbatalaj celoj estas pravigebla. Laŭ tiu sofisma, ĉar tute senbaza, vidmaniero estas evidente, ke perfidas iel siajn klasajn interesojn la proleto, kiu misuzas sian tempon en la propagando kaj instruado de nia lingvo. Por la "marksanoj-lingvistoj" esperantista laboristo povas pravigi sian intereson por la internacia lingvo, nur kondiĉe, ke li **apliku** ĝin por siaj klasaj celoj. Esperanto estas la rezulto de "disvolviĝ-

(1) "La kunproksimiĝo de naciaj lingvoj, kiu kondukos al unu monda lingvo, okazas sendepende de esperanto". (La nova Etapo, tria kajero, Moskvo 1932).

procedo de la burĝa socio" (1) kaj ĝis nun tiu artefarita lingvo montriĝis la plej vivkapabla. Sed "ni ne devas tamen malakcepti utiligon ankaŭ de aliaj internaciaj lingvoj, se ilia disvastigiteco faras tiun utiligon ebla" (2).

Bedaŭrinde por la "marksanoj-lingvistoj" (3), eĉ se la premisoj de ilia tezo estus ĝustaj, tamen ties konsekvencoj estas eraraj. Esperanto je ne atingis sufiĉan disvastigon por povi sukcese konkuri en la praktiko kun grandaj naciaj lingvoj. Aserti la malon, tio estas trompi sin mem aŭ celi trompi aliajn. Estus ja facile kolekti kaj mencii multege da faktoj, kiuj evidentigas la mizeran rolon, kiun ludas eĉ en la internaciaj rilatoj. Por konvinkiĝi pri tio sufiĉas travojaĝi Eŭropon kaj tiel konstati, ke en ĉiuj pli malpli grandaj urboj troviĝas librejoj, en kies montrufenestroj vidiĝas libroj kaj gazetoj el la grandaj kulturlingvoj naciaj. Sed plej ofte vi serĉus vane en tiuj samaj urboj, librejon, kie estas aĉetebraj esperantaj libroj kaj gazetoj.

Sekve, por pravigi nian partoprenon en la esperanta movado, necesas trovi aliajn motivojn ol tiujn, elmetitajn de niaj sin mem trompantaj K-doĵ. Kaj sen ia hezito mi konfesas, ke nuntempe ne ekzistas eĉ valoraj pravigiloj ekster la idealismaj : sopiro al tutmonda interfratiĝo de l' homoj, deziro labori al la faligo de l'miljaraj muroj, kiuj apartigas la popolojn, tiaj estas la instigiloj, kiuj igis Zamenhof elpensi sennaciecan lingvon kaj dediĉi sian vivon al ties disvastiĝo. Ankoraŭ nun valoras por ni la samaj instigiloj. Sed por ni, sennaciistoj, ili fariĝis eĉ pli valoraj kaj efikaj. Ni konvinkiĝis, ke ne sufiĉas starigi lingvan ponton inter la nacioj, kiel celis Zamenhof, por ke ili vivu pace unu apud la aliaj. Ni opinias, ke la nacioj devas malaperi kiel memstaraj kaj suverenaj unuoj kaj kunfandiĝi en mondregnon kun unu komuna kulturo. Ni lernis el la historio, ke la evoluo de l'homaj socioj tendencas al tia stato ; ni sekve subtenas tion, kio povas akceli la historian procezon. Tial ni estas la fervoraj

(1) Oni kp. en "La Nova Etapo" la : **Tezoj pri internacia lingvo**, prilaboritaj de la brigado de lingvo-instrua fako kaj akceptitaj de plenkunsido de Scienc-esplora Instituto de la lingvo ĉe Popolkomisario de klarigo. R.S.F.S.R. en Moskvo.

(2) Samloke.

(3) Oni kp. en la 5-a, 6-a kaj 7-a Leteroj.

adeptoj de l'mondlingva movado, kiu certe povas esti unu el la plej efikaj akceliloj.

Ni ja scias, ke la inventemo, la iniciatemo, la artefar-emo kondiĉas la malvolviĝon de l'scienco kaj tekniko. La esperantistoj t.e. tiuj, kiuj propagandas, instruas esperanton aŭ verkas en tiu lingvo, faras pioniran, sed tre utilan kaj pozitivan laboron. Eĉ la plej reakciaj esperantistoj, konsidere iliajn religiajn aŭ politikajn opiniojn. Per verkado de bonstilaj libroj, plenaj de antaŭjuĝoj kaj sen-sencaĵoj, aŭtoro esperantista povas tamen fari utilan laboron en tiu senco, ke per tio li intensigas la vivon de nia lingvo, li kreas imitindajn formojn, li pliprofundigas ĝiajn radikojn kaj tiel certigas ĝian estonton.

Pro tiaj konsideroj antaŭ 15 jaroj mi jam diris : "Kiam esperanto sukcesas en burĝaj rondoj, tiam mi kompreneble ĝojas. Konvinkita mi estas, ke lingvo universala enhavas econ revoluciigan".

*

Karaj Gek-doj, ĉar vi havas la bonŝancon kunveni en Manĉestro, okaze de l'Deksesa kongreso de SAT, mi petas, ke vi bonvolu fari al mi la plezuron aŭskulti, diskuti kaj pripensi trankvile kaj kompreneme la enhavon de ĉi tiu mia letero. Mi ne deziras, ke vi akceptu senkritike miajn ideojn. Senefikaj, senvivaj, dogmecaj farigās ideoj senkritike akceptitaj. Sed post pripensado kaj kritikado, se mia vidpunkto ŝajnas al vi ĝusta, vi tiam certe ekvidos, same klare kiel mi, ke ni ne kontraŭbatalas ventmuelilojn, imite al Don Ĥiĉoto, sed efektivaajn kaj tre danĝerajn realaĵojn. La naciismo ja estas la plej granda danĝero, kiu nunepoke minacas la homaron.

Tiu spirita malsano, tiu frenezula religio infektas eĉ la laboristajn organizojn. La komunistoj konkuras nun kun la socialistoj kaj la konservativuloj pri la plej bona maniero defendi la sendependecon de siaj respektivaj landoj. Tamen, post la fiasko de la Ligo de Nacioj, post la fiasko de la Dua kaj Tria Internacioj kaj de ĉiuj ajn provoj por starigi daŭran pacon **inter la nacioj**, ŝajnas al mi tute evidente, ke la **internaciismo**, kiel teorio por solvi la problemon pri mondpaco, montriĝis senefika, ridinde maltaŭga kaj tute kaduka.

Tamen tion ekvidi ne povas la homoj, kiuj neniam atentis la mondlingvan demandon. Vole-nevole ilia intelekta horizonto restas fermita kaj limigita per la naciaj

kadroj, per la lingvaj limoj. Tiel ne estas rilate al la esperantistoj kaj precipe al la SAT-anoj, kiuj estas sen-naciece organizitaj. Sed estas vera malnormalaĵo, duon-frenezaĵo, kiam homoj, kiuj rompis inter si la lingvajn barojn, malatentas tiun grandsignifan fakton kaj imitas la organizmanieron de la nesamlingvaj internaciistoj. Tia sinteno estas esence reakcia, perfida, nepre kontraŭ-batalenda.

Kaj tamen vi certe scias, ke la skismigintoj el la tiam bone prosperanta SAT-movado, kiuj nun demagogie kaj malsincere agitas por la rekuniĝo de la disigitaj fortoj, estas internaciisme organizitaj kaj celas trudi al ĉiuj sian kadukan, teorie kaj sperte fiaskintan sistemon. La sennaciistoj devas stari unuavice en la batalo kontraŭ tiajn reakciulojn en la esperanta movado laborista.

*

Ĉe la komenco de ĉi tiu letero mi diris, ke la sennaciistoj - la nekonsciaj kaj la konsciaj - konsistigas nuntempe la animon de la esperanta movado. Mi insistas pri tio pro la tre firma konvinko, ke nur la sennaciismo povas ja doni animon al nia komuna afero. Estas neeble trovi ĝustajn kaj efikajn pravigilojn por la laborista esperanta movado per nure praktikecaj konsideroj. Same kiel esperantistoj, kiujn influis la "interna ideo" Zamenhofs, savis antaŭmilita la mondlingvan movadon, kiun minacis la idista skismo, same ankaŭ SAT devas nuntempe savi la laboristan esperantan movadon per la helpo de la sennaciistoj.

Vi eble opinias, ke mi trograndigas la danĝeron kaj iom fantazias. Tiel ne estas : mia konvinko estas la rezulto de observoj kaj konstato de faktoj. Nur unu mi mencias. Dum mia sencela vagado mi havis en Valencio la okazon viziti la sidejon de l'tiea Laborista Esperanta Grupo. Laŭ ricevitaj informoj ĝi estas pli ol 200-membra, sed ne pli ol dek anoj flue kaj korekte parolas nian lingvon, dek aliaj pli-malpli povas komprene legi kaj fakte iom uzas ĝin.

Ĉiuj ceteraj estas nur esperantanoj, kiuj lernas la lingvon... post la revolucio. Tamen mi vidis tie personojn, kiuj ŝakludas aŭ lernas la arton tranĉi kaj ornami vestojn, dum mi ne rimarkis ian ajn interesigon pri esperanto. La konstato de tia fakto (kaj mi scias, ke ĝi bedaŭrinde

ne estas unika) povas iel pravigi la internaciisman organizmanieron de I.P.E., ĉar ja en tiu organizo, la plimulto da anoj en realo ne estas esperantistoj...

Sed, konsidere la bonon kaj estonton de esperanto, necesus esti blinda por ne vidi la grandan danĝeron, kiu kuŝas en tia stato. Tiuj esperantanoj - ne esperantistoj - povas per siaj voĉoj influi kaj decidi pri gvidado de movado, kiun ili fakte ne konas, al kiu ili efektive ne partoprenas ; ili restas tute sub la influo de siaj nacilingvaj partigazetoj ; unuvorte, ili ne povas akiri per la uzado de nia lingvo menson de vera mondĉivitano. Ili povas esti nur internaciistoj t.e. en realo nekonsciaj naciistoj.

Aliflanke oni bonvolu primediti jenan alian fakton. En Hispanio mi eksciis, ke tie estas kelkaj gvidantoj de laboristaj organizoj, kiuj simpatias al ido aŭ al occidental. Fakte, tiuj homoj scias preskaŭ nenion pri la mondlingva demando ; sed ili legis aŭ aŭdis, ke la du laste nomitaj lingvoprojektoj estas pli freŝdataj kaj sekve devas esti pli "perfektaj" ol esperanto.

Konante tiujn du faktojn, ŝajnas al mi facile por ĉiu pripensema homo prezenti al si jenan okazeblaĵon. Iun belan tagon aperas en la Internacio, kies plimulto da anoj fakte ne estas esperantistoj, belparolulo, kiun kaptis la emo agiti por la plej moderna kaj "perfekta" lingvo. Kiu neos, ke tia ulo ne povus tie akiri grandan influon ? Pri la sekvoj sufiĉas koni la historion pri la mondlingva demando por tuj ekvidi, kiom domaĝaj kaj detruaj ili estus.

Sen ia ajn timo pri eventuala kontraŭdiro mi resume asertas : 1) La internaciisma organizmaniero en la esperanta movado estas absurda, necelkonforma, plie danĝera kaj sekve nepre kontraŭbatalenda ; 2) la internaciismo kiel sistemo por organizi pacan mondon montriĝas fiaska pli kaj pli ĉiutage ; 3) oni ne devas celi al la organizado de pacaj rilatoj inter la nacioj, sed al ilia malaperigo kaj kunfando en mondregnon ; 4) la sennaciistoj estas la sole konsekvencaj mondlingvanoj, la solaj, kiuj iniciate, pionire faras pozitivan laboron.

Sed mi volonte konfesos, ke nia tasko ne povas facile logi homojn, kiuj revas en proksima estonto realigi sian idealon. Verŝajne neniu el la plej junaj sennaciistoj vidos la efektivigon de siaj aspiroj. Sed ĉu tio estas sufiĉa motivo por rezigni la batalon kaj resti senage ? Forpasis 88 jaroj, de kiam Karlo Marks kaj Frederiko Engels

publikigis sian Manifeston kaj tamen nun ankoraŭ nenie ekzistas en la mondo socialisma regno. Tamen neniu proleto kontraŭdiros, ke oni devas batali por la starigo de justa, senklasa kaj libera socio. Cetere, laŭ la diroj de Lenin, Trocki k.a. famuloj, la socialismo ne povas stariĝi en unu sola lando. Ni, sennaciistoj, asertas plie, ke la vera socialismo stariĝos nur, kiam la laboristoj sin organizos sennaciece, laŭindustrie, mondscale kaj ignoros la naciojn. Kaj ni konsideras esence reakcia ĉiun agitadon, ĉian batalon, kies celo estas reakiri aŭ konservi la sendependecon de iu ajn nacio.

La tasko, kiu staras antaŭ ni estas ja grandega kaj neplenumbla eĉ per tutviva agado. Ĉu pro tio ni interplektu la brakojn kaj rifuzu laboradi ? Kun mi vi diros : ne, certe ne! La agado estas konsistoparto de l'vivo. Ni volas vivi kaj sekve agadi... Kaj tiam stariĝas la demando : al kiu tasko ni dediĉu nian energion ? Mi kredas, ke ne ekzistas pli nobla kaj laŭcela tasko ol tiu, kiun difinas al ni la sennaciismo. Kaj ĝi estas pozitiva. Ni devas unue ellernadi esperanton, ĝis ni konstatos, ke ĝi estas al ni pli facila, pli intima ol nia gepatra lingvo ; ĉiel ni devas penadi por akiri menson de mondcivitano kaj tiucele detruu en ni ĉian naciemon. Ĉu tio ne estas inda laboro ? Certe! Kaj ĝi ne malebligas, ke ni partoprenu la batalojn de niaj klasfratoj, kiam tiuj bataloj estas **reale klasecaj kaj ne naciecaj...**

Ĉu estas saĝe luli sin en iluzioj, trompi sin mem per la kredo, ke la nuntempaj partioj internaciistaj preparas efektivan pacon en la mondo ? Ni povis kun ĉagreno konstati lastatempe, ke en Anglio kaj Francio la politiko de tiuj partioj, se ĝi estus aplikata, kondukus nepre al milito, pretekste defendi la sendependecon de Etiopio!... Sennaciistoj ne havas pli da simpatio por la Neguso ol por Musolini ; kaj ili ridas en la vizaĝon de tiuj naivuloj, kiuj sentas kompaton por la malkuraĝa forkurinto, kiam li pledas por "sia" popolo antaŭ la Ĝeneva areopago. Sennaciistoj sentas kompaton nur por la etiopoj, kiuj oni devigis morti kaj mortigi por defendi la interesojn de siaj subpremantoj : la imperiestro kaj la reĝoj el Etiopio. Musolini ne portis al la etiopoj liberon, sed ilia sorto ne estos tamen pli malbona ol antaŭe. Almenaŭ la tekniko eniras la landon kaj tio estas necesa premiso por la emancipiĝo de l'laboristoj.

Ĉar ni ne volas trompi nin mem, ni devas jam antaŭ-
vidi, ke prepariĝas nova mondbuĉado, kiu estos pli terura
kaj detrua ol la lasta. La sennaciistoj faru ĉion eblan
por ne viktimiĝi en tiu patriota frenezaĵo. Nia Frakcio
helpu laŭpove por la antaŭsavo al la membroj, kies vivo
estas minacata per militservaj postuloj...

Gesennaciistoj ! pozitivaj taskoj staras antaŭ ni ; la
manikojn ni suprenfaldu kaj eklaboru senlace, obstine
kaj kun trankvila konscienco, ĉar ni havos nenian respon-
decon en la prepariĝanta katastrofo. Antaŭen ! malgraŭ
tomboj kaj kadavroj !

El la mizerhava kaj tamen nacie sendependa Portu-
galio mi sendas al vi ĉiuj mian sennaciecan kaj fratecan
saluton.

*

El diversaj leteroj

*

Mankas en nia movado individuoj tute memstare pensantaj. Tro da niaj kunlaborantoj papage parolas marksisme. Ili kapablas nur imite ripeti, kion jam diris politikaj gvidistoj. Ni ja devas pritrakti aktualajn temojn, sed rigardante ilin de nia sennacieca vidpunkto. Ni ne devas celi trovi solvon al la **nunaj** problemoj, sed provi eltrovi en la interpuŝiĝantaj fortoj la kaŝitan fluon, kiu kondukos la homaron al unuiĝo, al sennacieciĝo. Unuvorte, nia movado devas havi sian propran karakteron, veran originalon. Se ni ne sukcesos doni al ĝi tiun necese originalan fizionomion, restante tamen en kontakto kun ĉiuj tendencoj el la laborista movado, tiam S.A.T. montriĝos kiel superflua organizo ; tiam la sperto estos montrinta, ke U.E.A. tute sufiĉas por la aplikado de esperanto...

4-10-1925.

*

Ne multe utilas esti kapabla ektrovi veron, se tiu ekstrovo okazas tro malfrue : gvidantoj ne rajtas (morale, spirite) erari...

*

Erarintoj bonintencaj ne estas punindaj ; sed ilia erarinteco ne donas al ili la aŭtoritaton por aplombe aserti, proponi, konsili...

*

Oni ja povas lerni el siaj eraroj, sed necesas por tio plene konscii, ke oni eraris kaj klare ekvidi la kaŭzojn de eraremo. Plie, necesas havi la kuraĝon konfesi publike siajn erarojn. Sen tio oni kapablas nur transiri de malnova eraro al nova.

*

Ekzistas gvidistoj, kiuj bone konscias pri eraroj faritaj, sed ili ne volas konfesi ilin, tial ke ilia ĉefa celo estas teni kaj konservi la gvidadon.

Gvidado estas necesa, sed gvidisteco estas nepre evitinda.

*

Gvidemo, komandemo, regemo estas ĉe multaj homoj la plej forta pasio. Ĉe kelkaj la riĉiĝemo estas nur la konsekvenco de ordonemo : en kapitalisma socio la mono ja donas pli da ŝancoj por kontentigi sian komandeman pasion.

*

Kiam mi aŭdas la kriojn : "ni savu la ĉinan kulturon, la francan, la rusan" ktp. el la buŝo de ĉinoj, francoj, rusoj k.a., tiam mi pensas : "pereu ĉiuj naciaj kulturoj kaj el iliaj ruinoj starigu mondkulturo pere de esperanto".

*

Kiuj sincere, konscie kaj laŭcele penadas funde lerni nian lingvon kaj praktikadas ĝin ĉiutage por eltrovi ĝiajn kaŝitajn trezorojn, tiuj faras senbrue, modeste, multe pli utilan kaj valoran laboron ol la oportunistaj kriemuloj, kiuj kredas agi, dum ili nur vane baraktas por akordigi neakordigeblaĵojn.

*

Generalo devas ĉiam antaŭvidi la eblon de malvenko kaj esti preparita por orda malantaŭeniĝo... Batalu la sanktan batalon kaj neniam toleru, ke mensoguloj povu havi la saman aŭtoritaton kiel verdiruloj.

*

Ne malofte okazas, ke galriĉa homo elmontras ĝentilon per afablaĵoj kaj karesnomoj ; sed tio kvazaŭ similas al la maldika tavolo sukera, kiu envolas amaran, vomigan pilolon.

*

Se galhava etcerbulo volas honori vin laŭ maniero, kiun vi ne ŝatas, ne kredu, ke sufiĉos malakcepti la honorigon per ĝentila elturniĝo, por eviti lian elverŝon de galo sur vin, pro la malakcepto.

*

Galhavulo kapablas miel-pipre kaj sofisme argumenti, ke ekspluatito devas esti dankema al sia ekspluatanto, se tiu lasta estas regno.

*

... Kio estas naciismo ? Nu, respondo ŝajnas al mi facila : Ĉe proletoj, ĝi tute simple estas la stulta prefero esti trompata de samnaciaj fipolitikuloj kaj ekspluatata de samnaciaj mastroj ; ĉe burĝoj, ĝi estas egoista deziro akapari la tutan ekspluatrajton en iu limigita teritorio.

Burĝoj ne estas tiel naivaj kiel proletoj, ili volonte ekspluatas fremdajn laboristojn, se ĉi tiuj lastaj estas same lertaj kiel la enlandaj kaj se ili konsentas ricevi malpli altan salajron...

*

... Mi dronas meze de budaisma literaturo kaj plifortigās mia konvinko, ke homoj - aŭ mitoj - kiel Budao (Ŝakamunio), Jezuo aŭ Mahometo havis pli da influo sur la socian vivon ol la ekonomio. Kaj la samon oni ankaŭ povas diri pri Marks mem. La antiidealisma marksismo fariĝis ia ideologio kaj kiel tia ĝi efikas. Ortodoksaj marksistoj kredas (estas ja nur kredo), ke la fama aŭtoro de l' "Kapitalo" eltrovis la leĝojn, laŭ kiuj evoluas la socioj, tial en la nomo de l' "sciencia socialismo" Stalin kaj K-io perforte provas trudi tiujn leĝojn al 170 milionoj da homoj.

Kaj rimarku, ke en efektivo tiuj materialistoj staras sur la sama grundo kiel la religiaj metafizikuloj, kiuj precipe akcentas la **estontan** vivon : pro la netrafebla celo feliĉigi la **estontajn** generaciojn, la oligarkoj el la Kremlo oferas la vivon kaj feliĉon de nuntempe vivantaj homoj...

*

La tuta mondo ja frenezigās ; sed vi konsideru, ke se saĝa homo ial devus vivi en frenezulejo, tio ne signifas, ke li ankaŭ konduku tie kiel frenezulo. Kaj por savi homon, kiu falis en puton, oni ne devas tien sin ĵeti.

*

Pli ol iam antaŭe mi estas konvinkita, ke la homaro neniam trovos pacon, ke la proletaro neniam tute emancipiĝos, daŭre irante laŭ la internaciisma vojo. La rajto de l'popoloj al memdispono estas funebra farso : ni celu la rajton de ĉiuj homoj ĝui la riĉaĵojn el la tuta tero ; iu ajn parto de nia planedo ne devas aparteni speciale al iu ajn aparta popolo.

*

La naciismo estas iu aspekto de la absolutismo ; sekve, eĉ se sur nia planedo ekzistus nur unu regno, la paco tamen ne estus certigata, se en la menso de l'mond-regnanoj ankoraŭ vivus absolutemo.

*

... Mi legis pri la mirinde bone organizita olimpiado en Berlino kaj pri la entuziasma akcepto al la francoj. Tio plifirmigas mian konvinkon, jam delonge akiritan, ke estus beno por la homaro, se la germana kaj franca popoloj iel aŭ aliel kunfandiĝus. 15-8-1936.

*

Pro manko de kompetento mi ne kuraĝus **aserti**, rilate al ekonomiaj aferoj. Sed la fakuloj (marksistaj kaj aliaj) tiom eraris en siaj antaŭdiroj, ke mi almenaŭ ne timas konfidi al vi, kion sufloras mia intuicio : oni ne devas aboli la monon, sed celi al starigo de sennacieca, sen-intereza mono, garantiata kontraŭ valorreduktiĝo kaj uz-ebla tra la tuta mondo. Senmona socio necesigus monstran burokracion, kiu certe limigus la liberon kaj iniciativon de l'homoj.

Cetere, vi ne pensu, ke tio estas ĉe mi nova ideo ; jam en 1923 mi diris tion en iu el miaj artikoloj pri mia vojaĝo al Sovetio.

Sennaciecaj lingvo, mono kaj organiz-maniero devus esti la devizo de ĉiuj, kiuj volas **celkonforme** klopodadi por starigo de racia, justa, paca socio tutmonda.

6-6-1937.

*

... Dum tra la tuta mondo ne ekzistos sufiĉe fortaj kernoj el sennaciistoj, plene konsciaj pri la nepra neceso ignori la naciojn kaj organizi sennaciecan mondmastrumadon, ĝis tiam la demandoj, kuŝantaj nuntempe inter la nacioj, ne estos solveblaj aliel ol per la milito.

Neniu Hitler, neniu Musolini povus tute malebligi la lernadon kaj praktikadon de esperanto al la milionoj da komunistoj, socialistoj k.a. revoluciuloj, kiujn ili subpremas, se la subprematoj decidus ellerni nian lingvon kun la firma konvinko, ke per tio ili preparas estontan venkon.

Kristanoj utiligis la katakombojn dum tri jarcentoj por praktiki sian religion. Ili kaŝe kopiis la evangeliojn. Same povus fari la revoluciuloj, rilate esperantaĵojn, se

ili estus, kiel ni, firme konvinkitaj, ke por organizi racie la mondon, necesas unue akiri menson de mondciĉivitano t.e. fariĝi sennaciisto.

Tio estas la "interna ideo de esperanto", pri kiu Zamenhof mem ne havis tute klaran komprenon. Tial vi ne dubu ke nia movado, ne ankoraŭ sufiĉe surbazita ideologie, indas, ke oni dediĉu al ĝi ĉiujn siajn fortojn, eĉ sian vivon...

*

Jes ja, mi ĉiam lernis kaj ankoraŭ lernas, pripensas, cerbumas. Kelkfoje problemoj fariĝas al mi tute klaraj, kiuj dum jaroj staris antaŭ mi en nebulo. Sed mi plene konscias, ke neniam la homo tute kontentige sukcesos respondi la enigmon de l'vivo. Jam delonge mi vane serĉas respondon al la demando : **intuicio-racio**.

Neniu el la respondoj de la diversaj - inter si kontraŭdirantaj - filozofoj kontentigas min. Plurfoje mi povis konstati, ke mia intuicio ne trompis min, kvankam mi ne povus per raciaj argumentoj pravigi mian konvinkon. En 1922, ekzemple, dum mia trisemajna ĉeesto en Sovetio mi havis la senton, ke la socialisma afero tie fiaskos, ke niaj esperoj en la bonfaro de l'bolŝevismo estas senbazaj. Sed tiam mi ne kapablus per tute raciaj argumentoj pravigi mian intuician opinion. Kiel ano de Komintern, mi male penis eltrovi argumentojn, kiuj kontraŭis al mia intuicio. Ĉi tiu lasta estis tamen prava. Jaroj forpasis kaj finfine per observado kaj kolekto de faktoj mia racio venis al la sama konkludo kiel mia intuicio kelkajn jarojn antaŭe...

*

... La fakto, ke Bugle (1) ne aliĝas al la marksismo estas tre notinda. Kiam bolŝevistoj fanfaronas pri Prenant (2), tiam oni povas rebati : Bugle! Almenaŭ la pretendo de la marksistoj, ke ili propagandas kaj instruas la "sciencan socialismon" estas nepravigebla : **scienca vero estas akceptata de ĉiuj scienculoj**. Se tiel ne estas, tiam temas nur pri hipotezo.

Bonvolu rimarki, ke, se fakte la marksismo estus scienca vero, ni ne rajtus kritiki ĝin en S.A.T. - Nia sendogmeo ne povus, ekzemple, pravigi la publikigon de artikolo, en kiu fantazia malkompetentulo argumentaĉus, ke la tero ne estas globo, ke ĝi ne estas ĉirkaŭirebla k.s.

(1) France : **Bouglé**, fama sociologo, direktoro de **Supera Instruista Seminario**. (Kompil.) (2) Franca profesoro. (Kompil.)

BIBLIOGRAFIO

* havebla ĉe SAT, 67 avenue Gambetta, F 75020 PARIS

** havebla ĉe Cercle amical esp. de l'Agenais, F 47340 LAROQUE
elĉ. = elĉerpita

VERKOJ DE E. LANTI

- * Oŭ en est la question de la langue internationale elĉ.
- * For la neŭtralismon! elĉ.
- * La laborista esperantismo **
- * Manifesto de la Sennaciistoj *
- * Naciismo **
- * Vortoj de Kdo E. Lanti * kaj **
- * Leteroj de E. Lanti * kaj **
- * Fredo (en "Vivo de Lanti" de Borsboom) *
- * El Verkoj de Lanti (unua volumo) **
Absolutismo - Herezulo - Herezaĵo - Adamaĵoj
- * El Verkoj de Lanti (dua volumo) **
Tri semajnojn en Rusio - Epiloge - Tro Plena Gramatiko
- * El Verkoj de Lanti (tria volumo) **
Artikoloj - Paroladoj - Leteroj (1937 - 1946)

Kunlabore kun Ivon :

- * Ĉu socialismo konstruiĝas en Sovetio ? **

TRADUKOJ DE E. LANTI

- * Tri Verkoj de Volter elĉ.
- * Skizo pri filozofio de la homa digno (Gille) *
- * La Veraj Interparoladoj de Sokrato (Han Riner) **
- * La Konflikto (Le Dantek) + Dubi (artikolaro de Alain)**

PRI E. LANTI :

- Vivo de Lanti (E. Borsboom) *

*

*Tiu ĉi volumo estas reeldono de la samtitola libro
aperinta en 1940
ĉe SAT, 67 av. Gambetta, 75020 Paris*